

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 103 (183)

MELBURNO

Jan.-Feb., 1972

BRILE SUKCESA KONGRESO EN KOLEGIA ATMOSFERO

Ministro por Turismo, la Hon. Vance Dickie, malfermis la 18-an Aŭstralian Esperanto-Kongreson

"Melburno estas konata kiel urbo ĉarma kaj digna. Tiu etoso de ĉarmo kaj digno trovis kernecan formon en la kongresloko de la 18-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, kiu okazis inter la 2-a kaj 8-a de Januaro, 1972.

En 1887, tiu favorjaro en kiu D-ro Zamenhof prezentis Esperanton al la mondo, estis konstruata en la ĉefurbo de la tiama kolonio Viktorio la universitata Kolegio Queen's.

En Januaro 1972 do, Queen's estis matura, tradicio-riĉa kunvenejo por la praktikantoj de la jam matura Internacia Lingvo.

Nur parto de la Kolegio datiĝas al 1887. La kongresanoj loĝis tre komforte en moderna alo (alo "Johnson") kaj manĝis en la bela kaj impona Halo Eakins".

Tiel skribis Kongresanino Ruth McGrath, kiu vojaĝis 2.100 mejlojn de Perth al Melburno por ĉeesti la kongreson.

Belaj arboj de la kolegia parko plezurigis la tutan atmosferon, kvazaŭ kamparecan, kvankam la Kolegio situas nur 15 minutojn for de la urbcentro de Melburno, bonvena distanco por "aĉetavidaĵ" samideaninoj, kiuj dum paŭzoj de la kongreso povis butikumi en la modernaj magazenoj. La sperta stabaro de la Kolegio estis je dispono de la kongresanoj, kiuj ricevis bongustajn manĝaĵojn kaj komfortan ĉambron, po \$7.50 tage, plej modera prezo en la nuna tempo.

Propaganda Laboro

La Inform-Oficisto de la L. K. K., S-ro Arnold Baldwin, bonege preparis la informadon de la gazetaro, Radio kaj Televido. Sekve de tio la granda ĵurnalo "AGE" (3.1.72) aperigis longan intervjuon kun S-ro Ken Linton kaj la posttagmeza ĵurnalo "Herald" (5.1.72) presis intervjuon kun S-ino Fay Koppel, ambaŭ artikoloj kun bildoj de la intervjuitoj. "Radio Australia", la kurtanda radiostacio de la aŭstralia registaro, surbendigis intervjuon kun S-roj I. Maddern, K. Linton, R. Robertson kaj H. Koppel por sia novajservo al Azio.

Preskaŭ ĉiutage aperis novaĵoj pri la kongreso en la gazetaro kaj Radio, kaj la televidaj stacioj prezentis la solenan inaŭguron. Elstaris preskaŭ tutaĝa artikolo en "Herald" (3.1.72) "The star gives them away" (La stelo malkaŝas ilin), kun fotografaĵoj pri la familio Payne, F-ino A. Godfrey kaj S-roj W. Chandler, K. Stanev kaj E. Tronerud. La tutaŭstralia presagentejo "Australian Associated Press" transprenis la novaĵojn, kaj dekoj da raportoj aperis tra la vasta kontinento.

La Kongreso komenciĝas

Sabaton, 1-1-72, la membroj de la Kongres-Komitato eklaboris en la Kolegio Queen's. En la antaŭhala de la granda manĝalono "Eakins Hall" S-ro A-thur Heathfield kun la helpo de S-roj Reed, McLochlan kaj Tronerud instalas la grandan Ekspozicion de Esperantistoj,

ricevitaj el tutmondo. Li meritas nian dankon pro multhora laboro ĉeĥeje por prepari la diversajn erojn, laŭteme kunigi kaj poste munti ilin sur grandaj ekspoziciaj tabuloj. Nete kaj alloge aspektis la ekspozicio kaj vekis la intereson de la Ministro por Turismo, al kiu Arthur montris ĝin.

Samtempe Kongres-Sekretario Herbert Koppel instalas specialan Kongresan Oficejon, proksime al la Kongresejo, en kiu deĵoris S-ino Adrienne Paling, F-ino Vera Strachan kaj S-ino Fay Koppel. Ke preskaŭ \$5000 trapasis la manojn de tiuj ĉi virinoj atestas al la granda laboro kiun ili faris, akceptante monon por loĝado, ekskursoj, manĝoj, fotografajoj kaj bildpoŝtkartoj. En la kongresejo mem, S-ro Arnold Baldwin kun S-ro H. Rosengren, dekoraciis la halon per E-flago kaj grandega bildo de D-ro Zamenhof. La Libro-Servo funkciis sub S-ino Ivy Fallu kaj vendis librojn dum la kongreso por \$237.45, bona sumo, kiu certe plezurigas la ĉefperanton Tom Elliott.

Kiam vesperiĝis la Transporta Servo, sub S-ro Maurice Fordham. S-roj L. McLochlan, E. Tronerud, A. Baldwin, M. Cohen, A. Heathfield kaj frualveninta Volo Gueltling (Sydney) kunlaboris aŭtomobile por transporti 22 kongresanojn el Sidnejo kaj Kvinlando de la Stacidomo al la Kolegio, kie S-inoj M. Casey kaj A. Hearn refreŝigis la lacajn vojaĝintojn.

La Di-Servo

Forte impresis al la ĉeestantoj, kiel konvena komenco por dignoplena kongreso, la Di-Servo en la bela kapelo de la Kolegio; kaj sendube ĉiu kantis emocie:

"Patro nia ! ni alvenis
Trans la lando, trans la mar';
kaj per unu lingvo laŭdas
Vin, la Patron de l'homar'.
La espero por frateco
Estis la gvidanta stel';
La finiĝo de malpacoj
Estas nia sankta cel'."

Citante la 13-an ĉapitron de Kor. I — sen amo nenio havas utilon aŭ valoron — Pastro C. C. Cowling en sia prediko komparis la religion keĵ E-on. Li klarigis, ke kredi je Dio, same kiel kredi je E-o, signifas "kredi pri ties potenco por la bono de la mondo, kaj samtempe vivi laŭ tiu kredo". Ambaŭ konsistigas vivovojojn.

La Bonveniga Vespero

Samvespere, 2/1 okazis en la kongresejo la Bonveniga Vespero. Kontribuis S-ro Paul Schwerin per ŝercrakontoj, S-ro F. Mueller-Sorau per kanto kaj legendo kaj S-ino Margaret Liston, kiu majstre

ludis sola amuzan skeĉon "La Ĉapelo", S-ro H. Koppel distribuis libro-premiojn al 6 kongresanoj kaj prezentis al la kongresanoj Majorinon Isabel Gale, kiu ĵus ricevis de la Reĝino la ordenon M.B.E. (Membro de da Brita Imperio). S-ino M. Sanders akompanis la komunan kantadon de la kongresanoj, kiuj finis la vesperon en la manĝosalono. Ni esprimis dankon al S-inoj M. Casey kaj M. Frogley kaj al F-ino Ann Hearn, kiuj forte laboris ĉe antaŭtagmezaj, posttagmezaj kaj vesperaj manĝetoj.

Inaŭguro de la Kongreso

Lunde (3/1): Solena malfermo de la kongreso. Neniām antaŭe ĉeestis tiom da gazet-, radio- kaj televidaj raportantoj, la lastaj fotografis kaj surbendigis la paroladojn. Kompreneble, estis la Ministro por Turismo, la Hon. Vance Dickie, kiu kaŭzis la alvenon de tiom granda nombro da raportistoj. Akurate je la 10-a la honora gasto, belaspekta altstatura sinjoro, eniris la kongresejon, akompanate de S-roj Maddern, Heathfield kaj Koppel, kiuj prezentis la gaston al la kongresa prezidanto Ken Linton.

Post kantado de la Brita Nacia Himno en Esperanto kaj piano-solo de Stanley Korman, S-ro Linton bonvenigis la kongresanojn kaj petis la Ministron malfermi la Kongreson. La Ministro laŭdis la meritojn de la Internacia Lingvo kaj konfesis ke dum siaj multaj transmaraj vojaĝoj li ofte sin sentis je granda malavantaĝo dependi de interpretistoj. Dum siaj lernejoj jaroj S-ro Dickie unue aŭdis pri Esperanto, sed malfeliĉe lia lernejo, la gimnazio de Bacchus Marsh, instruis al li nur la latinan kaj francan lingvojn. Li ĝojis bonvenigi la kongresanojn al bela Melburno kaj deklaris la kongreson oficiale malferma. (Aplaŭdo)

Post pianulado la Ministro adiaŭis kaj foriris, akompanate de S-roj A. Heathfield kaj I. Maddern, kiuj regalas lin en Eakins Halo dum li inspektis la Ekspozicion.

S-ro K. Linton daŭrigis la inaŭguron. Sekvis la salutoj de diversaj organizaĵoj. S-ro Linton satutis nome de U.E.A., S-ro V. Gueltling nome de S.A.T. kaj S-ro V. J. Timmins nome de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista kaj grupo en Hornsby. S-ro K. Stanev, novenmigrinto el Bulgario, nun el Adelaide, emfazis la gravecon de Esperanto por enmigrantoj, kiuj ankoraŭ ne bone scipovas la anglan lingvon. En la nomo de la aŭstraliaj E-kluboj nun salutis: S-ino Ruth McGrath (Perth), S-ro C. Stevenson (Adelaide), S-ro H. Rosengren (Melbourne E-Societo), S-ro A. Heathfield (Orientaj antaŭurboj de Melburno), S-ino A. Paling

(Orrong E-grupo), S-ro I. Heldzingen (Boronia E-Grupo), S-ino M. Wybenga (Morwell), S-ro N. Gamble (Canberra), S-ro J. Matasin (Sydney) S-ro A. Cocking (Manly), S-ro R. Robertson (N.S.W. Federacio), S-ino D. Sinclair (Federacio de Kvinslando), S-ro J. Allen (Brisbane), S-ino L. Buchan (Toowoomba), kaj S-ro J. Moore (Rockhampton). Post fermaj vortoj de S-ro Linton la ĉeestantoj kantis La Esperon.

Honore al John Booth, M.C.E., B.Sc. okazis marde, 4/1, inaŭguro de Memoriga Tabulo ĉe 25 Rathdowne Street, Carlton, kie, je 10-e de Februaro 1905, S-ro John Booth, konata inĝeniero kaj membro de la konsilantaro de la Melburna Universitato, fondis la unuan E-Societon en Aŭstralio.

Tiu domo nun apartenas al la "Reklam-Agentejo Mooney-Webb", kies estro, S-ro Webb, donis afable la permeson alŭksi la tabulon sur ekstera muro kaj uzi lian privatan oficejon por solena akcepto. Bedaŭrinde, pro manko de spaco, nur 25 personoj povis ĉeesti tiun akcepton, kaj la L.K.K. devis vole nevole limigi la nombron al po unu reprezentanto de ĉiu E-Societo en Aŭstralio.

Akurate je la 11-a alvenis, kun edzino, la honora gasto, Konsilanto David Wang, kiu reprezentas tiun urboparton en la Melburna Konsilantaro. Dum kongresanoj amasiĝis ekster la domo, en trafikoplena strato, S-ro K. Linton bonvensalutis Konsilanton Wang, kiu en sia parolado rakontis kiel li, malriĉa enmigrinto el Hong Kong, mem spertis la malfacilaĵojn de fremda lingvo. Li pledis por enkonduko de Esperanto en la lernejoj de Aŭstralio kaj senvualigis la belan tabulon, senkoste faritan de "Apex Engraving", la firmao en kiu deĵoras S-ro Linton.

ĉeestis ĵurnalistoj, kaj ankoraŭ estis oportuno por fari "grandan bruon" pri Esperanto en la gazetaro.

La Kongreso laboris

Aliĝis al la kongreso 193 ĝes-anoj, el kiuj 125 fakte ĉeestis. Laŭstate venis el Viktorio 65, el Nov-Suda Kimrujo 37, el Kvinslando 8, el Okcidenta Aŭstralio 8, el Suda Aŭstralio 5, el A.C.T. 1 kaj el Tasmanio 1. Ĝi estis la plej granda iam organizita.

S-ro K. Linton malfermis la ĝeneralan kunvenon de A.E.A. kaj la ĉeestantoj observis 2 minutojn da silento por la mortintaj samideanoj dum la pasintaj 2 jaroj. (S-roj A. Feldmayr, Sydney; J. Finch, Perth; R. Rawson, Melbourne; G. Mrongovius, Melbourne; W. Scarfe, Dimboola). S-ro C. Goldsmith anoncis ke Kvinslando gajnis la 1-an Premion en la interŝtata konkurso per 687% kaj li transdonis al S-ino Doris Sinclair diplomon kaj anoncis ke la Kvinslanda Federacio krome ricevos librojn en la valoro de \$20.

Pri la agado de A.E.A. S-ro C. Goldsmith donis detalan raporton (vidu aliloke), sed ni menciuj ĉiloke ke la membraro konsistis el 393 membroj (354 individuaj kaj 39 asociaj). Li dankis la redaktoron de "Australian Esperantist" S-ron F. R. Banham, la ekspedinton, F-inon V. Cox, la nunan ekspedanton, S-inon M. Fordham, la eks-libro-serviston, S-inon I. Fallu, la nunan Libro-Serviston, S-ron Tom Elliott. Li dankis S-ron Linton kaj S-ron Koppel (Vic-Sekretario) pro ĝisnuna kunlaboro kaj anoncis ke li deziras ekŝigi de la sekretaria ofico, sed ke li estas preta daŭrigi laboron kiel Administranto de la Koresponda Kurso. (S-ro Matasin aprobis kaj S-ro Mueller-Sorau subtenis akcepton de la raporto).

S-ro Les Scott donis la Kasistan Raporton. Ĉar la financoj estis sufiĉe sanaj, la membrototizo restas kiel ĝis nun. Sed la kasisto proponis ke ni havu asocian membrecon por ĉiuj kluboj kaj Federacioj je \$3.-. Nur tiuj organizoj kiuj pagas la asocian kotizon rajtas aĉeti librojn je rabatita prezo. (S-ro Chandler aprobis kaj S-ro Timmins subtenis akcepton de la kasista raporto).

Raporton de la Public-Oficisto Petley legis S-ro Goldsmith. Ĝin aprobis S-ino Buchan kaj subtenis S-ro Moore. S-ro Goldsmith raportis ke la Libro-Servo bone funkcias, ke ĉiuj aliĝintaj kluboj ricevos 10%-an rabaton, ke la libro-servo pagos poŝtkostojn por mendoj pli altaj ol \$3, sed ke por mendoj de malpli ol \$3 la mendinto devos pagi la poŝtel-spezojn (Raporto akceptita de V. Gueltling, subtenita de S-ino I. Fallu).

TO HONOUR THE MEMORY OF

JOHN BOOTH, M.C.E., B.Sc.

WHO IN THIS BUILDING ON

10th FEBRUARY, 1905

FOUNDED THE FIRST

ESPERANTO SOCIETY IN AUSTRALIA

THIS PLAQUE WAS UNVEILED BY

COUNCILLOR DAVID WANG

ON 4th JANUARY, 1972

DURING THE 18th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS:

K. G. LINTON
CONGRESS PRESIDENT

HERBERT KUPPEL
HON. CONGRESS SECRETARY

Sekvis mallonga regalo de la gastoj interne de la domo, kie S-ro A. Heathfield, F-ino A. Hearn kaj S-ino M. Frogley antaŭe preparis kaj poste servis trinkaĵojn kaj biskvitajn frandaĵojn al la honorgastoj. (Gratulojn al S-ro Arthur Heathfield pro liaj bongustaĵoj!). Denove

Ciuj rapo:toj estis unuanime akceptitaj Sekvis la elekto de la nova Estraro. S-ro Linton proponis S-ron R. Robertson kiel Prezidanton (subtenis S-ro A. Culey). S-ro Chandler proponis S-rojn K. Linton kaj I. Maddern kiel Vic-Prezidantojn (subtenis S-ro Gueltling). S-ro Goldsmith proponis S-ron Russell Baxter kiel 1-an Sekretarion (subtenis S-ro Timmins). S-ro Matasin proponis S-ron H. Koppel kiel 2-an Sekretarion (subtenis S-ro Moore). S-ro Matasin proponis S-ron L. Scott kiel Kasiston (subtenis S-ro Moore). Pri la posteno de Inform-Oficisto okazis diskuto. Pro malsano S-ro Petley ne deziras daŭrigi por tuta Aŭstralio, sed li estas preta labori en Kvinslando. La kunveno akceptis proponon de S-ro Linton ke ni lasu la decidon pri tiu posteno ĝis taŭga persono estos trovata. S-ro Linton proponis ke S-ro C. Goldsmith elektiĝu kiel Administranto de la Korespondaj Kursoj. (subtenis S-ro Chandler). S-ro Chandler proponis S-ron G. Thatcher kiel Kaskontroliston (subtenis S-ro Matasin). La membraro voĉdonis kaj elektis unuanime la novan Estraron:

Prezidanto: S-ro R. Robertson (Manly)
Vic-Prezidantoj: S-ro K. Linton (Melbourne and S-ro I. T. Maddern (Morwell)

1-a Sekretario: S-ro R. Baxter (Manly)
2-a Sekretario: S-ro H. Koppel (Melbourne)

Kasisto: S-ro Les Scott (Manly)
Administranto de Korespondaj Kursoj: S-ro C. Goldsmith (Manly)

Publikaj Rilatoj: vakas
Kaskontrolisto: S-ro G. Thatcher (Manly).

Sekvis diskuto pri novaj statutoj. Post kelkaj amendoj de la proponita teksto, la kunveno unuanime akceptis la novajn statutojn, sed evidentigis ke la ĉeestantaro ne reprezentis la duonon de la membraro. Tio, laŭ paragrafo 29 de la nuna statuto, estas necesa por ŝanĝi ĝin. Pro tio do devos okazi poŝta voĉdonado. S-ro Koppel transdonis proponon de S-ro Ralph Harry ke ni donacu monon por presado de sportista terminaro por la venontaj Olimpiaj Ludoj. S-ro Koppel proponis kaj S-ro A. Culey subtenis ke A.E.A. donacu \$50 al tiu celo (akceptita). Kelkaj ĉeestantoj aldonis pliajn monsumojn por subteni la projekton de S-ro Harry.

S-ro Goldsmith raportis ke li ricevis oficialan inviton de la Brisbana E-Societo ke la venonta kongreso okazu en Brisbano. Pri la preciza dato de la kongreso okazis diskuto, sed la ĉeestantoj proponis lasi la finan decidon al la Brisbananoj. Tamen, la ĉeestantoj akceptis reko-

mendon de S-ro Chandler, subtenitan de S-ro Gueltling, ke la 19-a kongreso okazu de merkredo la 2-a ĝis mardo la 8-a de Januaro 1974.

Okazis elekto por la Honora Diploma Komisiono. S-ino F. Koppel ne plu deziras esti membro de tiu komisiono, ĉar ŝi estas tro okupata en la Ekzamena Komisiono. La kunveno elektis: S-rojn V. Gueltling kaj V. Timmins (Sydney) kaj S-inon R. McGrath (Perth).

La nova prezidanto, S-ro R. Robertson, nun transprenis la prezidon. Li alvokis la ĉeestantojn plue donaci al la fonduso por reklamado en "Reader's Digest" kaj li raportis ke nur pluaj \$178 estas bezonataj. S-ro I. Maddern raportis ke li verkis libreton. "The Story of Esperanto" kaj presigis 2000 ekzemplerojn proprakte por \$300. Li raportis ke li mem jam sendis ekzemplerojn al multaj parlamentanoj kaj edukistoj kaj anoncis ke li donacas la restaĵojn al A.E.A. Li proponis ke membroj aĉetu po 5 ekzempleroj por \$1. S-ro A. Culey proponis kaj la ĉeestantoj unuanime akceptis dankesprimon al S-ro Maddern.

S-ro N. Gamble proponis ke A.E.A. subtenu la agadon de la t.n. "Spelling Action Society", kiu proponas fonetikan anglan lingvon. Post diskuto la kunveno malakceptis la proponon, ĉar kiel S-ro A. Culey diris, individuoj povas subteni la ideojn de tiu society, sed A.E.A., kiel organizo ne rajtas fari tion.

La U.E.A. Kunvenon prezidis la Ĉef-Delegito S-ro K. Linton. Li laŭtlegis raportojn de lokaj delegitoj pri ilia agado en 1970/71 kaj donis ĝeneralan raporton pri kotizoj k.t.p. Li ankaŭ alvokis la ĉeestantojn ke ili transprenu postenon de fakdelegito.

La S.A.T. Kunvenon gvidis la aŭstralia Peranto S-ro V. Gueltling (Sydney) Li klarigis la celon de S.A.T. kaj varbis novajn membrojn. Li dankis al A.E.A. ke S.A.T.-anoj povis kunveni ĉe aŭstraliaj kongresoj.

La ĝeneralan kunvenon de A.I.E.A. (Asocio por la Instruado de Esperanto en Aŭstralio) prezidis S-ino G. Pollard (Perth). La Sekretario/Kasisto S-ro V. Timmins raportis ke je 1/1/1970 la organizo havis 81 membrojn kaj je 31/12/1971 ĝi havis 86 membroj; sed 55 ankoraŭ ne pagis kotizon por 1971. Do fakte la organizo havis nur 31 financajn membrojn. La enspezoj superis la elspezojn je \$30.85, kaj la organizo nun havas saldon de \$134.01. Diskuto okazis pri la estoneco de la asocia organo "Klerigo". La redaktoro, S-ro W. Chandler, raportis ke pro malbona sano li ne povas regule eldoni ĝin kaj ke ofte li ne ricevas sufiĉe da artikoloj. S-ro R.

Robertson demandis ĉu estas saĝe eldoni gazeton se ne estas redaktoro nek artikoloj? Oni diskutis la eblecon ke "Klerigo" fariĝu regula rubriko en "The A.E."

Elektiĝis la estraro: Prez: S-ino Doris Sinclair (Caloundra), Vic-Prez: S-ino G. Pollard (Perth), Sekr./Kasisto: S-ro V. Timmins; Redaktoro: S-ro I. Maddern (Morwell), Help-Redaktoro: S-ro W. Chandler (Sydney). Stataj reprezentantoj: S-ino R. McGrath (Perth), F-ino W. Addis (Adelaide), S-ino M. Wybenga (Morwell), S-ro W. Chandler (Sydney), S-ro J. Moore (Rockhampton).

Prelegoj:

Trifoje kongresanoj havis la oportunon partopreni frumatenan "Lingvan Seminarion". S-ro Ken Linton, kies profunda studo pri la lingvo jam akiris respekton transmare, pritraktis utilajn ekzemplojn pri la refleksivo kaj la akuzativo.

Pastor C. Dowling, 3/1, priskribis multspecajn problemojn kiujn pastro provas solvi. Bezonante ripozon, li mem trovas konsolon en velŝipado. Li rakontis pri la unua ŝipeto en la haveno Phillip kaj la unuaj blankuloj kiuj surteriĝis apud nuna Melbourne (Evans kaj Murray). Sekvis lin S-ro P. E. Schwerin, kiu per trafaj diapozitivaj pri Delphi, Pompeii kaj Venecio montris kiel la "Natur-Elementoj kontraŭas la homojn".

S-ro F. R. Banham, 4/1, prezentis 2 interesajn komparojn: Kaj Zamenhof kaj Isaac Pitman sukcesis pri unu projekto (Z. internacia lingvo, P. skribsistemo), sed malsukcesis pri dua (Z. mondreligio, P. fonetika angla alfabeto). El multaj komunaj trajtoj rilate al Zamenhof kaj Albert Schweitzer elstaras ke ambaŭ spertis kiel knaboj multlingvecon, multe suferis pro la doloro de la mondo kaj kiel kuracistoj servis al malriĉuloj. Samvespere universitata docento "Robby" Robertson klarigis kiel "Skribi kaj paroli ne sufiĉas . . .". La ĉefa komunikilo en la moderna mondo estas la bildoj. Per diapozitivaj li montris kiel modernaj metodoj ebligas instrui samtempe al la tuta mondo. Liaj diapozitivaj inkludis unikajn kolorbildojn faritajn sur Luno.

Per trafaj argumentoj D-ro A. Einihoviĉi (Perth) 5/1 pledis por "Eŭtanazio". Temas plejparte pri pasiva aŭ negativa traktado. Li priskribis cirkonstancojn kiam estas pli humanece permesi al paciento morti trankvile, sendolore kaj digne. Li bone sukcesis instigi viglan diskuton en kiu aŭdiĝis argumentoj "por" kaj "kontraŭ".

"Robby" Robertson, 6/1, per diapozitivaj kaj desegnoj priskribis multajn metodojn, primitivajn kaj modernajn, por

utiligi la povumon de la suno. Bedaŭrinde ke la kosto de instalo per modernaj teknikoj estas ankoraŭ tro alta. Elstare unikaj estis la satiraj kolorkarikaturaj, unue pentritaj kaj lumbilde prezentitaj de S-ro V. Bourlin, samvespere. Ĉi tiuj "Grimacoj de la Mondo" primokis politikajn situaciojn kaj nuntempajn tendencojn de la junularo. Ili pruviĝis tiel popularaj, ke oni aranĝis duan montradon 2 tagojn poste.

S-ro E. Woodruff, kiu antaŭe loĝis en Sud-Aferiko, montris, 7/1, diapozitivajn pri vidindaj kaj aliaj interesaj en tiu moderna, kolorplena lando. Sekvis S-ro W. Chandler, kiu dum multaj jaroj okupis sin pri la ornitologio. Li parolis pri la "Evoluo kaj kutimoj de la Pingvenoj". Laŭ li ekzistas 17 specoj, el kiuj 10 vizitas la bordojn de Aŭstralio, inkluzive la "feaj" (malgrandaj) pingvenoj de insulo "Phillip", celo de postkongresa ekskurso.

Nova programero estis serio de preletoj "Novaj talentoj prelegas", kiu prezidis "nova" programestro, S-ro John Moore (Rockhampton). Pri "Enigmoj" prelegis S-ro Arnold Baldwin. Li ilustris per kelkaj facilaj ludenigmoj ke ne estas facile klasifi ĉion en la mondo. Juna Philippa Maddern parolis pri la historio, geografio kaj lingvoj (71 apartaj) de "Indonezio", kiu nur en 1951 fariĝis memstara respubliko kaj kies miksrasa kaj miksrreligia popolo estas tre tolerema. Arthur Heathfield demandis "Ĉu la estonteco estos nia?". Temis pri la estonteco de la homa raso, kies ekzistado multe ŝanĝis la mondon. La homo de la komputera mondo bezonos lingvon nur por komuniki al komputero kaj ne inter si. Barbara Williams parolis pri "Blindeco kaj brajla legado". Si klarigis ke nur 3% estas centprocente blindaj. Por legi rapide la brajlan sistemon, necesas lerni en la juna aĝo. John Fluit, studento el Morwell, parolis pri sia "Hobio", rokolektado. Kiel dankesprimon li prezentis mempoluritan specimenon al sia lernejestro S-ro I. Maddern. S-ro Harold Gilbert — radioamatoro — parolis pri la "Int. Esperanto-Ligo de Radio-Amatoroj" kaj priskribis kelkajn transmarajn konversaciojn per radio.

Dum la diskuto "Kiamaniere revarbi malnovajn E-istojn" aŭdiĝis plejparte malkuraĝigaj spertoj.

Distraĵoj kaj Ekskursoj:

Merkredvespere (5/1) okazis la Dramo-Konkurso. Partoprenis 2 grupoj. La E-klubo de Orientaj Antaŭurboj (Melbourne) prezentis dramon de dana verkistino, Zora Heide, "La Aventuroj de Don Juan". Ĉiuj roluloj Arthur

Heathfield, Ann Hearn, Margaret Sanders, Ivy Fallu, Eva kaj Bob Reed bonege aktoraj kaj agrable distradis la ĉeestantojn. La Manly E-Klubo ludis amuzan skeĉon "Komedio en la Mallumo", originalon de Margaret Liston, reĝisoro-rululo. Aliaj aktoroj estis "Robby" Robertson, May Baxter kaj Adrian Culey. La ĉeestantaro por sekreta baloto aljuĝis la migrantan trofeon al la Manly-grupo. Ambaŭ grupoj meritas gratulon pro siaj iniciativo, laboro kaj entuziasmo. Esperable ilia sperto donis instigon ne nur al plua propra penado, sed ankaŭ al aliaj grupoj, tiel ke la konkurso en Brisbano 1974 fariĝos vera Dramo-Festo.

Post la Dramo-Konkurso la 4 ĉarmaj anoj de la familio Payne distris per pluraj aktore prezentitaj ŝercoj. Sian prezentadon ili konkludis per kanto. Iom pli serioza tono troviĝis en la literaturaj legaĵoj de S-ro P. E. Schwerin. Lia kontribuo, precipe la elĉerpajoj el "Letters of an Indian Judge", prezentis modelojn pri la tradukarto. La vespero finiĝis per filmo farita de la junula grupo ĉe Morwell. En naturaj koloroj, ĝi montris facetojn pri la vivo kaj ĉirkaŭaĵoj de Morwell.

Por la **Koncerto**, vendredvespere (7/1) respondecis S-ino M. Sanders kaj la Manly E-Klubo, kiu provizis tutesperantan programon. Anoncistoj K. Linton kaj R. Robertson prezentis la artistojn. Ginny Tope ludis pianon kaj fluton; Dorothy Thyer bele kantis plurajn kantojn en Esperanto; Mark Dipnell ludis klarneton; Ges-roj Jim kaj Jennifer Dimo, pro sia akordiĉon-ludado, rikoltis tondran aplaudon. El la Manly-grupo la divertalenta Margaret Liston kantis en Esperanto, May Baxter dancis nederlandan dancon, Les Scott ludis akordionon, la danctrupa (S-inoj M. Baxter, M. Liston, V. Payne kaj S-roj A. Culey, B. Payne) dancis grekan dancon. Ges-roj Goldsmith prezentis 5-minutan skeĉon "Ekenamiĝo" kaj montris kiom oni povis atingi per malmultaj vortoj. Fine la dancistoj kun la filinoj Payne prezentis scenon el la konata muzika dramo "My Fair Lady". Ni ne forgesu danki al S-ino kaj F-ino M. Sanders, kiuj akompanis multajn erojn ĉe piano. Vera Muzik-festo!

Kongresanoj faris kvar ekskursojn per modernaj Mercedes-aŭtobusoj de la "Grenda Aŭtobus-Kompanio". La unua (2/1) montris historiajn vidindaĵojn de Melburno kaj finis ĉe "Como-House", historia domo kiu apartenas al la organizo "Nacia Kuratoreco" (National Trust). La dua (3/1) montris ĝeneralajn urbajn vidindaĵojn kaj parkojn kaj finis ĉe la Nacia Artmuzeo kaj Kultura Centro. La

tuttaga ekskurso al Ballarat (6/1) per du aŭtobusoj, provizis samtempe ripozon kaj informon pri la historiaj orminaj tagoj de Viktorio. Post lunĉo en bela parko apud granda lago, ekskursantoj vizitis vilaĝon modelitan laŭ frutempa Ballarat. Kelkaj kribris, kaj Ellen Minton eĉ trovis oron el rivereto. La kvara ekskurso kondukis postkongrese (9/1) al Cowes sur insulo "Phillip". Post vespermanĝo apud la marbordo ĉiuj vizitis lokon kien la pingvenoj ĉiuvespere, post tuttaga fiŝkaptado, revenas por nutri la idojn en la sablodunoj.

Fermo de la Kongreso

La programo por la ferma kunsido (8/1) promesis literaturajn erojn. S-ino K. Schwerin per mallonga traktato pri la poezio, esprimis opinion ke multaj modernaj poemoj estas nekompreneblaj. Poste ŝi legis poemon kiun ŝi aprobas: "Maljunaj Virinoj", rimarkinda pro simpatia observado. Ŝia neatendita forlaso de la podio, por ke la edzo siavice prezentu pluajn erojn, kaŭzis miskomprenon al la Prezidanto, kiu per la kutimaj kuraĝigaj adiaŭaj vortoj fermis la kongreson. La Kongressekretario pardonpetas pro tiu miskompreno, per kiu perdiĝis al la ĉeestantoj ankoraŭ kelkaj literaturaj gemoj.

Kongresa Festmanĝo

La Kongresa Festmanĝo (8/1), okazis en tre varma sabata vespero en la impona manĝosalono "Eakins Hall". Elegante aspektis la tabloj kun siaj blankaj tablotukoj, belaj floroj kaj romantikaj kandeloj.

Deĵoris S-ro Arthur Heathfield, servante trinkaĵojn al la 94 partoprenantoj. Presitaj Menukartoj sciigis en Esperanto la manĝaĵojn kaj la ordon de la tosto, kiuj alternis kun pladoj. Prez. A. Robertson proponis toston al la Reĝino. S-ino Ruth McGrath proponis la toston al A.E.A., al kiu respondis S-ro Robertson. Nomo de la vizitantoj S-ro E. Woodruff (Moree) proponis toston al la Loka Kongresa Komitato, al kiu respondis S-ro K. Linton, laŭdinte la laboron kaj subtenon de la komitatanoj.

S-ro Herbert Koppel, donacinto de la Dramo-Trofeo, transdonis tiun al S-ino Margaret Liston, kiu akceptis en la nomo de la Manly E-Klubo. Li esprimis la esperon ke Melburna grupo regajnos ĝin en Brisbano en 1974. Fine la ĉeestantoj "ronde interpretis manojn" por kanti "Pasintaj Tago ne revenos, sed memoros ni!"

Gis la revido en Brisbano!

Pro spacomanko kaŭzita de la longa Kongres-Raporto, ni devas prokrasti klub-

raportojn ĝis la venonta numero. Tamen, klubraportistoj nepre sendu siajn raportojn kiel kutime.—H.K.

A.E.A. EN 1970-71

Ni daŭrigis laboron laŭ la planoj starigitaj en 1968, kaj kvankam la sukceso ne estis tiel bona kiel ni esperis, ni sukcesis trovi multajn novajn aliĝintojn. En kelkaj lokoj la agado plivigliĝis, sed en aliaj ĝi stagnas. Tamen lastatempe leteroj montris pli da entuziasmo kaj ŝajne indikas pli viglan agadon en kelkaj urboj, kie antaŭe membroj dormis.

Publicigo: Dum 1970-71 membroj kaj amikoj distribuis 60,000 verdajn kartojn, kaj ni ricevis 1237 informpetojn. Al ĉiu ni sendis broŝuron "Freedom of Speech", informon pri lokaj grupoj kaj reprezentantoj, kaj aliĝilon pri la elementa koresponda kurso. Rezulte 143 personoj aliĝis al tiu kurso, kaj la profito \$282 helpis al la Publiciga Fonduso. Tio estis tre utila, ĉar, kiel ni atendis, ni devis represigi "Freedom of Speech".

Membroj iom laciĝis pri distribuo de verdaj kartoj; sekve ni devis trovi aliajn metodojn por plivastigi informon pri Esperanto. Tial sekve, en la oktobra nro de The A.E. ni anoncis la projekton mendi ĉe "Reader's Digest" la reklamon, kiu aperas en la januara nro de tiu grava revuo. Aldona listo de donacintoj kaj la ĝisnuna monsumo aperos sub Oficiala Informilo.

Al ĉiu, kiu respondas ni sendas la kutiman informon kaj ankaŭ informon pri elementaj kursoj en la koncerna ŝtato. Ni esperas, ke ni ricevos tiom da aliĝoj al la koresponda kurso, ke la profito ebligas alian reklamon. Se niaj esperoj plenumiĝos, ni ricevos ankaŭ novajn membrojn, kaj tio plibonigos nian financon situacion.

Korespondaj Kursoj: Jen la nombro de aliĝintoj en la lastaj dujaraj periodoj:

	1968-69	1970-71
Elementa	72	143
Mezgrada	41	49
Supera	5	14

Progreso: sed ni esperas pli bonan progreson en la venontaj jaroj. La Estraro dankas al la 29 instruantoj, kiuj helpis la lernantojn kaj esperas, ke ili tion daŭrigos. Pro la menciita reklamo ni atendas multajn aliĝojn al la elementa kurso, kaj sekve ni bezonos pli da instruantoj. Se vi sufiĉe bone scias nian lingvon kaj povas dediĉi iom da tempo al tre interesa tasko instrui komencantojn, mi petas, ke vi senprokraste min informu. Tiel vi donos valoran helpon al la disvastiĝo de nia lingvo kaj al la plifortigo de nia Asocio.

Interŝtata Konkurso. Tiu finiĝis je la 30a de Novembro, kaj jen la rezulto.

	Kvoto	Poentoj	%
Queensland	130	894	687.6
N.S.W. & A.C.T.	260	1132	435.4
Victoria	300	1300	433.3
W. Australia	80	248	310.0
Tasmania	30	44	146.6
S. Australia	40	57	142.5

Kiel evidentiĝis antaŭ monatoj, Kvinlando venkis pro sukceso atingi 687% de sia kvoto — mirinda rezulto. Ni kore gratulas kaj dankas al ĝiaj membroj pro la bona kunlaborado. Kiel premion ĝi ricevos Esperantajn librojn laŭ valoro \$20 kaj krome Atestilon, kiun nia Prezidanto donos nun al S-ino D. Sinclair por transdoni al la tiea Federacio. Pri la libroj ni aranĝos kun ties Sekretario.

Nia gazeto nun aperas regule ĉiumonate, kaj la presistoj bone faras sian laboron kaj multe helpas al ni per akurata aperado.

La redaktoro, S-ro F. R. Banham, regule liveras al ni multe da leginda informo, novaĵojn pri enlanda agado kaj interesan literaturon. Li ne plendas pri la pli multa laboro kaj li meritas sinceran dankon.

F-ino V. Cox, kiu antaŭe prizorgis la dissendon de la gazeto devis ekŝiĝi pro malsano, kaj S-ino Mary Fordham nun plenumas tiun taskon; ankaŭ al ŝi ni kore esprimas dankon.

Nia Libroservo: S-ino Ivy Fallu, kiu administris ĝin dum pluraj jaroj, devis ekŝiĝi antaŭ unu jaro, kaj ni dankas al ŝi pro ŝia fidela kaj utila laboro. Akceptis tiun postenon S-ro Tom Elliott en Sydney kaj post malfaciloj en la unuaj semajnoj la Servo nun bone funkcias. La transprenado donis al S-ro Elliott multe da laboro, kaj nia Estraro kaj ĉiu uzanto de la Servo ŝuldas al li dankon pro lia sindonemo.

Membraro: Je la fino de 1971 ni havas 354 individuajn membrojn kaj 39 asociajn. Nekontentiga nombro, ĉar mi estas certa, ke troviĝas en Aŭstralio pli ol mil Esperantistoj. La kotizo estas malalta, kaj ni volas, ke ĝi restu tiel; sed tio ne estos ebla, se ni ne povos kreskigi la nombron da membroj, ĉar kostoj ĉiam plialtiĝas. Ni petas, ke ĉiu provu varbi siajn Esperantistajn amikojn, kiuj nun ne estas membroj; tiel ni povos eviti pli altajn kotizojn kaj eĉ plibonigi la gazeton.

Financoj: Feliĉe nia Kasisto, Les Scott, loĝas apud mi, kaj ni ofte vidas unu la alian. Kunlaborado estas bonega, pro kio mi multe dankas al li.

Financa raporto por la periodo aperos en la marta nro. La sumo en la banko je la fino de la periodo estis \$600 malpli ol en la komenco. El tiu sumo \$400 estas la sumo, kiu mankis pro la pago por la reldamo en "Reader's Digest". Nun mankas nur \$45, kaj ni havas bonan esperon, ke tiu estos ricevita antaŭ ol vi legos miajn rimarkojn. Poste ankoraŭ mankas \$200, sed ni elspezis \$160 por nova adresmaŝino. Krome ni devis presigi novan eldonon de "Freedom of Speech" \$417, kaj pli ol \$200 por verdaj kartoj. Do, spite al granda kresko en la kostoj por nia gazeto, ni rajtas esti kontentaj.

Persona noto: Post kvar jaroj kiel via sekretario mi eksigas, ĉar mi opinias, ke nun estas oportuna momento transdoni tiun oficon al pli juna persono. Sciante tion, antaŭ kelkaj monatoj mi komencis pensi pri sekvonto, kaj mi opinias, ke S-ro Russ Baxter estos taŭga persono kaj bone daŭrigos la laboron. Mi petas, ke vi subtenu lin tiel same, kiel vi subtenis min; tiamaniere venos sukceso. Eble interesos vin scii, ke li kaj lia edzino venis al ni pere de verda karto!

Finonte la raporton, mi varme dankas al nia Prezidanto, Ken Linton, kiu, eĉ kiam superŝutita de alia laboro, ĉiam trovis tempon por konsideri proponojn aŭ problemojn, kaj donis al mi saĝan konsilon aŭ aprobon. Tiel li multe plifaciligis la laboron, eĉ pli ol li mem scias. Mi devas danki ankaŭ al nia vicsekretario, Herbert Koppel, pro lia helpo.

Mi ne intencas endormiĝi. Mi daŭrigos la administron de la korespondaj kursoj kaj helpas trakti la publicigon. Mi komencos per nova peto — ne por mono, sed por helpo. Dum la venontaj monatoj mi esperas havigi centojn da novaj lernantoj per la elementa koresponda kurso. Se iu el vi opinias sin kompetenta helpi la asocion kiel instruanto, mi petas, ke vi skribu al mi.

Sincere mi dankas pro la bona subteno, kiun vi donis al mi; mi petas, ke vi tiel same subtenu la novan Estraron kaj Sekretarion. — Tajni Goldsmith.

I will try to publish all matter in the next number. Much of interest awaits space. — Editor.

VERY IMPORTANT

STATUTO. During the General Meeting at the Melbourne Congress on January 4th, the proposed new Statutes as given in the September issue of this journal were discussed. There was no opposition to the proposal, but as only 60 voted there and proxies had been re-

ceived from only 68 members in favour, this does not equal half the membership. This fact shows how impossible is this portion of the present Statutes, for we are never likely to have half our members at a General Meeting.

At the meeting it was decided unanimously to ask all members who did not vote there, or had not sent a proxy, to send a vote. So if you **did not vote** at that meeting and **have not sent a proxy** will you please send a short note stating **I AM IN FAVOUR OF THE PROPOSED NEW STATUTES** or **I AM NOT IN FAVOUR OF THE NEW STATUTES** with your signature and address, to the Australian Esperanto Association, P.O. Box 415, Manly, N.S.W. 2095.

AS SOON AS POSSIBLE.
(Signed) R. G. Robertson, President,
R. W. Baxter, Secretary.

LIBERA FORUMO

Rigardinte la sukcesplenan kongreson, kiu ĵus finiĝis ĉe Melburno, mi opinias, ke nur unu punkto difektis ĝin: nome la troa uzado de la nacia lingvo en la ĝeneralaj kunvenoj de la A.E.A. Estas absurde moki la malfacilparolecon de la studentoj de fremdaj lingvoj naciaj samtempe kiel ni krokodile diskutis pri la nova konstitucio kaj aliaj aferoj propraj al la ESPERANTO-movado. Mi esperas, ke la tiama A.E.A. komitato kondiĉos la solan uzon de la internacia lingvo dum kunvenoj en la 1974 Brisbana Kongreso. —Arthur Heathfield.

Rilate al la reklamo en Reader's Digest mi tute subtenas la opiniojn de S-ro Koppel kaj D-ro Caldera.—P. E. Schwerin.

GAZETA KOLEKTO

Por mia arkivo pri-informa, mi petas bibliotekistojn kaj malnovajn legantojn pri la jeno: Kiu el vi havas plenan kolekton de La Suda Kruco, La Rondo kaj The A.E. ? Se ne plena, do kioma? Cetere, ĉu bindita aŭ ne? Antaŭdankon. —Red.

HOLIDAY PARK

Any nature-loving members who are retired or nearing retirement and wishing to live on the Sunshine Coast of Queensland could find a future home of their own and help to create a holiday park for Esperantists and other nature-lovers from all over the world. Details from S-ro W. Ray, 2 Bulcock St., Caloundra, Q. 4551.

Mrs. D. Sinclair, who forwarded the

above notice, recommends interest in this project.

VOLO GUELTLING

Notu ŝanĝon de adresol 9/45 Alt St., Ashfield, N.S.W. 2131.

TWO LETTERS OF INTEREST

16 Grosvenor Road, Lindfield
4th November, 1971

Mr. Frank Chamberlain, c/o Station 2 C.A., Canberra.

Dear Sir, Last week you referred to the United Nations as the only place where all people can meet freely and discuss all manner of things.

I disagree. In fact, I wrote a too-long letter and am now re-writing because I realise you are too busy to read unnecessarily long letters.

The 56th Universal Esperanto Congress took place in London in July and August. Delegates totalling 2,071 came from over 40 countries. These included 75 youngsters from 13 countries (UK, USA, Japan, Hungary, Spain, Bulgaria, Holland, Belgium, France, Germany, Italy, Norway, Austria and Sweden) who took part in a week-long "little congress" under guidance from members from the above countries plus Jugoslavia and Poland. **NO TRANSLATORS WERE NECESSARY.**

On the lighter side of the congress, entertainment included translations of plays by G. B. Shaw and Shakespeare; Robert Burns' poems; plays by the Bulgarian and Polish groups; a film made here called *Ci Tiu Lando Aŭstralio* which has been widely acclaimed.

You may have met Mr. Ralph Harry in Canberra. Formerly Ambassador in Saigon, he has now been transferred to Bonn. It was hoped he would be in Melbourne for the coming Australian Esperanto Conference next year.

At the congress in Vienna last year, the proceedings were opened by the President of the country (in fluent Esperanto). Among the members attending these annual congresses, it is not unusual to find persons of ambassadorial and diplomatic levels.

The world-wide Scouting movement is now using Esperanto at its international jamborees.

But there is still a need for translators and expensive duplication of all documents at the United Nations.

Where all people can meet freely . . . ? Only with someone else present to translate and therefore slow down the whole process.

Yours faithfully, Mrs. M. Chaldecott.

Macquarie Broadcasting Service Pty. Ltd.,
Box 48, G.P.O., Canberra.

17 November, 1971.

Mrs. M. Chaldecott,
Hon. Secretary,
Sydney Esperanto Society,
16, Grosvenor Road.,
LINDFIELD, N.S.W. 2070.

Dear Mrs. Chaldecott,

I received your letter of November 4, 1971 with considerable interest and delight. You are quite correct, there are other places than the United Nations where people can speak freely — Esperanto Congresses, which I have attended.

You will be surprised to know that I have been an Esperantist for very many years, although I have not been active in the movement, because of the pressure of journalistic and other work. Also, I have met many Esperantists abroad, and used the language in many places. I am hoping to resume my active interest in the work of Esperanto movement, and I know there is an enthusiastic group in Canberra. My friends in Canberra probably regard me as hopeless because it has been impossible for me to take any role in the Society for the reasons already mentioned.

I know Mr. Ralph Harry; he is a personal friend.

I think I should point out however, that the duplication and translation at United Nations would be necessary even if we had the acceptance of Esperanto, because national feelings are so strong, that so many nations expect to hear their own language spoken on delicate subjects of international controversy. I have found that the translation is so accurate and so fast that there is no delay, and I still adhere to my opinion that this is one of the few places where all people can meet freely — and indeed the **only** place where all people can meet freely unless they have the knowledge of the international language.

You may be sure that I am inspired by your letter to draw attention to the advantages of Esperanto if I get an opportunity during my broadcasts.


With warmest good wishes,

Yours faithfully, Frank Chamberlain.

PRESS ERRORS

P. 172, col. I, after 20th line: read — ravelled by pupils, e.g. noonac

P. 170, col. I, 8 from bot., Vortoĵn ŝparu.; col. 2, 7 from bot., Komercisto . . . 2-3 from bot. Li mise supozis . . .

**LA KONGRESANARO**

The zinc plates for these Congress photographs were generously given by Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne, as a mark of sympathy with our movement, through our President, Mr. K. G. Linton.



LA KONGRESANARO

Ĉe la Inaŭguro: S-ro K. Linton adiaŭas la Ministron. De maldekstre dekstren: S-roj C. Goldsmith, K. Linton, la Hon. Vance Dickie, S-roj I. Maddern, A. Heathfield, H. Koppel.



Ĉe la Inaŭguro: En la antaŭa vico de maldekstre dekstren: S-roj V. Timmins, V. Gueltling, J. Matasin (Sydney), A. Cocking (Manly).

"THE STORY OF ESPERANTO"

An admirable compendium, for which high praise is due to its author, Mr. Ivan Maddern. In 10 chapters are covered the elements of Esperanto, its historical background, its progress in Australia (with a page of 100 pioneers' names), and answers to some common objections.

Price: 20 cents from Mr. I. Maddern, 83 Hoyle Street, Morwell, Vic. 3840.

"**Telopeo**", n-ro 2, vol. 2. Bulteno de la EFNSK. 6 paĝoj.

La "Plena Ilustrita Vortaro" listas slangan vorton: krokodilo, t.e. paroli nacilingve en E-medio. Wre Chandler trafe riproĉas fluparolajn E-istojn, kiuj tamen ĉe klubkunvenoj preferas paroli nacilingve al lernantoj.

Du paĝoj estas inde dediĉitaj al la memoro de pioniro, Anthony Feldmayr.

Pri "socia vespero" kaj similaj kunvenoj. Tiun esprimon uzis raportinto en "Telopeo". Ni notu: "Socia vespero estas en Esperanto vespero koncernanta la homan socion! Tute alia afero estas **societa** aranĝo, aŭ amuzo, aŭ eĉ **societa vespero**". — I. Lapeina, en "Esperanto", majon, 1954.

"Tiu ĉi rondetoj havas karakteron . . . pure **societan** kaj servas por liberaj interparoladoj pri ĉiuj eblaj temoj . . . —Zam. ("Originala Verkaro", p. 321.)

Al novaj E-lernantoj, fluparolaj E-istoj peni purlingve paroli, plene posedinte la precizan sencon de ĉiu vorto uzata. (La Rondo, 12/56; A.E. 6/70).

The A.B.C.'s of Esperanto: 15 pages. 25c. Rebate for quantity. Channing L. Bete Co. Inc., Greenfield, Mass. 01301.

An information booklet in down-to-earth diction, it opens with 4 Advantages of Esperanto, followed by the pronunciation of the 28 letters and the 16 Rules. Cartoon-style drawings illustrate answers to predictable queries of interested persons. Pertinent facts are picturesquely presented: "If an American could speak **eight** other languages — French, German, Swedish, Spanish, Portuguese, Russian, Polish and Italian — he could still talk only to about **30%** of the people on earth".

Broŝuro: "**W. H. Trompeter** (A. Holzhaus) havebla ĉe Dr. H. Maschler, Hapardes St., 11. 64041 Tel Aviv. 0.65 U.S. dol. plus 10% sendkosto.

The N.Z. Institute of Esperanto has issued a 4 x 3 card calendar with a well-worded presentation of Esperanto

on the back. An intelligent piece of neat publicity; few people would discard it before the year's end.

AVIO NE ESTAS BIRDO

La P.I.V. enhavas "avio" = aviadilo. "Neologismo por ĉiutaga uzo." ("aviono" mankas.)

Supozinde, la iniciatinto de tiu etoformo havis en penso la neceson kurtigi radikon por ke oni povu havi rimedon por formi sufiĉe netajn kunmetaĵojn ĉe la aviadila terminaro: ekz-e, fighter-bomber. Kiel traduki? Batal-bombaviadilo? Tro longa. Kun la vasta, familiara buŝuzado de Esperanto tra la tuta mondo, E-istoj probable tendencos paroli kurtece kaj elipse. En tiu tempo oni eble audos esprimojn kiel: batbombavioj, kaj eĉ bob-avioj (?) ĉu ne? En tio oni sekvas la lingvoevoluo de la naciaj lingvoj, en kiuj tiaj tempoŝparaj rimedoj estas tre evidentaj. Jen la leĝo pri la plej malmulta peno.

POEMA PROVADO

"Traduku laŭvorte la versaĵon en la nacian lingvon. Se ĝi faras sensencaĵon aŭ estas preskaŭ nekomprenebla, aŭ tute nenatura — forjetu ĝin". — M. C. Butler. Vortoj de saĝulo.

Agante laŭ tiu principo, T. Fraser en "Brit. Esp." 11/61 analizas poemon "Rozulin" (Thomas Campion: trad. Foote) en "Angla Antologio", p. 94. Ne prete vin turnu al tiu stimula studaĵo.

MYLESTOM, N.S.W.: We have been greatly inspired recently to welcome Percy and Marjorie Holmes from Seymour. They were on a caravan holiday to study the Xanthorrhoea or Grass Tree on which Percy is an authority. We greatly enjoyed his account of an overseas trip on which he used Esperanto with great advantage, and for the first time we heard the International Language used as a normal means of communication.

Our studies are progressing well and we are looking for correspondents (preferably women). S. K.

ESPERANTO—"KLARA" LINGVO

Demandite pri misfamo, La Universala Telegrafa Unuiĝo respondis: Esperanto estas ankoraŭ allasita kiel "klara" lingvo subaze de art. 19, n-roj 140 kaj 141, de la Telegrafa Regularo, reviziita en Genevo en 1958. (H. de E. I okt. 71)

(La decido allasi Esperanton kiel klaran lingvon estis farita en 1925).

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 104 (184)

MELBURNO

Marto, 1972

SCIIGO DOLORA

En la 2-a de marto S-ro Wre Chandler telefonis el Sidnejo, ke "TINY" GOLDSMITH subite mortis. Al S-ino Goldsmith kaj liaj familianoj ni esprimas nian sinceran kondolencon. Nekrologo aperos en la aprila numero.

PRI LA NOVA PREZIDANTO

Ce la Melburna Kongreso, la membraro de la Asocio elektis Profesoron R. G. Robertson kiel prezidanton. Li naskiĝis en la norda regiono de Anglujo, studis ĉe la Oksford-a Universitato kaj gajnis magistran diplomon.

Li iĝis militmaristo dum la dua mondmilito, kaj unue atingis Aŭstralion en Decembro 1944. Reveninte hejmen post la militfino, li kunlaboris kun inventistoj kaj desegnistoj super la novaj helikopteroj, sed neniam estis tute kontenta, ĝis li povis reveni Aŭstralion kiel enmigrinto en 1950, kune kun la ĉarma edzino kaj geinfanoj. Li ricevis postenon en la Universitato de Nova Suda Kimrujo, kaj iĝis prelegisto, docento, kaj poste profesoro.

Multjare li instruis pri inĝeniera scienco, kaj precipi pri tridimensia geometrio; nun li estas Direktoro de Studado por komencantoj en la inĝeniera fako, kaj interesiĝas pri modernaj instrumentoj, ekz-e la televido, kinofilmoj, kaj kontrolo sen ekzamenoj.

Prof-o Robertson estis fervora skolto, kaj unue legis artikolon pri Esperanto en la skolta libro, "Scouting for Boys", de Baden-Powell, sed tempo mankis dum li studis sciencon kaj matematikon, ĝis

1965. Resaniĝante post grava operacio por fortranĉi tumoron, li aniĝis komencantan kurson de la Sydney-a Klubo, kaj laŭvice progresajn kaj altgradajn kursojn ĉe la Manly-a Klubo. Poste li mem instruis kursojn ĉe Manly, kaj iĝis Prezidanto de la Esperanta Federacio de N.S.K. en 1967. Multaj el la samideanaro amike nomas lin "Robi".

18th Australian Esperanto Congress

Late supplementary list:

- 171 Mr. V. E. Fletcher, Wanchope, N.S.W.
- 172 Mrs. L. Bate, Malanda, Qld.
- 173 Miss E. Lipski, Hawthorn, Vic.
- 174 Miss A. Longson, Victoria Park, W.A.
- 175 Mr. R. Morrison, Eildon, Vic.
- 176 Miss M. Jones, St. Lucia, Qld.
- 177 Mr. D. Thorp, E. Kew, Vic.
- 178 Mr. H. Jansen in de Wal, Hamilton, Vic.
- 179 Mr. C. Mossop, Katoomba, N.S.W.
- 180 Mrs. A. Russell, Lane Cove, N.S.W.
- 181 Mr. D. McQueen, Warragul, Vic.
- 182 Mr. E. Woodruff, Moree, N.S.W.
- 183 Mrs. E. Woodruff, Moree, N.S.W.
- 184 Mrs. A. Sedgley, Wembley, W.A.
- 185 Mr. N. Gamble, Canberra, A.C.T.
- 186 Mrs. E. Giles, Collaroy, N.S.W.
- 187 Mrs. G. Swan, Manly, N.S.W.
- 188 Mr. K. Stanev, Adelaide, S.A.
- 189 Mrs. R. McCollm, Camp Hill, Qld.
- 190 Mr. Lanyon, Parkdale, Vic.
- 191 Mrs. G. Burmeister, S. Oakleigh, Vic.
- 192 Mr. P. Trevorah, Rosanna, Vic.
- 193 Mr. James Oki, East Melbourne, State Distribution: Vic., 94, N.S.W.; 53; Qld, 21; W.A., 16; S.A., 5; A.C.T., 3; Tas., 1.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO**Oficiala Informilo****16an de Februaro 1972****Novaj Individuaj Membroj**

Rothgens, S-ino R., Camberwell, Vic.	
Campbell, S-ro C. B., Walgett, N.S.W.	
Wright, S-ro R. D., Surrey Hills, Vic.	
Thornton, S-ro D. L., Croydon, Vic.	
Jordan, S-ro I., Merewether, N.S.W.	
Leung, S-ro H. C., Carlton, Vic.	
Milne, S-ino G. M., Cobar, N.S.W.	
Gleeson, S-ro M., Yarra, Vic.	
Moir, S-ro R., Fairlight, N.S.W.	
Allen, S-ro J. R., Norman Park, Qld.	
Barocas, S-ro R., Moorabbin, Vic.	
Lanyon, S-ro C. M., Parkdale, Vic.	
Radcliffe, F-ino C., Manjimup, W.A.	
Andrews, S-ro P., Bogantungan, Qld.	
Anderson, S-ino K., Moorooka, Qld.	
Siwinski, F-ino M., Parkside, S.A.	
Davidson, F-ino W., Michelton, Vic.	
Bamkin, S-ro M., Belrose, N.S.W.	
Wiltshire, S-ro A. G., Auckland, N.Z.	
Barth, S-ro J. A., Cammeray, N.S.W.	
Pollard, S-ro C. J., Warrawong, N.S.W.	
Wilkes, F-ino A., Cammeray, N.S.W.	
Jeffree, S-ro J., Athelstone, S.A.	
Clarke, S-ro G., Orroroo, S.A.	
Vajda, S-ro G., Kingston, Qld.	
Wilson, S-ro L., Balwyn, Vic.	
Dennett, S-ro A., Midland Junction, W.A.	
Perez, S-ro S., Elwood, Vic.	
Bliesner, S-ino O., Narrabeen, N.S.W.	
Nickels, S-ino H. J., Montmorency, Vic.	
McCann, S-ro J., Albert Park, Vic.	
Bastys, S-ro J., Birrong, N.S.W.	

Donacoj

por la reklamo en "Readers Digest".

Jam publikigita	\$841.00
Adelaide Esp. Soc.	20.00
Graham, S-ino E.	5.00
Rosenblum, S-ro H.	10.00
Melburna E. Sub. Esp. Soc.	20.00
Cox, F-ino V.	10.00
Gash, S-ino A.,	5.00
Wright, S-ro D. A.	2.00
Collier, S-ro N. A.	2.00
Strickland, S-ino E.	2.00
Lees, F-ino M.	2.00
Morrison, S-ino K.	4.00
Carruthers, S-ino R.	7.00
Ross, S-ro I.	3.00
Esp. Ligo de W.A.	20.00
Canberra Esp. Klubo	35.00
Gamble, S-ro N.	10.00
Taylor, S-ro R. K.	5.00
Grabham, S-ro P.	1.00
Torr, S-ino J.	5.00
Dean, S-ro C. J. W.	10.00
McGrath, S-ino R.	6.00
Robbins, D-ro R.	2.00
Robinson, S-ro W. R.	2.00
Chandler, S-ro W.	1.00
Picz, S-ro T.	5.00

Greenhalgh, S-ino W.	7.00
Kemp, F-ino F. H.	5.00
Maddern, F-ino N.	5.00
Ford Lewis, S-ino P.	5.00
Pollock, S-ro D. P.	5.00
Henderson, S-ro P. A.	2.00
Mossop, S-ro C.	5.00
Duncan, S-ino M.	10.00
Sinclair, S-ino D.	10.00
Telfer, F-ino R. G.	2.00
Linton, S-ro K.	5.00
Maddern, S-ro I.	44.00
Gilbert, S-ro H. W.	50.00
Tronerud, S-ro E.	1.00
Baldwin, S-ro A.	10.00
Melburna Esp. Soc.	10.00
Acs, S-ro C. M.	5.00
Smith, S-ro C. M.	1.00
Robertson, Prof. R.	20.00
Fletcher, S-ro V. E.	8.50
Marshall, S-ro H.	2.00
McQueen, S-ro D.	3.40
Wallace, S-ro J.	2.00
Frost, S-ro A.	2.00
Grafen, S-ro W. C.	1.00
Graham, S-ino K.	2.00
Bowden, S-ino G.	2.00
Cooney, F-ino E.	2.00
Morrison, S-ro R.	5.00

\$1266.90

Kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn mankis nur \$22.10 por pagi la tutan koston, kaj mi estas certa ke kiam vi legos ilin ni estos ricevintaj tion. Jen mirinda bona rezulto, kaj mi tre kore dankas al ĉiu, kiu tiel helpis. Tiu bonega rezulto klare montras ke la plano ricevis la aprobon de la granda plimulto de niaj membroj.

La reklamo aperis en la januara numero kaj ĝis la 14a de Februaro ni ricevis 347 respondojn, el kiuj 39 jam aliĝis al koresponda kurso, kaj 9 aliĝis kiel individuaj membroj de A.E.A.

A.E.A. EXAMINATIONS

Advanced (Supera): Edwin Wreford Chandler, Sydney; John Burnett Moore, Rockhampton North; Richard Moir, Cronulla. All with honours.

Elementary (Elementa): Roy Keith Taylor, Hughes, A.C.T. Lena Buchan, Toowoomba; Mabel T. Wybenga, Morwell (V.). All with honours. Mary D. Halliday, Glen Waverley (V.)—C. C. Goldsmith, antaŭa sekretario.

Wilde: La Germana Lingvo

Oscar Wilde, suferante la doloron de tera infero en malliberejo, "Mi komencas studi la Germanan lingvon. Verdire, ĉi tiu estas la ĝusta lokaĉo pro tia studo".— "De Profundis", p. 5-6 1908-a eld.; eld. Rupert Davies (1962) p. 412.

EĤOJ PRI LA KONGRESO

„ . . . grandega sukceso de la kongreso, tiel kapable organizita. Ĉiuj ĉeestantoj havis la saman opinion; mi skribas por sciigi vin pri tio, ĉar mi estas konvinkita ke vi meritas nian profundan kaj koran dankon. Ni certe ĝuis plene la neforges-eblan kongresan semajnon”. D-ro A. Einihovici, Perth).

„ . . . ni vere ĝuis la kongreson kaj dankas al ĉiuj kiuj laboris tiel vigle por sukcesigi ĝin”. (Alfreda kaj Gerald Browne, Sydney)

„ . . . mi devas danki vin pro la granda sukceso de la tuta kongreso” (A.E.A. Prezidanto Robby Robertson, Sydney)

„ . . . hearty congratulations on a VERY successful congress”. (Tiny Goldsmith, Manly)

„ . . . Just a small note to tell you how much I enjoyed myself at the recent Esperanto Congress and wish to thank you all for the pleasant week I spent there”. (David Cafiso, Morwell High School).

„ . . . akceptu miajn korajn dankojn por via afbla kaj gastama traktado dum la kongreso kaj mi gratulas vin pro la malfacila laboro; la tuta atmosfero estis tiel amikena”. (S-ino I. Einihovici, Perth)

“Vi Melburnanoj ja multege laboris antaŭ kaj dum la kongreso, sed kia bonega sukceso ĝi estis! Por mi ĝi elstaras kiel la plej bela parto de cetere tre memorinda libertempo”. (S-ino Ruth McGrath, Perth).

“Al ĉiu organiza helpanto mi gratulas pri la elstara sukceso de la kongreso. Neniam antaŭe mi povis rimarki tiom da publica spaco en la ĵurnaloj, kiuj prezentis la aferon tute sen moketema tono — male kun bonhumore favora sinteno al ĝi”. (S-ro F. R. Banham, Melbourne)

“Gratulojn pri tre sukcesplena Kongreso” (S-ro Les Scott, AEA-Kasisto)

“Estis la plej bona kongreso, kiun mi iam partoprenis” (S-ino Thea van den Boogaard, Adelaide)

“Mi devas gratuli pro bonega laboro” (S-ino Doris Sinclair, Caloundra, Q'ld.)

TRANSLATION COURSE

For the more advanced students. 11 numbers a year. \$2. — Editor.

AUSTRALIA KRONIKO

Klubraportistoj bonvole sendu viajn raportojn ĝis la 15-a de la monato al la A.E.A. Vic-Sekretario, 41 Byfield St., Reservoir, Vic., 3073

Pro (ebla) pli granda prestiĝo kaj sekva perdo de spaco, 20 p.c., ni petas raportistojn kiel eble plej draste koncizigi siajn raportojn.

ROCKHAMPTON: Estraro por 1972: Prez., N. W. Russell; Vic-Prez: J. B. Moore, W. G. Dunbar; Sek: F-ino D. Davies; Kas: F-ino D. Neddrrie; Biblioteko: F-ino J. Turner; Societaj Arangoj: S-ino Y. Rayner; Kontrolisto: V. B. Moore; Komitato: S-inoj M. Constable, V. Ness, N. Ellis, S. McKeon, Pastro Tynan.

Zamenhof-festo (4/12): Ĉeestis 30 homoj (ink. 15 infanoj). Unu el la teatraĵaj roluloj en “Malhelpa Vento” studis E-on dum nur 3 semajnoj antaŭe. Nia klubo kantas ĉe la internacia vespero de la Business & Professional Women en februaro. Nia solkantistino estas Yvonne Rayner. Nia klubo aĉetis 500 kolorajn bildkartojn pri Rockhampton, de Murray Views Gympie, kaj orlittere presis sur ilin “Salutojn de Rockhampton”.—J. Moore.

BRISBANE: Elektiĝis 13/12 la jenaj: Prez., S-ro Mal Robinson; Vic-Prez: Tom O'Grady; Kas: Sybil Martin; Sek: Val Robinson; Vic-Sek: Joan Elvidge and Beverley Allatt; Libro-Peranto: Edna Jullie; Biblioteko: Gaye Phillips.

49 homoj (plus infanoj) alestis la Z-feston (18/12) ĉe la hejmo de Ges-roj A. Grant. Regis feliĉa atmosfero. Gaye Phillips kaj Mal Robinson kantis komikan teatraĵeton.

Tritaga semajnfino 29-31 jan. ĉe Tambourine-monto, kiam 14 anoj iĝis studentoj. Esperinde okazos similaj semajnfinoj samloke, en trankvila atmosfero tre taŭga por studado. Arthur Deutscher estas nia supera instruisto.

Kvinslandaj E-istoj ĝojas, ke Kvinslando estos la gasteŝtato por la venonta kongreso.—V. Robinson.

REDCLIFFE: 27/11: Zamenhof and Christmas Festo at the home of Mr. and Mrs. R. Memmott, Michel rd., Scarborough. Members came from the Brisbane and Sunshine groups, and everyone was dressed in the costume of another country. The pres., Mr. Memmott, welcomed the Mayor and Mayoress guests and members; Mrs. Styles proposed a toast to Dr. Zamenhof. The Mayor, Ald. Kroll, replied, saying that E-ists had the true aims of peace on earth and goodwill towards men. Members then paraded before the visitors and

total which country they represented — except Mr. and Mrs. Memmott. Mr. Memmott had offered a prize to the one guessing which country he and his wife represented. Mrs. L. Woods won it.

A sketch "Ĉe la Dogana Oficejo" was given by Redcliffe members—R. Memmott, S. Kunze; Mesd. V. Clarke, E. Chester, L. Woods, L. Memmott. Cooking, games and singing followed. Mrs. D. Sinclair (pres. Queensland E-Fed.) thanked the group, and on behalf of the group Mr. Memmott presented Mrs. Veronica Clark with gladioli in thanking her for taking over the teaching after Mr. and Mrs. Vic Clarke left for a holiday in England. Mrs. E. Chester presented a gift to Mr. and Mrs. Memmott in appreciation for the use of their home for the barbecue and classes each Tuesday.—Lilian Memmott.

Esperanto-Federacio de Kvinlando

Gia unua konferenco okazis 19-an kaj 20-an de Februaro en la Teatro Loch ĉe Moffat Beach. Ĉestis 37 delegitoj el 4 aliĝintaj societoj. Bonvena vizitanto estis S-ro F. Mueller-Sorau el Sidnejo. Kelkaj delegitoj ne povis ĉeesti pro pluvego. Unu el la ĉefa punktoj diskutitaj estis la nomo de la federacia bulteno. Per baloto la ĉeestantoj elektis la nomon "La Voĉo" kaj S-ino S. Bradburn, kiu proponis ĝin, ricevis kiel premion la libron "Kanakano el Kananam". S-ro R. Ross el Sunnybank estis elektita redaktoro de la bulteno. La konferenco decidis uzi la \$20 gajnitajn de la A.E.A. Konkurso por aĉeti ekzemplerojn de la libro "Zamenhof, Creator of Esperanto" kaj donaci ilin al bibliotekoj kaj lernejoj pere de la aliĝintaj kluboj.

Sabatvespere okazis amuzvespero. S-ro Mueller-Sorau kantis popolajn kantojn, Brisbananoj prezentis opereton, Toowoomba-anoj legis teatraĵojn kaj F-ino M. O'Mara akompanis per gitaro la komunan kantadon. Anoj de Sunshine Coast montris diapozitivojn kaj Redcliffe prezentis teatraĵeton.

Pro la malbona vetero la planita pikniko ne povis okazi. Anstataŭe membroj vizitis lokajn hejmojn. S-ino M. Poelstra gastigis ĉeestantojn el Brisbane, Redcliffe kaj Sidnejo kaj Ges-roj Ray gastigis anojn el Toowoomba, Dayborough kaj Caloundra.

La venonta konferenco okazos en Toowoomba dum la semajnfino de 29-a, 30-a Aprilo kaj 1-a de Majo. —Doris Sinclair.

SYDNEY: La Estraro por 1972: Prez: J. Matasin; Vic-Prez: V. Bourlin, S-ino E. Matasin; Sek: S-ino M. Chaldecott; Kas: S-ro Gould; Biblioteko: T. Elliott; Presraportisto: G. Browne; Programisto:

S-ino E. Matasin; Kontrolistoj: S-ino S. Fanos, W. Chandler.

En 15 februaro nia sekretariino organizis ludon Pulĉinelo. Ĉe la kunveno ni ĝojas vidi klason de lernantoj sub Fritz Mueller-Sorau.

22/11: Ni decidis enmeti reklamon en malgrandan ĵurnalon de All Nations Club (Kings Cross). Wre Chandler parolis pri bird-observado kun aliaj membroj de la Kampa Ornitologia Societo de N.S.K. Ili observis de la sepa matene ĝis la kvina horo vespere (17.00)! La observloko: Ŝtata Arbaro Cumberland kaj apude. Imitinte la birdsonojn, Wre nomis pli ol dekduon da birdoj observitaj. Unu el ili kudras foliojn per areanaĵoj!

29/11: Victor Bourlin montris bildojn de li mem pentritajn: "Grimacoj" kun sonbenda parolado en E-o kaj taŭga muziko. Estas amuza satiro pri la homaj aferoj — politika, ama, milita, junulara ktp. — eĉ pri la Opera Domo! Esperinde, ke, kiam vi legos ĉi raporton, multaj el vi jam estos vidintaj la bildojn ĉe la Kongreso, kaj konsentos, ke ili estas elstare nekutimaj.

6/12: Denove ni aŭdis la intervjuon je The Wilfrid Thomas Show kun la Sekretario de la B.E.A., H. Platt, registrita sonbende de Wre Chandler. Edna Turvey parolis pri la "faktoj de vivo" de silkraŭpoj — malĝoja historio de ekspluatado! Ŝi montris la ovetojn kaj la kokonojn. La vermo kiu eliras el la oveto faras kokonon ĉirkaŭ ĝin, por havi varman domon en kiu ĝi ŝanĝiĝos al fluganta insekto. Se la falenoj eliras kiel la Naturo intencis, la silkraŭpinoj demetas multegajn ovetojn, kaj la vivciklo rekomencas.—G. E. Browne, 7 dec.

17/1: Niaj kunvenoj kaj kursoj rekomenciĝis post ferio kaj la Kongreso en Melburno, kie 8 el niaj membroj ĉeestis kaj revenis kun nova entuziasmo. Ili laŭdis la aranĝojn kaj la bonan publicon por E. 24/1: John Matasin parolis pri la kunveno de la E-Federacio (N.S.K.) ĉe Leura kaj montris bildojn de Blu-Montaj floroj, la "Kolegio de la Reĝino" kun kongresanoj en Melburno. Ankaŭ ni vidis kelkajn pri Melburno kaj la Arbaro Sherbrooke.

7/2: Margaret Chaldecott montris lumbildojn pri bestoj, floroj, insektoj; Wre Chandler pri interesajoj de Viktorio; John Matasin pri La Esperanto-Domo antaŭ remodeligo, en Lawton-str.; Victor Bourlin ridigis nin per amuzaj pentraĵoj.

9/2: Antaŭ ĉ. 50 homoj Fritz Mueller-Sorau parolis al "Fellowship of Australian Writers" (Sydney). 14/2: Jar-kunveno: denove J. Matasin elektigis prez-o kaj V. Bourlin kaj Eve Matasin vic-prez-oj; sek-io, Margaret Chaldecott;

kasisto, David Gould; bibliotekisto, Tom Elliott (ankaŭ por Libroservo AEA). Wre Chandler kaj Shirley Fanos estas kontrolistoj; Eve Matasin ankoraŭ preparos programojn. La financa etato estas bona. La gazetara oficisto de AEA nun estas nia sek-io, Margaret Chaldecott, kiu petas eltranĉaĵojn ĵurnalajn pri E-o. 21/2. komedietoj el la libro de Marjorie Boulton, "Ni Aktoras". Vizitis nin Gladys Hickenbotham el la Leicester E-Club, Anglujo, kaj Marshall Cohen el la Melbourne E-Societo.—G. E. B.

MANLY: 18/11 Dramaj kursanoj kaj altgraduloj alestis programon de Dorothy Hasluck pri Travivaĵoj en Nepalo.

25/11 Kevin Smith prelegis pri Lingvaj Problemoj.

27/11 Kristnaska Festo en Virina Kroketa Klubo, Buckingham Street. Ĉeestis ĉ. 65 homoj. Vizitantoj: Alderman Joan Cooke (vic-urbestro de Manly) kaj Jon Fogarty, Chairman of Manly Arts and Cultural Co-ordinating Council.

2/12 Zamenhof-Vespero en la Vespera Lernejo, Darley Road. Programo: Radio. Wilfrid Thomas intervjuis S-ron Platt, Sek. de B.E.A., pri la U.K. en Londono. P. E. Schwerin legis el la verkoj de Felix Zamenhof. S-ino K. Schwerin parolis pri sia E-istiĝo. Parolis du komencantoj, Ges-roj Thoulous. Skeĉoj verkita de M. Liston. Kantoj gvidataj de L. Goldsmith kaj A. Cocking. Tajni Goldsmith pri Zamenhof.

5/12 Je afabla invito de Ruth Caruthers ni kunvenis ĉe 66 Wanganella Street, Balgowlah, por plani novan agadon. Sekvis fest-manĝo kaj distraĵoj. Ni bondeziris al Ges-roj K. Smith okaze de ilia forflugo al Francujo.

6/12 Kristnaska Festo ĉe 29 Pacific Parade, Manly, en la hejmo de Alderman Joan Cooke. Ĉeestis reprezentantoj de societoj aliĝintaj al Manly Arts and Co-ordinating Council. Kelkaj esprimis intereson pri Esperanto.

11/12 En Esperanto Domo, Sidneja Societo aranĝis Zamenhof-Vesperon. Kontribuis: V. Timmins, Fritz Mueller-Sorau, al familio Payne, M. Liston, Elsa Brandmann, T. Richmond, S. Sobey, E. Giles, G. Thatcher, R. Moir, M. Duncan. Programestro R. Robertson.

Pli forte komenciĝis la jaro 1972 en nia Klubo. Multaj membroj aktive ĉeestis la Kongreson en Melburno. Gvide de Margaret Liston, ni gajnis la dramatan trofeon, kaj 4 el niaj membroj estis elektitaj al la Estraro de AEA. Ni gratulas la novan prez-on, "Robbie" Robinson kaj la novan sek-ion, "Rus" Baxter. Du klasoj komenciĝis: elementan gvidas Betty Cleminson kaj Superan,

Marjorie Duncan. Programoj ĝis nun: "Helikopteroj", "Robbie"; "Distra Vespero", Arturo Cocking, nia vicprez-o.

Multaj membroj alestis la NSK-Federacian Piknikon ĉe Kurnell, la elŝipejo de Kapitano Cook. Poste, temanĝo ĉe la hejmo de Barrie kaj Vera Payne en Cronulla. La NSK-Federacia Konferenco okazos ĉe Wollongong la 25-26an de marto en la tre taŭga Motelo Piccadilly.

MELBOURNE: Ges-roj H. Koppel (29/11/71), kun helpo de diapozitivoj, daŭrigis priskribon pri vizito al Centra Aŭstralio. S-ro Koppel priskribis la fervoj-vojaĝon al Alice Springs, dum la Sinjorino komentariis pri ekskursoj al Standly Chasm, al bovbieno Ross River kaj 3-taga ekskurso al la plej granda monolito en la mondo, Ayer's Rock, kiun S-ro Koppel surgrimpis.

S-ino F. Koppel paroladis pri "Kun Tibor Sekelj al la supro de Akonkagvo (6/12) — aventurplena rakonto pri la konata E-isto kaj verkisto. Surprize vizitis la Z-feston en la YWCA-Halo (11/12) la bulgara konsulo Dimitar Hadjiev el Sidnejo. Li prelegis pri la nune tre forta E-movado en Bulgario.

La Boronia E-Grupo prezentis melodramon "La dubinda malbonŝanco de Lee Sing". F-ino H. Edwards pianludis, kaj S-ino M. Sanders akompanis ĉe komuna kantado. Arnold Baldwin revuis la pasintan jaron, kaj S-ro F. R. Banham festparoladis "Zamenhof, Esperanto kaj Ni". Li lamentis la nunan situacion de malfido inter la grandpotencoj kaj la rivalecon de grandaj lingvogrupoj, kiu rezultas en maljusta diskriminacio kontraŭ malgrandaj.

Du tagojn poste okazis en la E-Domo jarfina vespero. S-ro H. Beechey revuis sian plurjara E-vivon kaj konstatis ke necesas pli bona laboro. S-ro Koppel legis poemojn de Raymond Schwartz, kaj helpe de surbendigita muziko de Kim Bastin, ni komune kantadis sekvis la kutima refreŝigo.

La nova A.E.A. Prezidanto, S-ro R. Robertson (10/1) lumbilde parolis pri "La Enigmo de la Helikoptero" kiel ĝi diferencas de aeroplano. Bonvenaj estis S-ino Kay Morrison (Sydney) kaj F-ino W. Addis (Adelaide).

PERTH: 10/12 S-ino Tronerud (Melburno) vizitis Perton por partopreni sportkonkurson kaj bonvene nin vizitis.

Jarkunveno (1/12). La Ligo nun havas 62 membrojn (47 plenrajtaj, 14 asociaj, 1 dumviva) La enspezoj superis la elspezojn je \$16.56. Nova estraro: Prez. J. Hawks; Vic-Prez: S-ino R. McGrath; Sekr: W. Howard; Kas: S-ino E. Palmer; Biblioteko: S-ino G. Pollard, Informado:

S-ino I. Einihovici; Ekzamenoj: D-ro C. Caldera. La ĉefa ĵurnalo de Perth raportis pri nia nuna prez-o, S-ro Hawks.

La Zamenhof-Festo 15/12 en Forrest House Hotelo. Post la festmanĝo muzikaj eroj; J. Hawks rakontis pri siaj spertoj transmare.

Komenciĝis (9/2) nova klaso (20 lernantoj). Samvespere anoj, revenintaj el Melburno, rakontis pri siaj apertoj dum la E-kongreso. Ĉiuj laŭdis la organizintojn kaj prelegintojn.—G. Pollard.

VOĈO EL LA PASINTECO

Warwick, Kvinslando: 14 marto, 1936:

Conrad Dornbusch skribis:

"Mi aperigis tradukojn en: "Scienca Gazeto" (red. Ch. Verax), ĉ. 20 dum 1913-14; ankaŭ en "Ondo de Esperanto", kaj verketon "La Universala Ritmo" en "Esperanto Triumfonta", 3-an de Sept. 1922. Mi opinias, ke mi ne estis E-isto antaŭ 1909j.

"La E-a Klubo en Brisbano proponis premion por traktajo pri "influo de Aŭstraliaj kondiĉoj sur karakteron de junaj Aŭstraliaj" — aŭ ia simila temo. Mi kredas, ke tiu estis la unua E-a konkurso por tuta Aŭstralio! kaj mi gajnis la premion. Mi ne scias la daton. Estis ankaŭ konkurso pri traduko de (el?—Red.) la libro: "We of the Never Never", kiun mi partoprenis kaj malgajnis. Eble protokola libro de klubo en Brisbano povus doni informon pri malnovaj E-aj pioniroj: ekz-e Cadell, Fewings, Mason-Beatty, F-ino Fraser, P. W. Pears, polica magistrato en Warwick, kie li varbis min. S-ro Pears kaj mi kun klubanoj en Brisbano verkis romanon E-e. Ĉiu verkis po unu ĉapitro, kaj la libreto rondiris al ĉiuj verkantoj.

"F-ino Fraser estis sendube la plej grava el la samideanoj kaj meritas ĉefan atenton rilate Kvinslandon. Si mortis tuj post reveno de E-a kongreso en (mi pensas) Sydney. Mason-Beatty, Fewings, Cadell, Pears ĉiuj mortis.

E-ista grupo en Warwick. Prez., P. W. Pears; sek. kaj kasisto C. C. Dornbusch. Ĉeestis la unuan kunvenon Kanoniko (poste episkopo) Hay kaj D-ro Hankins. La fina kunveno okazis la 21-an de Junio, 1910".

"Mi ĉeestis la 7-an U.V. en Antverpeno, kie mi vidis D-ron Zamenhof . . . Mi grave malsaniĝis post la morto de mia edzo, J. H. Cadell, kiu estis vera entuziasmo . . ."—Ethel Cadell, La Rondo, 11/42.

CONSOLIDATED FINANCIAL STATEMENT FOR THE TWO-YEAR PERIOD ENDED 30 NOVEMBER 1971

RECEIPTS

1968-9			
\$588	Credit Balance 5/12/1969	\$1198.34	
	Subs. 1970	\$909.40	
1556	1971	1031.75	
			1941.15
178	Subs. paid in advance		63.00
49	Examinations		53.00
	"The Australian Esperantist"		
	Subscriptions	22.30	
18	Advertisements	9.00	
			31.30
	Intermediate and Advanced Correspondence Courses		
	Receipts	451.50	
41	Expenditure	136.12	
	Profit		315.38
60	Bank Interest		98.23
	17th Australian Congress		
	20% of Fees	49.70	
176	Half profit	171.90	
			221.60
	Sundries		1.75
			\$3923.75

EXPENDITURE

	"The Australian Esperantist"		
1032	Printing and postage etc.		
	22 issues		2197.18
113	Postage		99.39
223	Printing and stationery		270.94
51	Subs. to U.E.A.		
	(Associate members)		52.87
	Adresaro		27.27
12	Receipt duty and Exchange		8.82
	PUBLICITY FUND		
	Expend. 788.08		
	Donations 484.89		
			303.19
	Popular Course		
	Receipts 635.25		
11	Expend. 352.45		
			282.80
			20.39
44	Gifts		64.15
	Addressing machine		161.04
10	Sundries		26.77
	"Readers Digest		
	advert.	1290.00	
	Donations	890.32	
			399.68
	Balance 30/11/1971		
	Cash in Bank		\$595.25
			\$3923.75

Audited and found correct—
(Signed) GEORGE THATCHER
17/12/1971.

MASARYK KAJ ESPERANTO

Sur p. 62, "Lingvo Internacia", 1 feb., 1905, oni legas: "Kontraŭ Esperanto parolas bohema filozofo prof. dr. Masaryk en sia parolado — Nacia filozofio de plej novaj tempoj . . . (El ĝi) ni legas tiujn perlojn: 'Ekiĝis bezono de internacia lingvo. Ĝi ekzistis kaj ekzistas (anglaĵo, rusajo); artefarite ĝi ne estas konstruebla. Tiu Volapuk kaj Esperanto estas la lingvoj malvivaj' (!?).

"Estas necese aldoni, ke prof. Masaryk tute nenion, sed absolute nenion scias pri problemo de lingvo internacia kaj des malpli pri Esperanto; sed estas konfesinde, ke li havas grandan influon je certa partio bohema . . ." — H.K.B. (Boucon?).

T. G. Masaryk fariĝis prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko en 1918. En postnoto al la E-a: Malriĉa Knabo, kiu Gloriĝis, (eld. Moraviaj Pioniroj, 1930), Marta Root raportas pri intervjuo kun li. Li diris: "Ni havas tre multajn esperantistojn en Ĉeĥoslovakio, kaj ili havas siajn proprajn gazetojn. Vizitu ilin. Mi multe pripensis pri esperanto; mi dubis, ĉu nacio povas kulturi artefaritan lingvon. Ofte mi demandis min, ĉu la verkon 'Faust' de Goethe oni povus traduki en esperanton, ĉu Shakespere kaj Byron povus esti skribintaj siajn ĉefverkojn en esperanto?"

Marta Root respondis, ke profesoro Charles Baudouin, poeto kaj bone konata literaturisto, foje diris al ŝi: "Mi trovis, ke mi povas verki miajn poemojn en esperanto same facile kiel france" (lia gepatra lingvo). La prezidanto diris, ke li ĝojas aŭdi tion. Ŝi ankaŭ klarigis, ke multaj klasikajoj la plej gravaj en la mondo estas nun tradukataj en tiun ĉi universalan helplingvon, ĉar tiu ĉi lingvo havas la spiriton de la nova universala epoko.

Prezidanto Masaryk diris: "Persono, kiu bone scias ses aŭ sep lingvojn, povas verŝajne ellerni la esperantan gramatikon en ses aŭ sep horoj". La aŭtorino respondis, ke Tolstoj ellernis esperanton en tri horoj, tiel ke li povis legi kaj skribi en ĝi. Fine la Prezidanto esprimis tre afable, ke li volas akcepti esperanton se ĝi povas helpi la venon de pli bona mond-kompreno.

Li kun d-ro Beneš helpis ĉe internacia konferenco: "Paco per Lernejo", en Praha. Tiu konferenco akceptis Esperanton kiel la oficialan traduk-lingvon.

Verŝajne la supra temas pri unusama viro — T. G. Masaryk.

Vidu: La Suda Kruco, majo, decembro 1930.

LIBERA FORUMO

Mankas al "La Aŭstria Esperantisto" sekcio por maldecaj ŝercoj, malpura humuro kaj sprita pornografio. Ekde la komenco de civilizeco la populara kulturo ĉiam enhavis tiajn, sed nur en apartaj epokoj permesaj (kiel nun) la oficiala kulturo agnoskas ilian taŭgecon. Kompreneble, la apartaĵo devas esti klare titolita "FIRAKONTOJ — Ne legu ĉiun sekcion se malpuraĵoj ŝokus vin" por averti gelegantojn al kiuj tia literaturo malplaĉas.

Ĉu la legantaro de la "A.E." aprobas ĉiun proponon — Arthur Heathfield.

THE REFLEXIVE PRONOUN

Can "sia" and "lia" be equally right in the one sentence? "Macaulay had a lofty conception of the literary appreciation and classical culture possessed by schoolboys in his time".

(1) **En sia tempo**, Macaulay havis tre altan pritakson pri la literatura aprec-kapablo kaj klasika kulturo posedataj de lernejanjoj.

(2) Macaulay havis tre altan pritakson pri la literatura aprec-kapablo kaj klasika kulturo posedataj de lernejanjoj **en lia tempo**.

In (1) "sia" clearly relates to the subject — Macaulay.. In (2) the subject of "havis" is separated from its pronoun by words that indicate "lernejanjoj" as the subject of them, for the participle "posedataj" may be rendered: . . . kiujn posedis.

Thus: . . . kulturon, kiujn posedis la lernejanjoj en lia tempo.

The masculine singular pronoun is, of course, unmistakable, as it can refer only to Macaulay.

Study Rule 2 of Oficiala Komunikado de la Akademio ("Esperanto", 7-8/71; Brit. Esp., 6/71) and an example there given: "Li rekompencis la soldatojn batalintajn por **lia** savo". Tio estas: . . . kiuj batalis por lia savo.

AFRANKO MALSPARATA.

Kontraŭ afranko de 5 zlotoj 35 groŝoj (groszy) studenta rondo E-a en Polujo sendis al ni alvokon al kunveno sialanda, kiu okazos en feb. 1972 — limdato por aliĝo, 15 jan.

Kiam ni ricevis la avizon (29 nov.) ni estis atendantaj tre baldaŭan eldonon de nia decembra n-ro. Tial sekve, mencio pri la avizo el Polujo estus vana. Kial E-istoj tiel malŝparas siajn supozinde mizerajn monrimedojn, forŝutante ilin per vanaj poŝtendoj? — Red.

KANTLIBROJ

Himnaro Esperanta		KRV 200b	80
Internacia Kantaro	P. Bennemann	V 100b	35
		Z	1-00
Jen la Kantoj de l'Vojaĝ'		V 60b	55
		Z	60
Junularo Kantas		V 150b	90
		Z	1-20
		V 150B	1-10
Kantante Antaŭen		ZV 150b	1-25
Kantante tra Pollando		V 60b	48
Psalmaro		KR 224b	35
Simplaj Floroj		VZ 30p	1-10
Sub la Ĉielo		IVZ 25b	30

INSIGNOJ

1A Liliputa 1/8" diam.; Blanka Fono		Pinglo	36
2 Steleto 3/8"		Butono	38
3 Ronda 7/8" diam.; "ESPERANTO. Lingvo Internacia"		Butono	42
4 Stelo 3/4"; Ora "ESPERANTO"	Broĉo 35;	Butono	42
5 Stelo 3/4"; Blanka Rando	Broĉo 35;	Butono	42
6 Ronda 3/8"; Blua aŭ Blanka Fono	Pinglo 35;	Butono	42
7 Rektangula 3/4"; "ESPERANTO PAROLATA"	Pinglo 45;	Broĉo	45
8 Triangula 1"; Blanka Fono; "ESPERANTO"	Broĉo 40;	Butono	45
66 Ronda 7/16" diam.; Blanka Fono	Pinglo 45;	Bar Brooch	45
AEA Kiel 66 kun Arĝenta Fono	Pinglo 25;	Broĉo	25

LOKNOMOJ: KIEL ESPRIMU?

"En nia lingvo oni devus uzi streketon inter propra nomo de strato kaj tiu ĉi vorto, se oni metas la nomon antaŭe: Dzika-strato; sed ja la vera Esperanto formo estas meti la nomo poste: la strato Dzika, la placo Etoile, la turo Eiffel (au: Ejfelturo) ktp. Oni do devus diri: Takatuki-Esperanto-Societo, aŭ, pli bone, Esperanto-Societo en (de) Takatuki". —Waringhien, "Omnibuso", 9-10, 1971 "Zamenhof" (M. Boulton), p. 88: tie Zamenhof skribis (en 1901): "strato Dzika, n-ro 9".

Do, oni prefere skribu: (la) strato Rathdown; la alternejo en (aŭ: de) Narrabundah; la insulo Moreton ktp.

HUNGARIAN TOURISM

Tourist Information Service, Rakoczi ut 52, P.O.B. 26, B.P. 70, Budapest, will gladly send Esperanto literature of interest to intending travellers to that country, which holds a Culture Festival there in July, at Budapest.

"Enlitiĝo en Somero", p. 136.

Adolf Holzhaus petas korekton de sia traduko, jene:

v.4: en liton dum la tagolum'.

v.6: saltantajn birdojn sur branĉar,

The Russian newspaper "Pravda" (7.4 million) on 4 August 1970 printed a very favorable report on the 55th World Esperanto Congress in Vienna. This is the first such report to appear in that paper.

Plaĉe al cinikuloj: "Jen mallonga difino de Kristanujo:—Tiu parto de la mondo en kiu, se viro publike stariĝas kaj solene deklaras, ke li estas Kristano — ekridos ĉiuj liaj auskultintoj" — H. L. Mencken.

MAGNETOFONA SERVO

UEA en 1971 vendis 121 programojn al 8 landoj ink. Aŭstralio. Inter oratorajn voĉoj: Lapenna, Privat kaj eĉ Zamenhof mem (tiu ĉi kopiita de sur malnova vakscilindra registraĵo). Detaloj ĉe Rudiger Eichholz, 2040 Springbank Rd., Mississauga, Ontario, Canada.

ĈE LA FINA ADIAŬO

S-ino I. Einihoviĉi (Perto) estas unika ĉi-landulo en tio, ke ŝi, kiel lerneĵano, solene marŝis en la funebra procesio de Zamenhof en Varsovio, 16 aprilo, 1917.

UNIVERSALAJ KONGRESOJ

Portland (Usono) 1972; Beogrado 1973; Hamburgo 1974.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 105 (185)

MELBURNO

Aprilo, 1972



CECIL C. ("TINY") GOLDSMITH

Novembro, 1889 Marto, 1972

Jaudon, la 2-an de marto, li prelegis ĉe la kongreso de la "N.S.W. Bureau of Agriculture" en la urbeto Grenfell (N.S.K.). Fininte la paroladon kaj respondinte demandojn, li subite kolapsis. Veturigite al la hospitalo en Grenfell, li mortis post mallonga tempo. La kremacio okazis en la "Northern Suburbs Crematorium", North Ryde, lundon, la 6-an de marto. Pli ol 70 personoj ĉeestis.

"Tiny" estas vere granda Brita Esperantisto. Li naskiĝis en Gloucester la 16-an de novembro, 1889; Esperantiĝis en Birmingham en 1907. Grave vundita ĉe la batalo de la Somme en 1916, li restis du jarojn en hospitalo.

En 1920: li organizis la Britan E-kongreson (Birmingham); en 1926: fariĝis administranto de la B.E.A.; en 1927: fondinto, sekretario kaj direktoro de la Esperanto Publishing Co. Ltd., la plej granda E-eldonejo en la Angleparola mondo; en 1934: fariĝis sekretario de la B.E.A.; en 1936: pro skismo en la U.E.A. li fariĝis sekretario de la nova I.E.L.; en 1939: li prenis respondecon pri administrado de I.E.L. kaj U.E.A. kaj en 1947, post reunuiĝo de I.E.L. kaj U.E.A. li sekretario servis ĉe U.E.A. ĝis sia emeritiĝo en 1954.

Dum sia laborplena vivo li organizis tri Universalajn Kongresojn de Esperanto (Oxford, London, Bournemouth: 1930, 1938, 1949), almenaŭ dek Britajn landkongresojn kaj karavanojn al diversaj landoj.

En 1965 li venis Aŭstralion. 1966: Li estis gasto ĉe Esperantistoj en Manly, kie li semis semon, kiu fruktiĝis forme de la kongreso en tiu loko (1968). Por organizi ĝin, li revenis al Aŭstralio post vizito al Anglujo. Li tiam akceptis oficon de la A.E.A.-sekretario, kiun li tenis ĝis januaro 1972. De tiu tempo li senlace, sindone kaj tre efike sin dediĉis al la plivasta diskonigo kaj praktikado de sia amata lingvo. Per publicaj iniciatoj li signife pliigis la nombron de A.E.A.anoj kaj grandigis la Esperantan terenon.

Ke li mortis fidele sur posteno estas cirkonstanco tute konforma kun lia nobla karaktero kaj sendube ankaŭ kun lia propra kordeziro.

La morto venis — lin ĝi trovis ĉe laboro.

Al vi, amiko kara, laudo, danko, gloro.

Pacon al li. Konsolon al liaj karuloj. — F.R.B.

AUSTRALIA KRONIKO

Klubraportistoj bonvole sendu viajn raportojn ĝis la 15-a de la monato al la A.E.A. Vic-Sekretario, 41 Byfield Street, Reservoir, Vic., 3073

PERTH: Je 23/2 okazis kunveno estrata de S-ro Howard. Ludojn partoprenis ĉiuj ĉeestantoj. Raportis nia Publicisto (S-ino Einihovici) ke deputitaro estas formata por alproksimiĝi la Ĉefan Edukistaron por konsideri la enkondukon de Esperanto en la lernejojn.

La klaso por komencantoj sub gvido de F-ino O. Hunt bone progresas, kaj la nombro pliiĝis ĝis proks. 26. Post la klaso por komencantoj, je 8/3, kunvenis la anoj de la Ligo. Vice ili montris, lumbilde, diapozitivojn po 5 por ĉiu. La komentarioj estis en Esperanto kaj angla, ĉar kelkaj komencantoj restis por aŭdi Esperanton parolatan.—G. Pollard.

MELBOURNE: La sekretarion de la 18-a Aŭstralia E-Kongreso (Herbert Koppel) intervjuis reprezentanto de la radiostacio Vieno, Graz kaj Innsbruck. La intervjuo okazis je 18-a Jan. en Hotelo Windsor per sonbendo, sendota aerpoŝte al Aŭstrujo.

Nova klaso por komencantoj komenciĝis je 7/2, sub Harold Beechey. Samvespere la membroj laŭvice preparolis la pasintan kongreson kaj substrekis la diversajn erojn kiuj laŭ ili estis la plej interesaj. La ĝenerala kunveno okazis je 14/2. Laŭ la raporto de la kasisto (S-ino M. Fordham) la societo elspezis \$20.23 pli ol ĝi enspezis. Laŭ la raporto de la sekretario (H. Koppel) la societo havis en 1971 entute 37 membrojn, el kiuj 8 estis novaj studentoj kaj 29 malnovaj membroj. (En 1970: 6 studentoj kaj 28 membroj). Nova estraro elektigis: Prez: H. Beechey; Vic-Prez: S-ino V. King, A. Baldwin; Sekr: H. Koppel; Kasisto: Brigadestro J. Munro; Biblioteko: S-ino F. Koppel.

S-ro Baldwin parolis, 21/2, pri la tempo kiam "Estis Ĥaoso", t.e. kiam li, kiel studento ĉe la Universitato Monash, estis subredaktoro de la studenta gazeto "Ĥaoso". Li priskribis multajn taskojn kaj klarigis terminojn rilate tiun oficon, montrante samtempe specimenojn. 41 personoj plenpakis la E-Domon je 28/2 akaze de la distra vespero. Ĉeestis vizitantoj el Geelong, la Malvern kaj Orientaj Antaŭurboj, kaj S-ino Lee el Kalifornio. S-ro Jim Dimo (Rochester), bonekonata akordionisto, montris kolorbildojn pri sia vojaĝo ĉirkaŭ la mondo. Aparte interesaj estis tiuj pri ne ofte vidata Meksikio kaj pri tieaj E-istoj.

Orientaj Antaŭurboj (Melbourne): La jarkunveno 2/2 elektis novan estraron: Prez: S-ro M. Fordham; Vic-Prez: S-ino M. Sanders, F-ino A. Hearn; I-a Sekr: R. Reed, 2-a Sekr: S-ino I. Fallu; Kasisto: S-ino G. Burmeister. Aliaj komitatanoj: Arthur Heathfield, Jack Fallu, S-ino B. Smith (Publikaj rilatoj).

Malvern (Vic) La iama Orrong E-grupo ŝanĝis sian nomon al Malvern E-Grupo Elektigis: Prez: S-ino A. Paling; Sekr: F-ino V. Strachan; Kas: S-ino M. Halliday.

Letero el Anglujo

Ankoraŭ ĝuante nian libertempon en Anglujo, ni kuniĝis kun la E-a Grupo en Richmond (Surrey) — nova grupo kiu komencis ĉ. unu jaro. Plejmulte la anoj estas fluj E-istoj, kaj ni ĝuis la ŝancon paroli nur E-e. Je la lasta kunveno kelkaj diskutoj okazis; ĉiu sugestis temon kaj ĉiuj parolis. Ĉe alia kunveno la talenta S-ino Markarian demonstris la arton de papera faldado kaj rakontis pri ĝia enkonduko en Japanujon en la 3-a jarcento. Ĉiuj faris simplajn objektojn.

Ĉe kunveno de la U.N. Asocio en Richmond D-ro Lapenna prelegis pri la lingva problemo, donante konvinkajn kialojn por la uzado de E-o. Poste li

kapable respondis interese inteligentajn demandojn.

Malfeliĉe ni adiaŭis Ges-rojn Greenhalgh, kiuj foriris ŝipe por reveni al sia hejmo en Aŭstralio. La dumvintra vetero ne estis tro malvarma, kaj ili ĝuis sian vojaĝadon ĉi-flanke de la mondo: prezurige ni legas **THE AUSTRALIAN ESPERANTIST** de komenco ĝis fino. Salutojn al niaj amikoj de Jessie kaj Victor Clarke, 6 marto, 1972.

B.E.A. EXAMINATIONS

Writing about the "exam syndrome", The New Zealand Esperantist informs hopeful aspirants that the **Diplomo de la Brita Esperanto-Asocio** is an exacting test of human endurance . . . The written part is a marathon of ambiguity, idiom and technicality . . . if you try it after less than 5 years' study, chances are that you'll be working 24 hours a day for two months.

Of the **Licenciata Diplomo de la Brita Esperanto-Asocio**; very few possess it apart from being fiendishly difficult, it cannot be sat in New Zealand at present. A candidate is expected to know not only the grammatical subtleties of the language, plus the rudiments of its etymology and phonetics, but also its technical vocabularies, its history, and its original and translated literature. A condition of entry to the examination is the submission of a 1000-word essay on any subject; but it must be of a high stylistic quality.

We comment: The B.E.A. Diploma (also known as *Atesto pri Kapableco*) is approximately equal to the *Supera* (Advanced) of the A.E.A. The *Licenciata Diplomo* is fairly comparable with the *Klereca* (Final) of the A.E.A. Prospective candidates for A.E.A. examinations should bear the above in mind, assuming that the above remarks carry more than a modicum of truth.

By the way, New Zealand, "The Esperanto title of the Association is *Brita Esperantista Asocio*" (Bye-laws, "British Esperantist", Mar.-Apr., 1954. You lose a mark).

SCOUTS AND ESPERANTO

Mr. Stan Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, 3127, has for many years devoted his time and labor to promoting the spread of Esperanto among Scouts. He asks for help from well-wishers in this work. The quarterly organ of the Skolta E-Ligo costs only 50c. yearly posted direct; subscription through him would be encouraging as evidence of

interest and sympathy in the worthy field of action.

W. H. KING FORPAS'Ŭ

En la 24-a de januaro mortis William Hudson King, fervora aktivulo por Esperanto en Nov-Zelando dum 52 jaroj. Bone konas lin multaj Aŭstraliaj Esperantistoj. Nur 25-jaraĝa li estis elektita prezidanto de la 5-a Aŭstralazia Esperanto Kongreso en Melburno. Ĉiusfere li laboradis, lande kaj internacie por sia amata lingvo. "Efektive la historio de la viro estas ankaŭ la historio de la movado en Nov-Zelando", skribis C. J. Adcock en *The New Zealand Esperantist*" (jan;feb., 1972).

Tiel same trafite de la Morto, ni en Aŭstralio dolore simpatias kun niaj transmaraĵ kunbatalantoj.

Mrs. W. HARVEY

The sudden death, 1 March., of Mrs. Winifred Harvey, of Stephen St., Toowoomba, came as a great shock to all her friends, and especially to the members of the Toowoomba Esperanto Society, whose first president she was. Although blind, Mrs. Harvey in no way allowed her infirmity to hinder her study of, and practical interest in, the International Language. With the help of Braille texts, tapes and records she acquired, in a remarkably short time, such a degree of proficiency that on the occasion of the society's first annual meeting, she was able to deliver, in Esperanto, a really thought-provoking address.

Again, at the Queensland Esperanto Federation's recent conference at Caloundra she captivated her listeners with beautifully modulated reading, in the same tongue, of a charming fable. Her quiet but eminently practical enthusiasm has set an example for all Toowoomba — and indeed, all Australian — Esperantists, by whom she will be forever remembered.

To her husband, Mr. A. D. Harvey, all members of the group extend profound sympathy. (from: *The Toowoomba Chronicle*).

KRUPP — DRESDEN

En unu nokto Britaj bombavionoj detruis Dresdenon, plenan de rifuĝintoj, kaj mortigis 135.000 homojn. Post la milito la Brita Registaro pagis kompense al Krupp kvardek milionojn da pundoj kompense pri damaĝo al ties milituzinoj. Eĉ ne murmuris la Brita popolo proteste. Se la registaro estus donacinta la monon al la urbo Dresdeno, kiel gesto de Kristana pento, la gazetaĉaro laŭte hurlus kondamne.

RECENZOJ

"Laŭtema Vortaro: Esperanto, English, Francais, Espanol.

234 paĝoj. Prezo \$3, rabato por revendistoj. Eldonis Ergoto.: Havebla ĉe Prof. Adan Hrynkiwicz, C.C. 3134, Buenos Aires, Argentine.

La vortoj estas liste klasigitaj laŭspece en 4 lingvoj. Ekz-e, "pulo" troviĝas sub "Insektoj", "lakto" sub "Trinkaĵoj", en la indekso:

pulo: flea: puce: pulga.

lakto: milk: lait: leche.

Tiu procedo celas evitigi serĉon en apartaj vortaroj.

La kompilo estus ankoraŭ pli valora, se ankaŭ la Germanaj, Italaj, kaj Rusaj ekvivalentoj havus lokon en ĝi, laŭ principo de Bastien ("Naŭlingva Leksikono").

Precipe helpaj estas la sekcioj pri spacveturado, filatelio, fotografio, ŝako — krom aliaj — pri kiuj ofte mankas iuj terminoj en komune uzataj vortaroj.

La apero de ĉi-verko feliĉe instigus al kompilo de tut-Esperanta "Vortaro de Sinonimoj". Oni bezonas pli kompletan ol la pionira provo de Brendon Clark en "Kien la Poezio?"

"Biblia Revuo", apr.-jun., 1971. Angelo Duranti, Piazza Duomo 4, Ravenna 48100, Italy.

La eseo de Donald Broadribb estas majstroverko de intensa erudicio; povus ĝin taŭge prikomenti nur homo kun intelekto komparinda kun tiu de la aŭtoro. En aparte utila, ĉar populare legebla artikolo, G. Rust ekzamenas interalie aspektojn de la Sokrateca instrumetodo de Jesuo. Lumdona pritrakto, verkita en pli konversacieca tono, ĝi atentigas, ke la granda instruanto evitis la abstraktan kaj uzas nur konkretan vortobildon: lilioj, lampoj, salo, trezoro, kampoj k.s. Ĝi estas uzinda en rondoj edukaj.

J. Cohen-Cedek detale kontribuas pri la historio kaj arkeologio de la Sankta Sepulitejo. Piednoto informas, ke P.I.V. eraras en tio, ke la amasbuĉo al infanoj en Bet-Lehem ne estis faro de Herodo la Granda, sed de unu samnoma posteulo, verŝajne Herodo Antipas.

Prinotita traduko de Jona (Bibli-libro) far D. Broadribb laŭ la bone konservita originala teksto.

Nro jul.-sept.: Doktora tezo de George Mullens ĉe la Universitato de Melburno pri "harismo" (donaco, en la Esp. Nova Testamento). La vorto ne sin trovas en la P.I.V. Simile cerbostreĉa — kaj sciavastiga — studaĵo pri mistera 25-litera kvadrato. Ĉu fru-Kristana kriptajo, amuleto? Oni trovis ĝin sporade jam

de la Eŭfrato ĝis la Angla urbo Cirencester. Prof-o D. B. Gregor esploris kelkajn antikvajn lingvojn cele solvi la mirindan palindromon. Carl Loeliger (Melburno) kontribuas al studado de la Siria Nova Testamento.

Ĉi unikan revuon faras tre kleraj homoj, kiuj celas helpi intelektulojn eniri kaj ĝui la mirindan kaj misteran medion de la antikva mondo.

"The Life of Zamenhof": de Edmond Privat. Tradukita el la originala Esperanto de Ralph Elliott. Esperanto Press (Canada). 157 paĝoj; 4.50 guld. ĉe U.E.A. per nia Libro-servo.

Eldonita en 1920, tiu brila biografio, verkita de intima konanto de Zamenhof, estas la libro sur kiu ĉiu sekvinta "Vivo" pri la familio estas bazita. Ĝi impresas per sia virtuozaj esprimsemto kaj kompakta prezento, kaj la tradukinto senfidele kaj formkonforme redonis la prozan perfektan de la originalo. Al la Angla frazaĵo malestas tiu rigida neflekseco, kiu ofte difektas tradukaĵojn.

Aldonitaj estas kelkaj raraj fotoj ĝis nun ne publikigitaj; krome, dek paĝoj da informoj pri Esperanto kaj ĝia gramatiko, vortfarado k.a.

P. 29 informas, ke Zamenhof komencis studi la Anglan ĉe la kvinna klaso de la klasika gimnazio en Varsovio. Tio estas duba. Laŭ fidinda fonto, en la Rusaj gimnazioj oni tiutempe ne instruis la Anglan. Eble li studis la lingvon private.

La tri ismoj — Hilelismo, Homaranismo kaj Esperantismo — pri kiuj estas multe da teksto en la Leteroj de Zamenhof, estas klarige difinitaj de Privat en formo per kiu legantoj povas ilin nete distingi.

En la lumo de nuna scio pri la Ido-afero, estus bone, vidi pli aktualan piednoton pri la duba aŭtoreco de Ido. Laŭ aserto de iuj funde-konantoj pri tiu historio, Louis Couturat — ne De Beaufront — estis la aŭtoro.

Jam de la unua ĉapitro, en kiu Privat skizis la fonon de la Zamenhofa nask-regiono, ĝis la trista priskribo de la lasta sceno, legantoj streĉe sekvas la dramon de unika viro, kiu el sia sufero generis novan lingvon, kies adeptoj troviĝas jam en 80 landoj.

En lia 58-jara vivo venis horoj dum kiuj la animo de Zamenhof pulsis je la vibroj de l'venko; tamen daŭre premis ĝin sana kaj mona manko, disputado inter amikoj kaj genta malamo inter la popoloj. Tiun turmentan trion li kuraĝe frontadis. Doloron dum vivo persiste li spitis, kaj gloron senmortan tutjسته meritis. Pro la ofendoj kaj ĉikanoj, malpli granda karaktero, lasante fali la manojn, rezignus la kolosan taskon. Sed li estis kreita el dia metalo. Naturo lin formis — kaj la muldilon rompis.— Robo.

LA VOJRABISTO. (A. Noyes)

- 1.— En mallumo torentis la vento, kaj la arbojn ĝi blovis;
Galiono fantoma, la luno skuiĝadis, ŝancele sin movis;
La lunlumo rubandis la vojon, kaj tra la erikejo purpura
La rabisto alrajdis, konstante alrajdis:
La survoja rabisto alrajdis al la pordo antikva kaj dura.
★ ★ ★
- 2.— Sur la kapo li portis trikornon kaj galonon ĉe sia mentono;
Kun jaketo el ruĝa veluro, sur la kruroj ŝafled-pantalono.
Ho, senfalte li portis la vestojn; brav-sintene li sidis sur selo.
Kaj l'armiloj briletis, briletis, briletis;
La pistolo kaj spado briletis sub la alta steloza ĉielo.
★ ★ ★
- 3.— Trans la ŝtonan pavimon li bruis en la korto taverna obskura.
Sed, frapinte pervipe la ŝutron, ĉion trovis ŝlosferme sekura;
Ĉe l'fenestro li fajfis arion kaj aŭskultis — li iun ekspektis:
Sin! — de l'domo la filinon ruĝlipan, ruĝlipan!
En la harojn kaj longajn kaj nigrajn ŝi amnodon sangruĝan enplektis.
★ ★ ★
- 4.— En la korto peĉnigre obskura grince knaris la pordo beststala,
Kie Timĉjo la grumo aŭskultis, kaj lin mordis jaluz' akre gala.
La okulojn plenigis frenezo, lia vizaĝo radiis deliron.
La virinon li amis ardege, ardege.
Kiel hundo li mute aŭskultis, kaj li aŭdis tremanta la diron:
★ ★ ★
- 5.— "Unu kison, ho kara knabino, ĉar ĉi-nokte mi riĉon akiros
Kaj revenos kun multe da oro antaŭ kiam la suno eliros.
Tamen, se la hundaĉoj min ĝenos, persekuton dumtage farantaj,
Vi min serĉu lunlume, min serĉu lunlume;
Mi revenos al vi, mia kara, malgraŭ drakoj la vojon barantaj!"
★ ★ ★
- 6.— Piedinge li staris, sed vane — la maneton tro foran ne tuŝis;
Lasis fali ŝi tiam la harojn — lia sango volupte ekfluis.
Liajn sentojn treege flagrigis la odoro de ŝia parfumo;
Ŝiajn buklojn li kisis lunlume, lunlume;
La bridilon li forte ektiris kaj galopis el vid' en lunlumo.
★ ★ ★
- 7.— Ne alvenis li ĉe la tagiĝo; ne alvenis li ĉe la plensuno.
En la tempo de suna subiro, kaj jam antaŭ la levo de luno,
Kiam estis la vojo rubando l'erikejon markanta kun tordo,
Ruĝjakula anaro almarŝis, almarŝis.
La soldatoj de l'reĝo almarŝis kaj venĝeme alvenis ĉe l'pordo.
★ ★ ★
- 8.— Ili ne al la mastro parolis, sed trinkadis libere je vino;
Al la ino plenŝtopis la buŝon kaj ŝin ligis al ŝia lit-fino.
Ĉe l'fenestro du viroj genuis kun musketo facile prenota.
Ĉiuloke la morto minacis, minacis.
Trans la sojlon fenestran ŝi vidis al la vojo de li alvenota.
★ ★ ★
- 9.— En poz' streĉa ligite ŝi sidis; ili sputis al ŝi malhonoron;
Ili tiel musketon aranĝis, ke ĝi celu tre rekte la koron.
"Bone gardu!" kaj ili ŝin kisis. Sed ankoraŭ restis promeso:
"Vi min serĉu lunlume, min serĉu lunlume;
Mi revenos al vi, mia kara, malgraŭ ĉiu demono en Hadeso!"
★ ★ ★
- 10.— Post la dorso ŝi tordis la manojn, sed la nodoj neniel moviĝis.
Doloriĝis ŝi tiel la manojn, kaj la fingroj per sango kovriĝis;
Sed ŝi spite plenstreĉe penegis — malrapide la temp' sin ekspedis,
Ĝis alvenis preciza noktmezo, noktmezo.
La musket-lasilon jam tuŝis ŝia fingro. Si ĝin nun posedis!
★ ★ ★

- 11.—Pri ĉi tio ŝi estis kontenta; ne necesis jam plua doloro.
 Ŝi ekstaris kaj streĉe atendis kun la tubo pafila ĉe l'koro.
 Decidinte ne riski brueton, ŝi denove neniel baraktis,
 Ĉar la vojo vidiĝis lunlume, lunlume,
 Kaj la sango envejne kuregis kaj pro amo spasmege salt-taktis.
 ★ ★ ★
- 12.—Trot-trotad-trot! ĉu ili ne aŭdis, ke hufbatoj tre klare bru-plaŭdas?
 Trot-trotad-trot! ankoraŭ tre fore; ĉu do surdaj, ke ili ne aŭdas?
 Laŭ l'rubando lunluma de l'vojo, transirante la kreston impete,
 La rabisto alrajdis, alrajdis;
 La soldatoj kontrolis la prajmon, Si stariĝis tre rekte, agprete.
 ★ ★ ★
- 13.—Trot-trotad-trot! silente kaj froste; trot-trot! kiel aŭdeble ĝi ehis!
 Pli proksimen li venis kaj plie! Ŝia brava vizaĝo brilegis.
 Kaj la okuloj largiĝis momente; inhaliĝis la lasta enspiro.
 Sia fingro nun premis tre firme, tre firme —
 Tiu kuglo enboris la bruston; ŝia amo ŝin kronis martiro!
 ★ ★ ★
- 14.—Li turniĝis spronante rapide, alcelante al loko rifuĝa,
 Sen la scio, ke jam ŝi formortis, baniĝinte en sango helruĝa.
 Nur tagiĝe la veron li sciis, kaj ĝin aŭdis kun pala vizaĝo,
 Kiel Beta, la kara filino de l'mastro,
 Pro la amo al li sin oferis, sen rezervo, sen ajna domaĝo.
 ★ ★ ★
- 15.—La ĉevalon freneze li urĝis, malbenajon ĉielen alkriis;
 Laŭ la vojo polvoza li flugis; tra l'aero la glavo glimstriis.
 Liaj spronoj malsekis pro sango, sub la lumo de luno flaveca.
 Sian jakon vinruĝan ankoraŭ li portis:
 Mortpafite, li kuŝis en sango, la galon' ankoraŭ braveca.
 ★ ★ ★
- 16.—Kaj ankoraŭ dum nokto en vintro, kiam vento la arbojn blovadas,
 Ŝanceliĝas la luma fantoma galiono, sin skue movadas,
 Kaj la voj' erikeja rubandas kaj serpentas lunlume kun tordo,
 La bandito alrajdas denove, denove,
 Kaj alvenas ĉe l'pordo taverna, klaketante sur ŝtona la korto.
 ★ ★ ★
- 17.—Sur la ŝtonoj li klakas kaj krakas en la korto taverna obskura;
 Kaj denove li fajfas arion — belulinon li arde ekspektas,
 Kaj denove li frapas pervipe sur la pordon ankoraŭ sekura;
 Kies nigraj okuloj briletas, briletas,
 Car ŝi faras sangruĝan amnodon kaj en harojn ĝin ame enplektas.
 —Tradukis F. R. Banham kaj K. Linton
 ★ ★ ★

LIBROSERVO

Reprints of *Katalogo de AEA* are now available 18c posted.

Propaganda Leaflet "**The International Language**:" available free of charge from the Libroservo to anyone who specifies the quantity required and pays the postage costs.

Novaj Libroj:—

The Accepted Esperanto Dictionary—
 E. P. Ockey: Kolekto de Oficialaj Esperantaj vortoj: 45c.

Adoru Kantante — K.E.L.I. KR280B.
 262 Himnoj kun muziko. 5.25.

Sep Reĝidoj-Bela Balazs. Adam Wurtz
 20B: Bele ilustrita infanlibro \$2.35.

Utila Manlibro pri Hindujo — M.
 Haudebine G 76b. 1.75

Alko kaj Suna en Siaj Du Dometoj —
 V. Hills I 80b. 80

Rememoro el 1908j. (A.E., 6/71, p. 129)

Ankaŭ mi vivis jam en jar' mil naŭcent
 ok,

Junulo deksejara, fiera kiel kok' . . .

Dum frost-sezon' Berlina ekskurson faris
 mi,

Glitante sur biciklo trans firma lag-
 glaci'.

La radoj ekrapidis, frostiĝis la person':
 Car sub la vesto mia ja mankis — la
 kalson'!

Pro tio rezultigis baldaŭ apendicit'.
 Mi du monatojn kuŝis en hospitala lit',
 Kaj fine resaniĝis de post operaci';
 Sed vintre sen kalsono ne plu biciklis
 mi

—P.E.S. (Sidnejo).

TIBOR SEKELJ

Per lia letero al F-ino Hasluck ni informiĝas, ke 6 Jugoslavaj gazetoj publikigis 30 artikolojn, kiujn li verkis pri sia vojaĝo. Unu havas titolon: "Miss Hasluck kaj ŝia mondo", kun amikaj mencioj pri S-ro Wre Chandler, Marie Byles kaj la familio Chaldecott. En lia "Esperanto-Gazeto" estas artikolo: "Aŭstraliaj Hobioj"; en venontaj numeroj de Esperanto-Gazeto aperos tuta serio pri lia vojaĝo.

Plaĉis al lialanda TV-redaktoro ses duonhoraj programoj laŭ lia filma materialo, montrotaj en februaro.

El la vojaĝo li alportis 140 pecojn da masko, ritobjektoj, armiloj kaj laboriloj kaj 28 indiĝenajn pentraĵojn sur arboŝelo el Arnhemlando. Li ekspoziciis la kolekton en Beograd, Zagrebo kaj Novi Sad kaj intencas fari tion en pliaj. Post tio, granda parto de la kolekto restos en la Zagreba etnografia muzeo, kiu proponis al li bonan sumon por aĉeti ĝin . . . li mem ne havas firmen lokon en kiu li povus ĝin konservi. Li faris pli ol cent prelegojn; kelkloke tri apartajn pri Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Nov-Gineo. Li komencas verki libron pri tiu lasta lando.

En aprilo li forveturos Iranon. Dum tiu vojaĝo li faros propagandan filmon. Por la jarfino la pripensas novan iom pli longan vojaĝon. Alternativoj estas: la Pacifikaj Insuloj, eble pasante tra Sidnejo; Ĉinujo, aŭ Ameriko. "Esperanto-Gazeto" estas havebla ĉe Ken Linton aŭ U.E.A. 2 dol.

DIVERSE . . .

Aŭstria E-ista Fed. heredis de filantropo 40.000 ŝilingojn.

La trijara reklam-kampanjo de Aŭstria E-Asocio rezultigis 2054 inform-petojn, 192 petantoj aliĝis al la koresponda kurso kaj 88, sekve, al la progresiga kurso.

Laŭ statistiko de Libroservo Pickel (F. R. Germ.) en 1971 plej vendiĝis en Germanujo: Poŝatlaso de la Mondo Bona Sanco (W. Bormann), Paŝoj al Plena Posedo (W. Auld), Plena Ilustrita Vortaro, Senĝenaj Dialogoj (A. Fernandez), Vole . . . Novele (R. Schwartz), Metodiko de la E-Instruado (Rakuŝa).

Laŭ Heroldo de E. 1 feb. D. E. Parrish, ĉefdel. UEA en Usono, estis mortigita per pafilo de frenezulo.

Nejuna viro estas tiel "juneca", kiel li sin sentas post provo testi sian "junecon".

Nejuna virino estas tiel "juneca", kiel ŝi aspektas al viro kiu amas ŝin rigardi.

SENPAGA REKLAMETADO

De E-istoj mi ofte ricevas leterojn sur kies kovertoj mankas E-aj glumarkoj aŭ stampajoj. Survoje tiujn leterojn ekrigardas multaj poŝtistoj kaj plurokaze ankaŭ aliaj personoj. Se ili ofte vidas la vorton "Esperanto", ili sciigos pri la vastiĝanta uzado de la Internacia Lingvo.

Pro mia uzo de tiu rimedo — antaŭ multaj jaroj—Nederlanda poŝtisto fariĝis E-isto kaj poste elstara aktivulo en la Kristana E-ista Ligo Internacia.—Red.

FALDFOLIO MANNHEIM

Nova Esperanto faldfolio turisma en 20.000 ekz. Jam fine de 1965 la Trafik-oficejo eldonis la unuan Esperantan faldfolion en sama kvanto. Senpage ricevebla: Esperanto, D-68 Mannheim, I. T. 6/18, German Federal Republic.

SERĈI ION; SERĈI AL IO.

P.I.V. NE donas ekzemplon de uzo prepozicia post "serĉi", tamen pro rima aŭ metra bezono "serĉi al -o" estas uzo utila. Proze, ĉe preleg-titolo, jen uzo substantiva: "La Serĉo al Solvo de Polucio". (Preferindas uzi "al" ol "por".)

Jam de tre frua tempo ĝis sia vivfino, Zamenhof sporade uzis: uzado ĝin; vastigado ĝin komparado ĝin; malamon konservanto; alkalkulado ĝin (jaro 1915: Originala Verkaro 357). Tial, analoge, la formo "Serĉo solvon . . ." ne estus mal-korekta. Plena Gramatiko, par 263, notas, ke tiu uzo ne enradikiĝis. Malgraŭ ĝia arkaismeo, verkistoj, precipe poetoj, rajtas ĝin imiti, pro ĝia aŭtoritata precedenteco.

Estas rilata ankaŭ la sekvanta observajo:— Uzo de adjektivo aŭ adjektiva participo anstataŭ substantivo, kiel ekzemple: "la grava estas liveri verkon" (Lingvo kaj Vivo, 280; 240/1-4). "da internacia ili havas en si nenion" (Originala Verkaro 19/21) "la loĝanta en la ĉielo ridas" (Psalm 2/4). "Kiu estas la perfidanta vin?" (Johano 21/20).

Plendetalaj pritraktoj en Lingvo kaj Vivo, Waringhien, p. 150-164; Oomoto, 1-2, 1971, T. Nakamura.

Si:— "Kiam ni estos edziĝintaj, tiam mi dividos kun vi viajn zorgojn kaj ĉagrenojn".

Li:— "Mi ne havas zorgojn kaj ĉagrenojn".

Si:— "Mi diris, kiam ni estos edziĝintaj".

La Olimpiko.

Por subteni agadon de la Germana E-Asocio ĉe la Olimpiko en Munĉeno, la UEA donacis al GEA 20.000 ekz. de

seslingva faldfolio: "La Internacia Lingvo Esperanto" kun inform-adresoj en 66 landoj. Jam eldoniĝis 100.00 ekz. entute ĝis nun.

Glumarko Libro-Jara.

Internacia Libro-Jaro estas 1972. UEA eldonis glumarkon simblan en 80.000 ekz. En 16-markaj folioj po 0.40 guld. Aldonu 10% pro sendkosto. Ĉe nia Libroservo.

MINIMUME, ALMENAŬ

La diferenco. "Minimume" substrekas neceson limigi kvanton je la kiel eble plej malgranda. Ekz-e: "Kunporto por la vojaĝo minimumon da pakajo — sapon, razilon, dentobrosan . . ."

"Almenaŭ = "ne malpli ol"; "se ne pli". "Ĝi devas havi almenaŭ (at least) ok futojn da largeco". "Devas ĉeesti almenaŭ dudek membroj por validigi decidon". Ĝi esprimas dezirindecon havi iom pli . . .

PRESERARO MISLITERA


"Oni mampremas novajn amikojn": "British E-ist", aug. 1971, p. 78. Prefere: "amikinojn". Ho, nia permesa socio! "Dia Regno", dec. 1955 simile suferis de la pres-demono: Ĝi informas, ke la mondo "adoras Mamon". Ni sugestas: "Mamonon", laŭ Mateo 624. (N kaj M apudestas ĉe tajpklavaro).

LIBERA FURUMO

"Firakontoj" — En epoko, kiam multaj homoj strebas, aspekti laŭ vestado kiel eble plej malpure, mi estas tute konvinkita, ke kelkaj personoj ŝatas, legi kaj vidi pornografion en la gazetoj. Sed mi pensas, ke la nacilingvaj publikaĵoj pli ol sufiĉe provizas al tiaj deziroj. Por Esperantistoj miaopinie estas pli grave, priatenti la purajn akuzativ-formojn ol la malpuran humuron. —Do, mi ne aprobas la proponon.—P. E. Schwerin.

Hodiaŭ la meza altlernejano povas jongli kun binaraj nombroj, sed ne povas reciti la Dek Ordonojn. Li scias dekoble pli multe pri astronomio ol sciis liaj geavoj, sed malmulte pri la Surmonta Prediko.

40. a
foiro
de
barcelono
3. a . 13. a junio
1972



Ankoraŭ fojon La Foiro raklamas per Esperanto, korespondas en ĝi kaj estas en konsultaj rilatoj kun la Hispana Esperanto-Instituto. Pli ol 60 nacioj partoprenis; 1½ milionoj da vizitantoj. Ĉu vi iros Barcelonon? Ni vin bonvenigus! — Avenida Maria Cristina, Barcelona 4.

FONDUSO GOLDSMITH

A.E.A. intencas starigi fonduson nomatan: "La Tajni Goldsmith Memoriga Fonduso". — Ross Baxter, sekretario.

KORESPONDO

Ni deziras korespondi kun Aŭstralianoj. Skribu kun indikoj pri aĝ(sekso ktp. al Japana E-Koresponda Servo, ĉe Kleg, (531) Oyodoku, Nakatu-hamadori 3-10, Osaka.

Instrumajstro 27-para dez. kor. pri fotarto, birdscienco, filozofio, interŝanĝo de E-aĵoj. Peter Lorenz, 5231 Gangloff-sommern, Goethe Lernejo, German Fed. Republic.

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 106 (186)

MELBURNO

Majo. 1972

THE ENGLISH LANGUAGE: MYTHS AND REALITIES

In a speech at Gresillon, Professor P. Janton, Chairman of English at Clermont-Ferrand, said, among much else highly informative, that by his experience of the teaching of English in France, only 3% of pupils are capable, after 7 years of study, of understanding spoken English, and then only if enunciated by a cultivated English person. Of 300 students of English having chosen English as a special subject, scarcely a third remained for the third year.

He holds that English is, for a Frenchman, as difficult as German or Spanish. The sounds of English differ from those of French; syllabic accent is irregular; tone and stress in the phrasing of sentences difficult to master. Idiomatic, illogical expressions abound, the meaning of which one may only guess at. While all languages have their idioms, English is peculiarly rich in them.

Its vocabulary is vast indeed: 450,000 words — three times that of German; four times that of French. Its orthography is such that one can only guess at the pronunciation.

Pronunciation is the greatest difficulty. English might conceivably become a **written** international language, but it will never become a **spoken** one, because its vowels and consonants are not universal, but peculiar to one people.

It was less difficult for a Frenchman to learn English in 1871 than it is in 1971. A hundred years ago the English were still under the influence of French and the Latin-derived tongues; in part they conformed their sentence structure to French syntax; today the syntax of English is

specifically different from French . . . and today it assimilates thousands of American locutions.

In a general sense English has become and is becoming simpler in its morphology and syntax. But in a relative sense — that is, when compared with the French language — it tends to become more complicated.

The failure of language teaching is not of the teachers or their methods; it is caused by the languages themselves and by the necessary limitations of the human brain. For a language is a complex system which one masters only if one has grown up with it. In fact, to learn a language is a procedure "against nature"; it calls for the acquirement of reflexes and convolutions of thought utterly foreign to one's mental constitution. For one must forget all that one has learned since infancy, imitate strange sounds and change the memory with thousands of words lacking mental association. It is a labor without end, which calls not only for much time but also for highly specific qualities of spirit. It would be wrong to suppose that all students have these.

It is, therefore, necessary to face the fact that the knowledge of a foreign language is possible only to a natural elite, and not to the generality.

Prof. Janton concluded his speech with a firm proclamation of his faith in Esperanto. (The fuller French text is in "Franca E-isto" 9-10/71.)

KASTELO GRESILLON

Esperantista Kultur-Domo, 49—Bauge, Francujo. Oni povas aliĝi al ĝiaj stud-sesmajnoj ĝis la Kvara Somera Periodo komence 27 aŭgusto 1972. Informoj ĉe via Red.

A.E.A. Oficiala Informilo.

15 Aprilo 1972

Novaj Individuaj Membroj

McArdle, S-ro J. Kensington, NSW
 Hall, S-ino A. E., Rosebery, NSW
 Fanos, F-ino S., Ashfield, NSW
 Mason, S-ro A. R., Cloncurry, Qld.
 Masman, F-ino R. Coonabarabran, NSW
 Morrison, S-ino A., Geelong, Vic.
 Clements, S-ino N., Blackburn, Vic.
 Linton, S-ro T. A., Dunolly, Vic.
 Harvey, S-ino, Caloundra, Qld.
 Ray, S-ino E., Caloundra, Qld.
 Mackenzie, S-ino M., Nambour, Qld.
 Gange, S-ro J. M., Heathmont, Vic.
 Judd, F-ino M., Malvern, Vic.
 O'Brien, Doris, Caulfield, Vic.
 Blakeney, S-ino, J. M., Whyalla Stuart
 S.A.
 Constable, S-ino M., Rockhampton, Qld.
 Pritchard, S-ino, A. N., Redcliffe, Qld.
 Styles, S-ino, D. Clontarf, Qld.
 Robinson, S-ino V. A., Aspley, Qld.
 Wright, S-ro N. G., Woodstock, NSW
 Qualtrough-Sheffield, S-ro W. R.,
 Macedon, Vic.
 Qualtrough-Sheffield, S-ino M.,
 Macedon, Vic.
 Qualtrough-Sheffield, F-ino J.,
 Macedon, Vic.
 Qualtrough-Sheffield, F-ino S.,
 Macedon, Vic.
 Campbell, S-ro S. J., Walgett, NSW
 Steele, S-ro T., Ravenshoe, Qld.
 Chester, S-ino B. M., City Beach, W.A.
 Pritchett, S-ro J., Minnamurra, NSW
 Veacock, F-ino J., The Gums, Qld.
 Jones, S-ro M., Riverwood, NSW
 Munro, Brig. J., Port Melbourne, Vic.

Korekto (marto nro).

Austataŭ Thornton legu: Thomson
 Estas mia sincera deziro, ke ĉiu instruisto akceptu mian dankon pro lia baldaŭna respondo, kaj mi precipe deziras komuniki al S-ino Lily Goldsmith, mian dankon, pro ŝia multvalora helpo dum tre malfacilaj tagoj.

Mi estas certa, ke mi ne povos anstataŭi Tajni, sed mi faros mian plejblon.—
 R. W. Baxter, Sekretario.

A.E.A. EXAMINATIONS

Elementary: Mrs. M. Z. Pearson, Harbord, N.S.W.; G. S. Thatcher, Fairlight, N.S.W. with honor. Mrs. E. Giles, Collaroy, N.S.W.

The following hold the Advanced Diploma (Supera) and may act as examiners for the Oral Part of the Elementary examinations:

Western Australia: Mesd. McGrath, Sedgley, Pollard, Kruger, Threlfall; Mr. C. W. Dean.

Queensland: Mesd. Greenhalgh, Clarke

(Jessie); Messrs. J. Moore, H. Petley, N. W. Russell.

New South Wales: Messrs. F. Mueller-Sorau, Russ Baxter, R. Moir, A. Cocking, W. Chandler. Mesd. A. Baxter, Ford Lewis.

Remaining holders are Mr. R. Harry and Dr. Robbins (Canberra).

Those holding the Advanced Diploma of the Brita Esperantista Asocio (Atestpri Kapableco) are, subject to the approval of the A.E.A. Examinations Commission and to their being members of the A.E.A., entitled to examine for the Oral Part of the Elementary.

To those intending to enter for the Supera we advise that this examination, Written and Oral, is judged by those holding the Final (Norma Klereca) Diploma. These are: Dr. C. Caldera (Perth); K. Linton, F. R. Banham and Fay Koppel (Melbourne). This creates a difficulty for aspirants who find it hard to contact these Finalists. Two candidates who have passed in the Written Supera are thus held up through their isolation from the authorised examiners.

LINGVAJ EKZAMENOJ

"Multaj kandidatoj sukcesas ĉe Franc-lingva ekzameno pro tio, ke ili gajnas la pli grandan nombron da poentoj ĉe la traduko el la Franca en la Anglan. Ordinare, kandidatoj faras bone en tio. Sed estas granda diferenco inter legado de la Franca kaj la multe pli malfacila sin-esprimado en ĝi. Sennombraj personoj, kiuj fiere diras, ke ili bone retenas sian scion de tiu lingvo per legado, sentus ĉagrenon, se ili provus traduki en la Francan hazarde elektitan paragrafon el la Angla . . . En mia unuajara Franc-lingva klaso estis 35 lernantoj; je la lasta vespero restis nur du, kaj nur mi registrigis min por la dua jaro. El la 33 studentoj, kiuj komencis kun mi mian Germanan kurson, restis nur du ĉefine de la dua jaro . . . La Angloj, kaj kredeble ankaŭ la Francoj, ne facile lernas lingvojn". — P. Toynbee en sia verko "Underdogs" (subprematoj), 1961.

59 YEARS AGO . . .

Extract from a long interview with Dr. Zamenhof by J. M. Warden in "The Christian Commonwealth", Sept. 3, 1913.

"I assured Dr. Zamenhof that the Christian world was greatly indebted to him for his translations from the Old Testament. Many ministers and students of sacred literature had found them of great value as a commentary on the text; in many cases where there was a discrepancy between the Esperanto text and

the text of the English Bible it was found that the former was correct, and that it rendered the Hebrew text more faithfully than any national language.

"I asked him his opinion on the recently published translation of the New Testament. He said: 'I think that in all respects it is a meritorious production and the most important book in our Esperanto literature. So far as I have read it, the translation appears to be excellent'".

"He added that he hoped to be present at the Universal Esperanto Congress in Edinburgh in 1915, if it took place." (The Congress, however, took place in San Francisco that year.)

THE N.T. IN ESPERANTO (1912)

The 1912 edition was the work largely of Rev. J. C. Rust for the Greek; Prof. McFadyen gave advice on this. A. E. Wackrill revised the Esperanto text. Style and accuracy are defective in this edition. In 1926 the N.T. was thoroughly revised to bring its Old Testament quotations into harmony with Zamenhof's renderings in his translation of the Hebrew Bible. Of course, where the apostles and others in the N.T. quoted not from the Hebrew but from the LXX (Septuagint), or from memory based on it, this was not done.

Style and accuracy are improved in the 1926 edition. In my copy of the 1913 edition (reprint of the 1913 edition) I have marked interlinear every alteration.

In 1956 a new edition of the Bible in Esperanto appeared, revised somewhat by Prof. W. J. Downes. See: "Lingvo kaj Vivo", by Waringhien, p. 279, and list of revisions in "British E-ist" 7/57.

The 1912 edition of the N.T. sold out its 5000 copies in a few months. Today it is a bibliographical curiosity. —Editor.

LA MESAGO DE LA KAJTO

"Ĉu vi sentas vin sana, Panjo?" La voĉo de mia filo venis al mi el fora urbo.

"Jes, dankon," mi respondis. Mi bone aŭdis ĉion, kion li diris, sed mi ŝajne rifuzis akcepti la veron. Katanjo — lia filineto — nia nepino — mortigita en vojakcidento.

"Ĉu vi estas certa", li insistis. "Petu najbaron resti kun vi."

"Ne ĝenu vin pri mi, sed venu al ni, kiam vi povos".

"Ni venos post la funebraĵo." Lia voĉo sonis tre laca. Mia kompatinda filo.

"Funebraĵo", mi ripetis, remetante la ricevilon. Do nia kara Katanjo estas mortinta. Mi konsideris la vortojn, sed mi ne povis akcepti la veron. Nia Katanjo,

kiu neniam nur marŝis, sed saltis, kuris, aŭ rapide turniĝis kiel kirliĝanta vento; nia Katanjo, kiu ĉiam parolis, kantis, ridis. Kiel ŝi povis esti mortinta? Se mi povus tion kredi, kian grandan doloron mi suferus! Ne! Mi tute ne povas kredi.

Do mi rifuzis akcepti la veron, evitis najbarojn, kaj informis nenium pri nia Katanjo. Mi purigis la plankojn, poluris la fenestrojn, ordigis la ŝrankojn. Mi penis dormigi mian menson, sed ĝi rifuzis, kaj konstante flustris ŝian nomon. Katanjo! Katanjo!

Kun la flustro venis al mi memoro — memoro pri tago, kiam mia patro kaj mi flugigis kajton.

Tiu memoro reportis min al bela aŭtuna tago sur nia farmbieno apud rivereto, sed por mi la tuta mondo tiam mallumiĝis, ĉar mia skota ŝafhundino, mia propra Trilby, estis mortigita per piedbato de nia nova virĉevalo. Nun ŝi kuŝis en la tero sub tabulo, sur kiu mi skribis TRILBY-AFABLA HUNDO - MIA AMIKO. Ŝi estis sepjara kaj mi estis sepjara, kaj ni estis amikoj ekde naskiĝo.

Mi estis tro juna, kiam mortis mia patrino, por konstati mian pardonon, do ĉi tiu stranga suferado estis nova sperto por mi. Larmoj rifuzis elverŝiĝi, sed fariĝis malmolaj ŝtonoj en mia brusto. Mi kuŝiĝis sur la benko en la granda alkova fenestro kaj rifuzis paroli al iu ajn, sed eta voĉo interne konstante ripetadis "Trilby . . . Trilby".

Onklino Hanjo vokis min al lunĉo, sed mi ne respondis. Mia patro venis kaj staris apud mi, sed mi ne rigardis lin.

"Mi opinias," li diris, "ke hodiaŭ estas bona vetero por flugigi kajton. Kion vi opinias, Tomĉjo". Li nomis min Tomĉjo, ĉar li ne havis filon.

Mi ne respondis.

Li eniris la kuirejon, kaj mi aŭdis lin paroli al Onklino Hanjo. "Mi intencas fari kajton por Tomĉjo," li diris, "Grandegan. Ĉu -vi havas malnovan littukon, kiun mi povus uzi?"

"Vi diris al mi," riproĉis lin Onklino Hanjo, "ke vi intencis veturigi la vaĝonon al la vilaĝo por alporti kokidan manĝaĵon".

"Ho, tio devas atendi ĝis morgaŭ", respondis Paĉjo.

Ĝuste la fenestro li komencis produkti la kajton. Mi povis aŭdi lin. Mi komencis levi la kapon por rigardi lin, sed subite mi memoris.

Trilby estas mortinta. Neniam plu ŝi kun mi venigos la bovinojn; neniam plu ŝi renkontos min, kiam finiĝos la lernejo; neniam plu mi vidos ŝin.

La martelado ekster la fenestro ĉesis. Kion faras Paĉjo nun? Ĉu estas dece ne pensi pri Trilby dum nur kelkaj minutoj?

Mi levis la kapon kaj elrigardis. Paĉjo jam finis najli du longajn maldikajn lignajn latojn en la formo de kruco. Poste li komencis ligi ŝnuron inter la finoj de la kruco, sed kiam li klopodis ligi ĝin la nodo elglitis el lia mano. Mi ĉiam metis la fingron en la mezon de la nodo, por ke ĝi ne glitu. Nun li havis nenium por fari tion.

Mi eliris kaj metis la fingron en la mezon de la nodo.

"Ĝi bezonas longan voston," li klarigis al mi, "por ekvilibrigi. Ĉu ĝi ne estas granda, Tomĉjo?"

Ĝi ja estis granda — tiel alta kiel paĉjo — kaj bela.

Paĉjo kaj mi portis la kajton al la teraltajo ĉe la fino de la paŝtejo. Mi povis flari la nigran nove plugitan teron sur la alia flanko de la barilo, kie la vintra tritiko estis plantita. La vento blovis miajn harplektajojn kaj mian rozkoloran katunan robon malantaŭ min.

"Vi tenu ĝin tiel," diris Paĉjo, "dum mi kuros. Eble ni povos suprenigi ĝin je la unua provo".

Mi tenis ĝin. Paĉjo kuris.

"Lasu ĝin," li subite kriis. Mi lasis, sed tro malfrue, kaj la kajto lame saltadis simile al birdo kun rompita flugilo.

"Vi ne estas sufiĉe alta, Tomĉjo," diris Paĉjo. "Mi tenos. Vi kuru!"

Ĉifoje mi kuris. Mi stumblis, sed regajnis la ekvilibron kaj kuradis. Supren! Supren! Bonege flugis la kajto, simile al granda blanka birdo kontraŭ la blua ĉielo.

Paĉjo rigardis min kun granda rideto. "Ĉu vi deziras sendi mesaĝon al la anĝeloj?" Li prenis el ŝia poŝo malnovan koverton, elŝiris el ĝi kvardratan pecon, metis truon en la mezo, kaj fendon ĉe unu flanko.

"Nun metu ĝin sur la ŝnuron tiel," li klarigis. "Ni ne havas krajonon, do vi devas nur pensi vian mesaĝon."

Mi metis la paperan pecon sur la ŝnuron tiel foren kiel mi povis etendi la manon. Paĉjo puŝis ĝin eĉ pli alten. La vento kaptis, kaj alten ĝi kuris laŭ la snuro.

"Esprimu deziron", konsilis Paĉjo. "Ĉu similas al esprimo de deziro sur la unua ŝarĝo da fojno".

"Iom".

"Ĉu mi ricevos mian deziron?"

"Kion vi deziras?"

"Vere ne estas deziro. Vere estas preĝo."

La rideto malaperis de la vizaĝo de la patro. "Por kio vi preĝus, mia filinetto?"

Rigardante al la tero, mi flustris: "Por ke Trilby povu denove vivi inter ni".

Paĉjo rigardis min dum tuta minuto; tiam, ankoraŭ tenante la kajtŝnuron, li surgenuiĝis, ĝis lia vizaĝo estis tute apud

la mia, kaj mi povis vidi du miajn vizaĝojn en la speguloj de liaj okuloj.

"Tomĉjo, karulino," li diris. "Tio estas unu afero por kiu ni ne rajtas preĝi. Neniu mortinto povas reveni".

"Do mi ne deziras sendi mesaĝon," mi plorsingultis apogante min sur lia ŝultro kaj skuigante pro ploro. "Mi nenion alian deziras".

"Ĉu vere, karulino?" kaj Paĉjo premis min al si. "Ĉu vi ne povus preĝi, ke vi ĉiam memoros Trilby-n, kaj esti ĝoja pro tio, ke vi havis ŝin dum tiel multaj jaroj?"

Tiam io okazis al mi. Mi ploris kaj ploradis, sed la larmoj grade degeligis, la malmolajn ŝtonojn ĉirkaŭ mia koro. Alkroĉigante al la ŝultro de mia patro, mi konstatis, ke li donis al mi ion, kion morto ne povis forpreni.

Nun, pli ol sesdek jarojn poste, mi konstatas, ke similaj vortoj diriĝas multfoje, sed tiun tagon al mi ili estis tute novaj, kaj la magio de ilia konsolo venas al mi nun denove, kvazaŭ mi aŭdus ilin la unuan fojon. Do mi memoras kaj ploretas. La larmoj estas bonaj; la memoro estas bona. Se ne estus la malĝojo por malplenigi nian koron, kie estus la spaco por la ĝojo? Ĝojo kaj malĝojo estas parencaj; kaj dum la jaroj, kiuj restas al mi, mi devas agnoski ilin ambaŭ.

Kiam la gepatroj de Katanjo venos, mi igos ilin paroli pri nia knabineto kun ŝia plejda minijupo kaj ŝia flavbruna hararo. Estus pli bone se ili plorus, kaj poste, se ili dezirus aŭskulti, mi eble rakontos al ili mian historieton pri la tago, kiam la patro kaj mi kune flugigis kajton. (El la angla tradukis Ken G. Linton).

AUSTRALIA KRONIKO

MELBOURNE: La privatkomerca TV Stacio Kanalo "O", 1/3, intervjuis S-inon Fay Koppel. En la programo "Surprise! Surprise!", la populara artisto Tommy Hanlon mem provis paroli kelkajn vortojn en Esperanto kaj poste per interesaj demandoj intervjuis S-inon Koppel pri la utileco de la lingvo kaj ĝia tutmonda disvastigado.

Mikspoto de S-ro F. R. Banham (6/3) inkludis lian tradukon de kortuŝa rakonto fare de Henry Lawson "That Dog O' Mine" (Tiu hundo mia) kaj amuzan traktaton pri la "Abdiko de Sankta Nikolao". Alia interesa skizo temis pri la historio de la aŭstraliaj E-gazetoj ĝis la nuna "Aŭstralia E-isto". Je 20/3 S-ro H. Koppel informis la membraron pri la plej lastaj novaĵoj el la tutmonda E-movado kaj legis aerpoŝte ricevitajn raportojn.

Bonvena vizitanto ĉe nia kunveno de 27/3 estis S-ino Eileen Gardiner el Brisbane, kiu ĉefe venis por informiĝi pri kongresaferoj por la venonta kongreso en Brisbane. La preleganto ĉe la amuzvespero estis S-ro Jim Rae, kiu ĵus revenis de longa vojaĝo tra Sud-Ameriko. Li montris interesajn lumbildojn pri la "Popoloj de la Andoj." Malofta, sed ĉiam interesa parolanto S-ro Marshall Cohen rakontis, 10/4, pri vizito al fabrikejo por frukto-procedado ĉe Shepparton kaj poste pri la konstruado de la multkosta juvelkaj orriĉa templo de Salomono.

Kun pardonpeto al S-ro Rosengren pro preterlaso, ni deziras informi, ke la Estraro de la Melburna Esperanto-Society por 1972 (Vidu: "A.E.". Apr.) devus inkludi S-ron H. Rosengren kiel Publicoficiston.

MORWELL (Vik.): Kun bedaŭro ni aŭdis, ke Esperanto ne plu estas instruata en la mezlernejo, deponat la emeritiĝo de S-ro I. T. Maddern. La unua prezento de nia filmo okazis en "Morwell High School" je 11/4. Proks. 50 personoj ĉeestis kaj tiel ĝuis la filmon ke S-ino M. Wybenga jam ricevis petojn de 2 lokaj kluboj prezenti la filmon. La lokaj gazetoj "Advertiser" kaj "Express" detale raportis pri la prezento.

SYDNEY: 28/2: Viola Schlesinger parolis pri sia vojaĝo al Meksikio kaj Peruo kaj montris lumbildojn — speciale de la altegaj Andoj. Multaj lernantoj alestis. 6/3: La prez-o esprimis malĝojon pri la morto de "Tiny" Goldsmith, kaj la membroj staris silente por honorilian memoron kaj montri kondolon al lia vidvino.

Ni aŭdis sonbendon pri Manly, Rockhampton kaj Perth, aranĝitan de Ian Ross, sonbend-oficulo de AEA, por sendi alilanden. Fritz Mueller-Sorau raportis, ke 9 lernantoj ĉeestis kurson en lia hejmo. De 2 marto li gvidis du kursojn (komenkuloj 22; progresantoj 22) en por-pliaĝula lernejo ĉe Methodist Central Mission.

13/3: Du klasoj ĉe la Klubo; kelkaj klasanoj restas por la dua parto programa. John Matasin montris lumbildojn pri Kvinlando kaj NSK.

Sukceson al Ivan Maddern, kiu fondis la Sendependan Universitaton de Aŭstralio (koresponda); E-o estos unu el la temoj.

20/3: Ni ludis "Esperanton", nia nomo por "Bingo". La gvidantoj alternas, do ĉiuj havis sperton en uzado de E-aj ciferoj. 27/3: S-ino D. H. Lee, bonveninto el Redlands (inter Los Angeles kaj Palm Springs, Kalifornio), respondis demandojn pri sia agrabla lando. Fritz Mueller-

Sorau legis el diversaj libroj, inkluzive rakonton pri la Buljona Kongreso (1905) verkitan de Privat.

10/4: Frank Dunn, kiu instruas la duan klason en la Esperanto Domo, informis nin "Kiel Instrui al la Komenkantoj." Li kritikis la malkompetentan manieron en kiu lingvoj ofte estas instruataj kaj indikis la pli bonajn metodojn. Li emfazis neceson prononci vortojn klare kaj ne paroli E-vortojn kun nacia parolmaniero.

17/4: Viola Schlesinger ankoraŭfoje rakontis pri siaj vojaĝoj. Image, ni vizitis Bonaeron kun ĝia granda statuo de Kristoforo Kolumbo k.a. kaj vidis altegajn montojn. Sekvis bildoj de Rio-de-Janeiro. En Eŭropo bildoj de Madrido montris ĝin pura kaj belaspekta urbejo. Toledo aperas kiel en la Meza Epoko, ĉar ŝanĝo ne estas permesata. Sperte gvidate de Viola, ĉiuj ĝuis la vojaĝojn.

24/4: Amuza vespero; ni faris ludojn, kaj en "20 Demandoj", Margaret Chaldecott fine trovis, ke ŝi estas Miki-Muso! —G.E.B.

PERTH: Liganoj kunvenis 22/3 ce Suda Perto. S-ro Hawks estris kaj kondukis la ĉeestantojn tra vigla ekzercado; ĉiu vice devis respondi en E-o al lerte elpensitaj demandoj de la estro. Neniam okazis teda momento!

5/4: Ĉe la Nedlanda rendevujo la Ligo bonvenigis S-ron Sondereggar, Svisan fervojiston-Esperantiston, kiu rondiras la mondon. Li preparolis siajn spertojn kaj kontaktojn kun E-istoj en multaj landoj.

12/4: Klaso estrita de F-ino Hunt ĉe la Nedlanda kunvenejo; sekvis ĝin Liga kunveno estrita de S-ino McGrath. Nia prez-o petis, ke la ĉeestantoj vice kaj rapide respondu al liaj viglaj kaj elpensitaj demandoj. Valora provo! Sekvis mallongaj teatraĵoj de kelkaj grupoj, kaj fine legataj ĉerpajoj el Sekspiro kaj aliaj majstro-verkoj belsonis al la oreloj.—G. Pollard.

KANBERO: Estraro 1972/73: Prez. Noel Gamble; vic-prez. S-ino Mitzi Zagorski kaj Keith Taylor; sek. S-ino Joyce Torr; Kas. Philip Grabham; kontrolisto Colin Johns. Ni bonvenigis Ges-rojn Danny Kane el Melburno kiel novajn membrojn kaj ĝuis telefon-vokon de S-ro W. Sondereggar, UEA-delegito ĉe Zurich, en lia kvin-semajna vizito al Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Post du paroloj al studentoj de la Altlernejo en Narrabundah, helpe de la nova prez. de la E-grupo, John Harvey, ŝajnas, ke ni havos du flankokupajn klasojn ĉi tiun jaron.—N.F.G.

BRISBANE: Je la 25-a kaj 26-a de marto okazis nia dua sukcesplena semajnfino en ludomo ĉe Monto Tambourine, kiam 11 geesperantistoj ĝuis la sperton de

komunaj studadoj, aktivecoj kaj amuzadoj.

Dek ses komencantoj registriĝis je 16/2 ĉe 271 North Quay. Ĝis nun 14 daŭre ĉeestas. Dum la pasinta monato la komitato decidis aĉeti multobligilon por presi novaj-foliojn ĉiumonatajn kaj aliajn presajojn rilate al anoncoj, klubagadoj k.t.p. Ni adiauis 27/3 al Paula kaj Ron Crowe kaj Gaye Phillips, 3 anoj kiuj nun vojaĝas eksterlande. La prez-o, Mal Robinson, prezentis al ili leterojn portantaj salutojn de Aŭstralio al alilandaj kluboj. Dum la kuranta monato stariĝos la komitato por la kongreso en 1974.—V. Robinson.

TOOWOOMBA: Nia nova kurso ĉe la "Adult Education Centre" komenciĝis en marto kun 19 studentoj (13 komencantoj, 6 progresintoj) Nia societo invitis la Kvinlandan E-Federacio okazigi la duan konferencon en nia urbo. La Federacio akceptis la inviton kaj la konferenco okazos de la 29/4 ĝis 1/5 en la "Kiosk" de la bela "Queen's Park". Ni rajtas uzi 2 halojn senpage, kondiĉe ke la ĉeestantoj manĝu el la apuda manĝo-ĉambro. — Heber Petley.

AEA. Eunice Graham: direktorino de la Fed. Arthur Cocking: Direktoro de la Fed. Lily Goldsmith: Sek-ino de la Fed. Marjorie Duncan: Stata delegitino.—Les Scott.

MEMORIGA FONDUSO GOLDSMITH

Esperanta Federacio de N.S.K.	100
S-ro L. V. Scott	25
Prof. R. G. Robertson	25
Ges-roj R. kaj M. Baxter	25
"Revanto"	20
S-ino R. Carruthers	2
	197

Bonvolu sendi donacojn al la Sekretario de A.E.A., P.O. Box 415, Manly, N.S.W. 2095.

BONVOLU RIDETI !

Sercemulo en Berlino vetis, ke li ricevos de ne malpli ol kvindek homoj la saman respondon al lia demando. Por gajni la veton li demandis al ili: "Ĉu vi scias, ke S-ro Meier ĵus bankrotis?" Ĉiam venis la sama respondo: "Kiu Meier?" En duonhoru kvindek homoj tiel same respondis, kaj la ŝercemulo enpoŝigis la vetmonon. (Meier estas oftgenomo en Berlino.)

Esperanto Federacio de N.S.K. Iniciatas aldonon al la Goldsmith Memoraĵa Fonduso per donaco \$100.

Fonduson pri la memoro de "Tiny" Goldsmith starigos la A.E.A. Espereble multaj organizoj kaj personoj subtenos ĝin por plifortigi nian movadon, speciale per publiko pri E-o, por kiu "Tiny" arde laboris jam de 1907.

La 18-a Konferenco de EFNSK okazis en Wollongong 25-26 marto; 34 homoj ĝin alestis. Ĉiu klubo estis reprezentita, ink. de Canberra. Komercaj aferoj diskutigis en sabato p.t.m. La prez-o, Les Scott, tributis al nia mortinta sek-io "Tiny," kies foreston ĉiuj dolore sentas. Membroj silente staris dum minuto.

Ni diskutis aferojn de la Stata movado, i.a. subtenon por la Fonduso Goldsmith, kaj decidis partopreni veturantan elmontraĵon en la sekvonta Sidneja Teloopa Procesio. Per tio ni celas reklami la Federacion kaj la Movadon.

La Komitato de la Fed. kunvenis en la domo de direktorino Eunice Graham ĝis la konferenco. S-ino Lily Goldsmith aklame elektiĝis kiel la nova sek-ino de la Fed. Estu al ŝi sukceso en ŝiaj penoj daŭrigi la laboron de sia funebrata edzo, "Tiny".

ESTRARO: "Robbie" Robertson, prez. de AEA kaj vicprez. de la Esp. Fed. de NSK. Russ Baxter: sek-ino de AEA kaj direktoro de la Fed. Les Scott: kasisto de AEA kaj prez.; de la Fed. George Thatcher: kaskontrolisto de

Infano, en la unua jaro de sia lernejo vivo, larmis forte. Demandite de la instruistino pri sia malĝojo, ŝi respondis: "Oni diras, ke mi devas resti tie ĉi ĝis mi estos dekkvarjara." La instruistino amare ridetis: "Tio ne estas plorinda. Vi estas bonsorta infano. Mi devas resti tie ĉi ĝis mi havos sesdek jarojn".

Dekjarulinoj en lernejo devis verki pri temo: Kion mi deziras esti kiel maturulo. Ineto komencis per observo: Mi grande volus esti filmstelulino, sed, ĉar mi ne estas bela kaj ne povas sekslogi, mi timas, ke mi estos nur instruistino.

La afero okazis sur golfludejo, ekster la grupa domo. Unu fortika grandmuskola viro estis fiere parolanta pri sia propra fizika forto. Interrompis la vortfluan iu negranda viro, aspekte ne tre forta. Li diris: "Mi vetus, ke mi povas puŝi peze ŝargitan ĉaron ĝis la enirejo al la golfludejo, kaj ke vi ne povas puŝi ĝin revene al tiu ĉi nia starpunkto". La fortulo laute ridis kaj akceptis la veton. Tiam diris la alia: "Do bone; sidigu vi en la puŝĉaron!"

Knabino pasigis sian ferion en la kamparo, kie ŝi bone amikiĝis kun la filo de la bienmastro. Vespere ili pro-

menis sur la kampoj ĝuste kiam la suno estis subigonta sub la horizonton. Tiam ili ekvidis bovidon, kiu frotis sian buŝon kontraŭ la buŝo de bovino. "Jen rigardu", diris la juna viro, "mi havas inklinon fari la saman".

"Faru tion", diris la knabino, "estas ja via bovino".

Unu el la embarasaj momentoj, kiujn suferas prelegantoj, estas kiam aŭskultantoj rigardas al siaj horloĝetoj. Mi demandis al preleginto, ĉu li trovas tion tre tre maltrankviliga al li? Li respondis: "Ho ne tre. Nur kiam ili skuas la horloĝetojn por konstati ĉu aŭ ne ili ĉesis funkcii."

Angla sinjorino, kiu sin rigardis kiel kontrolanton de la vilaĝana moralo, akuzis supozatan abstinulon — laboriston — ke li agis hipokrite, ĉar ŝi efektive vidis lian puŝaron parkitan ekster drinkejo. La akuzito ne sin defendis per respondo vorta; tamen en tiu vespero li lokigis sian pus-ĉaron ekster ŝia dompordo kaj lasis ĝin tie dum la tuta nokto.

RECENZOJ

"**Suno kaj Pluvo**": Gudrun Riisberg. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Abyhoj. 80 paĝoj. 14 Danaj kr.

Dek kvin rakontetoj de Danino, kies unuaj noveloj aperis antaŭ longe en ŝialanda E-gazeto. Specialisto de l'ĉiutaga lingvaĵo konversacia — tion ŝi evidentigas en sia verkaĵo, flue komprenebla, ofte esprimtrafa. Kursanoj — kune en klaso — bone farus, unu post la alia elvoĉante tiun aŭ alian el la rakontoj. Per tio ili akirus en E-o pli elastajn langojn. Preskaŭ ĉiuj noveletoj ĉeftemas pri ia cirkonstanco, okazaĵo, kiu funde influas la viv-direkton. Per iliaj finaj vortoj legantoj plene ricevas la intrigo-solvon.

La titolo aludas la feliĉajn kaj malajn zigzagojn de l'vivo, karakterizas la feliĉajn ia artisma naiveco, kiu, je sia plej bona, atingas mildan ĉarmon. Ĉe tiuj malaj, la aŭtorino celas efektan tragikan, sed al ŝiaj scenoj de krudo kaj kruelo mankas la kurtesprima brutaleco de ekz-e Hemingway, Spillane, Chase k.s.

Estas bone, ke verkisto de malgranda popolo povas porti la pensojn al la ekstera mondo, sen neceso verki en lingvo ne gepatra. Per Esperanto ŝi aŭdiĝu en multaj landoj.

5. onjo = auntie. 24: linioj mismetitaj. 44: ". . . sed P. ne komprenis ŝian sintenon — aŭ ĉu?" Ĉu influo de Uson-angla

esprimo — "or did he?" 55: "Mi posedas min mem ĝis la vespero" = I'm free till evening. Komparu: "vi estas via propra sinjoro" (Fab. de Andersen 1: 86/27).

"**The Accepted Esperanto Dictionary: Leksikono de Oficialaj Vortoj**. Compiled and published by E. P. Ockey, ex-editor of "The British Esperantist". 22 pages. Price 20 Pence. From the author, 15 Upper Pines, Banstead, Surrey.

This, the only official dictionary in Esperanto, contains every Esperanto word and English definition that has been approved by the Language Academy. But about 140 of them bear an asterisk denoting a faulty definition. One example of this: **aleo** is not an alley. This is corrected by Butler in his dictionary. He, however, with here and there added words, is in accord with a considerable number of the official definitions bearing the warning asterisk: e.g. bovo, ĉifro, angoro, eble, venki, ripozi, bronko, apoteko, arkipelago, alciono, alineo &c. Why the asterisk in such cases?

For all the 4535 words listed the date and source of official acceptance is indicated by abbreviations — which makes this booklet very valuable.

Seven additions to the Universal Vortaro have appeared from 1909 to 1958. Where the "Aldonoj" (2 and 7) lack definitions in the national languages, the author rightly gives none, and, furthermore, leaves untouched errors and misspellings of the original texts.

A preface in Esperanto supplements the English one, which to much useful information adds: "Words formed from the 4535 official Esperanto roots can adequately express the sense of the 414,825 separate words contained in the thirteen volumes of the Oxford English Dictionary" — by the use of affixes in compounding words. We must check this, sometime.

"**'Invit' al Japanesko**": Miyamoto Masao. Originala poemaro. Eld. Stafeto, La Laguna, Tenerife. 111 paĝoj. 2 Us. dol.

Verkita de Japano elstare aktiva kaj pensema, vere praktika mistikulo, ĉi libro allogos precipe prozodiistojn, esplorantojn de artifikoj metrikaj. Antaŭ legado de la poemoj, necesas studi postnoton de Ueyama Masao, kiu eksplikas la terminojn: japanesko, utao, hajko, tankao. La Japana lingvo havas nek rimon nek ritmon: des pli admirande, ke en ĉi tiuj poemoj la poeto sin montras majstro de la rim-kategorioj, aliteracio ("sub sun' sudlanda"), kaj vorta sonimito ("kloak' englutus glugle"). Magie li manipulas: Nostalgie —

Jam pasis jaroj
 kaj jaroj for de tiam,
 kiam mi, knabo,
 kolektis tie konkojn.
 Ĉu tia — nur vizi' jam?

Amĝeme - - -

Ĉe estuaro
 printempa, jen alflus' kaj
 odor' de maro.

Mi solenas morne: kial
 respondoj ŝiaj bruskaĵ?

Aliaĵ ekzemploj de mozaikaj rimoj: min
 tro . . . vintro; ho ve . . . pove; por
 mi . . . dormi.

Ĉe la parenkrimoj li ofte uzas rimpare
 la ne bonan "l" kun "r": aperu . . . ni
 pelu; dura . . . brula; funebras . . . feblas.

Postnoto de Juan Regulo, la eldonisto,
 informas pri la loko en E-literaturo, kiun
 okupas tiu dediĉita Japano. En antaŭ-
 parolo Wm. Auld, mem korifeo, donante
 vers-ekzemplojn, lin laŭdas: "absoluta
 mastro de sia esprimilo, preta uzi kvazaŭ
 duonatenante ĉiujn eblecojn de nia komuna
 lingvo". Se jes, li prenas lokon apud
 Kalocsay.

Stranga verbigo: 49: ". . . figur'
 nienias". = estas nenia?

"**Cigana Romancaro**": Federico Garcia
 Lorca. El la Hispana tradukis Fernando
 de Diego. Eldonis Stafeto, Tenerife. 110
 paĝoj. 2 Us. dol.

Jen esence Hispaneca poemaro tradukita
 de Hispano, majstro de la tiulanda
 tradicia metro, oksilaba kun asonanca
 rimo en la paraj.

Enkonduke la tradukinto sin montras
 inda vers-interpretanto de la poeto kun
 ties simboloj, metaforoj, alegorioj kaj
 signifa elektado de terminoj ĝuste trafaj
 por vesti lian realismon kaj lian fantazion.
 Admiras lian arton suveranan ne nur
 art-kleruloj; ankaŭ simplaj homoj, kam-
 puloj, laboristoj, elvoĉas kun amo la
 karajn kantojn de sia fama samlandano,
 sopiranto al vivo libera de socia sub-
 premo.

Per ĉi modesta kajero Lorca prenas
 lokon en nia tradukita literaturo apud sia
 spirite-samcelano Heine. En 1936 per
 faŝista kuglo li pagis sian lojalecon al
 sia viv-idealo.

Aldone: Notoj, prononcoj pri propraj
 nomoj kaj danko al kunlaborinto Henri
 Vatre.

En iuj poemoj apostrofo estas ne uzita
 ĉe elizio de substantivoj; en aliaj jes.
 Kelkajn vortojn oni ne povas tiel trakti,
 ekz-e: jen, pensio, vizio, loĝio, harpio,
 oratorio. Senapostrofe, ili verbe aspektas:
 pensi, vizi, loĝi; harpi, oratori; "Jeno"

sen apostrofo = jen. Absurdo malutila,
 kaj ne reguligebla.

"The Story of Esperanto" (Maddern).

Comments: Page 4: The last Cornish-
 speaking person was Dorothy Pentreath,
 who died in 1777 (not 1770). An
 obelisk in the church at Paul, near
 Penzance, bears the words: . . . "who
 died in 1778", which, says G. Sutton
 in his short history of the Cornish
 language, is certainly wrong. See review
 of this booklet, A.E. 12/69.

P.7: Of far greater significance than
 the chimerical projects of Scherzl, Tri-
 temius, Tiemar and Sudre are the positive
 works of Maupertuis and Faguet de
 Villeneuve. (A.E. 9/47, 5/49. Drezen
 ("Historio de la Mondolingvo", p. 47,
 49, 85; "Lingvo Internacia", July, 1907.)
 Maupertuis first set forth the basic
 principles on which Zamenhof over a
 century later founded Esperanto. Faguet
 formed a system of conjugation nearly
 identical with that of Zamenhof, but he
 failed to elaborate a vocabulary, deeming
 this "a matter for scientific academies".

P. 15: It is almost certain that
 Couturat was the author of Ido ("Leteroj
 de Zamenhof", vol. 2, p. 167. "Cosmo-
 glotta", August, 1937. De Beaufront
 was the "straw man" used by the other

P. 12, 16: "unchallenged acceptance
 by linguists and governments" (writing of
 the period 1887-1908 in Esperanto history).
 "Most of the great classics of
 every country have long since been well
 translated into Esperanto". Both of these
 statements are indefensible. They are
 not needed for an adequately impressive
 presentation of the situation at that time,
 or of Esperanto's relatively rich and
 various literature.—Farbo.

UNIVERSITIES AND ESPERANTO

A new "first" was achieved by Prof.
 Margaret Hagler, who in Spring 1971
 received her Ph.D. in Comparative Liter-
 ature from Indiana University for a thesis
 on Esperanto as a Literary Medium. It
 will soon appear as a 450 page book.—
 "Heroldo de Esperanto", 1 Dec., 1971.

The Centre of Esperanto Documenta-
 tions is preparing an analysis of the
 current situation: Esperanto and the
 Universities.

PLEASE NOTE

I shall be away from Melbourne from
 14 June to 9 August, but will edit the
 paper, as well as I can under the circum-
 stances.—F.R.B.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 107 (187)

MELBURNO

Junio, 1972

ESPERANTO — A PHILOLOGIST'S VIEW

In an address to the Melbourne Esperanto Society, 15 May, Dr. John Martin of the Melbourne University spoke of his introduction to Esperanto in 1958 when on a visit to Reykavik, Iceland, while studying Icelandic and Swedish. It was via a textbook by Szilagyi obtained from the British Esperanto Association. Since then his interest in the structural genius of the language has been profound.

He stressed the tremendous advance in inter-communications between the peoples of the world. His great grandfather left England for Australia in 1854, the voyage taking 78 days; today he could go and return in 22 hours. This amazing acceleration in movement during the past 100 years has been accompanied by a marked general falling off in language learning. Lack of acceptance in this field and poor result from instruction are evident today. A new awareness and new methods are necessary, for a lingual crisis looms.

He touched on the cultural influence of Greek and Latin, which for long served as widely used common tongues over vast areas. The rise and fall of French as a significant medium; lingua Franca, Pidgin, and the growing spread of Mandarin over other dialects in China.

He rebutted the notion that Esperanto is "artificial", mentioning the changes man-wrought in Norwegian, Dutch, Irish, Hebrew, Indonesian &c. Hearing him, one thought of Dante, Chaucer, Luther — other stabilisers, re-makers, re-formers of the language material in their respective tongues.

One of the obstacles to Esperanto is the attitude of men the world over to

romanticise and glorify their mother tongues, investing them with an aura of "mystique", of some unique value unattainable by any constructed language. Criticizing this state of mind, he spoke of his own difficulty with the spelling of English, his frequent need to consult a dictionary, and his dissatisfaction with the expression of anything he wrote.

Esperantists were counselled to adopt more efficient methods in their advocacy and teaching of Esperanto. To this end he demonstrated methods of programmed instruction by means of tape-recorder, running off specimen lessons in Old English and Swedish. The tape recorder is of great value for language students unable to train the ear by contact with speakers of the language concerned. He gave an example of Icelandic, where only one Icelander was to him accessible at rare intervals for converse. He used Icelandic tapes wherewith to master the spoken speech elements. Isolated Esperantists now have similar resources and should more widely use them.

Dr. Martin intends to experiment with an audio-lingual Esperanto course at the University, provided he can "find the guinea pigs".

At closing time much of intense interest was perforce left unexpressed, and many intelligent questions by hearers undiscussed. May this progressive savant visit us again, and in the meantime may he have full collaboration with us in his future activity in this field.—F.R.B.

"La scienco jam faris diojn el la homoj, kiuj ankoraŭ ne meritis esti nomataj: homoj". — Jean Rostand, natursciencisto.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO**Oficiala Informilo****Novaj Membroj:**

Bourke, S-ino C., Lilydale, Vic.
 Clowes, S-ro L. M., Morwell, Vic.
 Livingstone, S-ro C. A., Briar Hill, Vic.
 Jager, S-ro E., Tennant Creek, N.T.
 Leighton, S-ino M., Morwell, Vic.
 McGilp, F-ino E. J., Ballarat, Vic.
 Robinson, S-ro W., Yallourn, Vic.
 Rucki, S-ro A., Moonee Ponds, Vic.
 Sten, S-ro A., Reservoir, Vic.
 Thomas, S-ro W. F., Nunawading, Vic.
 Walker, S-ino S., Morwell, Vic.
 Burns, Chris, Morwell, Vic.
 Crisp, Joseph, Toongabbie, Vic.
 Spencer, Gwenda, Morwell, Vic.
 Kane, S-ro D., Canberra, A.C.T.
 Bankston, S-ro L. T., Plympton, S.A.
 Caselyer, S-ino D. F., Wreck Point, Qld.
 Ashton, S-ino, A., Sale, Vic.
 Cody, S-ino M., Shepparton, Vic.
 Davidson, Rev. I., Albury, N.S.W.
 Summy, S-ino I. M., Garran, A.C.T.
 Ansell, S-ino A., Nhulunbury, N.T.
 Lipski, F-ino E., Hawthorn, Vic.

UNUA LISTO de la T.G.M.F.:

Esperanto-Federacio de Nova Suda
 Kimrujo \$100.00
 Baxter, Ges. R., Manly, N.S.W. 25.00
 Brodie, S-ro N., Bexley, NSW 5.00
 Carruthers, S-ino R., Balgowlah,
 NSW 2.00
 Duncan, S-ino M., Manly, NSW 10.00
 Giles, S-ino E., Collaroy NSW 5.00
 Hasluck, F-ino D., Cheltenham
 NSW 2.00
 Horsburgh, S-ino R., Tottenham
 NSW 2.00
 Scott, S-ro L., Manly, NSW 25.00
 Strickland, S-ino E. S., Croydon
 Park, NSW 3.50
 Thatcher, S-ro G., Fairlight,
 NSW 25.00
 Vawser, S-ro F., Prospect S.A. 1.00

PROMESITAJ DONACOJ:

Chandler, S-ro E. R., Crows Nest
 NSW 20.00
 Matasin, S-ro J., Northbridge
 NSW 20.00
 Robertson, Pro. R. G., Northbridge
 NSW 25.00

SPECIALA ANONCO: Ciuj sek-voj de ĉiuj kluboj, federacioj k.t.p. en Aŭstralio, bv. ekspedu al mi kompletan liston de viaj membroj (nomo kaj adreso), kiel eble plej baldaŭ. Sajnas, ke AEA povos plibonigi komunikojn inter kluboj kaj iliaj membroj tute sen pago el aŭ klubo aŭ membro. Mi petas vin sendi la liston, por ke ne manku la ŝanco helpi al pli

efika koherigo de la E-organizo. —Russ Baxter, sek-vo.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: 26/4 Kunveno estrita de S-ro Howard, kiu preparis rakonton kaj invitis vigan interrompon per demandoj dum S-ro Hawks ĝin legis. Spritaj respondoj al absurdaj demandoj de S-ro Hawk kreis ridadon. S-ro Howard rakontis pri sia knabaĝo, kaj ĉeestantoj diskutis lian anekdoton. S-ro Brodie, kiu nun sia edzino nun vizitas la filinon en O. A., ankaŭ parolis pri sia knaba sperto, kiu okazis en la norda parto de nia ŝtato. La Liganoj bonvenigis vizitantojn. Ges-rojn Jackson, kiuj libertempas ĉe Perth el norda urbo, Carnarvon. S-ino Jackson estas koresponda studanto per la verd-karta plano kaj bone progresas. Presisto de la gazeto "La Nigra Cigno" malsanis, do ne povis ĉeesti la rondon, sed feliĉe ŝi nun resaniĝas.

10/5: Ksnveno estrita de S-ro Hawks, nia prez-o. Ĉiam bonvenaj estas liaj programoj, ĉar ili instruas kaj aktivigas ĉeestantojn. Li preparis ekzercaron por vigliĝi la grupanojn. Li vice jetis demandojn, kiujn ni devis tuj respondi. Kelkfoje li lasis, ke ni haltu por korekti gramatikan neperfektaĵon, sed tuj poste rekomenciĝis la cerba streĉo. Gue profitdona instru-metodo! — G. Pollard.

SYDNEY: 1/5: 28 ĉeestantoj bonvenigis vizitantojn — S-inon Reem el Svedujo, kiu ferias kelkajn tagojn en Aŭstralio, kaj S-ron J. T. Allan (Wellington E-Societo). Li invitis nin ĉeesti la E-Kongreson en Masterton en januaro. Du N.Z.-aj filmoj kun E-teksto estas haveblaj. Elsa Brandman montris filmojn pri sia vojaĝo — Nederlando, Okc. Germanujo, Italujo, Grekujo, Honkongo. Ni vidis glisilon en kiu ŝi timplene flugis kun amiko. Si vizitis Castelridardon, urbon dediĉitan al fabrikado de piana-kordianoj.

8/5: Fritz Mueller-Sorau legis el verkoj: "Faulhaber Rakontas", "Suno kaj Pluvo", "Trans la Fabeloceano", kaj oratoris vortojn de Marko Antonio pri la morto de Cezaro, el "Retoriko" (Lapenna).

15/5: Ni bonvenigis al Bryan Cook el Nov-Zelando, kiu nun loĝas en Sidnejo. Victor Bourlin montris mementritajn lumbildojn de siaj aventuroj, kiam, tre juna, li lasis Rusujon. Li transiris la Dezerton Gobi, ĉefe per kamelo. Al la malsana Fritz Mueller-Sorau ni sendis bondezirojn. Li baldaŭ refortiĝu!

22/5: Wre Chandler ludis sonbendon pri la debato en Mosman. Vidu sube.

MANLY: Elementa, altgradaj klasoj kaj

drama grupo daŭris dum la pasinta trimestro de 1972; estis malpli lernantoj elementaj ol antaŭe, sed la aliaj proks. samnombri. Fine de aprilo okazis la kutima fintrimestra amuz-vespero. Du teatraĵoj: rolis anoj Olive Bleisner, Thora Richmond, May kaj Russ Baxter. Richard Moir lerte ludis gitaron kaj pianoakordion. Margaret Liston kantis en E-o "Wouldn't it be Lovely?". May Baxter kaj Bill MacDonald dancis laŭ tiu ario. Ni adiaŭis dumvivan membron, S-inon Marjorie Duncan, kiu flugis al Anglujo por viziti siajn parencojn. Si forestos 3 monatojn. Ĉe klubvesperoj parolis Prof-o "Robbie" Robertson (prez. de AEA); Kevin Smith (prez. Manly-Klubo), Roger Springer, Pete Schwerin, Wre Chandler k.a.

Prof-o Robertson gastparolis ĉe la Rotaria Klubo (Strathfield) kaj parolos al Rotarianoj en Campsie 25/5. La Rotaria movado ie-tie en Aŭstralio lastatempe interesiĝis pri E-o. "Robbie" kaj aliaj estas pretaj por prelege instigi pluan intereson.

Ni Venkis en Debato.

Debato: "Ĉu Esperanto Estos la Latino de Morgaŭ?" okazis 18/5 en Mosman. Prof-o R. Robertson la unua parolis, subtenate de Kevin Smith, Arthur Cocking, Wre Chandler, Ruth Carruthers, Margaret Chaldecott kaj Ver Payne. La opozicion estris Prof-o John Dunstan (Univ. de Sidnejo) subtenate de membroj de la Debata Societo Mosman'a. "Robbie" impresis parolis. Forte batalinte, li kaj liaj samideanoj estis elektitaj la venkuloj —34 voĉdonoj kontraŭ 15. Ĉiuj ĉeestantoj ege ĝuis la debaton.

ADELAIDE: Kunvenoj okazas ĉiun merkredvesperon kaj oni parolis, rakontas kaj laŭtleĝas pri diversaj temoj. Antaŭ kelkaj semajnoj nia E-amikino S-ino B. Randles adiaŭis de ni antaŭ vojaĝo al Eŭropo, Kanado kaj Usono. Ĝi daŭros proks. duonjaron. Ni havis adiaŭan vesperon en la hejmo de S-ino Fulton. Ni esperas ke S-ino Randles kontaktos kun multaj E-istoj dum la vojaĝo kaj rakontos multon post sia reveno.

Nova ano de nia grupo estas S-ro L. Bankston, Usonano, komencanto, kiu lernis per la A.E.A. Korespond-Kurso kaj kiu jam tre bone parolas kaj komprenas. Li sekvas la korespondkurson kun la helpo de F-ino Win Addis. Unu el la lecionoj estis skribi leteron al nova korespondanto. Tiun leteron li skribis en tre komika maniero. S-ro Bankston havas grandan senton por humoro, kaj ni multe ridis pri la enhavo de la letero, kiun F-ino W. Addis laŭtleĝis al ni kun lia permeso.

Melbourne: Je 17/4 post enkonduko de

Vic-Prez. Arnold Baldwin, pri la utilo kaj la ĝisdata enhavo de nia biblioteko, S-ino Fay Koppel parolis pri kelkaj novaj libroj jam pretaj por la bretoj. (i.a. ŝi recenzis "Internacian Kuirlibron", "Tralando de Indianoj" kaj "Kantoj kaj Romancoj" de Heinrich Heine).

La programo "Antique Night", organizita de F-ino Ann Hearn (24/4) inkludis konkursan ekspozicion pri antikvaĵoj. Dank' al F-ino Hearn kaj amikino, la ĉefsalono de la Esperanto-Domo prezentis veran festaspekton, kun floroj kaj bele kovritaj montrotabloj. Premiojn gajnis S-ino A. Paling (pro plej interesa komentario), Brig. J. Munro (pro plej malnova antikvaĵo), S-ro H. Koppel (pro plej interesa E-antikvaĵo) La kutima bongusta manĝeto konkludis ĝuplenan vesperon, rezulte de kiu la klubkaso gajnis proks. \$12.

S-ro F. R. Banham, 1/5, resumis kritikajn artikolojn de W. Auld pri E-tradukoj el la verkaro de Sekspiro kaj li skizis 5 bone konatajn romanojn, kies ĉefa temo estas la sinofero de individuo al la helpo por aliaj. Li ankoraŭ parolis pri la graveco de granda referenclibraro por la efika laboro de E-redaktoro. Por ke klubanoj ĝisdate informiĝu pri E-ista agado alilande, S-ro H. Koppel, 8/5, denove prezentis novaĵojn ĉerpitajn el la E-gazetaro.

Bonvena vizitanto al Melburno estis S-ro J. T. Allan, UEA Cefdelegito en Nov-Zelando kaj Prezidanto de la Nov-Zelanda E-Asocio. Post partopreno en internacia konferenco pri hospitalaj registroj en Sidnejo, li vizitis kelkajn hospitalojn en Melburno. Lia vizito ne koincidis kun kluba vespero, sed li akceptis, 11/5, inviton de Ges-roj Koppel, kiuj gastigis lin por la vespermanĝo ĉe Restoracio McClure. Dum plurhora konversado oni interŝanĝis informojn pri la nov-zelanda kaj aŭstralia movadoj.

D-ro John Martin, docento ĉe la Melburna Universitato, kaptis nian intereson je 15/5. Dum studado en Islando por doktoriĝi pri Lingvistiko, li trovis sin inter plurlingva grupo kaj konsciiĝis pri la bezono por internacia komunikilo. Tiel li ekinteresiĝis pri E-o kaj post mallonga studado konvinkiĝis pri ties utilo kaj kapablo plenumi la necesan rolon. Li nun proponas eksperimenti pri la instruado per modernaj metodoj inter universitataj kaj instruistaj studentoj; sed antaŭ ol komenci, li bezonas ciferojn koncerne la E-vortoftecon. Vidu raporton sur p. 217. **Orientaj Antaŭurboj** (Melbourne) Nia aprila amuzvespero en la hejmo de Ges-roj Brockwell estis vere gaja afero. Elsie Brockwell estas talenta artisto kaj ni povis admiri specimenojn de ŝia laboro.

Ni ekspedis nian sonbendon al Ĉeĥoslovakujo kaj esperas ke la klubo tie pli bone konos nin.—M. F.

BRISBANE: La plej grava okazo en la historio de Esperanto en Kvinslando estas la akcepto de la 19a Aŭstralia E-Kongreso. De la 2a ĝis la 9a de Jan. 1974 ni havos la ŝancon por gastigi E-istojn de ĉiuj aŭstraliaj ŝtatoj. Je la 8/5 stariĝis la kongresa komitato: Prez: Mal Robinson; Sekretario: S-ino W. Greenhalgh; Help-Sekr: S-ino E. Gardiner; Protokolistino: F-ino B. Allatt; Kasisto: S-ino S. Martin, Pluaj helpantoj por la komitato: Tom O'Grady, Hans Brendel, Tom Donnelly, Alan Grant, S-inoj Joy Kennedy, Val Robinson. La kongresejo estos preskaŭ certe ĉe la Universitato, St. Lucia. La kongreso estos sendube granda stimulo por ĉiuj el ni perfektigi en Esperanto kaj antaŭ la jaro 1974 atingi fluan parolkapablon.

Je 8/5 ni bonvenigis S-inon Winsome Greenhalgh kaj ŝian edzon post ilia ĝuinda mondvojaĝo. Feliĉe ni rimarkis ke ili ambaŭ aspektis tre bonsanaj. Samvespere ni bonvenigis spertan E-iston S-ron Trevor Steele, kiu antaŭ ne longe revenis Aŭstralion, pasiginte 5 jarojn en Eŭrope. Li vigle respondis al demandoj pri E-o en aliaj landoj kaj pri la Londona Kongreso. Bedaŭrinde li ne povas longe resti en Brisbano.

De 29/4 ĝis 1/5 preskaŭ 40 E-istoj ĝuis la 2-an konferencon de la Kvinslanda Federacio ĉe Toowoomba. La Toowoomba E-istaro bonege gastigis la vizitantojn. Dimanĉvespere, i.a. la Brisbana grupo prezentis 2 teatraĵetojn. Ges-roj Jullie faris komedion. Howard kiel Doktoro Jullie, kaj Edna kiel la paciento. La alia grupo prezentis "La Klaso"n. (Aktoris S-roj Gunster, Robinson, O'Grady, S-inoj Kennedy, Martin, Robinson). Trevor Steele, kiu ĉeestis kun sia frato, paroladis pri E-o en Eŭropo. Tio estis tre interesa kaj informriĉa. La venonta konferenco okazos ĉe Tambourine Monto je oktobro (dato ankoraŭ ne decidita).

Ce 271 North Quay 14/7 komenciĝos novaj klasoj por komencantoj. Informu amikojn kaj parencojn; per tio vi helpos fortiĝi la E-movadon en Brisbano. Denove, la supera instruisto estos Arthur Deutscher.—V. Robinson.

U.K. in PORTLAND (Oregon).

This is the third Esperanto world Congress to be held in U.S.A. The first was in 1910 at Washington (357 attended); the second, at San Francisco in 1915 (163). At 15 May this year, 750 have enrolled from 38 countries, (seven from Australia). The date is 29/7 to 5/8.

N^o Prenu Pipon al Societa Vespero.

La Dekano de Medicino ĉe la Universitato de Kvislando forte kondamnis la cigared-reklamadon per televido, radio kaj gazetaro. Li diris: "Estas tre venena kvalito observata en tiuj malfru-horaj televidaj reklamoj. Ili flagre prezentas junajn bonvivantajn de ambaŭ seksoj, gaje petolantajn. En la samaj momentoj ili fumas cigaredojn kaj drinkas fort ebrigajn likvorojn. Tio okazas en salona ĉirkaŭaĵo, kiu havas celon krei subkonscie erotikan pens-atmosferon".

Jam ne juna, mi ne volus troviĝi en erotika atmosfero, al kies kreado kontribuas ankaŭ la fumado de cigaredoj. Kiel fumanto, mi preferas celi al alia personeca prezento-formo. Laŭ observo, la karaktere solidaj viroj fumas pipon: farmistoj, episkopoj, kaj ĉefministroj, kiel ekzemple Baldwin kaj Wilson. Mi honte ilin imitas — kiel evidente sen rimarkinda sukceso. Cetere, mi preferas pipon.

Tamen, ni frontu la veron. Cigaredoj stimule gajigas al societo. Kiam la gastigantino paŝas al vi, ŝi klak fermas sian cigaredujon, kriante kiel ŝi sin fortunatas: "Ho, S-ro Bo, vi preferas pipon. Do daŭrigu fumadon . . . por mi tio estas egala — ja kedu min!" Rimarku la subnuancon de malplezuro.

Konversacio formortas. Ĉiuj okuloj turniĝas viadirekten dum vi fuŝe palperĉas la fumadon, la alumetojn. Plenŝtopinte la pipon, vi sentas vin kiel hirurgon sub okuloj de amaso da studentoj. Jen jam ĝi estas ŝarĝita. La ĉeestantoj rigardas vin dum vi metas ĝin en la buŝon, kvazaŭ ili atendus baton de signifa noktomeza horo.

Vi bruligas alumeton, spiriras kiel flegme kiel vi nur povas. Ho ve, la pipo ne volas funkcii! Ĝi estas aŭ tro preme pakita aŭ cindreto blokas la tubeton. Pro pretervido mankas al vi viaj pip-akcesoroj. Vi surhavas vian plej bonan vestkompleton, kaj viaj iloj troviĝas en la poŝo de via ame malnova vesto.

Vi tial atendas oportunan momenton en kiu vi povas kaŝe fari iom da pri-tuba laboro. Tiu tempeto ne venas, ĉar jam krias via afabla gastigantino: "Mi portos al vi helpilon!" Baldaŭ ĉirkaŭas vin ĉiaj aĵoj, jam de ungo-fajlilo ĝis glaci-pikilo. Vi triste skuas la kapon kaj puŝas la manojn en poŝojn kvazaŭ vi estus tute indiferenta. Jen, bonŝance! Vi ektrovis folio-tenilon!

Jen ileto ĝusta! Vi malkurbigas ĝin en rektan formon kaj per ĝi komencas fosteti. Ankoraŭ vane. Ĉar denove krias la gastigantino: "Mi portos al vi cindrujon! Frapetu vian pipon malplena!" Je la unua frapeto la cindrujo eksaltas en dekaduo da pecoj. Vi sidas tie, gapante al la

malfeliĉaj fragmentoj de tio, kio estis la genia manlaboraĵo de la fama Petro Keramio, la Paŝtista Potisto! Vi petas pardonon. Laŭ ŝia respondo la afero ne gravas. Ĝi estas nur bagatelajo, kiun donacis al ŝi la edzo de ilia geedza datreveno. Do, vi proponas aĉeti alian rekompence. Sed tio ne eblas. Nur unu tiaspeca ekzistas en la mondo.

Dum longa tempo eĥados en viaj oreloj la embarasaj ridoj de la ĉirkaŭantaj petoluloj.

Viroj, se vi ne povas dum vespero vin deteni de pip-fumado, instigu vian gastiganton montri al vi lian novan plankon en la garaĝo, aŭ mem iru eksterdomen por kontroli la lumilojn de via aŭto. Vi trovos, ke via pipo tre bone funkcias — sub la ĉielo! — Robo.

Ĉu Vido Nepre Sekvigas Kredon?

Estas certa, elpruvita fakto, ke miloj da homoj, jam de 1905., ĉestis Universalajn Kongresojn de Esperanto kaj povis per unu komuna lingvo interkompreni unu la alian. Oni voĉe faris en E-o intelektajn tezojn, kaj miloj bone sekvadis la sencon de la parolataĵo. Per kortuŝaj vortoj prelegistoj forte emociigis siajn aŭskultantojn. Aliaj parolantoj provokis akrajn kaj flame disputitajn vortobatalojn. Tamen tiuj faktoj, klare prezentitaj antaŭ la mondo, ĝis nun ne sukcesis konvinki la publikon. Kiel pri aliaj mirindaj raportitaj en la gazetoj, la publiko lasis ilin eniri unu okulon kaj eliri el la alia, nekredeme balancante la kapon kun nea gesto. Ili vidas, sed ne kredas. En la evangelio Luko: "Se ili ne aŭskultas la profetojn, ili ne kredos, eĉ se iu levigus el la mortintojn".

Jen tipa ekzemplo. En 1963 Prof-o Bjorn Collinder, de la universitato de Upsala, vizitis la universitaton de Melbourne por tie prelegi. Li estas bonekonata E-isto, aŭtoro kaj radi-parolanto en E-o. Kelkaj E-istoj vizitis lin ĉe la universitato. Estis evidente, ke lia malbona posedo de la Angla malebligis lin en la tasko transdoni la veran valoron de lia granda scio kaj klero. Post la prelego li parolis al kelkaj aŭskultintoj, antaŭ ol foriri el la prelegejo direkte al sia loĝejo. Estis videble, ke li pene serĉis en la memoro por la Anglaj vortoj kaj aspektis embarasata — ĝis venis la E-a grupeto por lin saluti! Kaj jen, kia ŝanĝiĝo sur lia vizaĝo! Li ek de tiam facile fluege elverŝis la parolojn, tute senĝene. Kun malvolonto kaj ĉagreno li devis repreni uzon de la Angla, post kiam la E-istoj foriris, kaj nova salutonto venis antaŭ lin.

La ses E-istoj kaj ilia amiko Collinder

per tio provizis okulvideblan demonstron, ke E-o estas vere praktika kaj uzebla lingvo ankaŭ en akademijaj rondoj!

Ĉu tio havis rezulton, kiu favorigus la ne-Esperantistojn al E-o? Tute ne. Malgraŭ sia vido al la Vero, neniu apudstaranto poste aliĝis al la AEA!

Kaj tio estas tipa kaj simptoma pri la ĝenerala sinteno de la granda publiko Ili sin blindigas antaŭ la nudaj faktoj kaj kvazaŭ metas antaŭ la okulojn vualon de indiferenta ignoro, torpora apatio.

(Pri Prof-o Collinder: The AE, nroj 35, 36.)

BONVOLU RIDETI !

Brutala serĝento kriaciis al simpla soldato: "Mi supozas, ke, kiam vi ekŝigos el la armeo, vi atendos mian morton, por ke vi iru al mia tombo kaj sur ĝin kraĉi!"

Respondis la soldato: "Ne, ne. Post mia ekŝigo el la armeo, mi certe ne volos plu stari en vico.

Diris sinjorino: "En gazeto mi legis, ke en Hindujo vi povas aĉeti edzinon por du dolaroj. Jen aferstato abomene terura, ĉu ne vere?"

Respondis la edzo: "Mi pensas, ke ne Bona edzino supozinde valoras du dolarojn".

Instruisto de Angla literaturo al sia lernanto: "Rakontu ion pri John Milton". — "Kiel edzo li skribis La Perdita Paradizo, kaj post la morto de sia edzino: La Regajnitita Paradizo".

Skota soldato revenis hejmen post 4-jara militkaptiteco kaj trovis siajn du fratojn kaj sian patron kun barboj ĝis la zono.

— "Kial vi havas tiom longajn barbojn?"

li demandis.

— "Ĉu vi forgesis, ke ekirinte vi kunprenis la razilon"?

A.E.A. PRESS OFFICER

In Jan. this year Mr. Petley resigned from the position of Public Relations Officer. To the Melbourne Congress he suggested that officers from each State be elected to share the work.

After the Congress Mrs. M. Chaldecott was invited to accept the vacant office, and she did. She asks whether any State officers have been elected; if so, she would like to hear from them, and to receive from all sources items from news media, reports of talks &c. to add to the cuttings given to her by Mr. Petley. Her address is on the front page of this issue.

ESPERANTO AND LITERATURE

Prof. Margaret Hagler gained her Ph.D. in Comparative Literature at Indiana University, U.S.A., last spring, with the thesis "The Esperanto Language as a Literary Medium". The book, of 450 pages, is being sent to Esperanto libraries and may later appear for general sale. Here translated is a part of a review by Wm. Auld in "Heroldo de Esperanto" 1.10.71:—

"The thesis is a complete and trustworthy work in which the author treats the language of the 20th century, the situation of literary translation generally, the search for an international language, the Esperanto language and movement, the history of Esperanto literature, poetry translated from English into Esperanto (a critical study of poems in all epochs, with a comparison of translations), original Esperanto poetry.

"She concludes that the choice of a constructed language as a literary medium is a new phenomenon in the world of belles-lettres, but in a relatively short time it has been firmly established and now possesses a flowering literary tradition. By its very existence it defies two suppositions which, though widely held, are not necessarily valid: (a) that languages are intimately bound up with national cultures, and that they become identical with them. (b) that no literary expression is possible except in ethnic and national languages.

"It may be that now, in this age of satellites and space travel, technology will force men to study and master the problems of language diversity. If so be, or at some time in the future, the data provided by the use of Esperanto for literary (and other) ends will greatly help in the solving of those problems.

"At a most modest appraisal, the evolution of Esperanto literature on a world-over scale during a relatively short time shows that Esperanto is a viable literary medium, and that writers of outstanding competence are ready to say, as Stendhal loved to comment: 'they have bought a ticket in a lottery, the winning number of which is that of a date in the future'".

Auld concludes: "This treatise is a very valuable document, not only because of its historical significance in America, but also by reason of the content itself".

(Trans. from an article by A. Borman in "Interlingvistika Servo", March 1972.)

NOTICE

I shall be away from Melbourne from 14 June to 10 August. Please withhold communication till the latter late.—Editor

ANGLAĴO PARLAMENTANA!

John Grey Gorton, former Prime Minister, speaking in October, 1970, outside Parliament.

"... and if this collection here in these gardens is not thoroughly matchless and I think it probably is, but if it's not, and if it's not unique of its kind, then I have no doubt whatever that under the guidance of Mr. Shoobridge it very shortly will be if it isn't already."

Perhaps it sounded better than it looks.

Kaduka traduko:— "... kaj, se ĉi tiu ĝarden-kolekto ne estas absolute senkompara — kaj mi opinias, ke tia ĝi ja estas — sed se ĝi ne estas, kaj se ĝi ne estas unika en sia speco, tiam mi nenial dubas, ke sub la kulturado de S-ro S. ĝi tre baldaŭ estos unika, se efektive ĝi ne estas jam tia."

Esperinde, ke tiu parolo sonis pli bone, ol ĝi preze aspektas!

Klara traduko laŭ senco: Se ĉi tiu kolekto ankoraŭ ne estas unika en sia speco, ĝi baldaŭ estos tia, sub kulturado de S-ro S.

COMPLETE COLLECTIONS ?

On p. 188 (Jan.-Feb. nr.) we asked whether readers or libraries possess approximate or complete collections of our organ from 1920 on. No one answered; Long and conscientious labor goes into the task of researching facts and figures for informative articles, and indeed for all material that has filled its pages for over 50 years. Is one to conclude that the vast majority, if not all, have discarded, and still discard, their copies after brief perusal, or retain them for only a short time? One would have believed that there were those among us sufficiently aware of the paper's value to conserve it as a prime source of reference in the field of Esperanto activity and enterprise in Australia.

The feeling that the work of each month is lightly tossed away by all but an hypothetical remnant does little to hearten those behind its publication. If this sagacious, but tiny, elite really exists, could it not find voice to inform us?—Editor.

KORESPONDADO

Interŝanĝas poŝtmarkojn, -kartojn, kun ĉiuj landoj. Skribu: Jaroslav Zemek, U Stadionu 721., Chrudim 3, Czecho-slovakia.

Gimnaziano 17-jara dez. kor. pri muziko, danco, p.m., p.k. Renate Zeller, 3591 Winkelstedt, D.D.R. (German Democratic Republic).

RECENZOJ

"**Trans la Fabeloceano**": F. Szilagyi. 135 paĝoj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj. Prezo 23 danaj kronoj, ink. sendkosto.

Ĝi estas represo kartonkovrila surbaze de la eldono, kiun faris "Literatura Mondo" en 1931. La konsisto: prologa kaj fina poemoj, ok fabeloj kaj sep noveloj. Tra la fabeloj latentas kaŝeta satiro, bonhumora, eĉ sane cinika pikado al la "monstroj" de la moderna mondo. Laŭ la limoj de sia propra temperamento la aŭtoro kiomeble celas la etoson da la Andersenaj fabeloj. Kroma elemento estas lia vortludado — kaj liaj komikaj frazripetoj, similaj al tiuj de certaj rimversajoj porinfanaj, ekz-e: La Domo, kiun konstruis Johano.

Guos la amuzajn groteskajn homoj ankoraŭ kapablaj re-vivi la fantaziojn de sia frutempo, kaj, ĉar jam maturaĝaj, percepti la instruon de saĝulo.

La unua "novelo" pliĝuste estas subtitolita "skizo"; ĝi vortpentras per kelkaj plumstrekoj la hejmon de la familio Zamenhof, kiam Ludoviko estis infano. Interesas malnovajn literaturajn E-istojn Terura Vizito, kiu gaje moketas la personaron de "Literatura Mondo", kaj interalie pri la malfeliĉaj neologismoj: darfi, durfi, lici. Sed la skizeto jam perdis sian aktualecon, kaj la humoro estas iom tro streĉe malverŝajna.

Entute, la kolekto ne taŭgas al komencantoj, sed aprecantoj pri diversaj verkstiloj legos ĝin ŝate.

"**Biblia Revuo**", nro 4, okt.-dec. 1971 76 paĝoj, Kvaronjare 6 Us. dol. Angelo Duranti, Piazza Duomo, 48100 Ravenna, Italy.

Plejparta konsisto: funda studo pri Tri Mitoj de la antikva Ugarito, kies urbneveloj arkeologe jam indikas ekziston proks. en 7000 A.K. El abunda materialo skribita sur argilaĵo oni deĉifris tion pri la Mitoj. La lingvo estas Semida, dialekto simila al la klasika Hebrea, sed kun signifaj malsamajoj, kiujn la aŭtoro, D-ro D. Broadribb, eksplikas kun multalio en sia Enkonduko.

La tezo entuta estas evidente tre valora por tiu dediĉita elito, kiu penas interpreti la misterajn voĉojn de el la pratempo de la civilizacio. Tion ili persiste strebas fari, malgraŭ sia nekompleta scio de la lingvo Ugarita kaj ĉagreno pro la foje rompitaĵoj tabuletoj aŭ forfrotitaj skriblitoj. Ilia cerbrompa lukto atestas la nenubeblan spiriton de l'homoj fronte al nesupereblaj taskoj. Ili kvazaŭ diras: "Ni specialiĝas en la plej malfacila; por fari la nefareblan postulas iom pli da

tempo".

Recenzo sub "Libroj" interesos erudiciajn teologojn jam familiaraj kun la Sanskritaj Sudroj. Mendu ĉi unikan revuon ĉiu, kiu kapablas ĝin profiti.

Jarlibro de UEA. Unua Parto 1972. 336 paĝoj. Ĝi estas oportune portebla por vojaĝantoj pro tio, ke ĝi enhavas preskaŭ nur la delegitan adresaron. Enkonduke V. Sadler informas, ke libro-vendoj ĉe UEA kreskis je 50 p.c. en 1971 kompare kun 1970, kaj la membrovarba kompanjo ricevis pozitivan kunlaboron. Malgraŭ multlanda inflacio la financa pozicio de UEA "jam draste pliboniĝis", kaj optimismo ne mankas. Peranto: Ken Linton.

MISTAKSOJ

Somerset Maugham estis 64-jaraĝa, kiam aperis en 1938 lia verko "The Summing Up" (resumo pri mia vivo). En ĝi li antaŭtime skribis pri la malmulto da jaroj, kiu tre verŝajne restas al li. Oni legas: ". . . ĉe mi la viv-irado komencas finiĝi . . . la estonteco por mi estas tiel tre mallonga". Kvankam li suferis de tuberkulo jam de la infanaj jaroj, li tamen vivis ĝis 1965, kiam li mortis 91-jara.

Arthur C. Benson simile tro malalte taksis sian vivlongon. En "The House of Quiet" (la domo de l'trankvileco) 1904, oni legas ĉe la fina paragrafo: "Mi jam atingas la finon de mia vivo". Naskiĝinte en 1862, li ĝisvivis la jaron 1925. Se li ne estis mort-minacata invalido, ŝajnas strange, ke li tiel sin esprimis en sia aĝo 42-jara.

NIA LIBRO-SERVO

Story of Esperanto: I. T. Maddern 24b 20
Jen Londono: (bele ilustrita). G 50B 60
Suno kaj Pluvo: Gudrun Riisberg N80b
1-80

Trans la Fabeloceano: F. Szilagyi. N130B
2-80

Faulhaber Rakontas: N 32B 55
Ni Ludas: G. Riisberg. T 32b 55
Internacia Libro-Jaro Glumarkoj (folio
16 markoj) 20

OUR EXPRESSIVE ENGLISH

French woman buying a cauliflower asks for "a blooming cabbage". Belgian shopper: "Please may I have some of your crummy bread?"

And a local lad has sweet converse with a shopkeeper: "I'd like some of them there". "Some of these?" "No, them". "These ere?" "No, them there". "Is these them?" "No, them's them, where I'm pointing". "Ah, these is them?" "Aye, that's right. Them's they!"—"Worker E-ist".

EL "HAMLETO" akto 1, sc. 1.

Kion signifas: "He smote the sledged Polacks on the ice"? Zamenhof tradukis per: "Li (en kolero) sian pezan glavon en la glacieron batis," Newell laŭvorte lin sekvas.

Ĉu tiu traduko estas laŭsenca? En akto 4, sceno 4 Ŝekspiro uzis la nomojn "Pole" kaj "Polack" kiel simplajn vort-variantojn. Zamenhof kaj Newell samvorte tradukis tiun teksteron:

"Kaj se ĝin vendi, ĝi al la norvego

Aŭ al la polo certe pli ne donus.

Hamleto: La poloj sekve ĝin eĉ ne defendos".

Kial do en akto 1 Zamenhof kaj Newell tradukis "Polacks" per "glavo", kaj en akto 4 per "polo"?

En "Literatura Mondo", sept. 1933, Waringhein komentas, ke Zamenhof konis la Anglan nur "tre malmulte kaj teorie". W. opinias, ke Z. eĉ ne rigardis la originalan tekston de Hamleto. Ĉetere estas verŝajne, ke tiu teksto estis malfacile havebla en la malgrandaj Rusaj urbetoj en kiuj Z. loĝis, kiam li tradukis la verkon.

Estas probable, ke krom la Germana traduko de Schlegel Z. uzis ankaŭ Polan aŭ Rusan tradukon. En lia traduko estas tre strangaj kontraŭsencaj, kiuj ŝajnas povi deveni nek de la Angla, nek de la Germana verko. Interalie:

Li en kolero sian pezan glavon' En la glacieron batis . . . dum la Angla kaj Germana teksto parolas **pri elpuŝo de Pola reĝo el lia glitveturilo.**

Tiel interpretis Prof-o W., sed la Anglaj vortoj signifas: "batis la Polojn en sledoj".

"Esperanto — la latino de l'demokratio"

Kiu la unua diris ĝin? Jen atribuo:—**Kardinalo Piffli:** Kongreslibro de la 24-a Hispana E-Kongreso (Barcelono 1963).

Emile Boirac: M. F. Menendez en "El Esperanto en la opinion de hombres eminentes" (1949). B. Cavanagh: "Esperanto, a first language for all mankind" (1971). M. Boulton: "Zamenhof" (1962), p. 144. Lanti: "Sennacieca Revuo", nro 75 (1939), p. 35.

Jean Jaures: I. Dratwer: "Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj" (1970) p. 110. Dratwer citas (erare) paĝon 216 de Drezon: "Historio de la Mondolingvo"

Ivan Ŝiŝmanov: "Seminario Lingvo kaj Kulturo" —1; TEJO en Strasburgo 9/71. Volume de kontribuajoj ĵus aperinta.

LA GASTEJESTRINO DE "LA TILIO".**(Baumbach)**

"La pokalo jam malplenas, la monujo ne plu tenas; soifas kor' kaj lango. Sorĉis min ja via vino, okulpar' de vi, silfino. En mi bolas sango".

"Sed", ridante diris ŝi:

"vi ne ŝuldos tie ĉi.

Pagu vi tintmone.

Tamen, se vin mono mankas, por la sako mi vin dankas — trinku vi ĝisdrone".

Donis sakon al la ino tiu knabo kontraŭ vino: trinkis dolĉebrie.

Diris ŝi: "Ho juna homo, rob', ĉapelo kaj bastono restu garantie".

Do fortrinkis tiu homo ĉapon, robon, marŝbastonon; ĝemis jam: "Sufiĉe! Ĝis revid', malvarma vino, kaj vi, loga vendestrino; festis mi tro riĉe!"

Diris ŝi karespetole:

"En vi koro kuŝas mole.

Ĝi la garantio!"

Sekvis febra lipa tuŝo — buŝo premis sin sur buŝo en gastej' "Tilio".

La verkinto de l'poemo kantis ĝin kun pasieemo, en nokt' dolĉodora. Antaŭ li pokal' kun vino, apud li gastejestrino sub tilio flora.

—Trad. F.R.B.

RURAL YOUTH & ESPERANTO

The following motion was passed at the Rural Youth State Conference recently held in Cairns: "That State Conference express its support of the introduction of Esperanto into Queensland secondary schools". Details: Miss Jan Veacock, The Gums, 4406; Jenny Stubbs, 43 John Street, Rosewood, 4340; Rural Youth, Box 151 N. Brisbane, 4000.

"WINNIE-LA-PU" (A. A. Milne)

In Esperanto. Review in next number. 164 pp. 5.95 at Libro-servo.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 108 (188)

MELBURNO

Julio, 1972

AUSTRALIA KRONIKO

MORWELL: Ĉe la Generala Kunveno 2/5 elektigis la jena estraro. Prez: S-ro I. T. Maddern; Vic-Prez: S-ro W. Wybenga; Sekretario/Kasisto: S-ino M. Wybenga; Bibliotekisto: S-ino I. McLaren.

Ni montris nian filmon ĉe la Rotaria Klubo. S-ro Maddern faris enkondukan paroladon pri Esperanto, kiun oni aprobe aŭskultis. Unu el la ĉeestantoj rimarkis ke li lernis la francan lingvon dum 5 jaroj, sed nuntempe apenaŭ memoras vorton.

Dudek studentoj de la "Sendependa Universitato de Aŭstralio", kies fondinto-direktoro estas S-ro I. T. Maddern, entuziasme studas Esperanton.

MELBOURNE: Dank' al kolorplenaj diapozitivaj kaj informriĉa komentario de S-ro Ken Linton, kiu revenis post vizito al Hindujo, la klubanaro, 29/5, faris okulan ekskurson ĉirkaŭ la urbo Delhi. Prezentiĝis ne nur historiaj kaj geografiaj vidindaĵoj pri antikva kaj moderna Delhi, sed ankaŭ amindaj personoj inkluzive de verdstelanoj.

S-ro Arnold Baldwin, 5/6, donis skizon pri la membreco kaj celoj de la internacia organizaĵo "Mensa" kaj ĝia E-sekcio "Espermensa" kaj testis la inteligenton de la ĉeestantaro, kiu vere ĝuis la programon.

Esperanto-Federacio de Viktorio

La Federacio organizis "Aŭtomobila Konkurso", sabaton, 20/5 Ĝi komenciĝis ĉe la Komerca Centro "Chadstone" kaj finiĝis ĉe "sekreta" celo, kiu estis la Restoracio "Potters' Cottage" apud bela Warrandyte. Partoprenis 30 personoj el ĉiuj 4 E-grupoj de Melburno, inkluzive 7 infanojn, en 8 aŭtomobiloj, sed unu aŭtomobilo ne atingis la celon. Spite de minaca vetero, la partoprenantoj ĝuis la

neordinaran okazon, la cerbumadon pri la skribitaj indikoj (en Esperanto kompreneble) por sekvi la ĝustan vojon, la varmigan tason da teo, kun "skonoj" (platpanetoj), konfitaĵo kaj kremo ĉe la fino. Eŝtis interesa ankaŭ inspektado de surloke manfaritaj argilaĵoj. S-roj Len McLochlan kaj Arnold Baldwin kontrolis la demandpapirojn de la partoprenantoj kaj decidis ke la aŭtomobilo de Ges-roj I. Heldzingen estis la gajninto. Ne mankis gajnintoj de la "ligna kulero", S-ro George Kuhlman.

Congress Photos still available:

Opening Ceremony: Nos: 1 A; 2 B; 3 C; 6 F

Minister Hon. Vance Dickie opens Congress: No. 4 D

Audience at Opening: No. 5 E

Group Photo of all Congress Members: 8 H

Morwell Group: No. 9 I

N.S.W. Group: No. 10 J

Queensland Group: No. 12 L

Eastern Suburbs Group: No. 12 L

All these photos \$1.00, plus 13c postage.

Also available large group photo of all Congress Members for \$1.80 plus 19c postage.

Send your order with payment to:
Congress Committee, Box 2122 T.,
G.P.O. Melbourne, 3001.

A.E.A. EXAMINATIONS

Elementary: Mrs. S. Blockley, Mosman Park, W.A.; Miss J. Gray, Subiaco, W.A.; Mrs. V. Payne, Cronulla, N.S.W.

REPORTERS: I sent copy to printers early — 14 June — this issue because I wished to prepare it for publication before leaving Melbourne.—Editor.

GASTARTIKOLO: JOHANO HAMVAI

En la novan mondon venis nova homo.

La jaro 1950. Batalinta Eŭropo ankoraŭ fumis pro la sekvoj de tiu terura stultajo — milito; Ĉiu, kiu povis, klopodis fuĝi el la haoso kaj mizero; kaj ni akceptis inviton de nia karmemora amiko, S-ino Harris en Nov-Zelando, trovi tie novan hejmon.

Kiu dubas ankoraŭ pri la praktika valoro de Esperanto, tiu sciu kiel efektiviĝis kaj realiĝis tiu ĉi invito, malgraŭ ĉiaspacaj malfacilaĵoj; Ho ve, la homa stultajo klopodis starigi multajn obstaklojn en nian vojon. Pli ol jaron ni devis atendi en Romo, jam survoje, la Nov-Zelandan sopiregatan enir-permeson — inter duboj: Jes au Ne? Dum tiu tempo aperis ankaŭ timo-tentoj rilate la tute nekonatan novan mondoparton al kiu ni volas konfidi la reston de nia vivo; La sola certigo kaj kuraĝigo estis la vortoj de kara, sed ankoraŭ neniam vidita samideano.

"Ĉu vi iras Aŭstralion?" amiko demandis nin; "tie vi devos laboregi du jarojn, kien ajn oni metos vin: en minejo, sur sukerkan-kampo aŭ en dezerto! La plej multaj enmigrintoj, precipe la pli malfortaj, senescepte neniĝas tie dum tiu tempo!" Alia demandis min tute serioze: "Ĉu vi ne timas, ke la Maorioj formanĝos vin en Nov-Zelando?"

Sekve, kun kiaj sentoj ni surŝipiĝis, kiam venis la longe atendita permeso! Dum la kvar semajnoj surŝipe mi preĝis: por ke la Maorioj ne kuiru min en siaj potoj!

Fine ni alvenis al nia ŝipvetura finstacio: Melbourne. Ĉe la elŝipiĝo atendis nin agrabla kaj inteligenta oficiala sinjoro, Kiu post identigo veturigis nin en ĉarme intiman familian hotelon en la urbcentro, kie ni ricevis ĉambron por tri tagoj, atendante ĝis aeroplano transportos nin al Sydney kaj de tie al Auckland.

Sed la mirakloj nur komenciĝis: Nia afabla "vira feino" elprenis monujon kaj donis al ni pundo-banknotojn kiel poŝmonon por nia restado en Melbourne. Ankoraŭ pli! Aperis ĉarme eleganta sinjorino, kiu purigis nian ĉambron dum ni iris en la manĝejon por tagmanĝi. (Feliĉe, ke mi ne ridindigis min antaŭ la sinjorino per saluto al ŝi laŭ maldmoderna hungara kutimo: "Mi kisas viajn manojn!")

Ĉe la manĝotablo bela fraŭlino demandis, kion ni deziras? Kvankam la aŭstraliaj banknotoj en nia poŝo jam faris nin iom pli kuraĝaj ol antaŭe, ni tamen ne kuraĝis elekti, ĉar ankaŭ la prezoj estis aŭstraliaj. Sed la afabla kelnerino nin trankviligis: ni povas elekti kion ajn, ĉar nun, dum tri tagoj, ni estas gastoj de la aŭstralia registaro, pli ĝuste de la aŭstralia popolo!

Niaj okuloj ekvidis ĉiajn kolorojn, precipe post la gustumo de la bonega aŭstralia ruĝa vino! Jen nia unua tosto: "Vivu kaj floru tiu ĉi fabela Aŭstralio kaj ĝia kara, amika popolo!" (Tiam mi ne konis la himnon "Advance Australia", alie mi certe estus ekkantinta ankaŭ tiun!)

Post la tagmanĝo ni retrovis nian ĉambron, belege brilantan, por ioma "ripozo": sonis telefono: — Iu sinjoro vin atendas en la vestiblo! Nin? En Melbourne? — Jes. Ni rapidis malsupren kaj tie akceptis nin karaj esperantaj vortoj: "Estu bonvenaj ĉi tie, karaj samideanoj. Mi estas la ĉefsekretario de la Esperanto-Societo . . ." Li, mia kara, unua amiko en Aŭstralio, S-ro H. Koppel. Li, tre okupita homo, tamen trovis tempon dum la tri tagoj montri al ni la belegan urbon, gvidi kaj prezenti nin al kelkaj eminentaj E-istoj. Tre afable akceptis nin D-ro Williams, kaj poste ni vizitis la hejmon de ĉarma kaj afabla angla-devena sinjorino: Banham, kiu akceptis nin per perfekta Esperanto, kvazaŭ malnovajn geamikojn. Multe ni parolis pri ĉio en nia kara lingvo. Ni forte deziris renkonti ankaŭ ŝian jam bonekonatan edzon, kiu tiam ne estis hejme. Poste ni provis vidi ankaŭ lin en la granda ĵurnal-presejo, sed bedaŭre tio ne sukcesis al ni.

Ni flugveturis al Sydney, kiun bedaŭre ni nur nokte traveturis de unu flugplaco al la alia, kaj fine per hidroplano ni alvenis al nia nova, nekonata hejmo: Nov-Zelando. Kiam ni proksimflugis al Auckland, jam mateniĝis. Malsupre de ni — la Norda Insulo kaj Auckland kun rave pitoreska haveno kaj ĉirkaŭajo. Jam finfine ni atingis nian celon, ho belan!

Ciujn karajn, konatajn kaj nekonatajn aŭstraliajn samideanojn salutas varmkore: JOHANO HAMVAI, Auckland, Nov-Zelando.

(Vidu: La Rondo, majon 1950, p. 265.— Red.)

"BLOOD COUNT"

Mi opinias, ke la plej taŭga traduko estas: "sangorkpuskla analizo". Se oni volus esti tute preciza, eble oni povus antaŭmeti al la vorto la adjektivon: kvanta, por emfazi, ke la analizo ne tiom koncernas la specifajn ecojn de la korpuskloj kiom la kvanton. Fakte, rilate al la ruĝaj korpuskloj la analizo koncernas nur la kvanton; rilate al la blankaj gi koncernas kaj iliajn specifajn karakterizaĵojn kaj ilian nombron en kuba centimetro da sango. — (D-ro) C. Caldera.

(Ankaŭ "hemogramo": G. Blutbild.— Red.)

A.E.A. OFICIALA INFORMILO

9 Junio, 1972

Novaj Membroj.

- McNamara, S-ro, T., St. Kilda, Vic.
- Connell, S-ro N., Armidale, W.A.
- Blau, S-ino P., Caulfield, Vic.
- Bone, S-ro B. P., Wantirna, Vic.
- Kealy, S-ro P. L., Alice Springs, N.T.
- Kelly, S-ino J., Armadale, Vic.
- Shaw, S-ino J. Lakes Entrance, Vic.
- Brimelow, S-ro. A. S., Chermside, Qld.
- Lorenz, S-ro P., Goethe-Schule G.D.R.
- Stephens, F-ino E., Auckland, N.Z.
- Ward, S-ro M. R., Christeis Beach, S.A.
- Wilson, S-ro J., Little Bay, N.S.W.
- Mitchell, S-ro O. K., Albert Park, Vic.

T.G.M.F.

- Caseleyr, S-ino D. F., Coeoy Bay, Qld. \$1.00
- Beaumont, S-ino M., Hornsby, N.S.W. 2.00
- Kirkwood, S-ino G., Mylestom N.S.W. 10.00
- Harry, S-ro R. L. Goethe-Schule G.D.R. 25.00
- Arnold, F-ino D., Adamstown Heights, N.S.W. 1.50
- Malvern Esp-Grupo, Glen Iris, Vic 10.00

—Russ Baxter, Sel.

LINGUISTICALLY THE WORST . . .

Britain heads for a major linguistic crisis. Our assumption that others must learn to speak English, our refusal to train translators, and the custom in British business of using cheap hacks for this work are already making us a laughing-stock abroad.

Mr. Cook-Radmore, chairman of the British Council of Translators, said: "Once in the Common Market, it's going to be a hell of a problem. I wake up in a cold sweat when I think who is going to cope with it. Our industry just isn't prepared to spend the time and money for training efficient translators. British firms' main criteria for the translators they use are that they should be quick and cheap. These are the worst criteria. A really good translator can do 2000 words in a day for a high quality translator. But if some firms can find someone who'll promise to do a thing by midday at \$2.50 an hour, they're thrilled.

Work is farmed out to "old Jones in sales who speaks Spanish" (after three holidays on the Costa Brava), retired schoolmistresses, holiday couriers, housewives in need of spare-time work that can earn them a few pounds. Their knowledge of technical terms is virtually nil, and they just can't cope linguistically

with the high degree of skills in industry today.

Volkswagen headquarters in Germany employ 100 staff translators. The largest known number of staff translators in any British company is 20. British business desperately needs good translators, but how on earth do you batter this into their brains? — Resume of article in "Leicester Mercury", 24.9.71. Full text in "Esperanto Contact", 11/71.

DOLORA REMEMORO

Ni represas el "Heroldo de E-o" tiutempan raporton pri la morto de J. G. Pyke. Kiun ankoraŭ memoras malnovaj amikoj liaj. Ĝi estas la plej longa mencio el la gazetoj disponeblaj por ni.

"La 15-an de oktobro 1930, dum la reveturo de la Oksforda Kongreso al Aŭstralio, de sur la ŝipo 'Balranald' ie en la Mediteraneo, proksime du tagojn antaŭ Malto, nia aŭstralia samcelano J. G. Pyke perdis la vivon.

"S-ro Pyke estis unu el la ĝenerale konataj kaj ŝatataj pioniroj de nia movado kaj la eminenta reprezentanto de Aŭstralio. Plurfoje li ĉeestis Universalajn Kongresojn (Prago, Danzigo, Oksfordo). Li estis la oficiala kolektanto en Aŭstralio por la Zamenhofa monumento kaj, kiel rezulto de lia laboro, Aŭstralio okupis la duan lokon inter la donacintoj. Cien li portadis sian ĉiamfreŝan spritecon, sed malgraŭ tia gaja ekstero li forte sentis la maljustecon, ĉu inter popoloj, ĉu inter sociaj klasoj. Dum lia lasta vizito al Germanujo en aŭtuno 1930 li sentis akran doloron, vidante kiel mizeraj estas la kondiĉoj sub kiuj vivas multaj laboristoj.

"Dekdu jarojn li pasigis en la servo de l'Esperantismo, kaj plejgrandparte li okupis la prezidantan seĝon de tiu aŭ tiu asocio, societo aŭ klubo.

"Pasie li amis la teatron kaj verkis kelkajn drametojn en Esperanto. 'La Amigilo' aperis en 'La Revuo' kaj ankaŭ estis prezentita de la esperantistoj en Parizo kaj Kopenhago".

"El letero de S-ino E. L. Osmond, Londono, ni ĉerpas ankoraŭ jenon:

" . . . ricevis informon, ke post matenmanĝo la 15-an de oktobro li malaperis. Malgraŭ traa serĉado de l'ŝipo li ne estis trovata, do oni supozis, ke li falis en la maron. Li diris al mi kelkfoje, ke li sentas kapturuniĝon, kiam li estas sur ŝipo, eĉ sur la trankvila maro de la Golfo de Danzig . . . En la lasta vizito li parolis gaje pri la reveno al aŭstralia somero kaj pri la interesaj travivaĵoj kiujn li priskribos al siaj samlandanoj. Samtempe li diris: "Mi certe revenos al kara Anglujo". (La raporto finiĝas per kondolenco.)

MUSINGS ON DEATH

"If I err in believing that the souls of men are immortal, I err willingly. Nor would I have this error, which enchants me, torn from me while I live. But if, when I am dead, I know nothing, as some philosophers suppose, I shall not fear that dead philosophers will mock me". — Cicero.

H. G. Wells argued against immortality. Chesterton commented: "H. G. suffers from the disadvantage that, when he dies, if he's right he'll never know. He'll only know if he's wrong".

"None but those shadowed by death's approach are suffered to know that death is a blessing. The gods conceal themselves from those that have life before them, in order that they may go on living". — Lucan.

BACK O' THE MOON

O Moon, lovely moon, with thy
beautiful face,
Careering throughout the boundaries of
space,
Whenever I see thee, I think in my mind:
Shall I ever, oh ever, behold thy behind?

Ho Luno, ho Luno, vizaĝe tre bela,
Veturas vi milde tra l' spaco fabela.
Duonon mi vidas — duono en kaŝo!
Ĉu iam mi vidos al via postajo?

TALES UNFINISHED

The most tantalising conversations ever
Are the ones you hear a little of
In the bus or train—and, at the critical
moment,
Have to get out, sadly, in the middle of.

Bone estus aŭdi ĝis la babilada fino
Ĉe nekonataj homoj dum trama, trajna
kunveturo.
Ho ve, evitas ĉiam nin tiklo de l' kulmino,
Ĉar jam eliri devas ni. Cagrena
malplezuro!

LA BIBLIAJ LINGVOJ

"Estas la devo de pastro instrui la
Biblion. Sen kompetenta scio pri la
Greka, li simple ne povas plenumi tiun
funkcion plene kaj taŭge". — (Foje
aŭdata diro).

"Kiom da pastroj, okupintaj sian oficon
jam sep jarojn, povas legi la Hebrean
Biblion? Ĉu 5 procentoj? Dube. Kiom
el ili ankoraŭ stude retenas scion pri la
Greka? Ĉu 20 procentoj? Same duba
afero". — (A Peel, Literatura Doktoro).

MEDITOJ PRI LA MORTO

"Se mi eraras, kredante, ke la animoj
de la homoj estas senmortaj, mi eraras
volonte. Kaj mi ne deziras, ke tiu eraro,
kiu ravas min, estu forprenita dum mi
vivas. Sed se, mortinte, mi jam ĉesos
konscii, kiel supozas iuj filozofoj, mi
ne timos, ke mortintaj filozofoj min
mokus". — Cicerono.

H. G. Wells (uelz) argumentis kontraŭ
la senmorteco. Chesterton komentis: "H.
G. argumentas sub malavantaĝo, en tio,
ke se li pravas, li, mortinte, ne scios pri
sia praveco. Li havos sci-kapablon, nur
se li estas malprava".

"Nur tiuj jam ombrataj de la morto
ricevas la scion, ke la morto estas beno.
La dioj sin kaŝas kontraŭ homoj kiuj
ankoraŭ plu vivos, por ke tiuj povu
daŭrigi la vivadon". — Lukano.

KRISTO KAJ LA KRIPLULO

"Lia dekstra mano estis velkinta".
Luko 6/6.

Ho dank'al Dio; Al mi ilojn nun redonu;
Mi denove tenu firme adzon kaj martelon!
Najlojn portu, lignon ĉiaspecan laŭ
bezono!

Vidu, kiel mano mia movas ĉi ĉizelon!
Kiel bonaj estas nun solida ŝtono, fero—
Kruda, glata, rekta, kurba, ankaŭ ronda
ĝi.

Edzino, proksimiĝu, rigardu min en
vero—
Denove laborpreta viro staras antaŭ vi!
Utila hom' vivgajna — ne plu mankripla
ulo.

Ho pensu nur, ke Li, la majstro, mild-
serene iras
Kaj ree donas forton al la mano, brak',
okulo

Kaj ĉia membro manka. Homoj dankaj
ĉie miras!

ANGLAJ DIALEKTOJ

En Anglujo la parolata lingvo diferencas ne nur je grandaj distancoj unu de alia, sed ankaŭ en regionoj malmultajn mejlojn for de Londono. La dialektaj kaj akcentaj nesamaĵoj ne estas tiel ekster-normaj, ke alilokaj vizitantoj ne povus ilin kompreni; kaj la parolvariaĵoj interesas homojn, kiuj amas lerni novajn vortojn. Malgraŭ la asimile kuniga influo de multo en la moderna vivo, la spirito de "regionismo" vigle pulsadas. La nord-brito aŭskultas kaj spektas resp. la sud-anglan radion kaj televidon tute sen ajna perdo de siaspeca lingvaĵo. Ankoraŭ daŭradas en la provincoj la suko kaj ĉarmo de la lokaj dialektoj, ĉiu riĉa je

sia aparta vortprovizo.—“Age”, Melbourne, 31.1.70..

ĈU VI SCIAS?

- (1) La plej granda E-Mondkongreso?
 - (2) En kiu jaro la verda stelo fariĝis la E-simbolo?
 - (3) Kiu tri-litera vorto konsistas nur el vokaloj?
 - (4) La plej malnova nacia E-gazeto?
 - (5) Kiu urbo donis sian nomon al E-vortaro?
 - (6) La fraŭlina nomo de S-ino Zamenhof?
 - (7) Rimoj por: silko, algo, rajto, apro, laŭbo, templo, merlo, erpi?
- (Respondoj sur alia paĝo.)

KONTRAŬ LINGVA GROTESKECO

Konata konsilo de Zamenhof estas, ke E-istoj imitu la plej bonajn klasikajn verkistojn, inkluzive lin mem. Li pravis tiel diri, ĉar en la Letero al Borovko li trovis, ke “la lingvo en miaj manoj . . .” ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran fizionomion, ne dependantan de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo”. En 1905: “Kiam la E-istoj penos ĉiam ĝin imitadi mian stilon . . . nia lingvo multe gajnos de tio ĉi” (“Originala Verkaro”, p. 433).

“Ĝis 1914 ĉiu bona verkisto sorbis kaj sekvis la stilon de Zamenhof” (Rossetti, “Esperanto”, 6/53.)

Unu el ili, Kabe, diris: “Se efektive mi estas ne malbona Esperanta stilisto, mi havas nur unu meriton, ke mi atente legis kaj studis la verkojn de nia Majstro, inokulis al mi la mirindan simplecon kaj maturecon de lia stilo kaj penis ĉiam ĝin imiti. Se mi sukcesis, mi atingis la rezulton nur dank'al la elekto de bona modelo kaj al fidela imitado”.

Ivo Rotkviĉ estas alte talenta E-isto, kiu principe penas ekspluati la “indigenajn” rimedojn de la lingvo, libere verbigante preskaŭ ĉiun elementon. Oni demandas tamen: ĉu li aprobas la konsilon de Zamenhof kaj la ekzemplon de Kabe? Ke li ignoras ambaŭ konsilon kaj praktikon estas ekster dubo. Vidu nur lian tradukon de “Tragedio en la Universo” (Zagreb 1961) kaj lian mirinde akrobatecan lingvaĵon en la antaŭparolo al “33 Rakontoj” (Stafeto 1964). Faŭkas abismo inter la elstara manierismo de tiu lasta kaj la ĝenerala stilo de la novelistoj en la kolekto.

Rotkviĉ lingve arlekanas. Li rajtas pretendi al plena “posedo” de E-o, sed ne al la posedo de komuna prudento prilingvaja, ĉar lia verkmaniero estas neniel “internacia”, kaj lia ekstremismo

estigas nur konfuzon ĉe legantoj. Jen kelkaj formoj el lia traduko de la “Tragedio . . .”:

ajn-io, fortiena, ektuji, fortie, entie, distie, traplue, forplue, ĉiaĵo, far-kielo, far-kialo, prinei, aljusi, supertombi, tuŝtuji, albaldaŭi, kurlaŭi, priebli, tratuji, ĵusete, tutĉie, ĉiege, plur-ion, plu-ion, dirĵusi, ŝanĝsubito, tra-alsubiti, praeksa fenddisete.

Obseda uzado de nenecesaj prefiksoj dis, al, for, el, sur, ek, tra, pri. En preskaŭ ĉiu okazo la prefikso donas nenion al la senco: ekz-e: disdistance pli ol; diseekstermo; forekstermi; pordo dislarĝe faŭkas; diseksplodo; alradiado; prisopirata evento; suratakis; alatakis; alinstruis; trakomprenas; trunketo elĝermos; kiun mi priebliis, k.m.a.

Komparinda ĝeno estas ankaŭ la pseŭdo-avangardisma, impresionisma snobeco, kiu karakterizas iujn alte flugantajn plumpuŝulojn. Per vort-kaj fraz-jonglado ili klaŭne celas ŝokimpresi per formo, anstataŭ doni havindan sencon. Ili brile sukcesas lacigi homojn de lingva sentemo.

Ankoraŭ alia plago estas verkaĉuloj de neaperiĝinda E-aĵo — malmatura, “malinternacia” kaj nekomprenbla pro nacilingva influo. Ĝi aperas precipe en efemeraj gazet-skriboj pri kiuj estas kulpa preterlasemaj aŭ egale malkompetentaj akceptintoj de tiaj fuŝaĵoj. Malzorguloj, fulme-skribemuloj, novbakitoj kaj eternaj komencantoj, enkestigu viajn skribojn dum ses monatoj. Je revido post paso de tiu tempo, verŝajne vi mem ne komprenos viajn tekstojn.

Sane utiligi la indigenajn rimedojn de E-o estas bone, tamen ni sciu, ke en tio kuŝas latentata viruso de ekstremismo. Virto ekstremigita povas fariĝi — malvirto. “Ne estu tro virta” konsilis la Predikanto (7/16).

La ennaska prudento de la simplaj E-istoj certe gardos ilin kontraŭ imito al Rotkviĉ kaj kondukos ilin al pli sekvindaj modeloj.—F.R.B.

PRI PAROLPOVA (?) PAPAGO

Filo de la kampulo Baŭer vizitis la ĉefurbon. Tie li admiris en magazeno strangan birdon kun granda kurba beko. Enirinte la vendejon, li sciigis, ke tiu birdo estas klera papago, kiu kapablas paroli.

La juna Baŭer aĉetis la papagon kaj sendis ĝin en kaĝo hejmen. En letero li informis, kion la birdo deziras manĝi, sed li ne skribis, ke la birdo kapablas paroli. Per tio li volis mirigi la familion post lia reveno.

La papago bone alvenis. La kampulo neniam antaŭe vidis tian birdon kaj, ne sciante kion fari, li demandis la vilaĝan instruiston. Tiu foliumis en siaj libroj kaj fine deklaris: "Tiu birdo estas speco de verda ansero, kaj via filo certe volas, ke vi manĝu tiun raran birdon!"

La familo Baŭer do manĝis ĝin, kvankam ĝi havis strangan guston.

Kiam la filo revenis post kelkaj tagoj, li tuj demandis, kiel fartas la birdo. Aŭdinte, ke oni manĝis ĝin laŭ propono de la instruisto, la juna Baŭer furioze kuris al la instruisto kaj ege mallaŭdis lin: "Kiel vi povis diri, ke la birdo estas verda ansero? Ĝi estas ja papago, tre malofta kaj klera birdo, kiu kapablas paroli kiel homo!"

La instruisto flehme respondis: "Kial do ĝi nenion diris?"

PRI LA KAMPULA LINGVAĴO DE THOMAS HARDY

(kun aparta atento al lia verko, "Far from the Madding Crowd")

La legantoj, kiuj iom bone konas la kampulojn de Dorset, homojn de iom malpli ol meza inteligentigo klera, rigardus kiel nekredoblan la bildon, kiun Hardy vortpentras pri ili en siaj verkoj.

Tiu kamplaboranta klaso, laŭ li, estas vera trezorujo de ekscentra sagaco kaj profanemasa familiareco kun la Biblio. . . . Oni suspektas, ke Hardy iufoje transmetis en iliajn mensojn la pli subtilajn personojn de siaj propraj studoj, aŭ paroligis per iliaj lipoj iujn el la pli kulturecaj metaforoj, kiujn li mem parolus, se li estus sur ilia loko, sed kiuj venas tre malnature el la buŝoj de liaj malpli intelektule dotitaj roluloj.

Ekzemple, kiam la laboristoj jam venas al la farmdomo por ricevi sian salajron, Liddy Smallbury, kiu estas duone amikino, duone servistino de Bathsheba, anoncas la fakton per ekkrio:— "La Filiŝtoj venas sur nin!", simile kiel dirus artkritikisto, kiam publikuloj amase svamas en artgalerion en tago de ekspozicio.

Kiam Bathsheba riproĉas Marian pro tio, ke ŝi ankoraŭ ne edzinigis, Maria respondis: "Malriĉan viron mi ne edzigos; riĉa viro ne min volas edzinigi; sekve tial mi staras soleca, simile al pelikano en la dezerto".

En tio ni kredas vidi la enmeton de satiro, kiu apartenas al la pensnivele de la aŭtoro, en la lingvaĵon de sociklaso multe malpli alta ol lia propra. Abundas en liaj verkoj tiuj samaj atestajoj de intelekta engrefto sur krudaj kaj trivialaj pensensprimoj en cetere ridamuzaj konversacioj de gekampuloj.

Sub la verkanta mano de Hardy liaj

Beotanoj (I) fariĝas Atenanoj laŭ profunda pensperceptemo; Germanoj, laŭ kapablo filozofie-spekulativa, Parizanoj, laŭ facile polurita sprito.

La klaŭnoj de Sekspiro, la kamparanoj de George Eliot, la farmlaboristoj de Scott, neniam levigis ĝis la alta nivelo de abstrakta rezonado, kiun Hardy posedigas al siaj cidrodrinkantaj kamp-kruduloj. George Eliot certe ne sin lasis fali en la literaturan eraron, atribui al la lingvaĵo de siaj roluloj la nivelon de sia propra pensado.

(I) La Atenanoj mokis la loĝantojn de Boetia pro ties mensa stulteco. La Bibliaj citoj: Juĝistoj 16/9: Psa. 102/6.

RECENZOJ

"Winnie-La-Pu" (A. A. Milne). Tradukis Ivy Kellerman Reed kaj Ralph A. Lewin. Redaktis Humphrey Tonkin; ilustris E. H. Shepherd. Eldonis E. P. Dutton kaj K-io, Novjorko. 164 paĝoj. Prezo 5.95.

Jen la unua por-infana klasikajo en Esperanta vesto. Preskaŭ 50 jarojn Anglaj geetuloj ĝuante legis pri la aventuroj de Kristoforo Robin kaj liaj best-amiketoj. La verko simile specas aŭ komparindas kun "Brer Rabbit" (frato kuniklo) de J. C. Harris, la rekontoj de Beatrix Potter kaj la postea: "D-ro Doolittle" de H. Lofting.

Antaŭparolo de H. Tonkin skize eksplikas la elementan strukturon de Esperanto, kaj glosaro de ĉiu vorto en la libro ebligas al ne-Esperantistoj iagradan komprenon de la teksto mem.

Tio taŭgas por inteligentaj maturuloj, sed ŝajnas evidente, ke infanoj bezonas preparan instruon antaŭ ol provi eklegon de la verko.

Espereble troviĝas nejunaj E-istoj, kiuj per ĉi tiu traduko povas partopreni denove ĉi-mondeton fantazian kaj re-vivi la plezuron, kio tiel ravis ilin en la infanaj jaroj.

Doktorino lingvistika Ivy Kellerman Reed tradukis la Sekspiran "Kiel Plaĉas al Vi" en 1910. Si mortis en 1968. Ralph A. Lewin, naskita Anglo, estas profesoro en Usono. Kontrolis la tradukon D-roj V. Sadler, John Wells; Reto Rossetti, W. Auld kaj Marjorie Boulton.

This is the first children's classic to appear in Esperanto. For almost 50 years English children have read with gusto the adventures of Christopher Robin and his little companions of the animal world. The book is similar to, or comparable with "Brer Rabbit", the stories of Beatrix Potter and the later "Dr. Doolittle" of H. Lofting.

A foreword by H. Tonkin sketches the elementary structure of Esperanto, and a glossary of every word used in the text enables a non-Esperantist to read the book with some degree of understanding. This is so for intelligent adults, but it seems clear that young children need preparatory instruction in the language before they try to read the book itself.

One hopes there are Esperantists who in this translation are able to return in spirit to this wee world of fantasy and so re-live the delights that charmed them in their infant years.

"The Problem of Linguistic Communication in the Modern World":

Second Plenary Session of the 56th World Esperanto Congress, 48 pages. Reprint from "La Monda Lingva Problemo", nr. 9. Price 75 cents at U.E.A. or Libro-servo. Five for 2.50.

The chief item is a verbatim report of a speech by M. Macmillan (British Council) on "English as a language of wider communication" and Dr. I. Lapenna's reply, which was in Esperanto and translated by Dr. J. C. Wells. The speeches were taped.

Mr. Macmillan led the debate. After Dr. Lapenna's reply, he said that while he was "for a large measure" in agreement with Dr. Lapenna, he nevertheless drew a different conclusion; he preferred "as a solution"—the teaching of modern languages. This, despite the personal witness of Dr. Lapenna to its ineffectiveness as such.

On the other hand, Dr. Lapenna suggested the displacement of foreign languages in schools by the introduction of Esperanto in them—not for many hours a week over five or more years, but just for two or three hours over one year. This would impart the groundwork of its structure and some 500 selected roots from which a vocabulary of over 5000 words could be derived by means of affixes. So, in a few years everyone, even those with but an elementary education, could understand and be understood on everyday matters anywhere in the world.

Other sections are: "La position de la langue Francaise dans le monde", by Jean Thierry; "Kurze Uebersicht ueber die Situation der deutschen Sprache in der Welt" (Goethe-Institute, Muenchen.) "Basic Facts about the international language (Esperanto)", by the Centre for Research and Documentation on the Language Problem). Resolution and Conclusions of the Congress.

Each section is followed by an adequate summary in Esperanto.

This publication is good reading for all Esperantists and certainly should be in the hands of every one of them engaged in public debate on the language problem.

ARIEH BEN GUNI

Tiel subskribiĝis la antaŭparolo al "La Libro de Amo". 12 literoj. Se oni forigas la artifikan "be", oni ricevas 10, kiuj formas anagramon de "Uaringhien (Waringhien). Tiu pseŭdonimo aperas ankaŭ sur p. 194 de "Nica Lit. Revuo", maja nro, 1960, ĉe recenzo pribiblia verkita laŭ la stilo de la Franca majstro.

LINCOLN KAJ KENNEDY

La murdo al Lincoln en 1865 strange similas al tiu al John Kennedy preskaŭ jarcenton poste.

Ambaŭ mortis en vendredo.

Ambaŭ ricevis kuglon en la kapdorsion, kaj kun la edzino ĉe ilia sidflanko.

Ambaŭ mortis en tempo, kiam ili luktis pri civilaj rajtoj.

Ilin ambaŭ ofice sekvis Sudŝtatanoj noll matak Johnson. Andrew Johnson naskiĝis en 1808; Lyndon B. Johnson, 1908.

En ambaŭ okazoj la murdintoj estis mortpafitaj antaŭ tempo difinita por ilia prijuĝado.

La nomoj de la murdintoj — John Wilkes Booth; Lee Harvey Oswald — havas po 15 literoj.

La viro, Boston Corbett, kiu asertis, ke li pafis la murdinton Booth, estis poste deklarita freneza. Jack Ruby, kiu pafis la akuziton Oswald, pledis frenezecon ĉe sia prijuĝado.

BERTRAND RUSSELL

En 1955 li prelegis antaŭ iu mond-parlamentara konferenco en Romo. En sia autobiografio li skribis: "Post ĝi, Italo, preskaŭ plorante, petegis min traduki mian prelegon en Esperanton, ĉar li ne povsciis la Anglan. Ho ve, mi ne povis tion". (vol. 3, p. 73).

El tio oni konkludas, ke tiu rajte meritrica saĝulo tamen ne estis sufiĉe saĝa, en tio, ke li ne lernis la Internacian Lingvon. Li estis homo intense okupata pri la internacia vivo, pense kaj politike, voĉe kaj skribe. Vaste li vojaĝis en fremdaj landoj. Tamen li, je sia malprofito, ne utiligis al si la praktikan interkomprengigon — Esperanton.

Russell estis mirinde, admirinde viro en kelkaj aspektoj de la homa karaktero — kuraĝa, honesta kaj penso-stimula. En 1962, je aĝo 90-jara, li parolis ĉe demonstracio en la Placo Trafalgar (Londono)

en neĝoŝtromo. Flame agema, li noble agitis preskaŭ ĝis sia morto en 1970, 98-jaraĝa.

W. S. MAUGHAM ON LANGUAGES

"Words are not important, but their meanings, and it is no spiritual advantage that I can see to know half a dozen languages. I have met polyglots; I have not noticed that they were any wiser than the rest of us . . . Unless you devote your whole life to it, you will never learn to speak the language of another country to perfection. You will never know its people and its literature with complete intimacy. For they, and the literature which is their expression, are wrought, not only of the actions they perform and the words they use . . . but of ancestral instincts, shades of feeling that they have absorbed with their mothers' milk, and innate attitudes which the foreigner can never quite seize".

"English grammar is very difficult, and few writers have avoided making mistakes in it. So heedful a writer as Henry James, for instance, wrote so ungrammatically that a schoolmaster, finding such errors in a schoolboy's essay, would be justly indignant".—"The Summing Up".

If Maugham is right, then the common belief to the contrary is a fallacy.

ABORTA RIMO

Waringhien en "Nica Revuo", p. 159, N-ro 28: "Mi ĉiam miris kiel Zamenhof, kies oreloj estis tiel delikataj al la harmonio, povis permesi al si la uzon de 'abortaj rimoj', ĉe kiuj la finaĵoj estas malsamaj:

Kion havis mi plej karan—

La junecon — mi ploranta

Metis mem sur la altaron.

"Aŭ, en tradukoj: Morta bato de la glav' de **Bruto!** Vi mortigis patron! Tero **tuta**

". . . tiu miskutimo devenas simple de la transporto, en E-on, de apartaĵo de la rusa poezio, kie, ekde la dua triono de la XIX j.c., oni adoptis la Moskvan prononcon, kiu konfuzas, je la fino de la vortoj, la neakcentitajn vokalojn a kaj o; e, i, kaj ja: **sada** (de ĝardeno) rimiĝas kun **nado** (necesas), ĉar, kvankam malsame skribitaj, la finaĵoj same prononciĝas en la Moskva maniero. Tiun apartaĵon Zamenhof kaj liaj sekvantoj enkondukis en E-on, ne rimarkante, ke tie la prononco tute malsamas, kaj ke sekve, ne temas pri rimoj".

-ANTO, -ATO, -ATULO.

La substantiva participo signifas ion konkretan (iu aŭ io, kiu -as): persono aŭ objekto, kiu plenumas ian funkcion.

Precipe oni uzas -anto ĉe objektoj nur okaze de personigoj — La prudento devas esti la instruanto de la sentado. La leukocitoj estas la gardantoj de la sango kontraŭ malbonaj influoj; aŭ ĉe maŝinoj: Multobliganto = multiplicator. En tiuj kazoj la plenumo de la funkcio devas esti farata de la objekto mem. Se persono faras ĝin pere de ilo, la ilo devas formiĝi per -il. Ekz. borilo. La uzanto estas la boranto.

C. Minor ne aprobas uzon de "trimastulo" por nomi ŝipon. Li rimarkas, ke ni jam uzas "tripiedo", "tridento", kaj rigardas "trimasto", "trikorno" (la ĉapelo) kiel taŭgajn. "Triornulo" estu rezervata por nomi mitan beston kun tri kornoj.

La formo "konatulo" havas uztaŭgecon nur se oni volas apliki ĝin al homo, kies karakteriza eco estas: esti konata, t.e. vaste, publike konata persono. Se oni nur volas indiki, ke persono estas konata de alia individuo, "konato" certe estas la ĝusta vorto.

Generale -ul post -at estas superflua. Tamen en la Fundamenta Krestomatio troviĝas "instruitulo", kie la karakteriza eco de instruisto (esti instruita) estas substrekita. Instruito = homo ricevinta instruon pri io.

Rimarku, ke estas "tendaro de militkaptitoj", sed "militkaptitula tendaro". Tie, -ul estas necesa.

Respondoj: Ĉu vi scias?

- (1) La 15-a, Nuremberg; 4963 anoj.
- (2) 1893.
- (3) iea.
- (4) "The British Esperantist", Jan. 1905.
- (5) Edinburgh.
- (6) Klara Silbernik.
- (7) Pilko; balgo, hidalgo; trajto, kajto, frajto; kapro; ŝraŭbo, daŭbo, traŭbo; ekzemplo, kontemplo; perlo, ferlo; ĉerpi, serpi.

Last But Not Least

"Laste sed ne lasta": Waringhien "Eseoj" p. 206. Tio estas, laste menciita, sed neniel lasta en la estimo de la viciginto. "Lastvice, sed ne last-range" (Grosjean-Maupin; Julius Gluck.) Utilajn esprimadojn notu en indeks-libreton. Tiel farante, vi progresos.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 109 (189)

MELBURNO

Aŭgusto, 1972

THE TEXT OF "THE A.E."

A large proportion of our readers are new-comers — friends and sympathisers, most of whom are in the early stages of learning Esperanto. Naturally they will find certain of the articles somewhat beyond their present ability to read with ease. Our paper being what it is — a gazette to inform and interest all Esp-ists — this is unavoidable. The same is true of "The British Esperantist" and every other national Esp. organ. Obviously a language must be learned before it can be read.

In welcoming to our ranks our many new supporters, I urge them to study on. After a regular session with a text-book, take a good dictionary, say Wells or Butler should you lack the "Plena Vortaro", and try to translate some of the simpler matter, e.g. jokes and anecdotes under "Bonvolu Rideti". This is valuable practice, and really very interesting.

Retain in order every copy of "The A.E." for future reference and reading; if you now truly wish to master the language, and sooner or later do so, you will be very glad that you kept them.

Meanwhile, it seems good to print some English text in every number, to impart something of immediate interest to our lingual fledglings. In the June number they will find about 25 inches of English — somewhat less than a quarter of the issue. This may vary from time to time.

We ask them to be patient and to persist in their efforts to attain that higher proficiency in the language which opens the way to the life-long pleasure of literary appreciation. In "The A.E.", as in every Esp. gazette with an earned status to maintain, there are subjects and themes that demand at least an approxi-

mation to mature treatment. And this calls for an expressiveness denied to one who is limited to elementary diction.

Believe us, we shall do our best to hold your interest and strengthen your will to work with all who strive to break Babel's barrier and so loosen the lips of men.—
Editor.

IMAGATA SOCIO EN KIU LA HOMOJ POVIS BONE VIVADI

La ĉefa kaj preskaŭ nulsola tasko de la magistratanoj estas certigi ke neniu homo sidas senfare, sed, male, ke ĉiu apliku sian forton al sia laboro kun fervora diligento. Tamen, tion farante, la regnantoj tute ne lacigu sin per senĉesa laboro, kiel jugbrutoj, jam de frua mateno ĝis malfrua vespero.

En Utopio oni dividis la tagon precize en dudek kvar horojn. Oni asignas nur tri horojn al laboro antaŭ la tagmezo, kiam oni iras al tagmanĝo. Post tiu manĝo, kaj kiam ili jam ripozis du horojn, ili laboras ankoraŭ tri horojn, post kio ili iras por vespermanĝi. Ĉirkaŭ la oka horo (kalkule la unuan horon kiel la unuan horon post tagmezo), ili enlitiĝas. Ok horojn ili dediĉas al dormo.

Ciom de la senlabora tempo inter la horoj de laboro, dormo kaj manĝo ili uzas laŭ sia propra plaĉo. Ili ne havas liberon foruzi ĝin per diboĉo aŭ flegma nenifaremo, sed, liberaj de sia rutina labordevo, ili rajtas bone kaj profite uzi la tempon, laŭplaĉe sin okupante per aliaj sciindaĵoj.

Post vespermanĝo ili sin okupas pri ludoj — somere en siaj ĝardenoj, vintre en la komunaj haloj, kie ili tag-kaj vespermanĝas. Tie ili sin ekzercas je la muziko, aŭ honeste kaj edife konversacias.—Thomas More (1478-1535).

READING—TELEVIEWING

The coming of T.V. in millions of homes has meant that for many people the desire for reading has almost disappeared, although it is also true that the low level of programs has sometimes had an inverse effect.

There are limits to T.V. First, it is ephemeral, that is to say one must catch the message immediately on hearing it. Any momentary distraction dispels the words, which are never recaptured. Studies have revealed that a person who has seen a program often has an erroneous impression of it, or, indeed, has retained no impression at all! The impression gained by reading is deeper, more lasting, for one can, if necessary, re-read and check the text after any length of interval.

Second, T.V. is superficial. Even the most serious factual programs lack the time to treat a subject in depth. A book, on the other hand, may present it in great details, in several volumes if need be.

Third, T.V. is indiscriminate. Its programs are aimed at millions whose tastes, culture levels and convictions are very diverse. In practice, this seriously limits the range of programs and inevitably fails to content the needs and wishes of everybody. The spectators choose a T.V. program from a limited field, but books offer the reader an infinite variety of theme and presentation.

Books are still the basic element in our civilisation. They preserve our culture and expand it. They provide relatively cheap yet sound means of education. True it is that we have tape-recorders, microphotography, etc., but such "canned" material is ordinarily difficult of access for the majority. At some time in the future it may be that these methods will supplant the book in our homes. In 1972 this seems yet afar off. For millions of thinking folk, the world over, nothing can take the place of books.

LEGADO—TELEVIDIDAD

La alveno de la televido en sennombrajn hejmojn signifas, ke por multaj homoj preskaŭ tute malaperis la instigo al legado, kvankam oni spertis ankaŭ, ke la malalta nivelo de tre multaj programoj kelkfoje efkis inverse.

La televido havas klare difineblajn limojn. Unue, ĝi estas **efemera**; tio estas: ĉion oni devas kapti je la unua aŭdo momenta interrompo perdigas la vortojn, kaj oni ne povas ilin re-kapti. Enketoj montris, ke homo, kiu rigardis iun programon, tre ofte konservis poste impreson kelkfoje oni konservis nenian impreson! Libro aliflanke estas daŭrema; oni povas, se neese, relegi kaj kontroli la tekston, eĉ post iom tre longa intervalo.

Due, la televido estas **supraja**. Eĉ la plej seriozaj informprogramoj ne disponas pri sufiĉe da tempo por ĝisfunde esplori la traktatajn temojn. Libro — eventuale en pluraj volumoj — kapablas esplori kaj elmeti temon plej detale.

Trie, la televido estas **sendistinga**. Programoj celas milionojn da homoj samtempe, kies gustoj, antaŭjuĝoj kaj konvinkigoj estas plej diversaj. Praktike tio severe limigas la gamon da la programoj kaj kompreneble ne kontentigas la bezonojn kaj postulojn de ĉiuj. Elekto de televida programo okazas inter tre malmultaj eblecoj; elektebleco, de libro estas preskaŭ infinita.

Libroj estas baz-elemento de nia civilizo. Ili konservas kaj plivastigas nian kulturon. Ili provizas relative malmultekostan krerigon. Hodiaŭ oni povas uzi sonbendojn, mikrofotojn kaj similajn, sed tiu konservita materialo estas malfacile alirebla por la grandega plimulto da homoj. Povas esti, ke iam en la estonteco tiaj helpiloj anstataŭas librojn en ĉies domo; sed en 1972 tio ankoraŭ ne proksimiĝas. En la vivo de milionoj da homoj la rolo de la libroj estas neanstataŭebla. (Resumitaĵo paragrafoj de artikolo "Internacia Libro-Jaro" fare de Wm. Auld, "Esperanto," majo, 1972.)

"NI LAŬDU FAMAJN HOMOJN

Panegiras Ivo Rotkviĉ en: "33 Rakontoj" (Stafeto, 1964): "**Reto Rossetti**: la bolversa miraklisto pri la sonoraj subtiloj de la fraza koncizo, senrivala perspektivisto pri la lingva kaj literatura evoluoj"

"**Ferenc Szilagyi**, la riĉkultura fakulo pri la lingvaj mistero, profunda etikulo kaj humanisto, objektiva pesmajstro (I)

Bele, miele, kaj ĉiel modele . . . ĉu ne?

(I) = aprecisto.

DISTRITA?

Vi konas la ŝercon. Sed ĉu la "distrita profesoro" vere estis distrita? Ni vidu per ekzemplo. "La kabareda amuzisto distris la ĉeestantojn per spiritaj ŝercoj; poste (ne: pli poste) la distritaj ĉeestantoj hejmeniris".

Male, la profesoro estas distriĝema (P.I.V.): tio estas: homo kiu emas iĝi senkonscia pri aferoj ĉirkaŭ si. Do, distriĝema profesoro; distrata (-ita) kabaredsidanto.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Ĉe nia kunveno de 24/5 Jack Hawks raportis pri prelego kiun li faris ĉe la Rotaria klubo de York. S-ro W. Howard prezentis sonbendon kun la voĉoj de multaj aŭstraliaj E-istoj, senditan de la AEA-sonbend-servo. 3 vizitantoj el la orientaj ŝtatoj helpis sukcesigi la vesperon: Niaj membroj Norm kaj Ann Brodie (el Sidnejo) kaj S-ro Buswell el Adelaide. Ĉeestis ankaŭ S-ro J. E. Thew, kiu lernis per korespondo kun Chris Dean kaj elmontris sin vigla kaj entuziasma studanto.

La Prezidanto kun plezuro bonvenigis, 14/6, 6 novajn anojn, kiuj estas klasanoj de la klaso en Nedlands: Ges-roj O. Battye kaj S-inoj M. Byers, M. Blight, G. Harmalin kaj S-ino E. Osborne. S-ro Illingworth montris samvespere belajn diapozitivojn pri vojaĝo de Newcastle (Anglujo) al Norvegujo kaj de Southampton per ŝipo "Canberra" revene al Aŭstralio. — G. Pollard.

MELBOURNE: S-ro H. Beechey, 19/6, klarigis la diferencon inter la logika (aŭ vertikala) pensado, dum kiu oni konstruas turon de pensoj, kun ĉiu firme bazita sur alia, kaj la transversa, kiu iom similas al haoso, kaj pri kiu li prezentis kelkajn ekzemplajn problemojn. Laŭ tiu tezo la transversa pensado estas la plej bona manifestiĝo pri inteligento, kiu ŝajne mankis inter la ĉeestantoj!

Je 26/6 ni aŭskultis sonbendon, faritan de Ann Hall (Sydney) pri la entombiga ceremonio de "Tajni" Goldsmith. S-ro M. Cohen, 3/7, prezentis 3 erojn. La unua temis pri ŝuista ilo ne plu multe konata, angle "Dog". En la dua li klarigis pri la egipta digo Assuan, pere de kiu kreiĝis la lagego Nasser kaj kiu alportis eble pli da malprofito ol profito. La tria aludis al la mult-aŭ dusingnifaj vortoj en diversaj lingvoj, sed de speciala intereso estas la vorto "koro", kun tiom da signifoj en la japana lingvo.

Je 10/7 S-ro H. Koppel prezentis plej lastajn novaĵojn el la tutmonda E-movado.

EASTERN SUBURBS (Melbourne): Kelkaj el niaj membroj nun estas supermare. Ges-roj W. Brockwell sendis interesan raporton pri vojaĝo al Anglujo kun priskribo de saviĝo de pasaĝero kiu falis en la maron. S-ino Bertha Smith, nia pres-oficisto, nun ferias kun filino en Japanujo, de kie ŝi interese raportis.

BORONIA: Por vigligi nian konversacian klason, 17/5, ĉiu ĉeestanto devis rakonti ŝercon. Tio fariĝis granda sukceso kaj provizis ridegigan vesperon. Je 24/5 George Kuhlman montris belegajn lum-bildojn pri sia vojaĝo al kaj tra Eŭropo.

Klasoj okazas ĉiumerkrede kaj bone progresas.

MORWELL: Nia prezidanto, S-ro Ivan Maddern, kun edzino kaj filino Philippa, flugos al Usono kaj reprezentos A.E.A. ĉe la Univ. Kongreso en Portland. Ni festis la 3-an naskiĝtagon de nia Societo per amuzvespero en la hejmo de Ges-roj Maddern.

Gratulojn al Joy Campbell kaj edzo pro naskiĝo de dua infano, filino Shahn Kathryn.

ROCKHAMPTON: Kurson por komen-cantoj ni ne plu havas. Ĉijare ĝi komenciĝis malforte kun nur 6 lernantoj, el kiuj kelkaj ne povis veni regule. Do, post kiam trifoje nur la instruisto venis sola, la kurso ĉesis funkcii. Tamen, daŭras la kurso je jaŭdo ĉe la "Adult Education", kun 4 ĝis 8 partoprenantoj. S-ro Neil Russell gvidas lunĉhoran klason por 4 ĝis 6 knabinoj ĉe la Rockhampton High School.

Nia bibliotekistino Joyce Turner restas for en Brisbano dum 6 monatoj por partopreni kurson por bibliotekistoj. Ŝi esperas fariĝi lerneja bibliotekistino. Ankaŭ nia kasistino Decia Niddrie ne povis esti kun ni dum kelkaj semajnoj. Ŝi aktorin en teatraĵo ĉe nia "Little Theatre".

ESPERANTO SEMINAR

In order that its members, as well as students currently studying the International Language at the Adult Education Centre, may have an opportunity to practice the language orally in a relaxed 'family' atmosphere, the Toowoomba Esperanto Society held, last week end, a seminar at the home of its librarian, Mrs. J. A. Lehane.

Interspersed with musical items, led by Miss Margaret O'Mara on her guitar, were readings from various Esperanto books and journals, presented by visitors, as well as short speeches and anecdotes. There was, as well, general conversation in Esperanto.

Several students from Mt. Lofty High School, brought by Mrs. L. Buchan, displayed an astonishing basic knowledge of the language, and charmed all present with their truly 'international' accent.

All participants expressed the wish that similar seminars will become a regular feature of the local movement.

(From "The Chronicle", Toowoomba, as reported by H. V. Petley, Press Officer).

Morwell Esperanto Conference

The Esperanto Federation of Victoria, in conjunction with the Morwell Esperanto Society, will hold a Weekend Conference at Morwell High School on the 6th, 7th and 8th of Oct., 1972. The pro-

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Ĉe nia kunveno de 24/5 Jack Hawks raportis pri prelego kiun li faris ĉe la Rotaria klubo de York. S-ro W. Howard prezentis sonbendon kun la voĉoj de multaj aŭstraliaj E-istoj, senditan de la AEA-sonbend-servo. 3 vizitantoj el la orientaj ŝtatoj helpis sukcesigi la vesperon: Niaj membroj Norm kaj Ann Brodie (el Sidnejo) kaj S-ro Buswell el Adelaide. Ĉeestis ankaŭ S-ro J. E. Thew, kiu lernis per korespondo kun Chris Dean kaj elmontris sin vigla kaj entuziasma studanto.

La Prezidanto kun plezuro bonvenigis, 14/6, 6 novajn anojn, kiuj estas klasanoj de la klaso en Nedlands: Ges-roj O. Battye kaj S-inoj M. Byers, M. Blight, G. Harmalin kaj S-ino E. Osborne. S-ro Illingworth montris samvespere belajn diapozitivojn pri vojaĝo de Newcastle (Anglujo) al Norvegujo kaj de Southampton per ŝipo "Canberra" revene al Aŭstralio. — G. Pollard.

MELBOURNE: S-ro H. Beechey, 19/6, klarigis la diferencon inter la logika (aŭ vertikala) pensado, dum kiu oni konstruas turon de pensoj, kun ĉiu firme bazita sur alia, kaj la transversa, kiu iom similas al haoso, kaj pri kiu li prezentis kelkajn ekzemplajn problemojn. Laŭ tiu tezo la transversa pensado estas la plej bona manifestiĝo pri inteligento, kiu ŝajne mankis inter la ĉeestantoj!

Je 26/6 ni aŭskultis sonbendon, faritan de Ann Hall (Sydney) pri la entombiga ceremonio de "Tajni" Goldsmith. S-ro M. Cohen, 3/7, prezentis 3 erojn. La unua temis pri ŝuista ilo ne plu multe konata, angle "Dog". En la dua li klarigis pri la egipta digo Assuan, pere de kiu kreiĝis la lagego Nasser kaj kiu alportis eble pli da malprofito ol profito. La tria aludis al la mult-aŭ dusingnifaj vortoj en diversaj lingvoj, sed de speciala intereso estas la vorto "koro", kun tiom da signifoj en la japana lingvo.

Je 10/7 S-ro H. Koppel prezentis plej lastajn novaĵojn el la tutmonda E-movado.

EASTERN SUBURBS (Melbourne): Kelkaj el niaj membroj nun estas supermare. Ges-roj W. Brockwell sendis interesan raporton pri vojaĝo al Anglujo kun priskribo de saviĝo de pasaĝero kiu falis en la maron. S-ino Bertha Smith, nia pres-oficisto, nun ferias kun filino en Japanujo, de kie ŝi interese raportis.

BORONIA: Por vigligi nian konversacian klason, 17/5, ĉiu ĉeestanto devis rakonti ŝercon. Tio fariĝis granda sukceso kaj provizis ridegigan vesperon. Je 24/5 George Kuhlman montris belegajn lum-bildojn pri sia vojaĝo al kaj tra Eŭropo.

Klasoj okazas ĉiumerkrede kaj bone progresas.

MORWELL: Nia prezidanto, S-ro Ivan Maddern, kun edzino kaj filino Philippa, flugos al Usono kaj reprezentos A.E.A. ĉe la Univ. Kongreso en Portland. Ni festis la 3-an naskiĝtagon de nia Societo per amuzvespero en la hejmo de Ges-roj Maddern.

Gratulojn al Joy Campbell kaj edzo pro naskiĝo de dua infano, filino Shahn Kathryn.

ROCKHAMPTON: Kurson por komen-cantoj ni ne plu havas. Ĉijare ĝi komenciĝis malforte kun nur 6 lernantoj, el kiuj kelkaj ne povis veni regule. Do, post kiam trifoje nur la instruisto venis sola, la kurso ĉesis funkcii. Tamen, daŭras la kurso je jaŭdo ĉe la "Adult Education", kun 4 ĝis 8 partoprenantoj. S-ro Neil Russell gvidas lunĉhoran klason por 4 ĝis 6 knabinoj ĉe la Rockhampton High School.

Nia bibliotekistino Joyce Turner restas for en Brisbano dum 6 monatoj por partopreni kurson por bibliotekistoj. Ŝi esperas fariĝi lerneja bibliotekistino. Ankaŭ nia kasistino Decia Niddrie ne povis esti kun ni dum kelkaj semajnoj. Ŝi aktorin en teatraĵo ĉe nia "Little Theatre".

ESPERANTO SEMINAR

In order that its members, as well as students currently studying the International Language at the Adult Education Centre, may have an opportunity to practice the language orally in a relaxed 'family' atmosphere, the Toowoomba Esperanto Society held, last week end, a seminar at the home of its librarian, Mrs. J. A. Lehane.

Interspersed with musical items, led by Miss Margaret O'Mara on her guitar, were readings from various Esperanto books and journals, presented by visitors, as well as short speeches and anecdotes. There was, as well, general conversation in Esperanto.

Several students from Mt. Lofty High School, brought by Mrs. L. Buchan, displayed an astonishing basic knowledge of the language, and charmed all present with their truly 'international' accent.

All participants expressed the wish that similar seminars will become a regular feature of the local movement.

(From "The Chronicle", Toowoomba, as reported by H. V. Petley, Press Officer).

Morwell Esperanto Conference

The Esperanto Federation of Victoria, in conjunction with the Morwell Esperanto Society, will hold a Weekend Conference at Morwell High School on the 6th, 7th and 8th of Oct., 1972. The pro-

gramme will include lectures, discussions, Social Evening Smorgasbord Luncheon, tour of the district, an Esperanto exhibition and a report by Mr. I. T. Maddern about the 57th Universal Esperanto Congress in Portland, U.S.A.

For further information contact the Conference secretary, Mrs. M. Wybenga, 30 Butters Street, Morwell 3840. (Please include a stamped, addressed envelope for reply). Interstate visitors will be specially welcome!

Esperanto en Lernejoj

La Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio klopodas pri la enkonduko de Esperanto instruado en altlernejojn en tiu ŝtato. Diskutado kun la Superintendanto de Lingvoj de la Eduka Fako (S-ro Fox) estas tre kuraĝiga.

Ekde la dua jaro liceaj studentoj rajtas elekti kelkajn laŭvolajn studtemojn. Dek lecionoj (po 40 minutoj) estas rezervataj tiucele en ĉiu semajno. Por tiuj kiuj elektas studi fremdajn lingvojn (francan, germanan, ktp.) kvar lecionoj ĉiusemajne dum kvar jaroj necesas. Tamen, estas taksate, ke du lecionoj ĉiusemajne dum du jaroj sufiĉos por E-o.

La nuna intenco estas instrui E-on en du-tri altlernejoj kiel provo. S-ro Fox pretas kunlabori pri tio kondiĉe, ke: (a) sufiĉe da studentoj elektos E-on; kaj (b) troviĝos sufiĉe da instruistoj.

Rilate al (a) ni pripensas eldonon de broŝuro, kiu klarigas la avantaĝojn de E-o, por distribuado inter la studentoj. (b) prezentas problemon. En 1970j. ok studentoj de la instruista kolegio (Secondary Teachers' College) studis E-on; en 1971j. estis naŭ. La plejparto da ili nun deĵoras ĉe lernejoj for de Perth. Ĉi tiun jaron dekok anoj de la instruista kolegio studas E-on. S-ro Fox estas skribonta al ili por demandi: ĉu ili konsentus instrui E-on? Verŝajne la ricevo de oficiala letero de la Eduka Fako kuraĝigos kaj instigos ilin koncentrigi la menson al la studado de E-o.

Sume, enkonduko de E-o en lernejojn dum 1973j. kredeble flaskus pro manko de instruistoj. Tiuokaze la Eduka Fako certe forviŝus la ideon por ĉiam — aŭ almenaŭ por pluraj jaroj. Do, ni "rapidu malrapide".

Ni celu al la jaro 1974 kaj certigu, ke ni nepre sukcesos.—W. H. Howard, sek., E.L.O.A., 26 junio.

DU NOVAJ LIBROJ.

INVIT' AL JAPANESKO — Miyamoto Masao; poezio, 110 paĝoj, broŝurita . . . \$2.20.

CIGANA ROMANCERO: Lorca; el-hispanigis F. de Diego. Poezio, 110 paĝoj,

broŝurita . . . \$2.20.

Ce nia Libro-servo.

BONVOLU RIDETI

Angla grafino procesis kontraŭ viro, kiu estis nominta ŝin "porkino". La juĝisto kondamnis lin. Tiam la viro demandis al li: "ĉu tio signifas, ke mi ne rajtas nomi grafinon porkino?" "Jes certe", respondis la juĝisto. Diris la viro "Nu do, ĉu mi rajtas nomi porkinon grafino?" "Komprebeble jes", konfirmis la juĝisto.

La viro sin turnis al la grafino, dirante: "Bonan tagon, grafino".

Ce memserva vendejo mi staris malantaŭ virino mezaĝa, kiu aranĝis sur la vendotablo vicon post vico da lad-kaĉoj porinfanaj. La spicisto estis tiel same mirfrapita kiel mi pri la strangeco de ŝia aĉetajo. Li bonhumore rimarkis: "Ĉu iu en via familio atendas naskon de ĝemeloj?" "Ho ne", ŝi klarigis, "mia edzo atendas falsan dentaron".

Policano arestis viron tial ĉar tiu pinĉis la postajon de juna virino. "Kial vi tiel agis?", demandis la polic-serĝento. La akuzito respondis: "Simple ĉar ĝi estis tie".

(Tio pensigas pri simila anekdoto pri la mont-heroo Hillary kaj la venko de Monto Everest — faro iom pli ambicia; "Mi devis ĝin ĝissupren grimpi, ĉar ĝi estas tiel" Sufiĉis nur la provoko.

Dentisto, kiu fervore kontraŭis atmosferan polucion, fiksis karton en sia atendejo: "Oksigeno nun uzata — nepre ne fumul" Sciante pri ekbruligemo de pura oksigeno, liaj pacientoj obeis la edikton.

Sciu, ke la "oksigeno uzata" estas nur tiu bone konata gaso, kiun la pacientoj en- kaj elspiras dum ili atendis.

Unu nokton Winston Churchill revenis hejmen tute ellacigita. Genis lin tio, ke ankoraŭ li devos interparoli kun vizitonto — viro tre teda, enuiga — el tia speco kiu venas en malĝusta tempo kaj ne volas foriri. La ŝtatviro do vokis sian ĉambriston kaj diris: "Johano, kiam venos Kavaliro B., informu lin, ke mi ne estas en la domo; kaj, por lin konvinki pri tio, fumu unu el miaj cigaroj, kiam vi malfermos la frontpordon".

R. K. — NENIA TABAKO!

En 1942j. Viro deziris aĉeti tabakon en la tempo de varmanko. Petinte la vendiston, li ricevis ĉi tiun demandon: "Ĉu vi estas R.K.?"

"Ne," li hezite informis.

"Do mi ne povas vendi al vi", diris la vendisto. La viro vizitadis laŭ la tuta strato, sed ĉiam la sama demando: "Ĉu vi estas R.K.?" Finfine lia pacienco elĉerpiĝis, kaj li rekte postulis al iu vendisto: "Kial vi ne vendas al mi simple pro tio, ke mi ne estas Romkatoliko?"

"Ho", klarigis la vendisto, "Ĉu vi ne scias, ke ĉe ni tabakistoj R. K. signifas Regula Kliento?"

—H. M. Cohen en La Rondo, Majo 1942.

FUMADO MALPERMESATA

Enirinte buson, dika vireto prenis lokon apud la veturigisto. Li ekbruligis cigaron kaj komencis legi gazeton. Ne turninte la kapon, la veturigisto diris al li: "La fumado estas ĉi tie malpermesata, sinjoro!"

La vireto ne respondis. Eble li ne aŭdis la averton? Li kontente fumadis kaj legadis. La veturigisto atendis kelke da momentoj antaŭ ol li reavertis per pli laŭta voĉo: "Mi ripetas, ke vi ne rajtas tie ĉi fumi."

Ankoraŭ neniu respondo. La vireto fumsputis kiel kamentubo kaj pli intense legadis la gazeton.

Koleriĝinte, la veturigisto sin turnis, por serĉi la konduktoron, kies devo estis pritrakti ofendajn pasaĝerojn, sed tiu estis jam fore ĉe la alia ekstremo de la buso. La veturigisto do atendis ĝis la venonta haltejo, tiam leviĝis de sia sidloko, paŝis al la pasaĝero, frapetis lin sur ŝultro, indikante plaketon. Li diris: "Pardonu, sed tie ĉi staras klare kaj precize: la fumado estas malpermesata."

Tiam la vireto prenis la cigaron el sia buŝo, metis fingron sur la lipojn, murmurante: "SS! Al la veturigisto ne estas permesate paroli kun pasaĝeroj!" —Lau Germanlingva en La Germana Esp. Revuo.

DE POST; EK DE

Amiko diris al mi: "De post morgaŭ mi ne plu fumos". Mi iom dubis pri lia heroeco. Do en la sekvanta tago mi lin vizitis ĉe lia domo. Venis al mi aromo de bona cigaro. "Ha, vi al mi mensogis!" mi diris. Sed mi ja eraris. Mia amiko ne estas mensogulo, sed bona gramatikisto. Mi ekhaltis, ekpensis kaj kore ridis. Kial?

Car, sciu vi, ke "de post" signifas laŭvorte: "from after". "De post januaro mi ricevos pli altan salajron" ne signifas, ke "de la unua de januaro mi . . .", sed "de la unua de februaro . . ." De post 1951 signifas: de 1952 pluen — "after 1951"

Se la fumanto dirus: "Mi ne fumos (ek) de morgaŭ", lia tabakfesto ja komenciĝus ĝuste en la sekvanta tago. (Ek) de nun —from now on; de tiam—from then; de 1951—from 1951.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Oficiala Informilo

NOVAJ MEMBROJ:

Howard, S-ro E. G., Clayton, Vic.
Cachia, S-ro S., Guildford, N.S.W.

PLUJAJ DONACOJ al la T.G.M.F.:

Cardale, F-ino F., Balgowlah, N.S.W.	2.00
Chandler, S-ro. E. W., Crows Nest N.S.W.	20.00
Denney, S-ino F., Gladstone, Qld.	2.00
Goldsmith, S-ino L. Manly, N.S.W.	5.00
Grant, S-ino H., Unley, S.A.	2.00
Lees, F-ino M., Belfield, N.S.W.	5.00
Robertson, Prof. R. G., Northbridge N.S.W.	25.00
Thompson, S-ro E. E., St. Kilda, Vic.	2.00
Esp-Fed, de Kvinslando, Clontarf. Qld.	5.00

A.E.A. Examinations

Advanced (Supera): Mr. V. J. Timmins,
Waitara, N.S.W. (honors); Mrs. Kay
Morrison, Manly, N.S.W.

The Zamenhof-Festo of all 4 Melbourne Esperanto Groups will be held on Saturday, 9th Dec. 1972 at the Y.W.C.A., 56 Russell Street, Melbourne, at 7.45 p.m. The Morwell Esperanto Societo will send a delegation.

JARKOLEKTOJ paĝo 222.

En la junia nro ni petis pri informoj. Ankoraŭ ne venis eĉ unu. Sekve ni konkludas, ke la eldon-laboro de 52 jaroj postlasis neniam da daŭra valoro, en senco de kompletaj jarkolektoj. Al bibliografoj mankas kaj ĉiam mankos la stud-materialo pri la vivo de Esperanto en Aŭstralio jam de 1920j., se ne paroli pri la antaŭtiuĵara tempo, kiam ne ekzistis efektiva E-gazeto. Ankoraŭ nun oni povas rimarki iom vastan indiferecon, rifuzon akcepti principon, ke la gazeto estas en si mem konservinde valora.

Spi'tal tiu dolora konstato, kaj pro simpla devosento, la administracio daŭrigos provizi presitan paperon por rubfornoj aŭ egale mizeraj fin-lokoj. Verŝajne la sorto de aliaj E-gazetoj malkuragiĝe similas al tiu de nia organeto; tamen iliaj gvidantoj, kiel ankaŭ ni, persistas produkti efemeran eldonajon. Komuna prudento, simpla saĝo, de legantoj forigus tiun epiteton — efemera — se ili kultivus pli larĝan perspektivon, pli sanan senton pri valoroj, kiuj rilatas al la historia kontinueco de la Esperantomovado en ĉi tiu lando.

Dume, komencu konservi nian organon. Nur futon da bret-spaco okupus dudek jarkolektoj.—Red.

NOTINDAĴOJ PRI ZAMENHOF

Lia koncepto pri la liberpenseco: skribante pri "liberpensulaj komunumoj", li sin esprimis jene: "Nomante sin liberpensaj, ili tamen malliberigas siajn anojn, kiel la aliaj religioj, ĉar ili ligas sin nepre kun ateismo, dum efektive ili devus lasi al ĉiuj siaj anoj plenan liberecon kredition, diktas al ili la prudento". — Leteroj de Zamenhof, vol. 2, paĝo 326.

Lia grandanimeco pri la demando internacilingva: "La demando pri tio, kia estos la formo de tiu lingvo, estas por mi afero negrava, se nur la lingvo estos **neŭtrala, uzebla kaj vivipova**". — Leteroj de Z., vol. 1, p. 321.

Lia atesto pri lia propra lingvoscio: "Plej multe mi amis la rusan lingvon . . . Mi kun plezuro lernadis ankaŭ aliajn lingvojn, sed ili interesadis min ĉiam pli **teorie** ol praktike; kaj ĉar mi neniam havis la eblecon ekzercigadi en ili, kaj ĉar mi ĉiam legadis nur per la okuloj, sed ne per la buŝo, tial mi libere **parolas** nur en tri lingvoj (ruse, pole kaj germane); la lingvon francan mi legas libere sed parolas ĝin **tre malmulte kaj malbone**; krom tio mi en diversaj tempoj lernis iom ĉirkaŭ ok aliajn lingvojn, kiujn mi konas tamen nur tre malmulte kaj nur teorie". — Leteroj de Z., vol. I, p. III.

Pri la Angla: "La anglan lingvon mi posedas tre malbone kaj tial mi ne kuraĝas fari publikajn tradukojn el tiu ĉi lingvo, pro timo, ke mi eble faros eraron. Libere traduki mi povas nur el la lingvoj rusa, pola, germana kaj franca. El lingvo angla mi povas traduki nur en tia okazo, se mi havas antaŭ mi la tekston de la tradukota artikolo ankaŭ en alia lingvo, por ke mi povu kompari kaj gardi min de eraroj". El letero sub gardo de F. Azorin, Meksikio.

Laŭ Privat (N. American E-Review, nov.-dec. 1959): "Zamenhof ne parolis la anglan lingvon kaj certe ne sciis anglan fonetikon".

En la letero al Borovko Z. skribis: ". . . estante en la kvina klaso de la gimnazio, mi komencis ellernadi la lingvon anglan". Ĉu private, per si mem, aŭ kun instruisto? En la fina raporto en 1879, kiam li finis sian gimnazian vivon, mankas mencio pri la angla. Vidu: "Zamenhof", Boulton, p. 32.

En letero en la jaro 1906: "Mia gepatra lingvo estas la rusa; sed nun mi parolas pli pole, kaj mi min nomas ne 'ruso' sed 'Rusujano'". — Originala Verkaro, p. 523. Komparu: "Mi estas nur hebrea homarano, liberkreda . . ." — "Vivo de Zamenhof" (Privat), p. 201.

Zamenhof legis siajn paroladojn. Pri la Buljona Kongreso: "Tenante la paperon, Zamenhof ektemis pli videble ĉe la manoj. Ĉu li povos eldiri finon?" — Privat: "Vivo de Zamenhof", ĉ. 6.

"The paper trembled in his hands. Overwhelming emotion seized him. Would he be able to read any more?" — English translation by Ralph Elliott Esperanto Press, Canada.

La voĉo de Zamenhof: Plurfoje, en 1902-4, E-istoj uzis fonografon por aŭdi la voĉon de siaj oratoroj, kaj precipe la voĉon de Z. mem. En 1909 ĉe la U.K. en Barcelono oni gravurigis lian voĉon. Sed la plej perfekta voĉregistrado okazis en Parizo, aŭguston, 1911.

Preskaŭ ĉiuj estas jam perditaj; sed de unu malnova cilindro oni faris diskon. Per tiu disko oni faris sonbendon. Unu sonbendo estis sendita al Aŭstralio, kie oni ĝin aŭdigis en jan. 1958, okaze de la Esperanto-kongreso en Melburno. — Plena teksto estas en la revuo "Esperanto", 5/1959..

PRI DU "EPOKOJ" ESPERANTAJ

En "Germana E-Revuo" Ludwig Pickel opinias, ke "Esperanto havis siajn kulminajn punktojn antaŭ la unua mondmilito, aŭ dum la 20-aj jaroj inter ambaŭ militoj, kiam estis speciale profesiaj eldonejoj kaj instancoj, kiuj prizorgis eldonadon de lernolibroj, literaturo, varbmateriale kaj revuoj. Ni nur pensu pri Hachette (Parizo), Hirt & Sohn (Liepzig). Apude estis propraj E-eldonejoj kiel Moller kaj Borel, Ellersiek kaj Heroldo de Esperanto". Li povus aldoni ankaŭ Rudolf Mosse (Berlino) kaj J. Muusses (Purmurend, Nederlando).

Evidente pro nesufiĉa disvendo de la E-eldonaĵoj, tiuj firmoj jam de longe ĉesis labori en nia kampo. Sajne, en la atmosfero de la evoluanta socio ekonomia, teknika, spirita, la legemado ĝenerale velkiĝis jam ĝis grado, ke en la nuna tempo la brava Juan Regulo pensis saĝe limigi eldonon de siaj valoraj libroj, kiel ekzemple: Eseoj de Waringhien (1956): 1000; Floroj de l'Malbono (1957): 1000; Esperanta Antologio (1958): 2600; Lingvo kaj Vivo (Waringhien) 1959: 2100 — por citi nur kvar. Ili restas post jaroj ankoraŭ haveblaj en sia unua eldono. Antaŭ pluraj jaroj aperis: Kantoj kaj Romancoj de Heine — en 1000 ekzempleroj!

Ĝis kiam niaj E-eldonistoj devas atendi pli kuraĝigan subtenon — pli sanan sintenon — fare de homoj, kiujn ili tiel sinofere servadas?

RUGOBUŜA KNABINETO (Heine)

Laŭ la teksto en "Kondukanto" (1904,
2-a edono) de la tradukinto, Grabowski:

Ruĝobuŝa knabineto
Kun la dolĉa okulpar',
Mi pri vi, ho knabineto,
Ĉiam pensas, mia kar',

Longa vintra la vespero,
Kaj mi volus en solet'
Kun vi ridi, kun vi sidi
En trankvila kameret'.

Volus premi al la buŝo
Vian etan blankan man',
Verŝi larmojn de kortuŝo
Vian etan blankan man'.

Notu eraran elizion de la akuzative en
la lasta strofo.

Jen le teksto en Muusses E-Biblioetko
N-ro 5 (1937). Kiu reviziis la
originalan de Grabowski?

Ruĝobuŝa knabineto
Kun la dolĉa klar-okul'
Nur pri vi, ho knabineto,
Ĉiam pensas mi solul'.

Longa vintre la vespero,
Do mi volus, knabinet',
Kun vi ridi, kun vi sidi
En trankvila kameret'.

Volus premi buŝon mian
Al la eta blanka man',
Plori larmon emocian
Sur vin, eta blanka man'!

La aŭtoro de tiu kajero N-ro 5 estis
Julius Glueck, kiun, laŭ informo de A.
Cseh en "Esperanto", julio 1945, "en-
glutis la germana buĉmaŝino". Glueck
"ofte havis okazon esti kun Grabowski
(mortis 1921)". Ili amis diskuti pri la
poezio, tial povas esti, ke en tiu tempo
Grabowski konsentis kun Glueck pri
eventuala revizio de tiu aŭ alia de siaj
poemtradukoj. Kiel ajn estu, certe estas,
ke Glueck senkomente prezentis la supran
tekston kiel aŭtentan de Grabowski.

MALFACILA LINGVO?

Rusaj lingvistoj asertas, ke la Samo-
jeda lingvo estas la plej malfacila kaj
la plej komplikita en la mondo. Gis
hodiaŭ oni ne povis kompili gramatikon
de ĝi, tial ĉar ĉiu verbo havas sian pro-
pran konjugacion! (La Rondo, Sept.
1944.)

"How long is that short piece of
string?" Ci traduki per "Kiom da long-
(ec)o havas tiu mallonga (kurta?) peco
da ŝnuro? Komparu en P.V.: "granda
(= longa) rivero".

LA SUBKONSCIO

Psik-analiza studo pri Zamenhof
povus doni riĉan rikolton pri la sub-
konscia flanko de lia laboro. Jen du
ekzemploj:

Enigmo por la juna Z. estis la nomo de
la urbo Bjalistok (aŭ, Bielostok). Biely
—blanka; kaj Stok — ĉu bastono? Kial
nia urbo estas nomata "blanka bastono"?

Poste, obeante sian instinkton, Zamen-
hof, por doni ekzemplon de la nelogikeco
de naciaj lingvoj, reproduktas la enigmon
de sia infanaĝo:

Ich weiss nicht wo ich meinen Stock
gelassen habe. Por Germano tio sencas:
Mi ne scias, kie mi lasis mian bastonon.

Tiu ekzemplo en la Unua Libro celas
pruvi, ke E-o estas deĉifrebla per la
radikaro por ĉiu, eĉ se li ne scias la
lingvon, dum la sama deĉifrado en nacia
lingvo kondukas al sensencaĵo:

Mi blanka ne kie mi pensi bastono (aŭ,
etaĝo) kvietia, havo.

Subkonscie "Bielostok" reproduktiĝis
en tiu ekzemplo.

La infanjaroj kaj studenta tempo de Z.
estis tre doloraj, turmentaj. Tiuj fortaj
sentoj devis iel influi al la karaktero de
la krea lingvo, kaj efektive ilia eho
sonas unuavice en la fonetiko. Oftaj
diftongoj (oj, aj, ej, uj, aŭ, eŭ) tion
karakterizaj por E-o, estas tipaj ankaŭ
por lia patrinlingvo. En la Slava kaj
la Helena tiuj diftongoj simbolas doloron,
suferon, melankolion. La interna ideo de
Z. estas de intime ligita kun la son-
sistemo de lia hejma lingvo. — Laŭ P.
Stojan — "Esperanto", Feb. 15, 1937.

FAMILIO ZAMENHOF

Laŭ familia tradicio, la Zamenhof'oj
devenis el Hispanujo. Ekzilitaj de la
katolikaj regantoj Isabela kaj Ferdinand
en 1462, ili, kune kun la Hebrea gento,
lasis for la landon. Vaginte tra Eŭropo,
la familio atingis Bavaran vilaĝon Sam-
hof. Ili perdis la Hispanan nomon kaj
akceptis kiel alnomon "la Samhof", kiu
fariĝis Samenhof pro pli facila prononco.
Fine, pro influo Slava—Zamenhof—ĉar
ilia migrado finiĝis en Bjalistok, subbaltik-
regiona. Tie naskiĝis Ludoviko, al kiu
oni instruis multajn lingvojn, sed ne la
Hispanan, ĉar ili ne forgesis la ekzilon.

Tamen, kiam Ludoviko elpensis Esperan-
ton, la genio de la Hispana lingvo
elstaris en lia subkonscio: Esperanto
havas nur kvin vokalojn, kiel la His-
pana; finas la verbojn per -i, simile al -ir
(Hispana); finas la adjektivojn per -a,
kiel la plej multaj adjektivoj Hispanaj, kaj
la substantivoj per -o, kiel 2500 sub-
stantivoj Hispanaj. (Laŭ F. Azorin en
H. de E.)

BELA? BELETA?

(Her face) "was between pretty and beautiful", skribis Hardy en sia romano "The Return of the Native".

Kiel traduki la vortojn "beautiful woman" kaj "pretty woman"?

Oni povus konsideri, ke la koncepto "bela virino" bildigas antaŭ la mensaj okuloj figuron de kombinitaj majesteco, gracieco, kaj ia strange imponanta supereco, kio mankas al "beleta" knabino aŭ virino. Ci tiun cetere ofte karakterizas petolemo, koketeco, kiuj ne facile kongruas kun la marmoreca perfekto de la unua tipo.

Butler en sia Vortaro trafe difinas per: beautiful, charming, fair, handsome, lovely, noble: BELA.

Agreeable, comely, nice, pretty: BELETA. (Ankau "attractive" estas vaste uzata en tiu senco).

La Plena Vortaro: Beleta: iom bela; **pli plaĉa ol konforma al la reguloj de beleco.** Bona difino, sed ankoraŭ ni disponas nur la formon "beleta", per kiu ni devas traduki la riĉon da nacilingvaj sinonimoj au aspektoj pri-personaj. En Nederlanda poŝvortaro "beleta" sola servas por vesti ses nuanc-vortojn!

Konsiderindaj estas: pupe-ĉarma, plaĉa-spekta, okulplaĉa, okulloga, aminda, ĉarmeta, dolĉpersona, plaĉvizaĝa, plaĉfigura . . .

La glosaro de "Parnasa Gvidlibro" ne helpas solvi la problemon, sed eventuale iu poeto ekuzos neologismon "minjona" (Fr. mignon)—trovatan en Wuester, kaj Wingen (vortaroj).

BJEL- aŭ BJALOSTOKO?

Troviĝas en la literaturo ambaŭ formoj. Bjelostoko estas laŭ la Rusa; Bjalostoko, la Pola. Maimon en Nica Lit. Revuo, N-ro 41: "Zamenhof mem uzis la formon Bjelostoko, ĉar li estis edukita en rusa kulturo. Poloj ĉiam diradis: Bjalostoko . . . ĝi apartenas al sendispute pola etnologia teritorio, kaj tial estas bone uzi la formon pli proksiman al la pola".

Holzhaus tamen rigardas erara la formon Bialystok sur la Germanlingva memorplato al Z. en Vieno. Tiutempe (1859, jaro de la naskiĝo de Z.) la urbo estis Rusa teritorio, kaj Holzhaus korektis ĝin per Bjelostok. "Mi naskiĝis en Bjelostoko . . ." (Letero de Z. al Borovko: Originala Verkaro 417. (Ruslingva originalo, tradukita de V.G(ernet)?).

Zakrzewski, Privat, Waringhien uzis la formon kun "a", kaj tio ŝajnas preferinda. La urbo estas en nuna Polujo.

Per kio diferencas talentulo de geniulo? Talentulo ricevas salajron ĉiusemajne.

PRI TRADUKADO

Oni povas precize traduki verkojn de la scienco, ankaŭ de la historio, kondiĉe ke ĉi tiu ne estas ornamita per oratorajo, kiu estas poezieca. La poezion efektive oni ne povas traduki; tial, ĝuste la poetoj konservas lingvojn — oni ne klopodus lerni fremdan lingvon, se oni povus havi en tute kontentigaj tradukoj ĉion verkitan en ĝi. — Samuel Johnson (1776).

Estas eble traduki verkojn, kiuj donas nur informon, faktojn. Ekfariĝas nebla la tradukado, kiam aŭtoro donas al vortoj signifon super, aŭ ekster, ilia intelekta sencenhavo. Alivorte, kiam lia verko ekfariĝas artprodukto. Provo traduki poemon atingas la ekstremon de l'absurdo. Verdire, la ideojn de poemo oni povas redoni en alian lingvon, ankaŭ la ecojn poeziajn oni povas revesti laŭ la plej ĝustaj ekvivalentoj. Foje traduko eĉ povas superi la originalon, sed en tiuj okazoj ĝi estas poemo de la tradukinto, ne de la poeto.—Wm. Bowyer, "Brought out in Evidence".

Tiuj asertoj estas debatindaj. Kion vi opinias pri ili?

Boksisto ĉe tablo en Novjorka restoracio mendis omaron, Rigardante ĝin, li rimarkis, al ĝi unu el la du pinĉiloj. Li plendis al la kelnero, kiu diris: "Ĝi batalis kontraŭ alia omaro kaj tiel perdis la pinĉilon". "Ĉu vere", respondis la boksisto: "Do forportu ĝin kaj alportu al mi la venkinton!"

Funda scienca esploro elmontris, ke virino foriras ĝuste tridek sep minutojn post kiam ŝi diras: "Estas jam tempo; mi devas foriri".

En juĝejo juná virino akuzis viron pri tio, ke li faris al ŝi maldecan proponon. Por ŝpari al ŝi embarason, la juĝisto permesis al ŝi skribi anstataŭ elvoĉi la vortojn de la propono. Kiam la juĝisto, persekutisto kaj defend-advokato jam legis ĝin, oni transdonis ĝin al la jurianoj, por ke ankaŭ ili legu ĝin.

Beleta jurianino siavice provis ĝin pasigi al sia apudulo, sed trovis lin dormetanta. Si vekis lin per kubut-puŝo kaj enmanigis al li la folion. Li legis la vortojn, ridete kapjesis kaj ŝovis la folion en sian poŝon.

La unua afero, kiun mi povas fari pli bone ol kiu ajn alia homo: nome, legi mian propran manskribajon.

La ununura mensogo, kiun mi skribis sur mia impostdeklaro: "Mi estas la ĉefdomano".

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 110 (190)

MELBURNO

Septembro, 1972

LA ĜOJO POSEDI VELBOATON

Jen estas la vera rakonto, kiamaniere sentima homo — mi, Johano Bonhomo — aĉetis brokantan velboaton kaj kuraĝe eliris por batali kun tiu pratempa malamiko de la homo, la maro. Se vi posedas velboaton aŭ esperas posedi, vi povus profiti per ĉi tiu rakonto pri miaj spertoj.

Antaŭ ol komenci, mi klarigu unu terminon. Kiam mi parolas pri la maro, mi aludas tiun malgrandan angulon de nia golfeto, kies batalemeco estas jam mildigita far la multaj infanoj, kiuj tie trafikadas. Tamen, ne atentu tion; nur memoru fari nenion, kion mi faris.

Aŭskultu al mi, kaj vi tiel lernos tiom multe, kiom vi lernus en dujara krozado en balenŝipo.

Kial posedi boaton, ĉiaokaze?

Multfoje, sidante sur la ferdeko de mia velboato kun ĝia kilo firme fiksitaj en la sablo sube, mi prezentis al mi ĝuste tiun saman demandon. Eble estas libroj, kiuj igas vin deziri posedi boaton. Tiuj libroj, kiuj pleniĝas de altaj etendiĝoj de veloj, de la tradoj, kaj de brile puraj ferdekoj. Mi deziris ĉion tion. Mi deziris ankaŭ tiun unikan senton harmoniigi kun la propra ŝipo, esti kreitaĵo de la vento kaj ondo, ankaŭ egale unikan senton, nemenciitan en la libroj, veturi sen pagi veturprezon aŭ aĉeti benzinon.

Eble vi akiras tion, kion mi deziris. Eble vi sukcesos, kie mi malsukcesis. Jam kostis al mi po dolaro por mejlo. Tio sinkos post iom da tempo, sed eble ankaŭ la boato.

Ni supozu, ke vi aĉetis malgrandan boaton, kiel mi faris. Ĝi estas dekkvin

futojn longa, aŭ proksimume tia. Tamen tio tute ne gravas. Ĝi havas karenon, maston, velon, kaj rudron. Ĝi diferencas de la grandegaj velŝipoj nur laŭ grandeco. Ĝi povas kaŭzi al vi egale tiom da ĝeno.

Nu, vi devas unue trovi ankrejon. Ĉiuj la aliaj velboatoj estas nete ligitaj al flosantaj buoj, ĉe kiuj ili spasme tiregas kaj ĝeme riproĉas ĉe ĉiu ekblovo de la vento.

Do vi aĉetis vian buon, kaj tuj vi ektrovas, ke vi bezonas pli ol buon. Sub la akvo estas ankro, kiu estas efektive la plej grava parto de la afero. La buo servas nur kiel markilo por tiu ankro. Do vi aĉetas agarikforman ankron, kiun vi devas ligi al la buo.

Do vi ŝarĝas la remboaton per ankro, buo, kaj ŝnuro, kaj remas al la ankrejo, kie, kun kontenta rideto vi rigardas sinki tiun ankron al la kota fundo. Nur unu malgrandan aferon vi forgesis. Vi ne ligis la alian finon de la ŝnuro al la buo. Do vi pasigas la reston de la tago naĝe serĉantan tiun ankron, sed la akvo estas tro kota, kaj vi nenion povas vidi, do iras hejmen por aĉeti pluan ankron.

Fine la ankrejo estas preta, sed viaj zorgoj ne finiĝis, ĉar dufoje vi devos ŝanĝi tiun ankrejon. La unuan fojon, ĉar vi metis la ankron tro proksime al la marbordo, do kiam la tajdo estas malflusinta, la boato jam ne estas en la maro, sed sur la seka sablo; la duan fojon, kiam vi ektrivos vian boaton kun ĝia nazo en la akvo kaj ĝia postajo senhonte espozita, kiel anaso serĉanta mangajon. Tio okazis, ĉar la akvo estas nun dekse futojn profunda, kaj

vi provizis nur dekdu futojn da ŝnuro.

Sed finfine ĉio estas en ordo, kaj vi remas al la ankrejo prepare al via unua vojaĝo. Kiel belege estos gliti tra la surfaco de la akvo, kuŝante en la malantaŭo kaj tenante la velŝnuron per unu mano kaj la rudrostangon per la alia. Preskaŭ atinginte la ankrejon, vi rimarkas vian boaton sidantan malalte en la akvo, kvazaŭ ĝi estus preta salti el la maro, sed kiam vi atingas la boaton, vi ektrovas, ke la boato sidas malalte pro tute alia kaŭzo. Pluvis dum la nokto, kaj la boato nun enhavas ok colojn da akvo.

Vi rapide lernos la arton elĉerpi akvon, do, kun via permeso, mi ne klarigos tion, ĉar ĝi estas tasko, kiun mi tute ne ŝatas. Post plua horo la akvo estas jam elĉerpita, kaj vi estas preta veliri.

Unue vi devas hisi la velojn. Vi alprenas la hisilon kaj forte hisas, sed nenio okazas! Kial? Ĉar la alia fino de la ŝnuro estas firme ligita al la masto. Vi liberigas la alian finon kaj denove hisas. Majeste la velo supreniras. La bumo svingiĝas al vi, kaŭzante, ke vi malantaŭen paŝu. Subite vi trovas vin spasme spireganta pro la diable malvarma akvo en kiu vi nun troviĝas. Oni devas ĉiam rigardi, antaŭ ol paŝi sur boato.

Bone! Nun vi estas denove seka, kaj vi sidigas en la boaton. Vi firme alprenas la rudrostangon. Vi tiras ĝin al vi. Nenio okazas. Vi puŝas ĝin for. Ankoraŭ nenio okazas. Kial? Estas nur malgranda afero. Vi forgesis malligi la boaton de la buo.

Do vi malligas ĝin, kaj la boato krabe glitas flanken, kaj preskaŭ kolizias kun alia boato ankrita inter vi kaj la marbordo. Vi rapide turniĝas kaj etendas unu kruron por forpuŝi la alian boaton. Via genuo subite levigas kaj forte frapas vin sur la mentono. Preskaŭ vi estas denove en la akvo. La du boatoj grincas unu al la alia, kaj homo eliras el domo sur la marbordo kaj krie demandas, kion vi, en la nomo de hadeso, opinias fari ĉe lia boato. Senresponde vi malhisas la velon kaj silente remas la boaton el la golfo.

Denove hisinte la velon, vi nun rapide veliras kun granda spaco da akvo antaŭ vi. Bonege! Vi povas iri kien ajn vi deziras. Vi movas la rudrostangon, tiel lofante la velojn kaj ĝirante la boaton, ke la bumo denove svingiĝas, apenaŭ maltrafante vian kapon.

Nun vi povas iom eksperimenti. Vi penas ĝiri. Tio signifas, ke por iri laŭ unu direkto, vi stiras laŭ la alia. Laŭ la reguloj de la maro, la plej

mallonga distanco inter du punktoj estas la litero "Z". Ĉi tion komprenas nur tre spertaj maristoj.

Vi nun povas ek trovi, ke vi povas vidi nur ĉe tiu flanko de la boato, kie la velo ne estas. Oceana vaporŝipo povus esti sur tiu blinda flanko, kaj vi ne vidus ĝin. Vi devas kaŭri kaj rigardi sub la bumo, tiel. Ho, ve! Guste nun grandega oceana vaporŝipo celas al vi. Bonege estas, ke vi vidis ĝin ĝustatempe.

Bedaŭrinde estas, ke vi perdis tiel multe da tempo ĉe la komenco. Nun vi devas reveni hejmen. Jam estas iom malfrue. Vi estas la sola velboato. Ho, kio okazis al la vento? Ĝi tute malaperis. La veloj senvente kolapsis. Tio ofte okazas malfrue en la posttagmezo, kiam vi estas proksimume tri mejlojn for de la ankrejo, kaj ĉiuj motorboatoj estas malaperintaj. Ne penu remi la boaton, ĉar la tajdo nun malflugas, kaj vi ne povus remi kontraŭ tiel forta fluo. Nenion vi povas fari, krom kuŝi en la boato kaj pensadi.

Estat multaj aferoj, pri kiuj vi povas pensi. Unue, ke nun mallumiĝas kaj la tajdo portas vin al la libera oceano; due, ke la boato ŝajne ne estas akve hermetika, ĉar la akvo en la fundo konstante plimultiĝas.; trie, ke lastan semajnon homo penis vendi al vi motoron. Eĉ pli bone vi povus pensi pri tio, kion vi kutimis fari, antaŭ ol vi posedis velboaton. Kiel sklave vi dependis de golfludo kaj tiaj aferoj. Vi povus pensi pri la mono, kiun vi nun elspezas por la boato, kaj kiun vi antaŭe forjetis por tiaj aferoj, kiaj manĝaĵoj, vestaĵoj, kaj loĝado.

La suno subiras kaj la aero malvarmiĝas. Tiam mirinda afero okazas! La luno levigas, la vento ekblovos, la ondoj kreskas, la veloj ŝveliĝas, kaj la boato kuregas. Ĉiuj viaj zorgoj estas forgesitaj. Vi estas tute malsekigita, sed, kun la veloj etenditaj kiel aglaj flugiloj, vi sentas, ke vi deziras iri antaŭen por ĉiam.

Estas bone, ke vi sentas tion, ĉar la rudro pro ia difekto tiel fiksiĝis, ke vi ne povas movi ĝin, kaj la boato celas al la libera malluma maro. Bona vojaĝon, leganto. Bonan vojaĝon — El la angla tradukis Ken G. Linton.

FINNLANDO

Petu ĉe Finnlanda Turisma Asocio, Eksterlanda Fako, Helsinki, la belegan prospekton de tiu lando, tute en Esperanto, kun granda tre detala mapo kaj riĉkoloraj vidaĵoj.

Simila pri Vieno ĉe Turisma Oficejo, Stadiongasse 6-8, A-1016, Vieno.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Kelkaj Liganoj vizitis la hejmon de Ges-roj C. Dean (7/6), kiuj loĝas en Fremantle. Tio estis laŭ plano, ke tiuj anoj, kiuj trovas la ĉeston al la kutimaj kunvenoj iom malfacila, ricevos viziton de Liganoj. Spite de malvarmega vespero dekludo da personoj ĉeestis, 28/6, en Suda Petro. S-ino Pollard gvidis ekzercadon, kiu postulis viglan aŭskultadon kaj observemajn okulojn. Kiel kutime, ankaŭ la prezidanto klopodis, per viglaj demandoj, malligi la langojn de la ĉestantoj.

Nia publicisto, S-ino I. Einihoviĉi, multe laboras pri la enkonduko de E-o en lernejojn, uzante ĉian oportunon por gajni intervjuojn kun la Eduka estraro. Tio grande helpas al nia prez-o kaj sek-io, kiuj samcele laboras.—G. Pollard.

MELBOURNE: Tre sukcesa vespero laŭ kunlaboro kaj enhavo okazis 17/7. La programo konsistis el aro da informaj kaj amuzaj kontribuoj, kiujn ĉiu ĉeestanto kontribuis laŭvice. A. Baldwin, 24/7, rakontis spertojn, kiuj sekvis interesigon pri paragrafo en multe reklamita libro "Chariots of the Gods". La temo: "Lingvo de la estonteco", kiu incitis al esploro, telefone kaj koresponde, kaj kondukis al usona konsulejo kaj usona firmao kaj fine al Melburna Biblioteko, kie nur observate en aparta salono li povis tralegi celitan pritakton, kiun li rajtis fotokopii.

Helpe de plujaj belaj diapozitivaj K. Linton daŭrigis, 31/7, sian informriĉan rakonton pri travivaĵoj en Hindujo, montrante scenojn viditajn dum ekskurso "De Delhi al Lucknow".

MORWELL: Ges-roj Schepers kaj W. Wybenga gvidis la julian societvesperon. S-ro Wybenga instigis la ĉeestantojn al vigla konversacio, dum Ges-roj Schepers legis anekdotojn kaj rakontetojn. — M. Wybenga.

SYDNEY: 29/5: Frank Dunn parolis pri "Kalocsay, Tiu Giganto". Li opinias, ke la poem-tradukoj de Kalocsay estas teknike perfektaj, sed ke liaj originalaj propraj poemoj eble estas eĉ pli bonaj.

5/6: David Gould prezentis per bildoj la duan parton de sia longa vojaĝo aŭtobuse tra Irano kaj Irako. Poste en la Sankta Lando li flotis sur la Morta Maro, samtempe legante libron. Li opinias la Moskeon de Abraham la plej bela konstruaĵo de li vidita. Tiam li vojaĝis tra Turkio, kaj fine la buso transiris Eŭropon.

19/6: Membroj parolis pri "la plej granda ŝoko en mia vivo" kaj poste:

"Mia plej frua memoro". Unu eĉ memoris okazon kiam la patrino forpuŝis lian infanĉaron — kun li en ĝi — kuris kaj rekaptis — forpuŝis kaj denove rekaptis ree kaj ree. La patrino tion konfirmis.

22/6: Ni ĝojis revidi la nelacigeblan Fritz Mueller-Sorau ĉe la Klubo. Eĉ kiam li estis en hospitalo li ricevis permeson paroli pri E-o kaj li havis bonan kunvenon. Wre Chandler informis nin pri intervjuo, kiun li havis kun ŝtonepokaj indiĝenoj kaj montris ŝtonan hakilon k.t.p. kiel atestajon. Instrua, ankaŭ amuza fantazio.

3/7: La membroj konsideris "Planon de Aktiveco" por progresigi la E-movadon. Preparis ĝin Shirley Fanos. Ĉeestis la kunvenon anoj de la Federacio. La Plano enhavas bonajn ideojn. Ni penos aranĝi paroladojn al Rotary, Lions kaj similaj kluboj, trovi taŭgajn gazetojn por reklami, kaj doni informojn pri E-o en "House Journals" (kompaniaj pripersonaj gazetoj) k.a. La grava neceso estigi E-instruistojn estis diskutita. Iuj jam akceptis esti instruistoj, do kun la jam havitaj, la problemoj estas iomete solvita. Ni plu diskutos la Planon venontkunvene.

Prof. R. Robertson, diskutante la demandon: "Ĉu ni bezonas universitatojn?" rimarkis ke la populara ideo pri studento — nome, longhara protestemulo — ne estas prava. Nur 7% de elekteblaj studentoj povas eniri universitaton kaj eble 3% ricevas diplomojn. Do, studento devas esti tre studema, labori tage kaj vespere kaj dum ferio taski por monon ricevi. Robbie menciis ankaŭ la novan "Universitaton de la Aero" en Britujo.

17/7: La Akordiona Societo de Aŭstralio, kiu luas la "Esperanto-Domon" por siaj kunvenoj, regalas nin per muziko kaj filmoj. Alestis pli ol 40 personoj.

24/7: Frank Dunn parolis pri "La Arto Pensi". Li morde kritikis la vivisekcion kaj la ofte eraran uzon de statistiko. Sed li ne informis nin pri pli sukcesa maniero.

31/7: Membroj legis teatraĵojn de Marjorie Boulton: el "Ni Aktoras". Ĉiuj partoprenis.

7/8: La klasoj ĉe Central Methodist Mission dauros. George Thatcher instruos komencantojn; Fritz Mueller-Sorau, progresintojn. Shirley Fanos diris, ke laborgrupoj kunvenos ĉe ŝia domo por helpi al produkto de "Telopeo", la gazeto de al Federacio de NSK. Wre Chandler legis leteron de Lily Goldsmith pri ŝia vizito al la parencon de "Tiny". La letero aperos

en "Telopeo". Ni deziris bonvojaĝon al Giuseppe La Roca, kiu revenos al Italujo.

BRISBANE: Grava estis la komenco de 3 elementaj klasoj je la 5-a de Julio. La nombro estas entute 23. Plejparte ili estas gejunuloj. La instruistoj estas J. Kennedy, V. Robinson, A. Deutscher kaj T. O'Grady. La kosto de la kurso estas dek dolaroj por proks. 22 lecionoj.

La klubo kunvenas lunde por la altgradaj kaj spertaj E-istoj. S-ino Win Greenhalgh gvidas la aktivecojn kaj lerte verkas skizojn kaj teatraĵetojn. Win donas sian helpon al grava kaj interesa flanko de Esperanto, nome la kulturo kaj amuzoj. Sep geesperantistoj pasigis la semajnfinojn 5-6/8 ĉe Coolum, norda marbordo, en domo kiu apartenas al unu el la anoj, S-ino Peters.

Arthur Deutscher aperis en televida intervjuo 20/6 ĉe TV Q. O. Li parolis pri Esperanto dum 10 minutoj. — V. Robinson.

SUNSHINE COAST: Malrapide, sed certe, la movado kreskas ĉi tie. Ron Ritchie instruas Esperaton lundvespere en Nambour por la Eduka Fako kaj ĉe la altlernejo li instruas kiel "Hobby Group" dum la lunĉoro, lunde. Foje kelkaj membroj el Caloundra veturas 20 mejlojn norde por partopreni la lecionojn en Nambour.

Ce Eumundi Fred Hartshorn penas instrui kelkajn lernejanojn, sed li devas labori foje tage, foje nokte. Ĉiu altlernejo en la loko nun havas la libron "Zamenhof, Creator of Esperanto" en sia biblioteko. Ni ofte skribas pri Esperanto en la ĵurnaloj kaj parolas al diversaj kluboj. Kelkaj anoj estas transmare. S-ino Poelstra rondiras Eŭropo, dum F-ino Barron vojaĝis al Kanado, eble ankaŭ partoprenos la Univ. Kongreson en Portland. — Doris Sinclair.

19-a Kongreso — Brisbane

Okazis la 4-a kunveno de la Loka Kongresa Komitato ĉe la hejmo de S-ino J. Elvidge. Planoj kaj aranĝoj progresas bone. Estis decidite ke la kongresa kotizo estos \$6 (por A.E.A.-membroj). E-istoj, kiuj deziras kontribui al la kongresa programo, ekzemple debatado, aktorado, prelegado, bonvolu skribi al S-ino S. Martin, 48 Launceston Street, Salisbury, 4107. Ĉiun poŝtajon pri la kongreso oni sendu al ĉi tiu adreso. — V. Robinson

Esperanto-Federacio de Viktorio

okazigis piknikan kunvenon, 29/7, ĉe la hejmo de Ges-roj M. Leereveld en

Suda Belgrave. Per trajno kaj aŭtomobiloj alvenis trideko da plenaĝuloj kaj deko da infanoj. Bela sunplena vetero benis la okazaĵon. Ges-roj Ali kaj Marcello Leereveld gastame akceptis kaj regalas la ĉeestantojn. Partoprenis reprezentantoj el ĉiuj kvar E-grupoj (Eastern Suburbs, Melbourne, Malvern & Boronia).

Dankon al S-ino A. Paling kaj F-ino L. Hooper, kiuj unue fervore laboris en la kuirejo kaj poste organizis kantadon helpe de hejme faritaj kantlibroj.

La 2-a Generala Kunveno de la Federacio okazis 2/8 en la Biblioteko de Oakleigh (kunveno de la Eastern Suburbs E-Klubo). Laŭ la raporto de la Sekretario/Kasisto (Arnold Baldwin) la bilanco montras profiton de \$3.99, sed evidentiĝis ke ne ĉiuj membroj estis kotize validaj dum la periodo 1971/72. La Federacio havis 28 individuajn kaj 4 klubajn validajn membrojn.

Elektiĝis jena nova Estraro: Prez. S-ino A. Paling (Malvern); Vic. Prez. F-ino M. Sanders (Eastern Suburbs); Sek-Kas. A. Baldwin (Melbourne); Bulten-Redaktoro: H. Koppel (Melbourne), Klubaj Delegitoj: S-ino M. Wybenga (Morwell), F-ino V. Strachan (Malvern), J. Fallu (Eastern Suburbs), I. Heldzingen (Boronia).

Jack Fallu—nia nova Ekspedanto

Ekde la julia eldono nia gazeto havas novan ekspedanton. Jack Fallu (de la Eastern Suburbs E-Klubo) transprenis ĉi tiun gravan postenon el la manoj de S-ino Mary Fordham. A.E.A. deziras danki S-inon Fordham, kiu zorge administris la dissendon de Januaro 1971 ĝis Junio 1972.

Jack Fallu, kiu ĵus emeritiĝis el la poŝtista servado, disponas pri faka scio por la tasko, gratulinda akiro por A.E.A.

A.E.A. ĉe la 57-a Universala Kongreso

A.E.A. Viv-Prezidanto I. Maddern estis nia oficiala reprezentanto en Portland (Oregon). Aeroŝtelo li raportas jene:

"Pro la alfabeto ordo de salutoj de la landaj asocioj, mi estis la unua en ĉi tiu sekcio de la programo. Jen la salutoj kiujn mi parolis: Estas plezuro kaj honoro por mi alporti de la Aŭstralia E-Asocio bonkorajn salutojn al vi ĉiuj. Ni ankaŭ gratulas kaj dankas la usonajn Esperantistojn pro ilia laboro por la 57-a Kongreso — nia Kongreso! Ni E-istoj en Aŭstralia firme kredas ke la movado nun staras ĉe la pordo mem de fina sukceso, kiam Esperanto estos

akceptita de la tuta mondo, tra la tuta mondo, por la tuta mondo. Do, ni esperu, ni laboru, ni batalu por gajni la finan venkon. Nia mesaĝo estas: Vivu Esperanto, Vivu la Esperantistoj kaj Vivu la interna ideo de D-ro Zamenhof!"

"PLAN OF ACTION"

Formulated by the Sydney Esperanto Club, this truly constructive document of ten 12-inch pages, frankly highlights the chief problems that face the Esperanto movement in Australia today. First, the need to stem the disconcerting loss of new members. To every new-comer, a "guide" should be appointed to familiarise him or her with all aspects of the local movement. This is treated in helpful detail.

Second, a more outward attitude on the part of Esperanto clubs. "Esperanto is only a means to an end — not the end itself". Relations should be formed with other bodies, of which several are mentioned. Programming should be more effectively organised, our songs up-dated, auctions of articles held more often, car rallies, art and quiz shows, debates between Esperanto clubs or with outside bodies arranged with wider publicity as a motive.

How to get publicity at modest cost? Advertising means are studied in a paragraph that reveals inquiry in depth on this feature.

Dealt with are also: working bees, registration of volunteers in all fields of service, a training school for teachers, tapes, pamphlets visitations to diverse community centres whereby Esperanto may be more widely presented. There is much else in the published Plan to engage the thought — and spur the action — of every true Esperantist.

A member's register is set down: Have you any skills or hobbies — any capability whatever — wherewith you could serve the movement here, by personal contribution in art, singing, public speaking, teaching, welfare visiting, manual labor, typing, use of car etc.

The Plan concludes with a tentative draft of a Letter to New Members in which they are assured of individual guidance by a Club member assigned to that service.

Write for copy to G. Browne, 18a Bradleys Head Road, Mosman, 2088.

KOREKTO.

En The A.E. julio 1972 la adreso de S-ro Ralph Harry devas esti: Bonn-Bad-Godesberg, F.R.G.

LIBERA FORUMO

Dum la pasintaj jaroj oni kutumis legi tedajn artikolojn represitajn el aliaj gazetoj, sed en la julia eldono ĝi atingis novan nivelon malaltan. En artikolo el negrava ĵurnalo provinca de Anglujo ni legis (anglalingve, kompreneble!) pri la malbona lingvokapableco de la firmaoj britaj. Ĉu tia artikolo taŭgas por la nacia revuo esperantlingva de Aŭstralio? Moki la malfortojn de aliaj landoj ne konvenas por internacia movado kaj certe estus pli utila uzi la vortspacon plibonigi la lingvoscion de aŭstralianoj. Mi ne deziras legi rikanojn kontraŭ mia lando kaj popolo do mi petas vin ne plu sendu "A.E." al mia adreso. — A. C. Heathfield.

Ĉiu mense vigla E-isto trovas intereson en ĉio, kio rilatas al la nuna lingva situacio en la mondo. La artikolo (p.227) rekte tuŝas al la lingva problemo en la internacia komerco kaj implice substrekas la mankon de komuna interkomprenilo — nome Esperanto. Tiu artikolo ne estas "moko", sed sincera protesto kontraŭ administracia inercio en grava situacio. "Esperanto Contact", kiu parte represas la tekston de la Angla ĵurnalo, ne samopinias kun nia korespondinto.

Aŭstraliaj E-istoj, kiel ĉiuj aliaj, "plibonigas la lingvoscion" ne per distra legado de asocia organo, sed per funda studado de bonaj lern- kaj legolibroj.

La lingvaj notoj en The A.E. pri-traktas demandojn ne facile troveblajn — eĉ ne rimarkitajn — en la Esperantaj lernlibroj. Ankaŭ pri tio aŭdiĝis grumbloj. Meze inteligentaj homoj scias, ke redaktoroj ne povas plaĉi al ĉiuj. La tono de la supra letero supozigas, ke la skribinto sentas en si kapablon tion fari. Se jes, tiu sento fontas el abisma malscio pri redaktoroj malfaciloj. Li staru sur nia loko, provizore dum jaro, kaj ricevu bezonatan edukon. — Red.

POSTAL WORKERS, PLEASE !

"The Australian Post Office News" would print a piece on Esperanto if a P.O. Esperanto group or an individual Esperantist could give the editor a news hook to hang a story on. That is, an incident or so to bring the article on Esperanto into relation with the activity of the Postal world. If any postal worker can help in this, please write to Mrs. Shirley Fanos, 11/27 Alt St., Ashfield, 2131.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

Bridgman, S-ino J. M., Kinaroy, Qld.
Riley, S-ro M., Newborough, Vic.
Hayes, S-ro E., Ferntree Gully, Vic.
Bayliss, S-ino L. G., Holland Park, Qld.
Suhr, S-ro P. A., Keysborough, Vic.
Wilson, S-ino A. J., Alice Springs, N.T.
Jackson, S-ino M. C., Carnarvon, W.A.
Brooking, S-ro L. J., Darwin, N.T.
Demovich, S-ro V., Summer Hill, NSW

T.G.M.F.:

Russell, S-ino O., Lane Cove NSW	\$5.00
Brown, S-ino S. F., Clayton, Vic.	2.00
Williams, F-ino B. C., Camberwell, Vic.	7.00
Bennett, S-ino B., Collaroy NSW	1.00
Smith, S-no C. M., Morningside N.S.W.	5.00

ANONCO:

Dankon por via respondo pri la voĉdoniloj.

Poraj voĉdonoj nun estas sufiĉe por ŝanĝi la statuton.—Russ Baxter, Sek., 4 aŭg.

MRS. ERIKA LOORITS

The front page of "The Mercury Northside" (Hobart), 10 August, features with photo our E-ist friend holding a handsome beaten copper plaque of Copernicus, which she won in a competition run by the Polish National Radio in the International Language.

She had tuned in to its broadcasts and was able to answer the questions asked about the astronomer.

Her husband, Eino, has won many international awards in Esperanto. He and she are Estonians and are active in the Tasmanian Finnish community.

PRI "HAMLETO" (p. 224)

El letero de Prof-o G. Waringhien: "Via kutima ekzakteco iom ŝanceliĝis en via artikolo de The A.E. (junio 1972): Newell ne sekvis Zamenhof-on sed tradukis:

ĉi tiel okulfulmis li frapante la pojojn en batalo sur glacio, kaj Gregor (en la oka eldono de la Zamenhofa traduko) komentas en noto: 'Verŝajne: batis la sledhavajn Polojn sur la glacio' . . . Zamenhof kaj liaj aŭtoritatoj kompreneble tradukis 'Polacks' kiel 'pole-axe'".

Dankon pro la atentigo, kara kolego!

Mia eraro okazis jene: dezirante kompari la tradukojn de Zamenhof kaj de Newell, mi — en distrema momento — mise ekprenis ne la tradukon de

Newell, sed, ho ve, la reviziitan de D. B. Gregor eldonon de la Zamenhofa. — Red.

BONVOLU RIDETI . . .

"Ĉu vi scias, kiom da kokritoj estas en ĉi tiu urbo, ne enkalkulante vin?"

"Kion vi aludas per 'ne enkalkulante vin!'?"

"Pardonu. Se vi preferas, diru al mi kiom da kokritoj estas en la urbo, enkalkulante vin."

Enirante en la skriboĉambro de sia edzo, la edzino trovis lin tenanta sian sekretarieton sur la genuoj. Si ekkrias: "Mi estas surprizita!" "Ne", rebatas la puristo: "diru pli ĝuste 'Mi miras', ĉar surprizita estas mi."

Baletistino foje petis al G. B. Shaw, ke li ŝin . . . gravedigu. "Imagu nur", ŝi sopiris, "nia infano estus la plej perfekta en la mondo: kun mia beleco kaj via inteligenteco". Al tio Shaw respondis: "Mi volonte kunlaborus, fraŭlino, sed mia konscienco tion ne permesas, pro terura risko. Imagu nian situacion, se la infano naskiĝus kun via inteligenteco kaj mia beleco . . ."

RECENZE

"Doktoro kaj Lingvo Esperanto": Adolf Holzhaus. Eldonis Fondumo Esperanto, Helsinki, je kosto de la aŭtoro. 524 paĝoj 145 x 200 mm, pli ol 100 fotoj kaj reproduktaj. Prezo 12 Us dol. plus 10% sendkosto.

Antaŭe aperis multaj libroj pri Doktoro Zamenhof. Estas malfacile kredi, ke restas tiom da materialo pri lia vivo kaj laboro, nepublikigita, ke tio povus formi ĉi tre imponan volumon. Per plurjara obstine fortostreĉa taskado la aŭtoro kolektis kontraŭ ega elspezo ĉion sciindan kaj vidindan por la plezuro kaj mensa profito da la mondovasta E-istaro.

Ĝi estas kolosa, detale dokumentita kompilo, kies plenumo atestas al la superhoma laboro de unusola viro. Ĝis nun ne aperis komparinda libro tiel fontindike kompleta kaj vastampleksa en ĉio, kio rilatas al Zamenhof kaj lia vivo-verko. Ĝi tre longe restos por bibliografoj la ĉefa trezorujo konsultenda, kaj por seriozaj E-istoj tra la tero la konstanta legindaĵo pro ĝia ĝenerala intereso.

S-ro Holzhaus konsciencie sin devigis aperigi paralelajn tekstojn en la Germana, Rusa kaj Juda tie, kie li opiniis tion necesa por zorga komparado.

Unu tre valora sekcio: Lingvoscio de L. L. Zamenhof, ampleksas 186 paĝojn da densa teksto — la plej funda analizo de la afero ĝis nun aperinta; ĝi tiel restos dum jardekoj. Pri traktitaj estas la lingvoj pri kiuj Zamenhof sciis: Juda (Hebre-Germana), Hebrea, Germana, Franca, Pola, Latina, Greka, Angla, Itala, Volapuk, Aramea — Esperanto; Inter aliaj: Studo pri la vivo de Marko Zamenhof; Deveno de afiksoj; Korelativa tabelo; La Unua Libro Esperanta en la Angla lingvo (1888); Unuaj adeptoj (1887-1902) kaj Adresaroj 1887-1908); Pseŭdonimoj de Zamenhof, monumentoj, memortabuloj Zamenhofaj; Esperanto kaj Zamenhof stratoj; Spesmilto; la poemoj originalaj kaj tradukitaj de Zamenhof, kun ĉiuj aperlokoj presaj.

Fortike bindita, el bona papero, klar-presa, ĝi meritas vastan vendon. Ĉiu homo deziranta havi aŭtoritatan verkon de grandega amplekso rigardos ĝin kiel trezoron, kiu neniam perdos sian valoron.

LOKO LINGVEMULA

ANTAŬ OL MI FORGESOS ?

Jen subtila eraro, kiun kaŭzas naci-lingvo influo: "Mi donas ĉi tion al vi antaŭ ol mi forgesos tion fari".

Tiel parolante, oni konfuzas al neagle-lingvano per absurdaĵo. Li komprenus tion per: "Mi donas ĝin al vi antaŭ ol okazos al mi forgeso". Alivorte: . . . ke post la dono **nepre okazos** ia forgeso. Kia forgeso? Forgeso doni ĝin? Sed la senco estas: "Mi donas ĝin al vi nun, por **eviti forgeson**; aŭ, por ke mi ne forgesu.

Ni komparu la ĝustan uzon; jen du frazoj:-

I will give you a key before I go out.
I will give you a key before I forget it
(t.e. forget to do so).

En la unua la senco estas: Mi donos al vi ŝlosilon, kaj poste eliros.

En la dua la senco estas: Mi donos al vi ŝlosilon, por ke mi ne forgesu tion fari.

Ni uzu "antaŭ ol" nur kiam temas pri **efektiva** aŭ **intenca** faro, ago.

INA RIMO AU VERSO

Ĝi finiĝas per neakcentita silabo: ekz. oro, faras. La E-a poezio estas esence ina, ĉar en E-o oni havas pli grandan kvanton da tiaj. Da viraj finaĵoj ni havas nur la apostrofitan substantivon:

Antaŭ miljar' en sankta dom'
troviĝis nokte krima hom'.

La pronomon:

La frosta nokto mordis nin;
vundita brako ĝenis min.

Prepozicion aŭ partikulon:

Certege ja mi devos je tagiĝ' ekiri hejmon re.

Mi skribis sur folio laŭ linio ĉe numero naŭ.

Dolore al ŝi mi balbutis "Adiaŭ", samtempe kateto elkvikis "Mi-miaŭ".

Inajn rimojn ni havas abunde; ĉiun substantivon, adjektivon, verbon, particon, ĉiun derivitan adverbbon (atente k.c.); mondo, mondon, mondan, -ojn, -ajn; faras, kantante, atente . . .

Milojn da versoj Kalocsay tradukis: uzante in-rimojn ĉe La Infero. Forte helpus al la provizo de viraj rimoj, se oni havus rimedon uzi prefiksojn aparte, kiel jam de longe ni uzis "for". Ekz.—

Ili iris al la domo re.

La monero kuris sur la planko dis.

Ja vere, insidas en tio certaj miskomprenbloj, tamen lerta versisto povus eviti dangecon. Nur estu, ke lia verso estu tute klara je aŭdo, tiel ankaŭ je lego.

UNU RESPONDO (p. 237)

S-ro P. Schwerin sendis liston de fordoneblaj ekzempleroj de La Rondo kaj The A. E., de kiuj li havas ekstrajn ekster siaj jarkolektoj. Certe li posedas ankaŭ ĉiujn nrojn de la posteaj jaro 1966-72. Liaj ekstraj nroj estas de 1941 ĝis 1965. Interesatoj, dezirante kompletigi la siajn, povas lin kontakti.

Li posedas ankaŭ kvar tre utilajn verkojn pri Vortofteco en Esperanto. Jen vera amiko de la bibliografoj.

LA ELEGIO DE GRAY

Verso 6: "And all the air a solemn stillness holds". Ĉu "air" aŭ "stillness" estas la subjekto de tiu frazo? Kion vi opinias? Komparu kelkajn tradukojn

. . . kaj ŝvebas en l'aer' silent' solena

(Auld, "Angla Antologio".

. . . kaj en l'aer' solenas la trankvil'

(Curry, "Eklezia Revuo", 1922)

. . . aer' trankvila, ne blovetas vent'

(Boutwood, "British E-ist", 2/27.)

. . . solene trankviliĝas la aer'

(Williams, same).

. . . silento sidas sur ĉiela tron' (Iddon, same).

. . . trankvilo sur la tuta tero estis

(Gregory, same).

RECENZOTAJ

"Kun Onklo Ho", Hanoi, 1972. 400 paĝoj.

"Rakontoj el Pluraj Landoj", Fred Parker. 89 paĝoj. Eld. B.E.A. 30P.

"Al Torento": Stellan Engholm, Tria eldono. 95 paĝoj. 12 Danaj kr.

ESPERANTIST TRAVELLERS

Esperantists here are among those who are availing themselves of the facilities for travel to Britain and for excursions to Europe. Those going by ship may readily find opportunities, when conversing, to inform fellow-passengers about Esperanto, a subject often introduced by the green star worn by most of us.

However, to make a lasting impression on an enquirer, one must be equipped with elementary material, e.g. the U.E.A. Yearbook, some leaflets giving a skeletal outline of the language, and an Esperanto translation of some classic. This, with your pocket dictionary, is minimal.

The several weeks of leisured life on the sea give ample scope for gaining the interest of the more thoughtful modicum of those on board, and open a field for the fervent sower, who, as Zamenhof hymned, never tires in his labor.

Arrived in Britain, and resting a while in some chosen centre, one may find in the Yearbook the addresses of local Esperantists and arrange to meet them. Visitors from other lands are especially welcome, and these meetings may lead to helpful exchange of views and experiences in our common labor. That both parties have the same mother tongue in no way detracts from the pleasure and profit derivable from such personal contacts.

Of course, meeting with foreign Esperantists does bring an added element: the rich experience of using Esperanto in its proper role and sensing with satisfaction that it really works!

Back to that Yearbook: as a directory it may bring for you happy hours with Esperanto friends otherwise unknown to you. As a means of impressing outsiders its 600 pages of well-arranged compilation witness to the world-wide range of our unique organisation. Without it, you lack one very effective means of convincing your hearer, and will find the making of contacts next to impossible. So, please, have it with you when you go abroad.

EN PORTUGALUJO

El letero de S-ro R. Rapose, Lourenco Marques, Mozambiko:—"Post 33 jaroj fine Esperanto povas esti libere instruata en Portugalio, do, ankaŭ en ĉiuj Portugalaj teritorioj. Ankaŭ estis leĝe stari-

ESPERANTISTAJ VOJAGANTOJ

ANKAŭ ĉi-lande E-istoj uzas la faciligojn por vojaĝi al Britujo kaj por ekskursi en Europo. Vojaĝanto per ŝipo facile trovas okazajn, dum konversacio, por informi kunvojaĝantojn pri E-o—temo, kiun ofte enkondukas ekvido al verda stelo veste portata de la plimulto el ni.

Tamen, por fari daŭran impreson sur demandinton, vi devas esti ekipita per elementa materialo, ekzemple la Jarlibro de UEA, kelkaj flugfolioj donantaj skeletecan skizon pri la lingvo, kaj E-a traduko de iu klasika verko. Tio, kune kun via poŝvortaro, estas minimuma.

Kelkaj semajnoj da senzorga vivo sur la maro donas sufiĉegon da bonokazoj por interesi la pli pensemajn homojn sur la ŝipo kaj prezentas kampon por la fervora "semanto", kiu laŭ la poemo de Zamenhof, "neniam laciĝas" en sia laboro.

Jam alveninte en Britujon kaj portempe restante en ia elektita loĝloko, oni povas trovi en la Jarlibro adresojn de lokaj E-istoj kaj aranĝi kun ili rendezvuon. Vizitantoj el aliaj landoj estas ĉiam bonvenaj, kaj tiuj renkontoj povas konduki al helpa interŝanĝo de vidpunktoj kaj spertoj en nia komuna laboro. Ke ambaŭ vi kaj ili samgepatralingve parolas neniel deprenas de la plezuro kaj profito haveblaj per tiuj personaj renkontoj.

Kompreneble, rendevui kun fremdaj E-istoj aldonas kroman elementon, nome, la riĉan sperton uzadi E-on laŭ ĝia propra rolo, kaj la kontentigan senton, ke en tio ĝi efektive funkcias!

Ankoraŭ pri la Jarlibro: Kiel adreslibro ĝi povas porti al vi feliĉajn horojn kun E-amikoj alie nekoneblaj por vi. Kiel ilo por impresi ne-Esperantistojn, ĝiaj 600 paĝoj da bone aranĝita kompilado atestas pri la tutmonda amplekso de nia unika organizo. Sen tiu libro, al vi mankas unu tre efika rimedo por konvinki vian aŭskultanton, kaj vi trovos, ke fari kontaktojn estas preskaŭ neeble.

Tial, nepre ĝin portu kun vi, kiam vi vojaĝas eksterlande.

gita la Portugalaj Esperanto-Asocio kun sidejo en Lisbono, kies estraranoj estis elektitaj antaŭ kelkaj tagoj. La disvastigo de Esperanto estas jam pli facila, kaj almenaŭ la homoj ne plu timos ĝin lerni".

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070
Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 111 (191)

MELBURNO

Oktobro, 1972

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

Thomas, S-ro S. W., Kavieng, New
Ireland.

Amat, S-ro C., Mt. Waverley, Vic.

T.G.M.F.:

Cox, F-ino V., Surrey Hills, Vic. \$5.00

Smith, S-ro. C. M., Morningside,
Queensland \$5.00

ANONCOJ:

ESTRARO de la Esp-Federacio de
Kvinslando:

Prez: S-ino D. Sinclair, 6 Borland St.,
Caloundra, 4551.

Vic Prez: S-ro W. Ray, Bulcock St.,
Caloundra, 4551.

Sek: S-ino D. M. Styles, 51 Donald St.,
Clontarf, 4019.

Vic Sek: S-ro R. Ritchie, "Homewood",
Dulong Road, Nambour, 4560.

Kasisto: S-ino M. Pritchard, 13 Flinders
Pde., Redcliffe, 4020.

PRI ADRESARO:

Por nunaj adresoj de S-roj V. Gueltling kaj Baxter ignoru la oficajn listojn, sed anstataŭ konsultu la liston de membroj.

NOVA OFICO: KUNORDIGANTO

S-ino S. Fanos, 11/27 Alt st., Ashfield, 2131.

Niaj kursaj instruistoj faras grandegan laboron: la estraro kore dankas al ili, kaj jam trovis metodon por plifaciligi la ŝarĝon: (a) Iu altiras studentojn. (b) Iu kondukas ilin de kurso al kurso, de ekzameno al ekzameno.

Jen la S-ino — Shirley. — Russ Baxter, sek.

A.E.A. EXAMINATIONS

Elementa: W. C. Grafen, Vic.; Mrs. M. Beaumont, N.S.W.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: F-ino Irene Spink 12/7 kondukis nin per diapozitivoj al Ĉinujo, Rusujo, Hindujo kaj aliaj landoj, kie ŝi kaptis memorindajn kolorbildojn. Dum aŭgusta kaj septembra kunvenoj nia prez-o kaj nia sek-io interesis nin per atentotenaj programoj. S-ro Hawks lerte, vigle instigis anojn respondi, kaj S-ro Howard, kun la prez -o, rakontis pri spertoj, invitante aŭskultantojn interrompi per demandoj.

Denove ni bonvenigis D-ron kaj S-iron Caldera, kiuj vizitis multajn lokojn tra la mondo. Ĉe la kunvenoj en Nedlands 9/8 and 13/9 D-ro Caldera sorĉis la orelojn, parolante pri lokoj kaj E-istoj, kiujn li vizitis. D-ro Einhovici alparolis 40 membrojn de la Morley Rotaria Klubo ĉe la Dianella Hotel 14/8. Raporto pri tio aperis en la kluba bulteno. Nia publicisto, S-ino I. Einhovici, fidele laborante por E-o, lastatempe ricevis promeson de la "Nomenklatura Komitato", ke strato estos nomita honore al D-ro Zamenhof.—G. Pollard.

MELBOURNE: "Novajoj el la Poŝta Departemento" estis temo de prelegoj de Ges-roj Koppel, 7/8. Denove klubanoj, 14/8, laŭvice kontribuis erojn, plejparte rilate al Esperantolingvo kaj propagando. H. Beechey 21/8 parolis pri la libro "Veturiloj de la Dioj". Li klarigis la teorion de la aŭtoro pri vizitoj al Tero de Spac-Veturistoj en

antaŭaj jarcentoj kaj diskutis la metodon subteni la teorion per priskriboj de rokpentraĵoj fare de primitivuloj en multaj mondpartoj.

George Kuhlman, de la Boronia E-Grupo, 28/8, prezentis unikajn scenojn pri Siberio kaj kelkaj urboj en la Sovet-Unio, dum li priskribis trajnvojaĝon per la Trans-Siberia Fervojo, kun la edzino kaj 5 filetoj. Vere interesa vespero!

La parolanto je 4/9 estis F. R. Baham, kiu ĵus revenis post ferio en la nordo. En diskuto pri diversaj A.E.A.-aferoj, li priskribis renkontigojn kun E-istoj en Brisbano kaj Toowoomba. Poste li legis, kun rideksploda efiko, artikolon: Dormi kun Virino estas Malkomforte. Sekvis rakonto pri spritajo, kiun faris Grabowski al iu kontraŭ-Eulo rilate la meritojn de la Itala lingvo kaj E-o.

La prez-o 11/9 legis saluton de Arnold Baldwin (Vic-prez.), kiu nun estas en Londono. Herbert Koppel detale raportis pri la U.K. en Portland laŭ aeropoŝtaj raportoj.

MORWELL, Vic.: F-ino Loretta Kelly, filino de Brian Kelly, distris nin dum la aŭgusta societvespero. Loretta ludis gitaron kaj kantis kanton kiun ŝi kaj ŝia patro tradukis el la angla. Poste ni ĉiuj kune kantis. Ankaŭ Ges-roj Schepers kontribuis al la programo Ili aŭdigis sonbendon pri spertoj en Walhalla, kiam ĝi estis ormineja urbo. Tio estis la rezulto de intervjuo kun sinjoro, kiu loĝis en Walhalla dum multe da jaroj. Ges-roj Schepers tradukis Esperanten kaj surbendigis lian rakonton—M. Wybenga.

SYDNEY: 14/8 Victor Bourlin lerte prezentis karikaturojn de diversaj "Grimacoj de la Mondo". Ni bonvenigis vizitanton, Ted Woodruff, el Moree. Wre Chandler raportis, ke propaĝando progresas: "The Link". The Modern Language Teachers' Association, kaj la gazeto de Thomas Wide Transport, deziras havi artikolon pri E-o.

21/8: Wre Chandler ludis sonbendon de paroladoj de Prof-o R. Robertson kaj Prof-o Dunstan en la debato, "Ĉu Esperanto estos la Latino de morgaŭ?" (p. 219 The A.E.). Poste membroj diskutis la temon; estis dirite, ke ĝi ne estas taŭga — Esperanto ne estos la Latino de morgaŭ; Latino estas morta lingvo, sed E-o estas vivece vigla moderna lingvo kaj, kiel aliaj lingvoj, ĉiam kreskadis.

Ni bonvenigis kiel membron S-ron Brodie, kiu nun loĝas en Sidnejo.

MANLY: Ni decidis starigi kampanjon por varbi novajn membrojn kaj student-

ojn: Estas multe da intereso pri fremdaj lingvo en la vesperaj kolegioj. La franca, germana, itala kaj eĉ la japana prosperas. Niaj klubanoj kredas, ke ni devas vekti intereson ankaŭ por E-o. La klubo havas fortan draman grupon, regule kunvenas en klasoj kaj por aŭskulti al gastparolantoj. Sed novaj subtenantoj estas necesaj por reteni intereson kaj disvastigi la movado ĉi loke.

S-inoj Lily Goldsmith kaj Peg Ford Lewis jam revenis post siaj vojaĝoj en Britujo kaj alilande. Ambaŭ ĝuis sian sperton. Tiu granda subtenanto de la Klubo, Marjorie Duncan, ankaŭ ŝi revenis frue en septembro.

ROTARIANOJ KAJ ESPERANTO

La fak-delegito por interesigi Rotarianojn pri E-o, Les Scott, kiu mem estas Rotariano, raportas intereson de pluraj Rotarianaj kluboj.

Prof-o "Robbie" Robertson gastparolis al Sidnejoj kluboj en Strathfield, Campsie, Hunters Hill kaj Liverpool.

Wre Chandler parolis ĉe Lidcombe, Leichhardt kaj Corrimal. Rotariaj kluboj en Murwillumbah (N.S.K.) kaj Mirboo North (Vic.) havas intereson, kaj ni sendis sonbendon al Merimbula.

Ĉu sperta, aŭ ne, proponu vin kiel gastparolantoj al Rotariaj kluboj tra Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Skribu al Les Scott, 34 Ocean rd., Manly, 2095.

N.S.K. FEDERACIO

aranĝis konferencon ĉe la Motor Lodge, Bathurst, por okazi: oktobro 28-29. La konferenco inkluzivos la jarkunvenon. Post tio, la jarvespermanĝo kaj amuzvespero: E-istoj mem partoprenos ĝin. Dimanĉe oni veturos ĉirkaŭ la vidindaĵoj de la urbo Bathurst, revenante p.t.m Detaloj ĉe Sek-io, S-ino L. Goldsmith, 2/22 August rd., Manly, 2095. Invitas ni ĉiujn al bonega semajnfino!

TOOWOOMBA, Q'ld: Another successful Esperanto seminar was held at the home of Mrs. J. A. Lehane, Harmsworth St., Toowoomba.

Students old and new discussed the practical application of Dr. Zamenhof's simple set of grammatical rules, practised the international language orally, listened to recorded musical items and themselves joined in a sing-song led by Miss Margaret O'Mara on her guitar. Among the visitors were three students from the Range High School who are learning the language, under the guidance of Mrs. Lena Buchan, President of the Toowoomba Esperanto Society.

Several students will represent the Toowoomba group at State Esperanto Conference (Queensland Esperanto Federation) at Mt. Tamborine in October.—H. V. Petley.

18-A AŬSTRALIA KONGRESO MELBURNO, 1972

Enspzozoj:	
Kotizoj:	\$881.00
Donacoj:	27.50
Profito el Loĝigado:	172.28
Profito el ekskursoj:	229.05
Profito el fotografajoj:	28.00
Profito el poŝtkartoj:	2.00
Kurtaĝo aldonita al ĉekoj:	1.67
Banka interezo:	2.19
Procento el vendo de libroj:	13.46
	<hr/>
	\$1357.15

Elspezoj:	
Presado kaj paperajoj:	\$1.86
Poŝtajoj kaj diversajoj:	34.72
Kosto de la koncerto:	44.00
Publico:	44.50
Kosto de la bankedo	29.79
Premioj por la konkurso:	40.65
Alfikso de ŝildo:	7.00
Flago:	19.55
Kosto de insignoj:	7.50
Impoŝtmarkoj:	5.30
Kongresaj Programoj:	12.40
Ĉeklibro:	2.50
Rifuzita ĉeko:	2.50
Profito el la kongreso	1104.88
	<hr/>
	\$1357.15

Distribuo de la Profito:

A.E.A.	
20% de la kotizoj	\$176.20
50% el la profito	\$464.34
	<hr/>
	\$640.54
Melbourne	
Esperanto Society	\$291.06
Eastern	
Suburbs E-Club:	\$103.96
Malvern	
Esperanto Group	\$41.59
Boronia	
Esperanto Group	\$27.73
	<hr/>
	\$464.34
	<hr/>
	\$1104.88

LINGUAPHONE: Surdiska lingvoinstruado. Ĝi forlasis kelkajn siajn kursojn, inter kiuj la Esperantan. Ĉu tio okazis pro la iom vigla vendado de Esperantaj diskoj farataj de aliaj diskfarejoj jam de kelka tempo?

LIBERA FORUMO

Kun intereso mi zorge legis la resumitajn paragrafojn el artikolo verkita de Wm. Auld pri televido (The A.E. 8/72)

Mi samopinias kun li. Miaopinie televido estas fanfaronilo kiu brue entrudiĝas en la normalan kvietecon de la hejma vivo. Ĝi manipulas la pensadon de la rigardantoj, precipe de junuloj. La tielnomata muziko, kiu ofte akompanas televidon, afliktas la orelojn de aŭskultantoj. Televido ŝteletas el la menso, precipe la juna menso, ĉian deziron legi ian literaturon kiu plibonigas vortkomprenon kaj, tial, voĉesprimon.

La nenaturaj, nekomfortaj pozoj, kiuj estas ofte prenataj kiam oni alvidadas al televido, ne estas bonfaraj por la homa korpo; krome, la okuloj laciĝas kaj doloras pro longtempa sidado antaŭ ĝi.

Generale la konstanta rigardanto estas cerbolavata kaj perdas la kapablon de sendependa kre-pensado. La homaro povus profiti de saĝa uzado de televido, sed ĝia nuna sendistinga uzado malutile efikas sur la pensmanieron kaj vivmanieron de rigardantoj. — C. M. Smith, Kvinlando.

Koran kunsenton kun C.M.S. Antaŭ la veno de televido miloj da Britoj dum juneco legadis la verkojn de klasike bonaj aŭtoroj, kies stilo tiel efikis sur ilin, ke iom post iom ili formis en si laŭgrade similan kapablon verki en sia gepatra lingvo. Nun nur malofte gejunuloj havas amon legi la purstilajn verkojn de siaj gloraj antaŭuloj, preferante sidadi kiel pupoj antaŭ televido kaj absorbi la krude kripligitan lingvaĉon de malkulturaj filmoj kaj groteske absurdaj reklamoj.

La "leĝo" malpermesas, ke gejunuloj vidu filmojn pri fi-sekso, kruelo, perforto kaj simila, supozinde por ili tro ŝokaj aŭ morale malbonefikaj. Tamen tiu "leĝo" neniel ŝirmas geknabojn kontraŭ veneno egale mortiga — detrua por kultivo de vera lingvosento—nome, la malnobligo kaj putrigo de ilia lingvo, la glora Angla.

Antaŭ jardekoj, homoj, lerninte ĉe la piedoj de la majstroj, ofte fariĝis altklasaj ĵurnalistoj, konataj verkistoj. Estas timinde, ke la venonta generacio forte mallevos la nivelon de verka esprimado, ĉar en siaj fruaj jaroj ili sin lasis sklaviĝi al la kretena parolajo de la nuntempa televido. Eĉ nun, kiom da gelernejanaj povas verki modele bonan leteron? Kiu el ili — junaj kaj nejunaj — dediĉis horojn al la bonegaj "Nokturno" (3AR Melbourne), aŭ la

purvoĉaj legoj el literaturo faritaj de Emlyn Williams, Charles Laughton, Basil Rathbone k.a. ? — Farbo.

T.G.M.F. De tempo al tempo mi renkontas tiujn misterajn literojn en nia gazeto. Post serĉado mi trovis en ĝi (5/72) mallongan anoncon: "A.E.A. intencas starigi fonduson nomatan 'La Tajni Goldsmith Memoriga Fonduso'. — Russ Baxter, sekretario". Kutime oni legfirme deklaras en la anonco la celon de tia fonduso. Kio estas la celo de la Fonduso? Kiu estras ĝin? Kiom da mono estas jam enpagita? — P. E. Schwerin.

NEKLARA ESPERANTAĴO

Mi simpatias kun vi en via embaraso, nome via malperfekta kapablo traduki en pur-sencan Anglajon tiun aŭ alian frazon, kiun okaze vi legas en Esp-aj libroj, gazetoj k.a. Povas esti, ke la nekapablo ne devenas de via manko de Esp-a sciaĵo, sed ĝuste pro tio, ke iufoje eĉ bonaj E-verkantoj sin lasas skribi nekularan E-on. Ili aŭ erare influigis de dirmanieroj propraj nur al sia gepatra lingvo, aŭ tro rapide, haste, surpaperigas pensojn, ideojn, kiuj estas al ili mem pli-malpli sufiĉe klaraj, sed tute malkleraj por la legantoj. Ofte homoj skribas antaŭ ol ili mem klare formis la ideojn en la propra menso. Pro tio, kompreneble, la leganto cerbumas!

Eĉ la majstroj iufoje "dormetas kiel Homero", farante frazojn nekompreneblajn. Unu ekzemplo: Marta, p.2, 9/10: — "tiu, kiu . . . elnaĝas antaŭ nia imago en la formo de Adoniso, **dormanta sur ia mistero**" . . . (??). D-ro D. B. Gregor, fundescia E-isto Brita, de kiu mi petis helpon, konfesis sin nekomprenanta. Li promesis eventuale peti Polon pri la afero. Zam. tradukis Martan el la Pola. — Red.

SCOUTING

"La Skolta Mondo" is issued 4 times a year. Agent is S. H. Milligan, 274 Mont Albert rd., Surrey Hills, 3127.

Scouting is a universal organisation; Esperanto can open for its myriad members the door to free communication the world over. Contact the above for details.

"I cannot forecast to you the action of Russia. It is a riddle wrapped in a mystery inside an enigma".—Churchill: "Second World War", vol. 1, 383.

Mi ne povas prognozi la estontan agadon de Rusujo. Tio restas diven-damando volvita en mistero interne de enigmo".

H. J. BULTHUIS: "JANE EYRE"

El letero 2 novembro 1931. "Mi iom miras, ke en via skizo de recenzo pri "Jane Eyre" vi komparis la tutan tradukon kun la originala verko. Tion farante, vi tute ne povas verki favoran kritikon, ĉar neniam mi laŭvorte, sed ĉiam tre libere tradukas. Mi tamen ne sentas ofendon; kiel kritikisto vi rajtas kritiki laŭplaĉe. Mi ĉiam ŝatas honestar eĉ severan aŭ malfavoran kritikon.

"Kelkfoje kiam Esp. verko ne estas klara mi komparis ĝin kun la originala teksto kaj tiam mi ĉiam vidis, ke la traduko estas sklave laŭvorta. Tion mi spertis ĉe 'Faŭsto', 'Urbo de Belega Sensencajo', 'Progresado de la Pilgrimanto', 'Aventuroj de Alicia en Mirlando', 'Tragedio de Reĝo Lear' (1) 'En Okcidento Nenio Nova', 'Barbiro de Seviljo' kaj precipe 'La Floretoj de St. Francisko'. Kontraŭe mi vidis tre klarajn tradukojn, kiuj tre diferencas de la originalajoj: 'Fabeloj de Andersen', 'Batalo de l'Vivo' t.k.p. Zamenhof estis Polo; li donis al ni pli bonajn tradukojn ol povus Anglo aŭ Dano, kaj el tio rezultas, ke tute ne estas necese, ke tradukisto traduku nur verkojn el sia propra lingvo. Tiel same faris la Anglo Eggleton per siaj tradukoj el la Germana, kaj la Hungaro Kalocsay per tiuj el diversaj linkvoj.

"En Angla Esp. gazeto mi legis: "Se vi volas fari bonan tradukon, tiam atente legi frazon post frazo kaj traduku ilin per viaj propraj vortoj!" Tion mi faris, tradukante 'Jane Eyre', kaj eble mi iom tro ofte deflankigis de la originala teksto, kiun mi tamen perfekte bone komprenas. 'Jane Eyre' ne estas matematika aŭ historia verko. Oni ja traduku verkon de Erasmus aŭ Spinoza kiel eble plej laŭvorte, ĉar en tiaj verkoj ĉiu vorto validas, sed tio ne estas la fakto ĉe verkoj kiel 'Jane Eyre', 'Fabeloj de Anderson k.t.p.

"La ĉefa afero estas, ke la Esp-istoj legu 'Jane Eyre' kun plezuro kaj ne kun tro multe da peno . . . Tutkore via, H. J. Bulthuis, Den Haag.

(1) Temas pri la traduko de Curry kaj Ashley, 1924. Recenzo pri "Jane Eyre" aperas en "La Suda Kruco", jan. 1932. Bulthuis mortis en 1945. Lia plej amata verko estas la originala romano: "Idoj de Orfeo", kronita de la Lingva Komitato, 1923.

Vidu: Encik. de E. En "La Nova Etapo", nro 1, 1932, aperas kritika skizo pri liaj originalaj romanoj.

GOETHE-INSTITUTO: Laŭ "H. de E." 3 junio, tiu organizo por disvastigi

la Germanan lingvon, antaŭ du jaroj devis pro financaj malfaciloj limigi sian agadon.

LINGVEMULA LOKO

Interes(ig)i . . .

Estas strange, ke la utila formo "interesigi" en la Plena Vortaro ne troviĝas en la Plena Ilustrita Vortaro.

"Mi interesis lin pri Esperanto"; "La redaktoro klopodis interesigi la gazeton": tio estas. — igi ĝin interesanta. Simile: . . . interesigi la komercon pri Esperanto". — igi ĝin interesata.

Pri -ig kun verbaj radikoj, vidu: Lingvaj Respondoj, sub "-ig" indekse.

ĈU EBLAS FARI NENION?

Leganto skribis al ni: "En The A.E., (9/72) unua paĝo, fine de la dua paraĝrafo, aperas: "Nur memoru fari nenion, kion mi faris".

"Nenio (nothing) ne ekzistas; tial ne estas eble fari nenion. Ĉu la verkinto intencis diri: 'Certigu, ke vi ne faru ion, kion mi faris'?"

Nu, ni studu la jenan frazon: "No rubbish is found on the streets". E-istoj tradukas tion per du frazoj:

- (1) Troviĝas nenia rubaĵo sur la strato.
- (2) Ne troviĝas ia rubaĵo sur la strato.

La dua estas tre preferinda, ĉar ne povas "troviĝi" neekzistanta aĵo. Ni donas ankoraŭ unu ekzemplon:—

"Bedaŭrinde troviĝas en la cetera bona libro de P. nenia indekso". Prefere: "Ne troviĝas en la . . . libro . . . ia indekso"

Per tio ni vidas, ke en frazoj tiu-specaj la verbo sen antaŭa "ne" povas momente erarigi aŭdanton, eĉ leganton, kiu supozas, ke sekvas ia ekzistajo, subjekto de la verbo: ekz-e: "Troviĝas en la libro . . . fuŝaj paĝoj".

Tamen nelogikaj uzoj de "neni" estas oftaj en la E-a literaturo: "Li manĝis nenion"; "Li faris nenion" estas Zamenhofaj.

PRI NIAJ JARKOLEKTOJ

Ken Linton havas kompletan kolekton de nia landa organo bele binditan ek de "La Rondo" en la jaro 1941 ĝis la laste eldonita numero de "The A.E."

Laŭ "Sudda Kruco" 9/30: N. Gaye kaj G. Gordon, kaj laŭ "S.K." 4/30: S-inoj Hopton kaj Purnell havis kompletajn jarkolektojn. La kolekto de G. Gordon supozinde restas en la Alexander Turnbull Library en Wellington; tiun de S-ino Purnell nun posedas via redaktoro. Kie troviĝas la du ceteraj?

SEKSPIRAJ DRAMOJ EN ESPERANTO

Jen kerneca resumo de kritiko fare de Wm. Auld, fama poeto. Por ĝin detale profiti, legu lian klare klarigan artikolon en "The British E-ist", okt. 1971 - jan. 1972.

Hamleto (Zamenhof) 1894: "Alta grado de fideleco al la originalo. Emnente prezentotaŭga. Ŝtariĝis normojn kaj nivelon, kiun ne atingis la Sekspiraj tradukoj antaŭ 1960.

La Ventego (Motteau) 1904: Banala parafrazo, al kiu mankas fluanteco.

Julio Cezaro (Lambert) 1906: Pli bona provo ol tiu de Motteau. Malgraŭ manko de adekvata poezia dinamismo (la ĉefa malforto de ĉiuj fruaj tradukoj) Lambert ne kontentigis banali, kaj ofte li tradukis per la sama versnombro kiel la originalo. La funebran parolon de Antonio li tre bone redonis.

Makbeto (Lambert) 1908: Tasko pli malfacila ol ĉe Julio Cezaro. La lingvo de la originalo estas pli kompakta kaj dense esprimiva ol en Julio Cezaro, kaj por ĝin redoni la talento de Lambert vere ne sufiĉis.

Kiel Plaĉas al Vi (Kellerman) 1910: Ĉefaj karakterizoj estas pezo kaj plato. La plej aborta el la provoj rekrei Sekspiron en Esperanto.

La Venecia Komercisto (Wackrill) 1914: Bona traduko, kiu vere eksentigas la kvalitojn de la originalo. Liaj versoj kaj sonoritas, estas kompreneblaj sen peno. Vere impona atingo. Efektive, oni povus ĝin senhonte reeldoni hodiaŭ — eventuale kun absoluta minimumo de editorado.

Soaĝo de Someromeza Nokto (Briggs) 1921: Ne tiel bone eltenas la tempopason En ŝia epoko ĝi ŝajnis kontentiga; sed ĝi ja ne validas en la moderna epoko.

Reĝo Lear (Curry kaj Ashley) 1924: Iom pli sukcesa. Per ĝi jam aŭroras la nova, moderna epoko de altgrada adekvata tradukado; tamen ankoraŭ la nivelo ne atingis dinamismon indan je la granda originalo.

Romeo kaj Julieto 1945; Antonio kaj Kleopatro 1947; La Gajaj Edzinoj de Windsor 1948; kaj Trojlo kaj Kresida 1952 (Andrew): La proza traduko de poezia verko estas komplete senutila krom kiel ŝlosilo helpe tiun, kiu klopodas trakompreni la originalan tekston.

Otelo (Rossetti) 1951: La versoj redonas la poezion de la originalo; la prozaj paroloj viglas kaj esprimivas. En la poezio kvazaŭ audigas la aŭtenta voĉo de la granda poeto.

Hamleto (Newell) 1964: Li aliris sian taskon kun intenco resti kiel plej proksima al la laŭvorta senco de la

Angla teksto; li nomis sian provon "produktado de modera fidelisma maniero". La traduko havas grandajn meritojn, sed enhavas sintaksaĵojn pli indiĝenajn al la Angla ol al Esperanto. Oni eksentas, ke ĉe Newell la originala estas por li la pli grava lingvo. Pro la laŭvortisma kriterio la traduko estas ofte peza, malflua, malgracia, precipe en komparo kun la Zamenhofa majstroverko.

Reĝo Lear 1966: Somermeznokta Sonĝo 1967; La Tempesto 1970 (Kalocsay): Tiuj tradukoj reprezentas la veran apogeon de la ĝisnuna Sekspir-tradukado. Ili tiel rekreas la spiriton kaj la poezion enhavon de la originaloj, ke ĉiu leganto povas fidi, ke per ili li vere ekkonas la dramojn de la Angla aŭtoro.

(Kelkaj tradukoj de Kalocsay ekzistas ankoraŭ en manuskripto, interalie: La Mildigo de la Megero; La Komedio de Eraroj kaj Epifanio: aŭ, Kiel Vi Volas.

PARODIOJ

En la mondon venis nova krizo;
Tra la mondo iras la bojkoto:
Per flugiloj de la civilizo
Nun ni ĉiuj flugas al bankroto.

* *

Jen Usono (ne plu soifanta)
Ĝi la monan ŝiras organismon.
Al la mond' eterne kreditanta
Ĝi prezentas bankan kataklismon

* *

Forte staras muroj de l' doganoj
Inter la popoloj dividitaj,
Sed ni ĉiuj saltas sur vulkanoj
Per la dancaj flamoj ekscititaj.

—El "La Pirato", ĉ. 1933.

Aliajn parodiojn vi trovas en "The British E-ist", feb. 1934 (La Misvojo), kaj en "Bulgara E-isto", aŭgusto, 1963, pri La Vojo kaj La Espero.

ANGLAJO PARLAMENTANA

"What I've never done is fix a date until I've made up my mind what the date is likely to be" — Mr. McMahon en March, 1972. "Age", 7 Sept. 1972.

"Kion mi neniam faris, tio estas: fiksi daton antaŭ ol mi decidigis pri tio, kio verŝajne estos la dato".

Jes ja, antaŭ ĉio la klareco!

BONVOLU RIDETI . . .

Boksisto suriris la arenon kaj pompe prancis laŭ la maniero de sia metio. Tiam li forskuis sian robon kaj—febre ĝin remetinte — fulme kuris for el la batalloko. Tri minutojn poste, li revenis, ruĝvizaĝe, jam surhavante sian kalsanon.

Malsana viro vizitis tre aferplenan kuraciston. Atendinte horon en antaŭĉambreto, li fine eniris la konsultejon kaj komencis informi la kuraciston pri sia sanstato. Post kiam li elvoĉis kelkajn frazojn, jen eksonis telefono. Kiam la kuracisto finis sian parolon ĉe la telefono la viro denove komencis la diradon, sed ho ve, la telefono ankoraŭ kvar fojojn interrompis lian klarigon. Ne povante plu toleri tiun ĝenadon, li ekprenis sian ĉapelon kaj paŝis al la elira pordo. "Kien vi iras?" krietis la kuracisto. "Al la plej proksima telefono!" blekis la malsanulo.

HEJMA BINDADO

Estas ĉiujare 11 ekzempleroj de The A. E. Por ilin kompakte konservi jen rimedo:

Prempuŝe krampopinglu 6 ekzemplerojn per sufiĉe forta maŝinetio. Tiam faru same kun la cetera kvino. Metu strion da fortika gluo sur la maldekstra rando; kune premu la du pinglitajn arojn. Aldonu fronte kaj dorse paĝon de blanka papero. Fine, kovru la tuton per bonkvalita brilpapero.

NIA MUTA MONDO !

Robert Hamilton en "Sennaciulo", 6/72, atentigas, ke kiam la Usonaj astronautoj parolis de sur la luno a nia planedo naŭ dekonoj el la mondloĝantaro ne povis kompreni eĉ unu vorton. Spite de grandioza antingo de modernaj scienco kaj teknologio, kiu ebligis la surluniĝon de la homo, li tamen ankoraŭ ne venkis la problemon de interkomunikado kun ĉiuj popoloj de la mondo.

Komente ni aldonus, ke la problemo estas ja solvita, per Esperanto, sed pro antaŭjuĝemo kaj inercio oni ne universale akceptas la solvon.

TRANSLATION COURSE

Founded in 1940, this course aims to produce a few clear and accurate translators. Persons able to write reasonably correct Esperanto may, by active membership, improve their style and deepen their knowledge of the language. It is not suitable for beginners, and is of little use to those not prepared to translate the short English texts regularly and methodically. \$2.00 for 11 numbers yearly. Details from Editor.

"HEROLDO DE ESPERANTO"

Tiu gazeto enhavas, nroj 9 kaj 10 bonegan artikolon de Gaston Waringhien — La Lingvo kaj Stilo de Zamenhof. "H. de E." estas abonebla ĉe Ken Linton. 5 dol. jare.

RECENZOJ

"Rakontoj el Pluraj Landoj": Fred Parker. Eld. Brita Esperantista Asocio. 89 paĝoj. 89P.

Dek ok anekdotoj kaj rakontetoj pri vojaĝo, aventuro aŭ simpla kuriozo kolektitaj de la aŭtoro dum mondvastaj feri-vagadoj kaj aliamaniere. La klara elementeca lingvaĵo atestas, ke li bone plenumis sian celon: kontribui al provizo de taŭga legmaterialo por kursanoj. Estas evititaj "esprimoj, kiujn Zamenhof ne aprobus", esprimo iom tro absoluta, ĉar diskutebla, tamen sagace kaj propre aplikita al ĉi tiu libro.

Modele priskribaj estas la skizoj pri vagado en Evedujo, Norvegujo, Aŭstrujo, Korsiko, Hispanujo kaj Montekarlo. Iom rememoriga pri la Usonaj rakontoj de Bret Harte estas: Kiel Sankta Nikolao venis al Hopkin's Bar; eble la plej bona en la kompilo. Rekomendita, laŭ ĝia difinita intenco.

"Esperanto-Deutsch poŝvortaro, 190 paĝoj; Deutsch-Esperanto, 2/9 paĝoj. Eld. Veb Verlag Enzyklopadie, Leipzig 05, Eilenburger str. 55. G.D.R.

Teknike admirinda elono. Nete klara teksto, fortikaj bindo kaj kovrilo; entute plaĉa prezento. Formato poŝforma 3½ x 5 coloj. Ĉiu libro enhavas 12.000 vortojn, kun derivaĵoj, figuraj uzoj, sencnuancoj. Laŭprincipe, laŭcele, la kompilinto, Erich-Dieter Krause (Dip. Phil.), strebis aperi modernan, ĝisdate lingvaj vortareton en kiu troviĝu, krom ĉiutagaj vortuzaĵoj, ankaŭ abunde esprimoj el la tekniko, komerco kaj sporto. Uzante la Plenan Vortaron kiel ĉefan fonton, la aŭtoro ankaŭ serĉis materialon el modernaj Esperantaj libroj kaj gazetoj.

Granda helpilo, precipe por negermanlingvanoj, estas la uzo de "tr" ĉe transitivaj verboj; "intr." ĉe ne-transitivaj; "f" ĉe in-genraj substantivoj; "m" ĉe virgenraj; "n" ĉe neŭtraj. La listo de mallongigoj (162) kontrastas kun 33 en la Germana-Esp. de Hans Wingen (1954) kaj 106 en la Esp.-Germana de Butin/Sommer.

Tre rekomendinda por Germanlingvanoj kaj lernantoj de la Germana.

"Biblia Revuo": Oka jaro. Nro I, jan-marto 1972. 6 dol. por 4 nroj. Angelo Duranti, Piazza Duomo 4, 48100 Ravenna, Italy. B.E.A. perantas.

Kvaronjara revuo por teologoj, tekstokritikistoj, religie-esplorantoj, arkeologoj kaj ĉiu homo havanta en sufiĉa grado la specifan kulturon por profite digesti ĝian valoran enhavon. Se paroli nur pri la kompil-aranĝo kaj la prestek-

niko, oni miras pri la timeginda tasko, kiu frontadas la cerbulojn kaj la manmetiistojn, kiuj ĝin produktas.

D-ro D. B. Gregor komparas la verkon de Jehezkel (A.K. ĉ. 580) kaj Eskilo (A.K. ĉ. 480) U. Baratto vorte kaj fote klarigas pri fosoj en Kapernaŭm kaj Magdalo. J. Chiussi ekzamenas la naturon kaj supernaturon de la Islama ekzegezo. Traduko el la Apokrifaj Daniel far K. J. Young.

Biografia listo de prireligiaj artikoloj el la monda gazetaro; recenzoj kaj notoj pri kuriozaĵoj, eltrovoj, kaj aliaj interesaj ankaŭ por simplaj homoj.

D-ro D. Broadribb restos plurajn jarojn en Zuriko ĉe la Jung-Instituto tie. Valida estas la supra adreso de S-ro Duranti, kiu urĝe serĉas kunlaboron de fakuloj. Li donus detalojn.

"Sennacieca Revuo", Nro 100. 60 paĝoj, ilustrita. Eldonis S.A.T. Unu dolaro, ĉe la peranto, V. Gueltling, 9/45 Alt Street, Ashfield 2131.

Jen ĉiujara revuo kiu prave pretendus esti la plej granda soci-sciencia kaj kultura periodaĵo en Esperanto. Komparindus kun ĝi nur "Norda Prismo", lamente lamanta nur por nesufiĉa abonsubteno.

Karakterizas "S.R-on" detalaj kaj dokumentitaj artikoloj, kiuj foje atingas amplekson de veraj monografioj: ekzemple, tiu de S. Aarse La Fonto de la Arto, pentra, muzika, en kiu estas pritraktitaj la majstroj en tiuj medioj.

Esperanto Lingvo Neklasa: Pri la Nederlanda kaj aliaj lingvoj, kun longa postparto pri E-istoj kaj iliaj ideologioj kaj sociaj tuŝpunktoj. Enrigardo en Finnlandon, popolon, lingvojn k.c. de Jussi Jantti. Eugeno Lanti, la Homo kaj la Pensulo: intime informaj vortbildo pri li fare de N. Bartelmes, kiu amikiĝis kun la famulo antaŭ pli ol duonjarcento. Kelkaj Aŭstraliaj E-istoj ankoraŭ memoras pri la vizito de Lanti en 1939.

Per alloga lingvaĵo Sandor Szathmari kritike eksplikas la grandan poemon de Imre Madach, Hungaro. Kalocsay tradukis ĝin en 1924: dua eldono aperis en 1966.

Erasmus Zilles vojaĝis tra ĉiuj horzonoj en 23 (aŭ 24?) tagoj. Aparte interesa ĉi-lande estas lia raporto pri Sidnejo kaj Nov-Zelando — kion kaj kiujn li vizitis dum restado tie.

La Domo kun la Sep Etaĝoj: Traduko de elstare bona Itala novelo pri malsanetulo senhelpe implikita en la sinistra mekanismo de vere stranga kuracejo. Lian sorton priskribas la aŭtoro per tranĉa sarkasmo, morda ironio, kiu enteksas la tutan tekston.

Lingvo noto: Netransitiva uzo de "turni": — "Li turnis al la paciento. Li returnos hejmen . . . estas malfacile turni.

SECOND ESPERANTO BOOK

by Bertram Potts, N.Z. Esperanto pioneer and author of Nokto da Timo kaj Aliaj Noveloj. It is a translation of Children of the Poor, a best-selling novel in N.Z. The author, John A. Lee, born in Dunedin in 1891, was a ward of the State who gained a D.C.M. and lost an arm in 1914-18 and later became an M.P.

N.Z.E.A. Book service reports spirited advance orders. 272 pages, price 3.20. A review will appear.

ESPERANTO EN N. VJETNAMO

1956: Aperis mem-lernlibro E-a, 2-voluma, 20,000 ekz.

1959: Alia, 18-leciona.

1960: Duagrada lernolibro, kaj la unua vortareto E-Vjetnama; legolibro en E-o. Ĉiuj lerniloj rapide elĉerpiĝis.

Hodiaŭ oni planas aperigi pli bonan legolibron kaj Vjetnama-E-an vortaron.

La ŝtata Fremdlingva Eldonejo jam plurajn jarojn havas E-fakon; la Vjetnama Demokratia Respubliko rigardas E-on unu el la oficialaj fremdlingvoj, kaj la ŝtato ĝin utiligas.

La Vjetnama Pacdefenda Asocio (fondita 1956) nun decidis starigi propran eldonejon. Dum 15 jaroj la Asocio E-igis pli ol 2500 homojn, kiuj ricevis unuagradan ateston; ĉ. 700 el ili ricevis la duagradan. (H. de E. 1 apr. 72.)

IRONIO?

Estas erare laŭtigi, ke nia lingvo promesas al la mond' eterne militanta sanktan harmonion . . . Ni devas propagandi la malon: deklari, pruvadi, ke Esperant-lingve oni povas tutsame kapen-frapi la homfraton, kiel nacilingve. Mi partoprenis kaj partoprenas en Esperantaj movadoj kaj jure asertas, ke tiu deklaro ne estus mensogo. Mi spertis. — Laŭ Sandor Szathmari, en "Sennacieca Revuo", nr. 100.

GEEDZOJ AĜE DIFERENCEGAJ

En sia romano "The Well-Beloved" (la tre amata), T. Hardy prezentas viron kiu enamiĝis al virino, al ŝia filino, kaj al ŝia nepino. Laŭ Desmond Hawkins ("Thomas Hardy", 1950), en 1873 Barono Corneille du Fleurant edziĝis kun la nepino de virino, kiu antrompe lin forlasis antaŭ 41 jaroj.

INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ

Helsingor, Danlando, 23-30/7/72

S-ino Lily Goldsmith sendis al ni foton de la partoprenantoj en tiuj kursoj, gviditaj de S-ro Friis kiu varme salutis la Australiajn E-istojn kaj kore invitis ilin alesti estontajn kursojn en la bela Danlanda ĉirkaujaĵo.

En la internacia alternejo kunvenis 138 personoj; pri tio legu: "La Forto de l'Vero" (Adi), havebla ĉe B.E.A. au per nia Libro-servo.

La impresa foto estas en posedo de S-ino Goldsmith, kaj trovas altan intereson ĝin vidi tiuj homoj, kiuj estis tie au intencas viziti Danlandon.

U.K. EN PORTLAND, USONO

Pli ol 800 homoj el 40 landoj kunvenis en la kongresejo Hilton por la 57-a. Ses registaroj — F. R. Germanujo, Israelo, Belgujo, Japanujo, Norvegujo, Svedujo — reprezente salutis la Kongreson. S-ro Ivan Maddern tiel faris nome de la Aŭstralia E-istaro. Guenther Becker trafsingnife festparoladis. Okazis preskaŭ 50 kunvenoj de diversaj organizoj. Jurnalistoj montris tre grandan intereson pri la movado.

La 58-a okazos en Beogrado, kaj la tiea komitato esperas, ke venos ĉ. 4000 partoprenantoj.

MEMBRARO DE U.E.A.

La revuo "Esperanto", oficiala organo de la U.E.A., estas legata en 88 landoj, sed el pli ol 32.000 membroj de la U.E.A. nur iomete pli ol 7000 estas individuaj membroj; la ceteraj estas asociaj. En la aprila nro estas laŭlanda statistiko. En ĝi Aŭstraliŝo havas 137 individuajn membrojn kaj 214 asociajn: entute 351. Landoj kun pli da individuaj ol asociaj membroj: Brazilo, Finnlando, Sudafriko, Svislando, Usono. Ken Linton estas peranto por la U.E.A.

FRUA PLEDO POR PENSIJOJ

"Por maljunaj, malriĉaj homoj oni devus provizi hejmon kaj komforton . . . Laboristo servas sian landon per ŝpato, tiel same kiel pli bonstataj viroj servas ĝin per glavo, plumo aŭ lanceto . . . Devus esti tiel same nature, honore, ke honeste servinta laboristo ricevu pension de sia paroĥo, kiel ke viro de plialta socirango ricevas pension de sia lando, tial ĉar li bone ĝin servadis".—Ruskin: "Unto this Last", 1862.

Aĝ-pensioj leĝiĝis en Britujo — en 1908.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstria Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070
Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.
A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 112 (192)

MELBURNO

Novembro, 1972

WINNIE-LA-PU IN ESPERANTOLAND.

Leading U.S. Journal Looks at Portland Esperanto Congress.

A. A. Milne's children's classic was among the souvenirs taken home by the Congressists. (See "The A.E.", 7/72.) In a report published in "The Christian Science Monitor", 16 August, we cull the following:

"While other ideas for an international language have come and gone, Esperanto has solidified its reputation as the only language specifically designed for international communication to have proved itself in practice by gaining broad support and a considerable number of speakers. Its use for literature has developed to such an extent that the Esperanto version of 'Winnie-the-Pooh' has a value all its own, rather than being just a pale reflection of the original.

"Humphrey Tonkin, vice-provost at the University of Pennsylvania, said his translation of the book was not the easiest of tasks, but non-English speakers are enthusiastic about the result.

"E. P. Dutton, of New York, are not the only publishers issuing Esperanto material this year in the U.S. The Channing Bete Co. of Massachusetts, launched a 14-hour course in Esperanto at the time of the Congress in Portland.

"... Esperanto is still a basically grass-roots movement of people who feel the best way of understanding others of different language backgrounds is to meet them halfway, on an equal basis. They are not satisfied by the well-beaten tourist routes or a smattering of foreign languages. They do not

find persuasive the argument that English, French, Spanish &c. are increasingly used for international communication. Indeed, Dr. Richard Wood, professor of linguistics at Louisiana State University, avers: 'English is being phased out all over the world: in the Philippines, India, Tanzania, Kenya and Ceylon, English has been displaced by a new national language. What we need is a neutral language — one that doesn't represent one country forcing its will on another'.

"... In the U.S. the language is being taught in an ever-growing number of schools and universities. (A Baltimore Esperantist) Mr. T. Goodman observes: 'In this country not only could we use it for gaining insights into English and as a prelude to studying foreign languages, but also as a try-out language. It's so easy that if a student can't succeed with it, he can forget about Spanish, German or French'.

"Mr. Goodman came to Portland with some 50 other students from the U.S., Canada and Japan, to study Esperanto for credit at the University of Portland, where courses were offered at all levels to prepare students for the Congress and for subsequent use of the language. Students of only a few weeks can put the language into practice, either by correspondence or by talking with visitors from abroad."

ESPERANTO CHRISTMAS CARDS

Similar to those of last year. Available at 5c each from Malvern Group, L.

Hooper, 1/13 Belmont Av., Glen Iris, 3146.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ:

Nurse, Ges-oj F. S., Emerald, Vic.
Brunchhorst, S-ro L. F., Chatswood,
N.S.W.

Bond, S-ro J., Tuart Hill, W.A.
Dott, S-ino M., Kalorama, Vic.
Eldridge, S-ro A., Carnegie, Vic.
Housen, F-ino B., Elsternwick, Vic.
Jobling, S-ro G. C., Mitcham, Vic.
Levine, S-ro M., Killara, N.S.W.
Mappin, S-ro A., Wembley Downs,
W.A.

Marmo, S-ro L. D., South Yarra, Vic.
Marshall S-ino K. E., Curtin, A.C.T.
Shoobert S-ro B., Sydney, N.S.W.
McGouran Ges-oj J., Traralgon, Vic.
Bellamy, S-ino I., Wahroonga, N.S.W.

T.G.M.F.:

Stubbs, F-ino J., Rosewood, Qld. \$2.70

ANONCO:

Estis atendite, ke la unua aldono de "Link" estus atinginta membrojn en septembro. Bedaŭre, tio ne ebligis pro leĝaj malfacilaĵoj. Nun mi povas nur certigi al vi, ke "Link" ne estas forgesota gazeto kaj mi esperas, ke la malfruigo estos mallonga. — Russ Baxter, sek., 6 okt.

ATENTU, KLUBESTRAROJ!

Sajnas, ke la verdaj kartoj perdis sian popularecon. Kial? Ili estas niaj plej gravaj kaj plej malmultekostaj iloj. Per 410 v.k. ĉi-jare ni varbis 51 novajn studentojn, t.e. 12½%-an rezulton! Eĉ plej altprezaj reklamoj per ĵurnaloj esperas ricevi nur 10%-an rezulton. Do, kion fari?

Preparu agadon por januaro antaŭ la venonta lerneja trimestro. Kontakto vian anaron. Disvastigu kartojn per mano, hejmpoŝtkesto, letero k.t.p. Skribu al mi por havi novaspektajn, blankajn kartojn. Memoru: Britujo aliĝos la Komunan Merkaton en januaro. La mondlingva problemo ankoraŭ pli forte graviĝas. — Russ Baxter.

DUMVIVA MEMBRECO DE U.E.A.

Malmultaj el ni estas riĉaj, do la pli saĝaj preparas por la maljuneco, kiam iliaj financaj rimedoj eble ne plu povos toleri la elspezon necesan por resti individua membro de Universala Esperanto-Asocio. Tiuj saĝuloj fariĝas dumvivaj membroj, kaj en tiun anaron ni nun bonvenigas S-inon Doris Sinclair de Caloundra en Kvinlando. La aliaj dumvivaj membroj estas:

F-ino Winnie Addis
D-ro C. J. Caldera,
F-ino Bessie Carrick,
S-ino Hilda Cooper
S-ino Marjorie Duncan,
S-ro Sid Grant,
S-ro Ern Hanks,
S-ino Pearl Hanks
S-ro Rex Hanney,
F-ino Mary Hodge,
S-ino Fay Koppel,
S-ro Ken Linton,
S-ino Ruth McGrath
S-ro Ivan Maddern,
S-ro John Matasin,
D-ro Ross Robbins,
S-ino Katie Schwerin,
S-ro Ted Woodruff.
Ken G. Linton, Cefdelegito por Aŭstralio.

AUSTRALIA KRONIKO

ROCKHAMPTON: Prelegetojn al Rotario faris Vic-Prez. John Moore en Julio ĉe Rockhampton, en Aŭgusto ĉe North Mackay kaj li jam ricevis inviton fari same ĉe Yeppoon en Oktobro, kaj ĉe Bowen. Sed ĉi lastan faros S-ro Norm Collier, la tiea Delegito. Versajne ŝuldiĝas tiuj invitoj al, unue, la cirkulero de Murwillumbah, due, leteroj kiujn sendis nia sekretario al pluraj R-kluboj trie, al la iniciato de Esperantista Rotariano D-ro Degotardi de Yeppoon. Versajne ankaŭ aperis artikoloj pri E. en la pres-organo de Rotario.

Nia klubano Pastro Tynan nun deĵoras ĉe Marian, apud Mackay. Ni tre bedaŭras ke li devis foriri, sed esperas ke li baldaŭ helpos fondi E-klubon en la distrikto Mackay, kie jam interesiĝas pluraj personoj, inkl- 4 Rotarianoj.

En Aŭgusto vizitis nin Noel Gamble, prez de la E-Klubo de Kanbero, kaj Ges-roj Tronerud, antaŭe de Melburno, nun de "Tutaŭstralio", ĉar ili ĉiame vojaĝadas en sia rulanta domo. Ili nun estas malnovaj, bonaj amikoj, ĉar ili jam kvarfoje vizitis nin; la kvinan ni atendas kun antaŭgojo.

En Oktobro ni atendas kun plezuro viziton de la Delegito de Vierzon (Francujo), nome S-ro Jean Requillard. Li esperas viziti al Rockhampton dum 9-taga restado en Aŭstralio. Eble li revenos poste por vidi la ceteron de la kontinento!

SYDNEY: 28/8: Wre Chandler amuze fantaziis pri Noa, Noa ĉagreniĝis, ĉar li ne kolektis haŭtpoŝbestojn (marsupiulojn) de Aŭstralio por meti ilin en la Arkeon. Fine, la Pluv-dio — Jupiter Pluvius — telefonis lin, dirante, ke li tute forgesis inundi Aŭstralion.

Jen kial la kangaruoj k.a. postvivis la Biblian inundon!

4/9: Ludvespero. En ludo simila al "Scrabble" membroj montris lertecon, formante E-ajn vortojn.

11/9: Bonvenaj estis 7 progresantoj de la E-a klaso de la Metodista Centro en Sidnejo. Fritz Mueller-Sorau ludis E-diskojn de paroladoj ĉe la Universala E-o Kongreso Bologno (Italujo), en 1955. Ni ĝue aŭdis F-inon Vermaas, sek-ino de UEA, la prez-on Ivo Lapenna k.t.p. Inter aliaj diskoj estis 5 kantoj de studentoj de la Altlernejo en Morwell.

18/9: La membroj diskutis programon por la Zamenhofa Vespero okazonta en la Esperanta Domo 16/12. Laŭ invito, Wre Chandler parolis pri E-o al Rotariaj Kluboj — unu ĉe Corrimal (42 personoj) kaj la alia ĉe Leichhardt (33 personoj). "Verdaj kartoj" estis disdonitaj; ni ĝojas, ke kelkaj jam estas resenditaj al ni.

25/9: David Gould montris lumbildojn pri Maroko. Kun kelkaj aliaj turistoj li vojaĝis tra la lando dum tri semajnoj en "Landrover". Li rikoltis riĉan faskon da fotoj, sed nur la eksteron de moskeoj ni povis vidi, ĉar nur al mahometanoj estas permesate eniri. En Gibraltaro li fotis la Berberajn simiojn, kiuj onidire "gardas" la Rokon.

9/10 Antaŭ du semajnoj estis petite, ke membroj skribu leteron al iu — reala aŭ imaga — kaj poste la leteroj estu intersanĝataj inter la membroj. Ĉiu devis respondi al la letero, kiun li ricevis; do ofte estis amuze ĉe kunvenoj, kiam ambaŭ leteroj kaj respondoj estis legataj. Estis imagaj komunikoj inter tiel diversaj karakteroj, kiel la Viro, en la Luno kaj Noa. Inter la leteroj estis peto por instruado de E-o en lernejoj. —G. Browne.

N.S.K. FEDERACIO

La prez-o Les Scott kaj la estraro de la N.S.K. Federacio bonvenigos legantojn de "A.E." aliĝi sian organizon. Krom konferencoj diverslokaj, ili kondukas piknikojn, aŭtobusajn vojaĝojn, kaj ofte kunvenas. Ĝia oficiala organo, "Telopeo", estas nun eldonata preskaŭ ĉiumonate, kaj membroj estas plene informataj. Kotizo malalta, nur 50c jare. Skribu al la sek-io, S-ino L. Goldsmith, 2/22 August Rd., Manly 2095.

Du membroj, S-ino Edna Giles, 20 Cliff Rd., Collaroy 2097, tel. 98 6841; kaj F-ino D. Hasluck, 65 Cobran Rd., Cheltenham 2119, tel. 86 5632, invitas E-istojn de la kamparo kaj aliaj ŝtatoj tranokti en iliaj hejmoj, kiam ili veturas al Sidnejo. Al E-istoj dezirantaj resti mallonge en Sidnejo, ni kore rekomendas, ke ili akceptu tiujn amikecajn

proponojn.

MELBOURNE: Nia ĉiujara merkatespero "Amerika Teo" okazis je 25/9. Ĉeestis 29 E-istoj, kies vigla negocado, 2 loterioj kaj luksega vespermanĝo rezultigis profiton de \$63.44, plej granda ĝis nun atingita sumo. Ĉifoje gajnis la grandan ĉokoladan torton (bakitan de S-ino F. Koppel) S-ino Valda King kiun ni bonvenigis kun plezuro post resaniĝo. (Lastjare 24 ĉeestantoj kontribuis \$53.33).

Je 2/10 ĉiu ĉeestanto prezentis 5-minutan interesajn, inkluzive raporteton aeropoŝte senditan de Vic-Prez. Arnold Baldwin el Parizo kaj 2 utilajn receptojn de Brigadestro J. Munro. La vespero de la 9/10 estis dediĉita al la E-Konferenco en Morwell (vidu raporton aliloke), kiam partoprenintoj rakontis pri la interesaj aranĝoj kaj samideana kunestado.

BORONIA, Vik.: Kun bedaŭro ni raportas la morton de Myra Marshall, edzino de nia amiko Harold Marshall, je la 4-e de Aŭgusto, 1972. Si estis ĉiam entuziasma kaj populara partoprenanto en la teatraĵoj kiujn ni prezentis okaze de la Melburnaj Zamenhof-Festoj. Ŝia morto estas granda perdo por nia grupo, kaj al Ĥa'old kaj lia familo ni esprimas sinceran kondolencon.

Gratulon al Heather kaj Ivan Heldzingen, al kiuj cikonio alportis (9-an de Sept.) duan denaskan Esperantiston, Leslie, frateton por Leonie.

PERTH: La Liganoj bonvenigis la revenon de S-ino Vera Payne kaj ŝia familio al nia klubo. Si vigle partoprenas en klubaferejoj. Je 27/9 ĉe kunveno en Suda Perto Vera rakontis al ni pri spertoj inter E-istoj dum 19-monata restado en Sidnejo. Si ankaŭ instruas lundon kaj mardon.

La komitatanoj okupiĝas pri la Zamenhofa datrevena kunveno kaj multe laboras por sukcesigi la okazon. —G. Pollard.

Esperanto-Konferenco en Morwell

La unua konferenco de la Esperanto-Federacio de Viktorio okazis inter la 6-a kaj 8-a de Oktobro en Morwell. La sekretario de la loka societo, S-ino M. Wybenga, kaj la Prezidanto, S-ro I. Maddern, multege laboris por ĝin sukcesigi.

Entute aliĝis 60 el kiuj proks. 53 fakte partoprenis, inter ili ankaŭ S-ino W. Greenhalgh el Brisbano kaj Ges-roj P. Holmes (Seymour). La kluboj de Melburno estis reprezentitaj per 24 partoprenintoj. La plejmulto, kompreneble,

venis el Morwell, Moe kaj Yarram.

Ĉiuj vizitantoj loĝis en la moderna kaj komforta Hotelo "Latrobe Valley", kie okazis vendredon vespere (6/10) la oficiala malfermo. Post salutvortoj de la loka Prezidanto (S-ro I. Maddern), la Prezidanto de la Konsilantaro de la Regiono de Morwell, Konsilanto W. J. Pettigrew, bonvenigis ĉiujn kaj oficiale malfermis la Konferencon.

Sekvis ĝuplena muzika vespero, dank' al la Morwell-anoj. Ges-roj Maddern, Filino Doroteo kaj Bofilo Michael Howes ravis per "La Espero" kvarvoĉe aranĝita de Doroteo. Pluan plezuron provizis la bela kantado en Esperanto de du junulinoj Loreto Kelly kaj Mary Malone kaj de S-ino McLaren. Instrumenta Duetto (Ges-roj Howes) kaj komuna kantado aldonis al la gajeco de la vespero, kiu finiĝis per kaŝtrinkado kaj vigla konversado.

Sabatmatene konferencanoj kunvenis en la gimnazio de Morwell. Tie S-ino Wybenga instalas vendejon de E-libroj kaj konferencanoj aĉetis librojn por pli ol \$43. Parolado de S-ro Maddern pri ĵusa vizito al Usono kaj la Univ. Kongreso en Portland malfermis la programon. Sekvis amuzaj skeĉoj de anoj el Morwell kaj de la Klubo de Orientaj Antaŭurboj. S-ino Fay Koppel klarigis "Kial kaj kion ni legu", montrante plurajn gravajn E-verkojn. Ann Hearn rakontis interesajn pri Centra Aŭstralio kaj F-ino A. Godfrey donis informriĉan rakonton pri partopreno en la Univ. Kongreso en Sofio.

Posttagmeze konferencanoj ekskursis al Moe por viziti tiean folkloran muzeon, kaj vespere denove en la gimnazio la programo konsistis el eroj prezentitaj de Melburnanoj kaj 2 filmoj. Bongusta manĝeto kaj gaja babilado en la lerneja salono por kuirinstruado finis la vesperon.

Dimanĉe en la gimnazio S-ino A. Paling komparis la vivon de William Booth de la Sav-Armeo kun tiu de D-ro Zamenhof. Sonbendoj kaj komunikantado finis la antaŭtagmezan programon, post kiam konferencanoj translokiĝis al la Hotelo por bufeda manĝo kaj oficiala fermo de la Konferenco. Federacia Prez. S-ino Paling dankis nome de la vizitantoj al kio respondis S-ino Wybenga kaj S-ro Maddern. Sekvis ekskurso al la malnova ormineja urbeto Walhalla. Ni revenis nur ĝustatempe por adiaŭi kaj trafi la trajnon al Melburno.

Entute sukcesplena konferenco dank' al la klopodoj de la Morwell'anoj. La loka gazeto "Express" detale raportis pri la konferenco kaj aperigis du bildojn

pri la bonveniga vespero.—F. & H. Koppel.

NI ESTU REALE PENSANTAJ!

Ĉe la jarkongreso de Sveda Esp. Federacio Ib Schleicher prelegis, ke se ni deziras interesi aliajn organizojn por E-o, ni devas konvinki ilin, ke E-o vere utilas ĝuste por TIUJ organizoj. Ili ja havas aliajn celojn ol ni. Ni ne rajtas atendi, ke ili interesiĝos pri la disvastigo de E-o, se ili ne trovas, ke tio utilas al Ili.

Ekz-e: "PACO", la organo de la Mondpaca E-ista Movado, 63-paĝa, lukse, presita kun multaj ilustraĵoj kaj eldonata de E-istoj en Sovet-Unio, spegulas la oficialan sovetan sintenon rilate al mondpolitikaj problemoj.

"EL POPOLA ĈINIO", monata revuo, ankaŭ lukse presata kun belaj, eĉ koloraj ilustraĵoj kaj artikoloj pri la moderna Ĉinio, konformas kun la oficiala politiko de la ĉina registaro.

Multaj E-nstoj okcidentaj negative sintenas rilate al tiuj eldonaĵoj, opiniante, ke ili estas propagandiloj por la reĝimoj en la koncernaj landoj. Jes, prave! Ili estas. Sed ĉu tio estas manko? Ni komprenu, ke niaj gesam-oj tie devas — se ili volas labori por E-o — utiligi nian lingvon, prezentante la vidpunkton de ilia registaro. Ĉu tio ne estas la sole ebla vojo, se ni volas iam atingi tutmondan akcepton de E-o? Aŭ ĉu ni imagas al ni, ke ni unue ŝanĝu la mondon tiel ke ĝi konformas al niaj politikaj konceptoj?

Ib Schleicher voke instigis al pli da realismo en nia sinteno al la ekstera publiko. La sovetaĵ E-istoj, kiuj eldonas: "Paco", kaj la ĉinaj, kiuj eldonas: "El Popola Ĉinio", meritas nian estimon kaj apogon. Ili estas realistoj! Kial ni ne sukcesas same utiligi E-on por la celoj de NIAJ registaroj kaj NIAJ politikaj kaj ideaj organizoj? — Laŭ "Sveda Espero", jul.-aug.

POEM-TRADUKOJ

Amiko petis nin aperigi ankaŭ la originalojn de poemtradukoj en "The A.E.", por ke legantoj povu fari komparon. Li diris, ke nur tiel oni povas priuĝi la gradon de fideleco traduka.

Responde: supozinde ne pli ol 5% de legantoj sufiĉe bone komprenas la Germanan por taŭge taksi. Servo al tia malmulto ne valorus la spacon. Pri la Angla, interesatoj ordinare povas sin turni al la originaloj. Ĉu vere nia amiko konsekvence sugestus, ke ni aperigu ankaŭ la originalon de Rusa, Hebrea aŭ Japana poemeto?

ANGULO LINGVULA

"KIU estas; KE LI estas."

Kelkaj E-istoj trovas malfacilon ĉe la ĝusta uzado de la verbtempoj. Zorge kaj konserve notu:

"Li vidis viron, kiu fumis cigaron."

"Li vidis, ke la viro fumis cigaron".

La regulo estas simpla. La tempoj de la ĉefpropozicio signas la KIU-propozicio per tiu sama tempo; la KE-subpropozicio per la nuntempo de sia verbo. (Kalocsay en "Esperanto", majo, 1958, p. 83, kol. 1.)

GE—

Cu "gefiloj" signifas (1) filo kaj filino; (2) filoj kaj filinoj, lausekse egale au neegale nombraj?

Probable pro nacilingva kutimo la plurala prefikso ge- postulas tamen pleonasme la pluralan finaĵon -j. Tiel, kiam oni parolas pri la gefratoj X, oni ne scias, ĉu temas pri frato kaj fratino au pri fratoj kaj filinoj.

Uzo de "gefilo" solvus nur parton de la problemo (1); ankoraŭ restus dubo pri (2). "Kvin gefiloj" povas ekz-e signifi: unu filo kaj kvar filinoj, au kiu ajn alia seksa proporcio.

Estas aliaj uzoj. La demando meritas studon. "Plena Gramatiko", para. 141, 161. "Lingvaj Demandoj" (Zam.).

KRITIKAJ PIKETOJ . . .

"Avo" en "British E-ist", julio 1972, p. 293: ". . . (la vorto) 'multampleksa' ŝajnas al mi taŭtologia . . ." Tamen li ne trovas pleonasma la superflua "tute" en sia fina frazo: ". . . tute mankas (en la vortaro de Wells) la traduko 'multampleksa'".

Taŭtologio — nura ripeto de la sama ideo sub alia formo.

Pleonasmo — superflua uzo de vortoj, senutilaj por la signifo, sed utilaj por la esprimforto.

D.J.F. Quirke, p. 297, konsilas, ke "vi agu iam hodiaŭ, antaŭ ol vi forgesos". Pli klare esprimite: ". . . por ke vi ne forgesu". Lia frazo, vaste uzata de E-istoj, ne estas analoga al la lojike korekta: "Mi preparos la kaĉon antaŭ ol mi enlitigos".

ENGLISH RHYMES

English is immensely richer than Italian in vocabulary, but very much poorer in dissyllabic, or feminine rhymes. It is poor even in single rhymes; some 6000 words, many of them highly poetical, lack one. Take "love", "truth", "God", for example. At "love" one rushes to match it with "dove", or "above", or even with "move". "Death" calls for "breath"; "wealth"

for "stealth"; "heart" for "part" or "smart"; "length" for "strength"; "home" for "roam", "foam"; "life" "breast" for "rest"; "arms" for "charms", and for "babe" — "astrolabe"!

If you use "jollity", you will use "frivolity"; if "rigid", then "frigid", "mountains" then "fountains". How otherwise? Triple rhymes should be left to comedians.

Esperanto is rich in feminine rhymes, i.e. that end in an unaccented syllable, but poor in masculine. This disadvantage has, under necessity in close translation, been brilliantly overcome by the more gifted writers. A glance, however, through the 640-page Poem Anthology compiled by Wm. Auld in 1958, will reveal the difficulty of finding a poem with single stressed rhyme-endings throughout.

ANGLAJO PARLAMENTANA

Ni aperigu la plej klaran tradukon de la subaj frazoj elvoĉitaj de J. Gorton (laŭ oficiala raporto). Ili estas majstraj miniaturoj de la arto haose esprimi la penson.

"It is my understanding — and it can be no more than an understanding — since it is based on my understanding of legal advice".

"What the Government is doing, and desires to have happen, is a continuation of what has been enabled to happen in the past".

"The result will result as a result of careful examination and study".

"Is it permissible for me to claim I have been misrepresented because the Leader of the Opposition said I misrepresented him, because I have been?"

La episkopo de Southwell (Anglujo) en 1885 diris en prediko: "I feel a feeling which I feel you all feel" Bedaŭre ke la du viroj ne povis renkontiĝi por konversacii.

Ralph Harry, Our Ambassador in Bonn.

In New York in March at a half-hour interview on WNYC-FM he spoke of his experiences with Esperanto during his diplomatic career in ten countries. As a boy in Tasmania he had learned Esperanto. His interest in the language was renewed in the early days of the United Nations. A meeting was adjourned because of electricity failure. It could have been carried on by candle light, but without the simultaneous translation service the members could not communicate with one another.

After setting out the advantages of Esperanto over national languages for international use, he was asked to say something in it; whereupon he recited

the Lord's Prayer in faultless, musical phrasing.

While in Bonn, Ambassador Harry will work with German Esperantists on the completion of a multi-language phrase book of sporting terms (including Esperanto equivalents).

Tapes of the above interview and three 5-minute tapes on Australia from: H. K. Ver Ploeg, Esperanto Audio-visual Service, 321 19th Avenue, Spokane, Washington 99203.

BIRDO KAJ VERMO

The early bird may catch the worm,
Or so we've all been taught;
If this be so, it follows that
The early worm was caught.

Kaptas vermon birdo kiu fruas:
Tiel oni nin ĝis ted' instruas.
Se tiel estas, venas viv-ekstermo
Al povre stulta frumatena vermo.

EPITAFIO

Hendrik Adamson, Estono, E-ĝis en
1929. Li mortis en 1946. Sur lia
tomboŝtono oni vidas en Esperanto:

. . . Mi ne bezonas oron,
nek ĉiujn trezorojn de l'mondo;
sed sangan mi ploras ploron
pri homaj maljust' kaj senhonto.
Per pala parafrazo ni tradukis:
I yearn not for an honored name,
For glory, opulence or fame;
With tears, I pray for life to see
A world from shame, injustice free.

"THIS TOO SHALL PASS . . ."

When some great sorrow, like a mighty
river,
Flows through your life with peace-
destroying power,
And dearest things are swept from sight
forever:
Say to your heart each trying hour—
"This too shall pass away!"
—Lanta W. Smith (?)

EĈ TIO FINE PASOS . . .

Kiam dolorego, kiel granda ond' rivera
Sur vian vivon fluas kun pacdetrua
forto,
Kaj ĉion karan rabas for aflikto
animŝira —
En tiu malespera hor', inspiru vin la
vorto:

"Eĉ tio fine pasos!"

—Tradukis Farbo.

58-a U.K. DE ESPERANTO

Beograd, Jugoslavio, 28.7. - 4-8, 1973.
La Prezidento nacia, Josip Broz Tito,
estas ĝia Alta Protektanto. Li iam
lernis Esperanton kaj patronis la 38-an

en Zagreb 1953.

Ĉiu kongresano ne membro individua
de UEA ricevos senpage la revuon
"Esperanto" dum la tuta kalendara jaro
en kiu okazas la Kongreso. Esperanta
faldfolio pri Beograd havebla ĉe 58-a
U.K. de Esperanto, Terazije 42,
YU-11000, Beograd. Interesatoj kontaktu
B.E.A.-on.

RECENZOJ

"Infanoj de la Malriĉuloj": John A. Lee.
Tradukis Bertram Potts. Eldonis S.A.T.
272 paĝoj. Prezo 3.20.

La aŭtoro sin dediĉis al la tasko
vortbildi la situacion de malriĉa familio
en Nov-Zelando, kiel ĝi statis dum lia
knabaĝo. Naskiĝinte en 1891, li
komencis la verkon en 1933, kiam
ankoraŭ flagris la granda ekonomia
krizo. Vizitinte Nov-Zelandon, Bernard
Shaw konsilis al li eldoni ĝin sub sia
propra nomo. "Ĝia apero komence ŝokis
multe da liaj samlandanoj; hodiaŭ oni
ĝin laŭdas kiel klasikajon".

Kio estas aparte miriga, tio estas la
senindulgaj rakontoj kaj aludoj pri
aferoj, kiuj intime malkovras ne nur
liajn proprajn deliktojn sed ankaŭ sor-
didajojn pri lia patrino kaj fratino
Povas tion rajtigi la neceso nepre per-
zenti la kompletan veron pri tiu terura
sperto-tempo en lia vivo, sed la nud-
vortaj priskriboj pri liaj karaj familianoj
provizas por ili plorigan epitafon.

Oni longe serĉus similan libron, ver-
kitan de elstara publika viro, kiu tiel
tre draste tiras for la vualon de sia
intima hejmvivo. Oni eble pensos pri
tio, kion faris la filo de Lloyd George
antaŭ kelke da jaroj: la biografio de lia
patro.

La unua duono de la libro ĉefe temas
pri liaj junjaraj revoj, la amo al la
naturo, knabaj aventuretoj, spertoj ĉe
religiaj kunvenoj, konjektoj pri la
seksvivo; la dua pri lia progresiva
malsupreniĝo en fi-kondukon. Estas
bedaŭrige, ke la libro abrupte finiĝis per
ĉaso al li — ŝtelinto. Li estis tiam 13-
jaraĝa. Havinda do estus dua volumo,
kiu kronikus pli plaĉan kaj signife pli
interesan vivtempo, ĉar en postea
tempo Lee ricevis liberon, honore servis
sur batalkampoj en la Unua Mondmilito,
fariĝis parlamentano, poste estro de la
ŝtata fako de domkonstruado, redaktis
gazeton: "Lee's Weekly" kaj verkis
libron, kiu rezultigis lian ekŝigon el la
Labor-partio.

Vere li estas realisto: homo, kiu
prezentas aferojn, kiaj ili ekzistas,
inkluzive de ĉio ŝoke malbela.

Genas leganton la tralibra uzo de streketo anstataŭ la plilonga haltostreko antaŭ kaj post parenteza rimarko. Ekz-e: 43: (ili) adoras la paganajn diojn-koloro, sunlumo kaj lunlumo . . . 44: tuŝis la ĉielon-ĉiela horajo . . . 162: tripenco. Ĉu do analoge "trimonato", "dutago" k.c.?

Forviŝis li honore per posta serv' publika.

La pekojn de la knaba aĝ' — la temo ĉi-kronika.

"Hilelismo de L. Zamenhof", la Rusa teksto kun Esperanta traduko de Adolf Holzhaus. Klarigaj notoj kaj foto de Zamenhof 1905. Eld. Fondumo Esperanto, Helsinko, je kosto de la tradukinto. 86 paĝoj.

Ĝi estas tre signifa eldonaĵo en tio, ke por la unua fojo ĝi aperas en Esperanto. Por la verko Zamenhof (1901) uzis pseŭdonimon "Homo sum", ĉar cirkoŝtancoj devigis lin al tio. Kaŝeĉon konsilis A. Kofman, al kiu Zamenhof sendis la manuskripton kvar jarojn antaŭ eldono.

Post preso de la broŝuro la eldonisto "fermis sian magazenen"; sekve nur en 1903 Zamenhof post multa klopodado ricevis la ekzemplerojn. En 1939-45 la domo lia en Varsovio forbrulis kune kun la biblioteko, tial la broŝuro estas rara. Unu ekzemplero estas en la Hebra Biblioteko en Jersualemo. Holzhaus kserokopiis ĝin por la Viena Esp. Muzeo kaj la biblioteko de la Brita Esp. Asocio en Londono. La Fondumo Esperanto akiris mikrofilmon de la sama por la Universitata Biblioteko en Helsinko. Kopio de tiu filmo kun Esperanta traduko de Holzhaus estas reproduktita en ĉi broŝuro.

Esperinde, ke ĝi interesos ankaŭ nehebreajn E-istojn, ĉar ĝi estas sendube valora historia dokumento. La Esperantaĵo estas klarlegebla: ĉu povas esti, ke iom da Zamenhofa stileco fluetis el la Rusa teksto en la Esperantan?

Por ankoraŭ pli bone kompreni la broŝuron, studentoj de la ideologio Zamenhofa sin turnu al "Originala Verkaro", paĝoj 312-343 kaj al leteroj en Parto V (nroj 289-296, 334, 367-8).

La problemo pri ĝusta lingvo por la idea "popolo Hilelisma" estas traktata sur paĝoj 54-61. Zamenhof rifuzis la antikve-hebrean lingvon, ankaŭ ian Hebrean jarĝonon, favore al Esperanto (p. 61). Li skribis: "Antikve-hebra lingvo, kiel morta lingvo . . . absolute ne taŭgas . . . baza ellerno estas neordinare malfacila . . ." Kompreneble li ne povis antaŭvidi ĝian reformon, praktikan adapton kaj la postean ĝeneralan uzadon en la moderna

Israela ŝtato.

La verko en sia E-a traduko jetas novan lumon sur nesufiĉe konatan flankon de Zamenhof, nome lian fundan esploron en la animo de la homo mem. Se li povus esti sin dediĉinta al la socia filozofio, sen la premo de aliaj devoj, li nun starus inter la mondfamaj pensuloj.

"Kun Onklo Ho": Fremdlingva Eldonaĵo, Hanojo, 1972. 400 paĝoj. Ĉe Nyuyen van Kinh, 68 Ly Thuong Kiet, Hanoi.

Ho Chi Minh naskiĝis en 1890, mortis 1969. Neniu biografio tiel versimile, tiel vivece povus prezenti al la mondo tiun grandan figuron, kiel faras ĉi granda kolekto da personaj rememoraĵoj. Verkis ilin homoj, kiuj intime konis kaj kunlaboris kun li en lia vivlonga taskego porti pacon kaj prosperon al lia longege suferinta landeto.

La libro atentene detalas la historiajn eventojn, kiuj efikis sur lian hejmlandon jam de lia nasko ĝis lia vivfino — la zigzagojn de venko kaj malvenko — kaj la manierojn kaj metodojn per kiuj li kaj liaj fideluloj stabiligis la unuajn kaj kontraŭefikis la duajn.

La eterna spirito de la Patro de la Vjetnama popolo ankoraŭ flamas senes-tinge en la koroj de liaj plubatalantaj gefiloj.

La produkto de tiel tre ampleksa libro estas miraklo de volforto en tempo, kiam sur malgrandan landon la plej potenca nacio en la mondo pripluvas morton, masakron kaj detruon.

"Al Torento", novelo de Stellan Engholm, Tria eldono. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Aabyhoj. 93 paĝoj, 12 Danaj kr.

Plaĉas la simpla, tuj komprenebla lingvaĵo de tiu ĉi ĉaste pura verketo. Ĉiu frazo facile fluas preter la okuloj, tiel ke leganto kun bedaŭro sin trovas turnanta ĝian lastan paĝon post nur mallonga distrotempo. Sekve do ĝi estas taŭga por komencantoj, kiuj ricevus kuraĝigon per la sperto ĝin absorbi.

Konsistigas ĝian literaturan valoron ĝia bonstila analizo de la animo de adoleskulo kiu suferas la turmentojn de sia malfacila aĝtempo — vanaj aspiroj, la prema sento de izoliteco, kaj la malespero de am-stato por li enigma.

La temo, kerno de la novelo ne estas streĉa; mankas al ĝi rakonta imponeco. Simple dirite: Juna arbarulo, Karl, esperante vivon pli vastan, renkontas en parko knabinon. Enjo, kiu kun li intersimpatias, ĉar anime similaj.

Si konfuzas lin per malvolo daŭrigi la

vojon al pli intima rilato, nome, gefianĉigo. Nur poste ŝi konfesas sian gravecon per alia viro, kiu poltrone ŝin forlasas. Post militservo Karl iras al ŝia dometo, ame ricevas la bebon, kaj alprenas ŝin al sia koro, kie, oni rajtas kredi, ŝi restos karese por ĉiam.

La du junaj homoj estas honestaj unu al la alia. Komence, ŝi ne volis uzi Karlon kiel kvazaŭ-patron de ŝia ĵus koncipita bebo, kaj kaj, fine, li riskis sian reputacion per tio, ke li akceptis ŝin kiel viv-kunulon, supozinde laŭlegan.

Samaŭtoro: "Homoj sur la Tero" kaj "Vivo Vokas" estas haveblaj ĉe U.E.A. per nia peranto.

BAHA'I: La Mondkredo por la Nuntempa Homaro. Arthur L. Dahl. Tradukita Roan Orloff Stone. 22 paĝoj.

Kompakta prezento de tiu sekto universalisma. Ĝiaj naturo kaj celo; interpreto pri la Diaj revelacioj; historio de Baha'i; ĝiaj bazaj instruoj politikaj, sociaj, kaj antaŭdiroj pri la estonta mondsistemo; ĝia interna administrado.

Al la ĉefa centro en Wilmette (Illinois) ĉiujare vizitas pli ol 200.000 personoj. Aliaj "adorejoj" troviĝas en Frankfurt, Kampala, Panamo kaj Sidnejo.

Bona lingvaĵo, teknike neta presajo. Senpage havebla ĉe S-ino Roan Orloff Stone, 504 North Fifth St., Gallup, New Mexico, 87301.

Kromdire, estas havebla "Bahaismo, la Religio de Paco" (Lidja Zamenhof) ĉe U.E.A. Prezo 0.40 guld.

"**Telopeo**", sept. Bulteno de la E-Federacio de N.S.K. 16 paĝoj. Financa etato kaj jarraporto de la Federacio; letero de S-ino L. Goldsmith; traduko el Gorkij: Kanto pri Stormheroldo, far V. Bourlin; Karlo kaj Erna (plagiato de "Frankie and Johnny"), far F. R. Baham, krom personaj notoj, komento k.s. Redaktas ĝin Wre Chandler.

INSPIRA VERKO

En 1900 Zamenhof verkis: "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia". Legu ĝin en "Fundamenta Krestomatio". Li venis al la sekvantaj konkludoj, kiuj post paso de 72 jaroj ankoraŭ restas validaj, ĉar ne refutitaj. Esence li skribis:—

... ne ekzistas eĉ la plej malgranda kaŭzo por timi, ke aperus ia nova lingvo, kiu elpuŝus Esperanton. . . ni povas doni al vi tiun ĉi plenan certecon. . . La gramatiko ĝia doŝnas plenan eblon esprimi ĉiujn nuancojn de la homa penso per 16 reguletoj ellerneblaj en duonhoro.

Kion nova aŭtoro povus doni pli bonan? . . . kian ajn el la multaj projektoj aperintaj post Esperanto vi prenu, vi trovos en ĉiu el ili almenaŭ 60% da vortoj, kiuj havas la saman formon kiel en Esperanto. Se vi al tio ankoraŭ aldonos, ke ankaŭ la restaja 40% da vortoj diferencas de la Esperanta formo pleje nur tial, ke la aŭtoroj aŭ ne turnis atenton sur diversajn principojn kiuj por lingvo internacia estas treege gravaj, aŭ simple ŝanĝis la vortojn sen ia bezono, vi venos al la konkludo, ke la **efektiva** nombro da vortoj, al kiuj oni anstataŭ la formo Esperanta povus doni formon pli oportunan, prezentas ne pli ol iajn 10%. Kion do prezentus per si la **nova** lingvo? . . . Ĝi estus nur iom ŝanĝita Esperanto! Sekve la tuta demando pri la estonteco de la lingvo internacia alkondukiĝas nur al tio: ĉu Esperanto estos akceptita sensanĝe en ĝia **nuna** formo, aŭ en ĝi estos faritaj iam iaj ŝanĝoj!

"Ni akceptu Esperanton en ĝia nuna formo ĝis aŭtoritata kongreso aŭ akademio okupos sin pri Esperanto kaj faros en ĝi plibonigojn per decido kun forto por la mondo. Nur tiel kaj ne alie tiu komitato, kongreso aŭ akademio povos agi. . . Sekve se ni eĉ supozos, ke fina lingvo de la estontaj generacioj estos ne Esperanto, sed ia alia ellaborita lingvo, en ĉia okazo la vojo al tiu lingvo nepre devas konduki tra **Esperanto**".

Resume Zamenhof fide sin esprimis: Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom arta. Kiel internacia neniam estos elektita ia alia lingvo krom Esperanto; ĝi aŭ estos lasita por ĉiam en ĝia nuna formo, aŭ en ĝi estos poste faritaj iaj ŝanĝoj.

Tiu supra estas nur skeleta skizo ĉerpita el ege valora artikolo. Ĝi enspiras kuragon en la plej pesimisman koron. Ĝi meritas oftfojan legadon kaj pripensadon de ni ĉiuj.

"RAKONTOJ PRI FEINOJ"

En "Heroldo de E." 3 junio 1972 Prof-o G. Waringhien skribis: ". . . rakontoj, kiujn Zamenhof tradukis el Charles Perrault". Tradukis la rakontojn de Perrault ne Zamenhof, sed S-ino Sarpy, el la Franca. Zamenhof **korektis** ĝin en 1904.

Bonveno al Novaj Legantoj

The Editor greets you, new readers, and trusts that with each issue your pleasure in its pages will increase. Within his means, he will try to meet your needs.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: Mrs. M. Chaldecott, 16 Grosvenor Road, Lindfield, N.S.W. 2070

Address of A.E.A.: Box 415 P.O. Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Libro-Servo: T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, N.S.W. 2036

N-ro 113 (193)

MELBURNO

Decembro, 1972

REDAKTORO AL LEGANTOJ

En sankta tempo de la Krist-alveno
Sur vi kaj viaj restu Dia beno;
Kaj dum la nova riĉ-latenta jaro
Feliĉon portu ĉiu via faro!

En gaja kanto, aŭ medito pia,
Foriĝu en forgeson ĉia ĝeno via;
Doloroj, malagrabloj, forpasu el memoro
De freŝa esperemo estu plena via koro.

KRISTNASKO

La festo de Kristnasko fine venas
Kun siaj sorĉe lumaj bondeziroj,
Kaj la pastrar' en laŭtaj panegiroj
La enkarniĝon de Jesu' solenas

Okulojn de infanoj fikse tenas
La grandaj magazenoj kaj foiroj,
En kiuj nekristanaj dikaj viroj
Ĉi daton pro la vendebleco benas

Dum en preĝeĵ' cerebroj grandiozas,
Malriĉaj sur la strato peralmozas
Tagon malĝojan, kiel la ceteraj

La Kristo de la stal' amare plendas,
Ĉar lia naskevento nur prezentas
Okazon por negocoj pli prosperaj
—Geraldo Matos: "Arĉoj", 1967.

Komparu tiun poemon kun la aperinta:
Sankta Trogo . . . en The A.E., dec.
1970. En ili vi trovos vere mirindan
samecon de ideoj kaj penso-sekvo. Farbo
recenzis la libron: "Arĉoj" en januaro
1970; devas esti, ke li, inspirite de la
poemo de Matos, verkis la pli longan
tekston: Sankta Trogo

EMBARASA SPERTO

Antaŭ multe de jaroj, kiam mi estis
nove kvalifikita farmaciisto, mi laboris
en apoteko en ĉefurbo. Tiu apoteko
neniam fermis sian pordon, kaj mi devis
labori tra la nokto. Laborante kun mi
estis du viroj, kiuj ambaŭ estis multe pli
aĝaj ol mi, sed ili ne estis farmaciistoj,
tial mi estris la apotekon dum noktaj
horoj.

Lun nokton en la apotekon venis du
ĉarmaj junulinoj. Unu el li diris al mi:
"Ĉu vi estas la estra farmaciisto?" Mi
respondis: "Jes. Kion mi povas fari por
vi, fraŭlino?" Diris ŝi: "Mi havas
furunkon, kiu tre dolorigas min. Ĉu vi
povis doni al mi ion por mildigi ĝin?"

Naive, mi diris al ŝi: "Certe, fraŭlino,
ĉu mi povas vidi la furunkon?" Ne
respondinte, ŝi tuj levis sian jupon kaj,
movinte siajn subvestojn, malkovris
parton de sia korpo, kiun kutime oni ne
malkovras al vido. Mi sentis mian
vizaĝon ruĝiĝi, ekrigardante al unu el
miaj kolegoj, kiu sin klinante sur ven-
dotablo, rigardis min ridete pro mia
konsterno. Mi ne sciis kion diri nek fari.
Se mi dirus: "Kovru vin", mia embaraso
estus evidente malkovrita. Tial mi
diris per malrapidaj, mezuraj vortoj,
penante soni indiferente: "Jes, vi havas
furunkon. Mi scias precize kion vi
bezonas por elkuraci ĝin".

Mi rapidis en la dispensarion, sur-
voje pasante mian ankoraŭ ridetantan
kolegon. Post kiam foriris la junulinoj,
mia kolego diris al mi: "Mi supozas,
ke estonte vi memoros demandi unue:
"Kie estas la vundo?" Li estis prava.
De post tiam mi ĉiam faras laŭ lia
konsilo.—G. Clarke (S.A.).

CHRISTMAS

Three things go by the name of Christmas. One is a religious festival. This is important and obligatory for Christians, and it is of no interest for anyone else.

The second is a popular holiday, an occasion for merrymaking and hospitality.

The third is the commercial racket, which gives more pain than pleasure. Long before 25 December everyone is worn out by efforts to remember all the right recipients and think out gifts for them. There is little time left for merrymaking; much less to take part in a religious act.

Anyone can force you to give him or her a present by their sending you a quiet unprovoked present. Here's one from Mrs. Busy, whom we hardly know, so back to the shops to get one for her. And so it goes on.

We are told that the whole dreary business must go on because it is good for trade. It is an annual symptom of that lunatic condition of our country, and the world, in which everyone lives by persuading everyone else to buy things. Is it really our duty to buy and receive masses of useless junk every winter just to help the shopkeepers? If the worst comes to the worst, let us give each other the money and write it off for charity . . . (Resume of words by C. S. Lewis, "Undeceptions": pub. Geoffrey Bles, 1971.)

KRISTNASKO

Tri aferoj havas la nomon "Kristnasko". Unu estas religia festo. Tio estas por Kristanoj grava kaj deviga. Aliajn homojn ĝi ne interesas.

La dua estas populara libertempo, okazo por gaji kaj gastigi. La tria estas la komerca ekspluatado. Longe antaŭ la 25-e de decembro ĉiu estas lacigita pro la streĉo rememori la ĝustajn ricevontojn kaj elpensi por ili taŭgajn donacojn. Malmulta tempo restas por festa gajado, kaj ankoraŭ malpli por fari religian devo-agon.

Per sendo de nebezonata donaco ĉiu persono povas devigi vin reciproki per simila sendo. Jen estas donaco elmane de S-ino Zumado, kiun ni preskaŭ tute ne konas. Do ni devas kuri al butikoj por elekti unu por ŝi. Kaj tielade plu.

Oni diras, ke la tuta tedaĉa afero devas daŭri, ĉar tio estas bona por la Komerco. Verdire, ĝi estas ĉiujara simptomo de tiu freneza stato en kiu sin trovas nia lando — kaj la tuta tero — laŭ kio la homoj devas persvadi unu la alian al konstanta aĉetado. Ĉu vere oni devas aĉeti kaj ricevi ĉiuvintre amasojn da senutila rubaĵo simple nur por helpi al la butikistoj? Se la afero finfine ne plu tolereblas, oni reciproke donu la monon kaj rigardu ĝin kiel almozon!

KONGRESO DE S.A.T.

En Kuopio (Finnlando) kunvenis 330 SAT-anoj (370 aliĝis). Tie J. Regulo Perez (eld. Stafeto) informis, ke ĝenerale li eldonas librojn je nombro de mil ekzempleroj, kelkfoje malpli (500, eĉ foje 200 ekz.). La Esperanta Antologio aperis en 2500 ekz. (preskaŭ elĉerpita). La Vivo de Zamenhof (Boulton) estas elĉerpita, kaj Vivo de Plantoj preskaŭ tiel. Li kalkulas proks. 4-5 jarojn por finvendo. Estas pretaj verko de Schwartz kaj alia de Waringhien (Eseoj pri religio kaj arto).

J. R. P. sagace limigas la eldonojn, mirigas nin nur tio, ke li devas tion fari, pro la malvigla volo de E-istoj aĉeti liajn iufoje grav-signifajn eldonaĵojn.

"EL POPOLA ĈINIO"

Oni povas aboni la gazeton por 50 Anglaj P. Du jaroj: 75P. Tri jaroj: £1. Abonantoj ĝis 15 marto, 1973, ricevos E-murkalendaron kaj serion da poŝkalendaretoj. Plej malkara gazeto, kaj la plej impona. Peranto: Fritz Mueller-Sorau, 11/242 Albany rd., Petersham, 2049.

TRADUKANTO VEAS . . .

La sencon de l'vortoj mi pene elhakas —
Ho, pezepiede la pensoj limakas:
Sed fine fariĝas skribajo traduka —
Tre ofte plorinde senspica, sensuka.

KANTO DE PESIMISTO

Ĉu mi senrezulte, vane,
Spezis min por mond' sendanka,
Laboradis san-malsane,
Elĉerpita, forto-manka?
Sin en min persiste ŝovas
Sugestaĉoj malesperaj:
Lingvajn barojn venki povas
Ne la homoj efemeraj.
Rezignu mi — neniam venos solvo;
Eĉ ne, kiam en tomb' mi restos polvo.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

W. Somersert Maugham, kiu mortis en 1965, aĝe 91, sopiris respondojn al du demandoj:-

Ĉu ekzistas vivo post morto?

Kian rangon li rajtos en la Literaturo? Se li ricevis respondon al la unua, oni neniam scios ĝin. Kiam oni jam ricevos respondon al la dua, li ne scios ĝin.

19-A AUSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

2-9 Jan., 1974 — Brisbane

La kongreso okazos ĉe Internacia Domo de la Kvinlanda Universitato en St. Lucia. Ĝi estos "enloĝa" kongreso. La loĝejo konsistas el komfortaj, unulitaj ĉambroj. La rivero Brisbane ĉirkaŭas triflanke la 260-akrean terenon de la Universitato. Kongresanoj rajtas uzi la naĝejon. La Kongresa Komitato certe laboros forte por fari vian restadon agrabla kaj interesa.

Loko Kongresa Komitato: Prez, kaj Transporto: S-ro Mal Robinson; Sekr. S-ino W. Greenhalgh; 2-a Sekr. kaj Koncerto: S-ino E. Gardiner; Kasisto: S-ino S. Martin; Protokolo: F-ino B. Allatt; Informado kaj gazetaro: S-ro T. Steele; Gastigantoj: S-inoj V. Robinson & J. Elvidge; Ekspozicio: S-roj T. O'Grady, H. Brendel, D. Wright.

Kongres-Kotizo (por A. E. A.-membroj) \$6 (ĝis 1/7/73), por ne-membroj de AEA: \$7.- Sendu la kotizon al la kasistino: **S-ino S. Martin, 48 Launceston St. Salisbury, 4107.** Aldonu \$5 kiel deponon por loĝejo kaj afrankitan respond-koverton.

Teatra Konkurso: Ni esperas ke multaj kluboj sendos geaktorajn. La Brisbana E-Societo donacos premion por la plej bona mallonga skeĉo. (La Universitato havas taŭgan malgrandan teatron).

First List of Congress Members:

1. Mr. H. Koppel, Melbourne
2. Mrs. F. Koppel, Melbourne.
3. Mrs. E. Gardiner, Highgate Hill, Q.
4. Mr. M. Robinson, Aspley, Q.
5. Mrs. V. Robinson, Aspley, Q.
6. Mrs. W. Greenhalgh, St. Lucia, Q.
7. Mrs. S. Martin, Salisbury, Q'ld.

AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO OFICIALA INFORMILO

NOVAJ ANOJ

- HARRIS,** F-ino R. J., Port Moresby, P.N.G.
BEASLEY, S-ro D. J., Cooranbong, N.S.W.
WILLIAMS, S-ro M. F., Gwynneville, N.S.W.

T.G.M.F.

- GRANT,** S-ro E. T., via Mackay, Qld. \$2.00
DAVIES, F-ino D., Bouldercombe, Qld. 2.00
GRAHAM, S-ino E., Balgowlah, N.S.W. 4.00
ANONCO

En la antaŭa eldonaĵo vi rimarkis anoncon pri verdaj kartoj. Multe da klopodo pri taŭgeco de enhavo produktis

—ni kredas—tre plaĉan, modernan kaj allogan inviton al la publiko ekkonsideri la meriton de Esperanto.

Tamen, ankoraŭ unu ingredienco estas absolute bezonata — via helpo. Mi petu al vi—voku por ili, skribu por ili, demandu pri ili — per via klubsekretario aŭ rekte.

Russ Baxter, Sek., 3 novembro, 1972.

A.E.A. EXAMINATIONS

Elementary:

R. A. Ritchie, Nambour, Q., honors.
 G. Clarke, Orrooro, S.A., honors.

PRI ADRESARO: (Korekto)

Kirkwood, S-ino G., P.O. Box 78, Coffs Harbour Jetty (N.S.W.) 2451 D.B.E.A., I.
 Holmes, S-ro P. 8 Villiers St., Seymour 3660. D.B.E.A.

A.E.A. ESTRARO ALVOKAS

Dum la 2-jara financa periodo ĝis la 30-a de nov., 1971, antaŭ la Kongreso en Melburno en jan. ĉi-jare, la Aŭstralia E-Asocio elspezis \$788 pro ĝenerala publikeco kaj membreca plialtigo. Pluraj presajoj de Verdaj Kartoj kostis: \$258.55; 3000 ekz-oj de "Freedom of Speech", \$417; papero, kovertoj, afranko kaj sekretariaj elspezoj sumis \$112.45: entute \$788.

La supro estas tute aparta de la kampanjo por la reklamo en "Reader's Digest", kostinta \$1290. Ĝi estis elpagita el donacoj per membroj kaj organizoj.

La publikeca buĝeto kaj plialtigo por la nuna dujara financa periodo devos esti pli alta ol en la lasta tempo konsiderata, pro senĉese kreskanta kosto. Publikecon kaj antaŭenigajn elspezojn ni devos elpigi per donacoj, ĉar la nuna kotizo je \$3.00 poĵare ne povas per si mem pagi la koston de eldonado kaj elsendado de "The A.E.". De post la Kongreso 1972 tiu kosto plialtiĝis 50% — po \$100 por eldono de 550 ekz-oj, inkluzive de afranko — ĝis nun: po \$150 por ĉiu eldono.

Nia publikeca fonduso, inde nomita "La Tajni Goldsmith Memoriga Fonduso por Publikeco" memore al homo, kiu donis sian tutan vivon al la movado, bezonas la subtenon de ĉiu membro, kiu povas kontribui. La Estraro kore alvokas ĉiujn honori la memoron de Tajni kaj samtempe plialtigi la progreson de Esperanto per sia malavareco.

- Jam anoncita en la aŭgusta "The A.E." \$327.00
S-ino O. Russell, Manly, N.S.W. 5.00
F-ino B. C. Williams, Violet Town, Victoria 10.00

S-ino B. Bennett, Manly N.S.W.	1.00
S-ino V. Cox, Surrey Hills, Vic.	5.00
F-ino J. Stubbs	2.70
S-ino C. M. Smith	5.00
S-ino E. Graham, Manly N.S.W.	4.00
S-ro K. L. G. Smith, Manly N.S.W.	15.00

La ĝisdata sumo de la T.G.M.F.
por Publikeco \$374.70

"Robbie" Robertson, prez-o; Russ Baxter, sek-io; Les Scott, kasisto.

JUNULAJ FANTAZIOJ

En fama muzik-centro, gvidisto sur podio,
Por ĉarmi ĉiun koron per bela harmonio:
En melodia regno, kie sin ĉiame trovas
La sonodolĉo, kiu min ĉiame vibre movas.

Nokturn' kaj danc' kaj uvertur', pavano
—kia belo!

Animkaresaj sonoj fluadantaj tra orelo!

Stari, pugnoj venklevitaj en ĉefa
boksareno,
Gui laŭdon de dek miloj ĉe tiu fama
sceno.

Jam ĉampion' de l'tuta mond', neniam
malvenkita,

Kaj poste laŭrokrone kaj honore
"emerita";

Allasi al Boks-Histori' rekordon por
inspiri

Junulojn de la Nobla Art', ardantaj por
laŭiri

Doloran vojon de l'Aren' kaj gajni
boksrenomon

En lokoj ĉiulandaj — honoron, famon,
monon.

Klarigi malfacilojn de la lingvoj longe
mortaj

El fundaj scioj en la kapo mia tre
bonordaj

Hebrea laŭ la Sankta Skrib', majesta
proz' Romia,

Klasika Greka, kaj la posta form'
Evangelia (1),

Obskuraj tekstoj, eksegez', kapricoj de
la tensoj —

Ho, kia nutro por l'anim', plaĉado al la
sensoj!

Kiam juna, pens-humora, ofte tiel mi
pri-revis,

Sed, per dekret' de Dio, mi alion fari
devis;

Rutina mia vivotask', do mankis al ĝi
famo—

"Valoras nur honesta far', kaj dev-
plenuma amo!" — Farbo.

(1) La "koinee", popola formo de la
Greka; originala lingvo de la Nova
Testamento.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: "Interrompota Rakonto" estis la temo de nia kunveno de 11/10, kiun estris S-ro Howard. Komence kelkaj interrompis la preleginton, sed ĉar la rakonto fariĝis treege interesa interrompoj baldaŭ ĉesis, ĉar fine ĉiuj aŭskultis atente.

"Kion vi vidas?" — lumbildparolado de S-ro Hawks. Li montris diapozitivojn pri Francujo, Grekujo kaj Afriko kaj laborigis nin per demandoj. Je 8/11 S-ro Howard disdonis multobligitajn bildojn kaj invitis ĉeestantojn priskribi, laŭ iliaj vidpunktoj, la eventojn kiujn la bildoj mense-vekas. La diversaj rakontoj ĉerpitaj el la sama bildo montris la variantojn de la homa menso.

La penoj por enkonduki E-on en lernejojn senĉese okupas la mensojn de la publicistino, la sekretario kaj prezidanto. Subtenas ilin aliaj anoj per intervjuoj de eminentuloj pri edukaj aferoj. — G. Pollard.

MELBOURNE: Je 9/10 membroj kiuj partoprenis la tre sukcesan konferencon en Morwell, vice rakontis pri la multvaria programo. (Vd. "AE" p. 259 & 260). Semajnon poste S-ino F. Koppel prelegis pri la origino de bonekonata ŝercnomo "Uncle Sam", de la skribmaŝino kaj de populara manĝaĵo "Terpomfritajoj". Poste, la ĉeestantoj tostis la sanon de la 80-jaraĝa eksprezidanto S-ro E. McKenzie per "malsanigaĵ" kafo kaj kuko.

Prez. H. Beechey; ĵus reveninta post 3-semajna ferio, rakontis (23/10) pri du ekscitaj aĉetoj — nova feria domo sur duoninsulo Mornington kaj nova aŭtomobilo; sed feria agado konsistis grandparte el laboro en kaj ĉirkaŭ la nova dometo.

Treege sukcesa estis la "Pionira Vespero", 30/10. Ĉeestis 26 inkluzive anojn de la Malvern E-Grupo kaj Gesroj I. Maddern kaj S-ino M. Wybenga el Morwell. S-ro Maddern skizis la vivhistorion de John Booth, fondinto de la 1-a E-klubo en Aŭstralio. C. Lanyon priskribis la agadon de sia tre aktiva kaj progresema patro. Percy Holmes priskribis renkontiĝojn kun diversaj pioniroj kaj faris tributon al sia instruisto F-ino V. Cox, kies ĉeesto ĝojigis nin. M. Cohen aldonis informon pri S-ro F. McKenzie, multjara Prezidanto de la Melb. E-Soc. kaj samtempe transdonis memorajon nome de la Societo. Fine Ken Linton dankis al S-ro Maddern, ĉefa instiginto de la okazo, pro ties donaco de bele enkadrigita bildo de John Booth al M.E.S. Finfine la paroladan soifon oni kuracis per teo kaj luksa vespermanĝeto. Vidu raporton alipaĝe.

F. R. Banham parolis, 6/11, pri la temo "Ĉu Esperanto estas triumfonta?" Li konsilis ke tio povos okazi nur se ni venkos la pesimismojn kaj pensos pozitivajn. Kiel bona ekzemplo li aludis al artikolo de D-ro Zamenhof en Fundamento Krestomatia "Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia". Poste li distris nin per du amuzaj rakontoj — "La Kristnaska Pudingo" kaj "La Hundo kaj la Dingo".

Nia Vic-Prezidanto Arnold Baldwin nuntempe travojaĝas Eŭropon. El liaj regulaj raportoj H. Koppel, 13/11, ĉerpis rakontojn. Arnold vizitis la "Aŭstralian Cambron" en la U.E.A.-Domo en Rotterdam, la centran oficejon de S.A.T. en Parizo, samurbe la ĉefoficejon de la Franca E-Unuiĝo kaj la B.E.A. oficejon en Londono. Inter gravaj kluboj li vizitis grupon en Parizo kaj la Londonan E-Klubon. En Vieno "Radio Vieno" surbendigis intervjuon kun li kaj li prelegis por la Esp.-Soc. "Harmonio". Je 20/11 Ken Linton daŭrigis sian serion pri Hindujo. Li montris treege interesajn bildojn pri la regiono de la montaro Himalajo.

BORONIA, Vik. Niaj membroj Heather kaj Ivan Heldzingen vizitis la japanan ŝipon "Nippon Maru", post avizo de la Osaka E-Servo Centro" ke E-isto F-ino F. Kamaĉi eble bezonos gastigon dum ŝi estas en Melbourne. Malfeliĉe f-ino Kamaĉ jam aranĝis sian programon kaj ne povis akcepti la inviton de Ges-roj Heldzingen. Tamen, Ges-roj Heldzingen havis la oportunon varbi por Esperanto inter ne-esperantistaj japanoj kaj estis mem gastigitaj per japanaj nutraĵoj kaj trinkaĵoj.

CANBERRA: Membroj kunvenis en la hejmo de Prez. Noel Gamble por saluti A.E.A. Prez. Prof. R. Robertson, kiu kun la edzino pasigis semajnon en la ĉefurbo. "Canberra News" raportis pri la kunveno. Alia kunveno okazis en la loĝejo de Ges-roj D. Kane, kiuj baldaŭ iros al Tajvano por resti tie dum unu jaro.

Harry Torr, kunfondinto de la klubo, kaj S-ino Joyce Torr, dum 20 jaroj fidela instruisto kaj komitatano, emeritiĝis kaj translokiĝis al la "Ora Bordo". 181 gejunuloj de la japana bonvol-misio vizitis Kanberon. La Japan-Aŭstralia Societo invitis niajn membrojn por renkonti la solan E-iston de la Misio, F-inon Fumiko Kamaĉi el Osaka. Ni ne nur havis oportunon paroli kun ŝi, sed ricevis de ŝi belajn donacojn.

Gojigan Kristnaskon kaj Feliĉan Novjaron al ĉiuj! Ne forgesu kontakti nin, se vi vizitos Kanberon dum viaj ferioj.—Noel Gamble.

SYDNEY: 16/10 Fidelaj membroj, kiuj spitis la pluvegon interbabilis pri E-aferoj. 23/10: La gastparolanto estis S-ino M. McKenzie. Temo: "La Panorama Vidajo de la Vivo" laŭ teozofio; ŝi asertis, ke ĝiaj idealoj similas tiujn de E-o. La Rotaria Klubo en Concord (Sidnejo) invitis al Wre. Chandler paroli pri E-o ĉe ĝia kunveno 27/11.

30/10: Ni bonvenigis al Frank Wyndham el Hornsby kaj esperas vidi lin ofte. Volo Guelting trovis tre sukcesa, ĝoja kaj helpa la Kunvenon de la E.F.N.S.K. ĉe Bathurst. (Vidu raporton alpage.) Ivan Maddern sendis al ni filmon pri sia vizito al la E-Kongreso en Portland (Usono). Ni esperas ĝin baldaŭ vidi. D-ro Gordon Payne parolis atentostreĉe pri sia lastatempa esplorado en Parizo enquete la Francan Revolucion, kaj ankaŭ pri arkeologiaj aferoj Ankaŭ lin ni esperas reaŭskulti.

6/11: Volo Guelting prezentis nostalgiajn lumbildojn de la 18-a Aŭstralia E-Kongreso. Inter bildoj de la Teatraja Vespero ni re-vidis Tajnion Goldsmith ludanta rolon de kuracisto en lerta skizo kun Lilio. Poste Volo legis el la "Germana E-Revuo" bonegan prelegon de Ralph Harry, en kiu tiu emfazis, ke E-o lin helpis en sia diplomata laboro diverslande. Bona propagando estis intervjuo inter Isabelle Lukas kaj Wre Chandler en "Sun-Herald" 5/11: "Esperanto kiel monda lingvo: nova espero". Wre ankaŭ donis paroladon ĉe la James Ruse Agricultural High School, kaj 23/11 Victor Bourlin montris sian "Grimacoj de la Mondo" ĉe la Eduka Asocio en Dubbo; malgraŭ ke ĝi estos en la Angla lingvo, ĝi havos rilaton al E-propagando.

13/11: Laŭpete, Wre Chandler ripetis sian fantazian paroladon pri Noa kaj la marsupiuloj. Ni bonvenigis Ges-rojn John Coshman kiel vizitantojn al la Klubo. Li lernas E-on ĉe la hejma klaso de Fritz Mueller-Sorau.

BRISBANE: Pro la pli varma vetero niaj somera aktiveco komenciĝis per studtago je 1-a de Okt., ĉe la hejmo de Alison kaj Bob Edmeades. Ni tagmanĝis subĉiele kaj trinkis bongustan vinon, faritan de Bob mem. Guinda Esperantotago! En oktobro ĉe Monto Tambourine okazis la semajnfino de la Kvinlanda Federacio. La Brisbanaj E-istoj estis la gastigantoj. La programo estis tre sukcesa. Aliaj grupoj, kiuj partoprenis estis Caloundra, Sherwood kaj Too-woomba. Kompreneble, kiuj forte kontribuis al la sukceso.

Je 25/8 Winsome Greenhalgh gastparolis ĉe kunveno de la St. Lucia Rondo. La anoj estas grupo de naj-

baroj, kiuj vigle interesiĝas pri kulturaj temoj. Ili petis al Winsome paroli pri la internacia lingvo. Je 30/10 Arthur Deutscher gastparolis al junaj Rotarianoj en Newstead.

Nia aktiva anino W. Greenhalgh ĉeestis la E-Konferencon en Morwell kaj poste en Brisbane raportis pri la interesa sperto ĉe Morwell. Ivan Maddern afable sendis al ni sonbendon pri tiu okazo kaj pri la Universala Kongreso en Portland.

La Brisbana Zamenhof-festo okazos ĉe la hejmo de Ges-roj Jullie. Estos rost-festo subĉiele. Ni antaŭguas renkonti la anojn kaj ties familianojn.—V. Robinson.

TOOWOOMBA: La loka gazeto "Downs Star" detale raportis pri la konferenco de la Kvinlanda Federacio en kiu partoprenis kelkaj anoj de nia klubo.

Esperanto-Federacio de Viktorio

Post sia tre sukcesa konferenco en Morwell, la E-Federacio de Viktorio organizis 2 pluajn interesajn renkontiĝojn.

Je 24-a Okt. po 4 reprezentantoj el ĉiuj kvar Melburnaj E-grupoj vizitis la Centran Klafikan Departementon de la Melburna Cef-Poŝtofiĉejo, kaj ili pasigis du edukajn horojn, esplorante kaj observante la laboron de centoj da homoj sur la 4 etaĝoj de la Centra Poŝtofiĉejo. Speciale interesaj estis la nove akiritaj klasif-maŝinoj el Japanujo.

Dudek personoj el ĉiuj 4 grupoj ĉeestis, 18/11, renkontiĝon en la hejmo de Ges-roj I. Heldzingen. La ĉeestantoj konkursis en diversaj ludoj, kaj la Boronia grupo gajnis la plej altan poentaron. Sunbrila vetero favoris la kunvenon, kiu finiĝis per kradrosta vespermanĝo. Dankon al Ges-roj Heldzingen ne nur pro ilia gastamo, sed ankaŭ pro donaco de la manĝokostoj al la malforta kaso de la Federacio.—H.K.

MONPETADO ĈE HEJMOJ

Antaŭ multaj jaroj, serv-organizo de kiu mi estis prezidanto uzis la hejmskatolojn poŝtajn ĉirkaŭ elektitaj antaŭurboj de Sidnejo por fari monpetadon. El tiu kampanjo ni ricevis pli ol 700 dol., t.e. meznombre 4 ŝilingoj (40 c.) per ĉiu letero. Elstara sukceso! Mi ne antaŭvidas similan sukceson per la blankaj kartoj, sed, se ni ricevos respondon de nur 2% el la ricevantoj, tio signifos duobligon de nia membraro en la lokoj kie la kartoj estos disdonitaj.—Wre. Chandler.

JOHN BOOTH; H. M. LANYON

At no small cost in time and money, Mr. Ivan Maddern researched the background of John Booth, the founder of the first Esperanto society in Australia in 1905. This formed the substance of his talk at the Melbourne Esperanto Society on 30 October. Of the 24 members of that original group, I find the names of 14 in the Year Book of 1907 (Adresaro de D-ro Zamenhof), which lists 75 names of that foundation group. Of the original members C. W. Thonger was active until later, and A. Wallace—could he be the Mr. Wallace who was later the editor of the old School Paper?

The fourteen members of the original group mentioned in the Yearbook of 1907 are: E. B. J. Crawford, P. Connolly, E. Eberbach, O. Krome, F. D. Rossiter, Grant Smith, Miss H. McDowell, Ch. W. Thonger, J., D., H., R., M., Fl. Booth.

There is no F. E. J. Cobb (original member) in the Yearbook, but there are three Cobbes: G., J., and J. Fr. Sofala Cobbe (all "Australia").

The life of John Booth (1857-1920) covered that of Zamenhof (1859-1917). Mr. Maddern traced the family background and genealogy, the education and subsequent career of John Booth in science and engineering, his marriage and descendants. He married Marion Parker in 1879; their children were two sons and three daughters. The daughters never married. Son Orville had no children; Wilfred had two sons. One of them, Alfred, has no children; the other, John, died in the Second World War, leaving a baby boy, John Booth, whose whereabouts are not known by us.

Mr. Cecil Lanyon followed with a talk on his father, Henry Maynard Lanyon, Esperantist from 1907. He was born near Ballarat in 1876 and later lived at Boort. He began his teaching career in 1891 in the Geelong State School, thereafter serving in some dozen centres in Victoria. He retired from the Education Dept. in 1941 and died in 1967.

A man of wide and intense public interests, he thought, wrote and worked with foresight and fervor on the social problems of the time.

Mr. Percy Holmes, Esperantist from the 1920's told with fluent, sparkling humor of those early days and his impressions of the old Melbourne Esperanto Society and the Melbourne Esperanto Club, then separate bodies—Editor.

Three foolscap folios: La Esperantaj Pioniroj de Viktorio (Booth, Lanyon) may be had from Mr. Maddern.

PIONEERS: 1914, 1920.

We have the Yearbooks of the U.E.A. for those years; others are missing. In them we find:

- 1914.—Adelaide: L. Lyall, del.
Hobart: Norman Carryer, del.
Melbourne: Gerald Whiteford, del.; Esperanto-office, Mr. Edmanson, 152 Elizabeth-st.
Sydney: Mary Adamson, del.; Miss E. M. Andrews, vice-del.; sub-del., Miss M. E. Andrew. W. Fairless, Mr. Chedghey; Misses Orr, E. Scheidel.
1920.—Melbourne: C. W. Ballard, del.; M. Hyde, vice-del.
Hobart: Douglas Gilbert, del.
None for the other capitals.

PUBLIKAJ PAROLADOJ

Petoj kaj invitoj por paroladoj pri Esperanto fare de organizoj, kia Rotaria kaj aliaj, nun okazas pli kaj pli ofte. Pro tio ni ja ĝojas.

Necesas, ke ni ĉiam akceptu tiujn invitojn, sed povas esti, ke iuj membroj ne sentas sin kapablaj publike paroladi. Se vi estas tia persono, mi povas vin helpi.

Mi ĵus ricevis de nia Rockhamptona delegito, John Moore, kopion de parolado, kiun li faris ĉe la loka Rotario. Ĝi estas bonege elpensita kaj aranĝita, kaj eĉ se vi havas nenian pretendon esti oratoro, ĵen estas parolado, kiun vi povus simple legi kun tre impresa efiko. Petu ekzempleron de S-ro John Moore, 34 Hadgraft St., Rockhampton North, 4701. Li estas preta vin helpi. — K. G. Linton, vic.-prez.

ESPERANTO LECTORATE

Dr. B. Cavanagh is now university lecturer in Liverpool. In 1931 Prof. W. E. Collinson was appointed lecturer in Esperanto there. It is the first lectureship to be established in Great Britain. He died in 1969.

The lectorate is now independent of, instead of ancillary to, the Chair of German Studies. Dr. Cavanagh was for six years president of the B.E.A.

INFORMA SERVO

Kontraŭ afrankita koverta, la redaktoro estas volonte preta respondi al demandoj pri lingvaj, historiaj, bibliografiaj, pripersonaj kaj aliaj demandoj pri ĉio, kio koncernas Esperanton. Tion li plenumus laŭ sia modesta kapablo, kaj en la kadro de siaj referencaj rimedoj.

CHRISTMAS IS HERE AGAIN . . .

Among E-ists there will be heard: "What can I give to him or her?" "What would I like as a present?" Worthy of favorable consideration is the Esperanto Bible, translated by Dr. Zamenhof, himself no less. That is, the Old Testament part. In style and usage the New Testament was brought as closely as possible into conformity with it. Every real E-ist should have one. It should be procurable at the Bible House in Flinders St., Melbourne, or — in other cities — at a centre of the British and Foreign Bible Society, which published it. Failing this, it may be ordered from the B.E.A. in London through our agent.

N.S.K. FEDERACIA KONFERENC

En la 28-29 okt., 42 membroj kaj amikoj de la Federacio ĉestis la jaran ĉefkunvenon kaj konferencen ĉe Bathurst 130 mejlojn for de Sidnejo. Ili venis el Kanbero, Oranĝo, Woodstock kaj Sidnejo. La "Motor Lodge" provizis plejbonan servon. La konferenco estis tre sukcesa. Multaj partoprenis la diskutojn. La prez-o de A.E.A., Prof-o "Robbie" Robertson, interese parolis pri la Asocio, ĝiaj atingoj kaj planoj.

Ĉe la Amuza Vespero, kondukita de Arthur Cocking, membroj mem provizis la programon. Elstaris du teatraĵetoj de la Manly Drama Grupo, preparitaj de S-ino M. Liston; krome estis konkursoj, lumbildoj, muziko kaj kantado. Post legado de Volo Gueltling, la ĝuinta vespero finiĝis per kafo.

Dimanĉmatene la grupo busveturis al vidindaĵoj de la urbo, gvidita de Gordon Bullock, estro de la Turisma Oficejo de Bathurst; inter ili la "Panorama Racing Circuit" . . . Rondirejo Panoram Kurkonkurs. Multaj el ni haltis por lunĉo ĉe la Elvidejo Hawkesbury.

E-o estis bone praktikata dum la konferenco, en la oficialaj programoj kaj konsversacioj. Ĉiuj laŭdis ĝin unu el la plejmulte ĝuaj semajnfinoj. En la loka gazeto aperis bona artikolo pri ĝi, do nia publikeco en la regiono kreskis.

La Federacio okazigos piknikojn ĉiumonate kaj la Zamenhofan Vesperon ĉe Esperanta Domo, Redfern, en 16 dec. — "Elvies".

Frazo ofte miskomprenata.

" . . . it is a custom more honoured in the breach than in the observance". Akto 1, sc. 4, Hamlet.

Zamenhof: tute korekte, — "estas pli honore forgesi tiun moron, ol ĝin sekvi".

BONVOLU RIDETI

Iu klientino telefone plendis al firmo. Ŝi ne ricevis kontentigan klarigon de komizo kiu respondis al ŝi. Tial ŝi postulis, ke la komizo venigu la direktiston por kun ŝi paroli. "Certe, sinjorino", respondis la komizo. Li sin turnis al siaj kunuloj en la oficejo, forgesante kovri la ricevilon, kaj ŝi aŭdis lin diri: "Kiu el vi volas servi hodiaŭ kiel direktisto?"

Unua viro: (jus proponinta konsilon): "Ho, pardonu min, sed la tento proponi konsilon estas ofte nerezistebla".

Dua viro: "Tute ne gravas; la kapablo ĝin ignori estas universala".

Iu demandis al Marlene Dietrich: ĉu plaĉas al ŝi vidi imitantinojn de ŝiaj prezentaĵoj? Ŝi respondis: "Nur tiam, kiam ili malbone min imitas".

Ce la hejmo de Skota pastro, viro proponis sian tabakosakon al li, por ke li prenu piplenon. La pastro ne volis akcepti la amikan geston, dirante: "Dankon, sed mi ne plu fumas tabakon. Kiam ĝi estis mia propra aĉetaĵo, mi dolore pensis pri la terure alta kosto; kiam ĝi apartenis al alia homo, mi tiel prem-dense pakis ĝin en la pipon, ke mi ne povis bloveti tra la tubo".

Dikkorpa viro stumblis laŭ irejo sur buso kaj sidigis apud nervoza vireto. Ignorante averton kontraŭ fumado, li elprenis cigaton. Diris li: "Ne ĝenos vin mia fumo, ĉu?" Respondis la alia: "Ĉu ĝenos vin mia atako voma?"

Kuracisto: Se mi trovos operacion necesa, ĉu vi povos pagi por ĝi?

Paciento: Se mi ne havus monon por pagi vin, ĉu vi trovos operacion necesa?

ESTONOJ KAJ ESPERANTO

En Sidnejo la Estonlingva kultura ĵurnalo "Kungla" presis foton kaj artikolon de Eino Loooris: "La monda lingvo de la estonteco". Li estas filatela del. de U.E.A. en Hobarto, Tasmanio. Per sonbenda prelego Estonlingva: "Esperanto", li partoprenis en oktobro la Estonan Scienca-Teknikan Konferenco en Filadelfio, Usono.

ANGLAĴO PARLAMENTANA

"Our attitude is a clear one. As yet we have not made up our minds definitely as to what our policy should be".

"What I have never done is fix a date until I have made up my mind what the date is likely to be". — W. McMahon.

Fine ricevinte supozon, ke ni jam divenis la dirvolon de la parolinto, ni provas tradukon:

Nia sinteno estas klara. Ĝis nun ni ne decidis pri tio: kio devos esti nia politiko.

Kion mi neniam faris, tio estas: fiksi daton antaŭ ol mi decidis pri verŝajna dato.

"KOZO"

En poemtraduko L. N. M. Newell uzis la formon: kozo. En letero li nomis ĝin "infano mia". Lia pretendo estas malprava, Laŭ "la Revuo", vol. 5, p. 330, la vorto troviĝas en la Aldono al la Vortaro de Boirac (1909). Li mem elĉerpi el la Pola-Esperanta Vortaro de Grabowski. La signifo: A. thing, Fr. chose, It. cosa, G. Ding, Sache. La P. I. V. ne listas ĝin.

POLOJ PAROLAS:

"Ne sufiĉas konkondi E-on nur en la lernejoj; la sperto ja montras, ke la lerteco en la uzado de fremda lingvo akirita en lernejo estas ĝenerale tre malalta kaj kun la fluo de la tempo tute malaperas, se oni ne uzas tiun lingvon. Do, por ke tiu lingvo adaptiĝu, oni devas al la abiturientoj de lernejoj, en kiuj ĝi estas instruata, doni okazojn kaj impulsojn por uzadi ĝin". — Prof-o Ajdukiewicz.

"Esperanto estas la sola fremda lingvo, kiun sen malfacilaĵoj mi scipovas uzi kaj parole kaj skribe. Aliajn fremdajn lingvojn (kvar) mi sukcesis ekkoni nur pasive, malgraŭ tio, ke por trastudi ilin mi perdis nekompareble pli da tempo. La fascine simpla gramatiko de E-o kaj ĝiaj vortkreaĵoj forigas neceson de senpensa, nelogika "enkapigado". — Prof-o S. Hausbrandt.

"Dum la Olimpiko en Melburno (1956) vizitis min Aŭstraliaj E-istoj, petante fari en ilia klubo prelegon pri Pollando. Tiun ĉi viziton mi ne povas forgesi; tiel koran akcepton mi delonge ne spertis". — Prof-o Jerzy Loth. (Elĉerpe el "Esperanto: eldiroj de Polaj Intelektuloj", Varsovio, 1964).

PRI PRESERAROJ

Sole laborante, via redaktoro per prapraj okuloj kontrolas la tekstojn, kaj pro manko de ĉio-vidpovo foje ne rimarkas eraron; au, presisto kulpas. Korektante eraron en unu linio, li enŝovas eraron en tiun saman linion rekompostatan.

Mr. T. ELLIOTT (Libro-servo).

He will be away from 26 Jan. to 11 Feb., so please get orders in before he leaves.